

THE
A U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y .

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Vol 4, No. 4, JAN., 1944



EDITED BY
F.R.BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSENDON W5., VIC.

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooo
Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

ooooo

1944

Atingon viaj kordeziroj venu;
La belaj revoj ja efektiviĝu.
La bonfortuno vin tre riĉe benu;
Esperoj jam malfortaj reviviĝu!

FRB

C.E.M. JOAD KAJ ALIAJ.

PAROLAS pri internacia lingvo. Diras Joad: "Estas tre nature ke Angloj volonte vidus sian lingvon adoptita kiel internacia. Tia adopto certe plaĉus al nia nacia fieremo kaj konsoli al nia nacia malkompetenteco lerni lingvojn... Por eviti la neceson lingvolerni, la Angloj klopodadis akiri al si Imperion (la lingva avantaĝo kuŝanta en Imperi-posedado estas: ke aliaj homoj devas lerni vian lingvon se ili volas paroli kun vi, aŭ leviĝi soci-range, aŭ ricevi administran oficon---vi ne bezonas lerni iliajn). Mi ne povas favori la Anglan en tiu ĉi afero. La fakto ke ĝi plaĉus al Angla nacifiero havas sian inverson: ĝi ofendus al la nacifiero de neanglosaksoj. ĝi kaŭzus ĵaluzon kaj naskus suspekton ke Britujo kaj Usono avidas mondregadon. La sama malaprobo almenaŭ kelkgrade aplikiĝas ankaŭ al Basic English, malgraŭ ĝia lernfacilo kaj mirinda adekvateco de ĝia 850-vortaro (1). Simile malaprobinda estas ĉiu ajn nacia lingvo, eĉ la Franca, kies koncizo kaj klaro cetere favorus ĝin. Latino estas, ho ve, tro malfacila. Mi devas konfesi, ke taŭgas nur inventita lingvo.... Mi deziras du lingvojn---unu, nia propra; la alia, lingvo por internacia komunikado. Se ni povas kompreni unu la alian per nia helplingvo, ŝajnas al mi nenecese forlasi niajn nacilingvojn. Unu grava danĝero de la moderna civilizacio estas unuformeco. Mi

time antaŭvidas mondon en kiu unusola civilizacio, kompleta kun la samaj Woolworth-oj, kinoj, radio, vestoj, maĝgumo, fraŭlinoj, biero, sternas sian mortecan monotonon de Balham ĝis Bagdab. Mi amas la diversecon en la vivo, kaj la konservado de nenormigitaj lingvoj estas mia opinio unu el la malmultaj ankoraŭ restantaj gardiloj kontraŭ tute stereotipa mondo."

Aliflanke Maj.-Gen. J.E.B.Seely (Lord Mottistone) en "For Ever England" (1933) alpaŝas favore al la Itala. "La Naciara Ligo ordonu ke ĉiu infano lernu unu lingvon krom la patra....Ĝi estu la Itala---la lingvo plej facile literumata, parolata, komprenata, kun literaturo tiel glora, ke eĉ la Franca, Germana kaj Angla devas preskaŭ klini la kapon antaŭ ĝi". Estas tre malŝajne ke konsentus ne-Italoj starigi staton laŭ kio la potenco de la Itala animo sola havus efikon sur la mondon de homoj nepovantaj ekvilibre ricevi similan efikon de la ceteraj kulturoj. Nedezirindaj rezultoj de tia lingva-psika hegemonio estus facile imageblaj.

Aŭdu ankoraŭ Italo-amikon---Prof-o W. Murdoch. Li fervoras jene: "Kiom koncernas la prononcon, la Franca estas verŝajne la plej malfacila lingvo de la Eŭropa kontinento, kaj la Itala la plej facila(2); ĉar la Itala estas fonetike literumata, kaj ĝiaj reguloj estas sen esceptoj (3).....Al niaj infanoj ni devus instruigi fremdan lingvon, ne por ke ili povu ĝin paroli, sed legi. Kiom da Aŭstralianoj, post 4-5 jara lernado de la Franca, povas legi ĝin plezure-facile aŭ eĉ regule penas legadi ĝin? Se tiaj homoj dediĉus la saman tempon al la Itala, ili jam legus Italajn verkojn preskaŭ, se ne tute, samfacile kiel Anglajn. Vi diras 'La Franca estas ŝlosilo al granda literaturo.' Mi konsentas, sed asertas ke la Itala malŝlosas ankoraŭ pli grandan. Kun la sola escepto de la romanoj, la Italoj en ĉiu literatura formo superas al la Francoj." (Lucid Intervals, p.92)

Kompilis F.R.BANHAM.

- (1) Pri tiu "mirinda adekvateco" la legantoj mem juĝu!
- (2) Disputebla! La Hispana kun rajto pretendas al tia. Sed eĉ ĝi havas ĉirkaŭ 810 neregulajn verbojn.
- (3) Tiel en la teksto. Kompreneble Murdoch volas diri ke la fonetiko havas neniujn esceptojn. La gramatiko de la Itala estas plena de komplikajoj. Krome estas almenaŭ 20 klare diferencaj dialektoj. (Rimarkoj de la Trad.)

MASARYK T.G.: La homo ne havas nur amon al sia nacio, sed same tempe la sopiron kunvivi kun nacioj aliaj, celante tuthomaran kunigon. Vera internacieco estas nek kontraŭnacia, nek nenacia.

ESPERANTO VIVAS!

- ARGENTINO:** La Dua Kongreso okazis en Buenos Aires 22-25 Aprilo. En la honora komitato sidis gravaj personoj el la Argentinaj rondoj literatura kaj scienca, kiel ankaŭ la diplomataj reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj Amerikaj landoj. Proks. 300 ĉeestis la malfermon. Oni sendis mesaĝon al la E-istoj kiuj suferas pro la milito. Meso en Esp-o. Du novaj E. Societoj en Buenos Aires---Katolika kaj Art-Kultura. Decido eldoni novan gramatikon kaj starigi superan kurson kun ok fakoj, ĉiu instruata de specialisto.
- BRAZILLO:** Kunsido de Brazila Ligo E-ista 30 Jan. La Poŝto plenumis la peton de la B.L.E. kaj la Instituto de Geografio kaj Statistiko koncerne E-on kaj cenzuron.
- BRITUJO:** La financa stato de la Asocio pliboniĝis pro granda kresko en la nombro da Membroj, la alta nombro da lernantoj per la div. korespondaj kursoj (pli ol 2000) kaj pliboniĝo de la librovendo. Radia Fakterminaro aperos en la dua parto de la Jarlibro de I.E.L.
- EGIPTUJO:** Britoj, Novzelandanoj, Ĉeĥoj, Poloj kaj Egiptoj kunlaboras vigle. Longaj artikoloj aperas diversgazete, en la Araba, Franca, Angla lingvoj. Kurso en Cairo (20); koresponda kurso.
- PALESTINO:** Jarkunveno de la Palestina E. Ligo en Jerusalemo. Parteprenis Judoj, Araboj, Armenoj, Angloj, Amerikanoj, Grekoj, Poloj, Ĉeĥoj, Novzelandanoj k.t.p. Salutleteroj de Prof-oj Flugel kaj Collinson, I.E.L. kaj B.E.A. Gvidanto de la British Council in Nazereth parolis pri E. en Anglujo dum la milito. S-ro Novak en la nomo de la Poloj kortuŝe parolis pri siaj aventuroj en div. landoj, kie fuĝante de Polujo li renkontis samideanojn. La kunveno flame rezoluciis kontraŭ rasismo. La kunveno impresis la urbon; la gazetoj favore detale raportis. Granda ekspozicio de literaturo; 300 ĉe koncerto. D-ro Olsvanger prezidis.
- PORTUGALUJO:** Ĉefdelegito raportas ke jam nur Angla, Germana, Franca, Hispana lingvoj rajtas uzon koresponde. "Nia E-o nun dormas; ĝi ne estas malpermesata, sed praktike ni ne povas uzi ĝin," diras li.
- SVEDUJO:** S-ro Morariu ankoraŭ rondvojaĝas propagande. Nova kurso koresponda; kun 330 personoj. Gazeto.
- SVISUJO:** E-a Tago ĉe Tiĉino 1 Majo. Planoj por estonta laboro. D-ro E.Privat prelegis pri Hindujo.

WORLD ENGLISH.

There are four main possibilities of simplification:-

1. Simplified spelling, i.e., "Anglic."
2. Simplified pronunciation.
3. Simplified and limited vocabulary.
4. Simplified syntax.

If we went the whole hog in all four respects we should produce something like standardised English.

Fear of murdering a living language has prevented anything but the most timid adaptations of English as an auxiliary language. Anglic simplifies the spelling, Basic English the vocabulary....When you give a man a grammar and a dictionary, however short, have you shown him a short cut to speech? It may eventually be proved that by limiting him to a small number of words and sentence patterns you have made things more difficult for him. And if English were to be pidginized the simplification of pronunciation would have to be based on those differences of sounds which most men could hear and learn to make fairly easily without expert tuition. English speakers would have to learn it as a foreign language. We do not know yet how easy or how difficult that would be. ("The Tongues of Men", J.R.Frith, Univ. Coll. London, 1937)

MALGAJA FAMILIO EN DVINSK.

(Ĉapitro 1 el "Coco The Clown" de Nicolai Poliakoff.)

En Decembro 1905, kiam mi ĵus estis kvinjara, Dvinsk estis malgranda urbo, ĉirkaŭ 300 mejlojn sude de Leningrad, aŭ St. Petersburg, kiel ĝi nomiĝis tiam, kaj ĉirkaŭ 95 mejlojn de Riga.

Estis mezo de vintro en Dvinsk---tranĉe malyarme kun plumbe-griza ĉielo, kaj ĉio kaŝita en profunda neĝo. Ĉe la rando de la urbo, en la Verd-strato, estis granda domo dividita en apartamentojn, kaj en tri teretaĝaj ĉambroj tie vivis granda familio. Estis patrino kaj patro kaj ok junaj infanoj.

Homoj en- kaj eliris la ĉambrojn, kaj ĉio estis bruo kaj aĝemo. Meze en la tumulto la ok infanoj mallaŭte ploradis. La pli junaj ne sciis, kial ili ploris; ili ploris, ĉar la pli aĝaj ploris. Najbaroj provis, konsoli la virinon, kiu alkroĉiĝis al sia edzo kaj ploris obstinege. Li provis, kvietigi ŝin, milde dirante ke li baldaŭ revenos.

La plej aĝa knabo iris al sia patrino. "Ho, patrino, patrino, ne ploru tiel," li diris. "Patro baldaŭ revenos."---Tiu knabo estis mia plej aĝa frato Aleksandro kaj la viro estis mia patro. Li estis mobilizita, por batali en la rusa armeo kontraŭ la japa-

naj invadistoj.

Mi sentis min mizera, ĉar mia patro devos foriri de ni, kaj pli mizera, ĉar mia patrino tiel ploris, kaj tial mi ankaŭ ploris. Sed mi memoras, ke samtempe mi sentis feliĉon kaj fieron vidante mian patron vestita en tia eleganta uniformo. Li havis grandan nigran ursofelon sur la kapo kaj belajn altajn tubo-botojn, kaj pleje el ĉio mi ŝatis la municia-zonon ĉirkaŭ lia talio.

Mia patro forlasis nin. Mi kuris al mia patrino kaj diris: "Ne ploru, patrino. Patro baldaŭ finos la militon." Mia patrino kisis min, sed Aleksandro diris: "Silentu, Nikolai. Silentu kaj iru en la liton." Mi enlitiĝis, sed pasis longa tempo, antaŭ ol mi ekdormis. Ŝajnis al mi, ke mi povas vidi armeojn de soldatoj preterpasantaj antaŭ miaj okuloj, mia patro inter ili, kaj mi miris, kial li devis foriri kaj forlasi nin.

Mia patrino ne enlitiĝis en tiu nokto. Kiam mia plej juna frato, kiu ne havis pli ol ok monatojn, komencis plori, ŝi prenis lin en siajn brakojn kaj vartis lin antaŭ la fajro plorante mallaŭte. Neniu el ni iris al la lernejo la sekvintan matenon. Mi eliris en la korton mallantaŭ la domo, kie ĉiuj infanoj ludis. Kiam ili ekvidis min, ĉiuj kriis: "Jen Nikolai. Lia patro iris en la militon."

Mi paŝadis kun antaŭenpuŝita brusto, tre fiero pri mia patro. Unu el miaj amikoj venis al mi dirante: "Nu, Nikolai, ne plu teatro por vi." Tio ree tre malgajigis min. Mi amis la teatron. Mia patro estis rekvizitisto (property-man) en la sola teatro de la urbo. Preskaŭ ĉiutage li estis kunpreninta min tien, kaj mi sopirdeziris, plenkreskiĝi, por ke mi povu labori en teatro. Eble mi sentis tiel, ĉar la unua objekto, kiun miaj okuloj vidis, estis la interno de teatro. Tio estas la vero, ĉar mi naskiĝis en teatro. Mia patrino kutime helpis al mia patro pri la kostumoj en teatro en Bezinovic.

Unutage ŝi ekmalsaniĝis kaj oni venigis kuraciston. Kiam li elvenis el la tualet-ĉambro, kie ŝi kuŝis, li diris al mia patro: "Gratulon, sinjoro Poliakov, vi havas belan knabon."

-----P. SCHWERIN (Trad.)

ESPERANTO KAJ KONKOJ.

Mi neniam science studis la konkojn, do ne estas konkologisto. Malgraŭ tio mi sciigis ke Esperanto povas tre utili al tiuj homoj konkoomaj. Antaŭ multe da jaroj mi loĝis en Tacoma, Vaŝingtono, kaj interesiĝis en kolektado de belaj konkoj el Puget-Sound. Fine mi posedis konkaron egalan kun kiu ajn alia en la urbo.

Unu tagon venis en la kapon ideo ke mi povus pligrandigi la kolekton, havigante al mi specimenojn el fremdaj landoj. Kompreneble, mi tiam povus aĉeti de diversaj firmoj, sed mi sentis

ke pli interese, malpli koste, estus ricevi ilin de amikoj. Esperanto en tio bone servis al mi. Al ĉiuj miaj korespondantoj mi skribis, petante konkojn kaj proponante interesanĝaĵojn.

Siatempe la specimenoj alvenis. Tiuj de Jerusalemo estis la plej interesaj, pro ilia Biblia rilato---konkoj el Rivero Jordan, Galilea Maro, la Meza Maro, ankaŭ terlimakoj de Oliva Monto, Samario, Betlehero.

Konkoj venis ankaŭ de Hispanujo, Portugalujo, Aŭstrio kaj Bulgarujo. La lastan sendis Serg. Teodor Mator de la Bulgara armeo. Li informis min ke li ne loĝas apud tavolo de akvo, tial li devis grimpi monton por kolekti diversajn terkonkojn. Li informis ke tiuj jam dormiĝis por la vintro, sed verŝajne vekiĝos je la ekprintempigo se mi tenos ilin neperturbitaj. Ĉiu konkovo volve havis paperpecon sur kiu sidis ĝia nomo Latina. La pakajo min atingis en Kristnaska semajno. La vetero estis neordinare varma, rozoj floris. Malferminte la skatolon, mi trovis ke la konkoj jam bele revigliĝis, foriĝis el siaj etikedaj (indikaj) paperoj, kaj mikse suĝlitis tien-reen en sia porvojaĝa ujo. Iliaj individuaj identoj ĉiam restis por mi mistero!

D-ro Lehman Wendell en "American E-ist" Majo 1943.

-----FRB. (Trad.)

PARADIZO PERDITA.

El "The World as I See It" de Albert Einstein.

Ĝis malfrue en la 17a jarcento la klerulojn kaj artistojn de tuta Eŭropo tiel strikte kunligis komuna idealo, ke kunlaborado inter ili estis preskaŭ ne tuŝita de politikaj okazaĵoj. Tiun ĉi unuecon pli fortigis la ĝenerala uzo de la Latina lingvo. Hodiaŭ ni rerigardas al tiu aferstato kiel al paradizo perdita. La pasioj de la naciismo jam detruis tiun ĉi komunecon de la intelekto, kaj la Latina lingvo, kiu iam unuigis la tutan mondon, jam mortis. La homoj erudiciaj, perdinte senton de intelekta komuneco, nun fariĝas ĉefaj paroliloj por la nacia tradicio. Nuntempe staras antaŭ ni la kurioza fakto, ke la politikistoj, la praktikaj naci-zorgantoj, fariĝas la elmontrantoj de internaciaj ideoj. Ĝuste ili kreis la Ligon de Nacioj.

-----E. HEARNE. (Trad.)

Laŭ raporto en Palestina Esp. gazeto ricevita de la Nov-Zelanda Asocio la Strato Zamenhof en Tel Aviv estas jam unu el la plej gravaj vivarterioj de tiu urbo.

LA FILO DE L'MUZOJ

("Der Musensohn," Goethe.)

En kampo mi, vagante,
Fajfadadas nun laŭkante
De lok' al loko for!
Kaj laŭ la taktmezuro
Kaj laŭ la marŝplezuro
Moviĝas mia kor'.

Ĝojigas min alveno
De l'floroj en ĝardeno,
Burgonoj ĉirkaŭ ni.
Salutojn mi vin sendas,
Dum vintro mi ne plendas.
Florsonĝojn kantas mi.

Mi kantas ŝur vasteco,
Glacia long', larĝeco,
Al vintro venas bel'!
Foriĝas sonĝa floro
Pro novprintempa horo
Sur monto kaj parcel'.

Renkontas mi junulojn,
Bontaŭgajn danckunulojn,
Instigas ilin mi.
Timulo senĝeniĝas,
Mallertulin' turniĝas
Laŭ mia melodi'.

Vi donas flugilplandojn
Kaj pelas tra la landojn
L'amaton for de mi.
Ho Muzo, dolĉa, dia,
Kiam ĉe brusto ŝia
Ripozon trovos mi?

.....

(trad.) K.HIRSCHHEL

Proza difino: La somera kaj vintra pejzaĝo gajigas la junan poeton. Somere---vaganta; vintre---glitanta sur glacio kaj anticipe kantanta pri la floroj de l'printempo ĝis ili venos. Lia pasio spirite ekbruligas renkontulojn junajn, kiujn li instigas danci. Fine li ekparolas la Muzon, kiu pekas lin, la amanton, kaj demandas: Kiam fine trovos mi ripozon ĉe mia amatino?

ODO BUJID MORTIS.

Prof-o Odo Bujid mortis en Krakovo aĝe 85-jara. Li estis samtempulo kaj konato de Zamenhof en liaj studentaj jaroj, kaj poste unu el la pioniroj de nia lingvo en Polujo. Li studis bakteriologion ĉe Koch kaj Pasteur kaj estis eminenta sur tiu kampo. El lia plumo iris 250 sciencaj artikoloj en la Pola, Germana, Franca kaj Rusa lingvoj. Laŭraporte la Germanoj lasis al li permeson daŭrigi la studojn en la Universitato. Lia agado por E. komenciĝis 1912 en Krakovo. Dank' al liaj pledoj la ŝtatestro Pilsudski favoris E-on kaj patronis la Univ. Kong. de 1931. En 1927-8 Odo Bujwid vojaĝis Brazilon, kaj multe helpis lin tieaj E-istoj. Dum jaroj li proprakoste eldonis "La Pola E-isto" kaj aliajn presaĵojn en E-o. Ĉefulo de la movado en Polujo, lia aŭtoritato ĉe la Polaj E-istoj estis senescepta. Kiel lia Majs-

tro, li mortis en Pola urbo sub Germana okupado en cirkonstancoj tre kontraŭaj al ĉio celata de E-ismo. Tamen tio ne daŭros, nek pereos la laboro kaj influo de tiu granda animo. Ame konservas mi leteron, kiu antaŭ ok jaroj li adresis al mi. En ĝi spiras ankoraŭ lia helpema kaj kuraĝiga spirito.

----- FRB.

TRAĖUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 6: (Kompilita el tri tradukoj.)

Ne estas mirige, ke la Eŭropanoj unue venintaj ĉi tien priskribis Aŭstralion kiel landon de renverso. Kaj ne sen bona kialo! Niaj ĉefaj arboj deigas sian ŝelon anstataŭ siajn foliojn. Niaj sovaĝaj ĉerizoj kaj prunoj portas siajn semojn ekstere de la frukto. La aŭstralia piro povas esti malfermita nur per ĉarpentista ĉizilo aŭ mansegilo. Kelkaj arboj niaj havante dekmilojn da folioj ĵetas nenium ajn ombron, ĉar ĉiu folio turnas sian randon fronte al la suno, por malpliigi forvaporigon. La sal-arbusto tiras la malsekecon ne per siaj radikoj, kiel faras preskaŭ ĉiu alia planto en Kristanujo, sed per siaj folioj el la nokt-aero. Tiuj estis kelkaj el la strangajoj, pri kiuj la fruaj esplorantoj raportis al siaj parencoj. Ili rakontis ankaŭ pri fel-portanta besto, kiu vivas en riveroj kaj demetas ovojn. Pri aliaj fel-portantaj bestoj, kiuj portas siajn idojn en poŝoj; pri birdoj, kiuj havante flugilojn ne povas flugi; kaj pri batalilo, kiu ĵetite eblas reveni kaj ekfrapi la ĵetinton. Stranga lando, vere, kaj lando kun stranga historio.

Venkinta Grupo: WESTERN AŬSTRALIAN ESPERANTO LEAGUE.

Tradukota teksto de Konkurso 8:

Caroline's mother had cooked a new kind of Breakfast Cereal. Caroline thought she would enjoy it. She placed a spoonful in her mouth.

The result was as unexpected as it was terrifying. Almost at once her lips and tongue swelled to double their normal size, she had a violent fit of coughing, and it seemed to her that she was suffocating. The back of her throat swelled, and Caroline lost consciousness. Her mother, frantic with fear, called a doctor who lived next door.

Dr. Smith quickly realizing the situation, filled his syringe with adrenaline, and injected it into Caroline's arm. Several injections were needed before she was all right again, but by early afternoon she was playing around the house as though nothing had happened. (Warren T. Vaughan: Allergy, strangest of all maladies.) Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.2.44
P.E.SCHWERIN, Flat 1, Carabella Flats, McDougall St., Milsons Point, NSW.

ASOCIAJ AFEROJ.ELEKTO DE OFICISTOJ.

Ni atentigas la aliĝintajn grupojn, ke laŭ statuto par. 12 la komitato kaj estraro de AEA reelektiĝos en 1944. La komitatanojn "A" elektas la aliĝintaj grupoj, kiuj rajtas nomi po unu komitatano "A" por ĉiu 10 de siaj membroj.

Ĉar estas la devo de la komitatanoj "A" elekti (1) Komitatanojn "B", (2) la Prezidanton, Sekretarion kaj Estraron, kaj ĉar ili devas voĉdoni por la grupo en decidotaj aferoj, mi petas ĉiun grupon zorge elekti fidelajn reprezentantojn kaj sendi la nomilon al la sekretario ne pli malfrue ol Januaro 31, 1944. Jen formo de nomilo:

"Per tio ĉi ni avizas, ke s-ro (s-ino, f-ino) (a) nom-adreso; (b) nom-adreso estas la laŭregule elektita(j) reprezentanto(j) de tiu ĉi aliĝinta grupo en la AEA komitato. Ĉi tiu grupo nun havas-----membrojn.

XYZ Esp. Club.

Subskribita de Prezidanto kaj Sekretario
aŭ viculoj."

Ĉar la nove elektita komitato estos en ofico kiam paco revenos, ni admonas la aliĝintajn grupojn tre serioze atenti ĉi tiun aferon.

FLORENCE RAWSON (Prezidantino) 7.12.43.

.....
ANONCO! ANONCO!! ANONCO!!!

Al I.E.L. samideanoj kaj membriĝontoj. Senprokraste pagu viajn kotizojn al la subskribinto. I.E.L. bezonas vian helpon. Nepre pagu vian kotizon, varbu almenaŭ unu novan membron, plialtigi vian kategorion. Membro kun Jarlibro (MJ) 5ŝ; Membro-Abonanto (MA) 10ŝ.; Membro-Subtenanto (MS) 25ŝ. Pagu tuj!

L.E.PFAHL, Ĉefdelegito, 64 Brighton St.
Croydon NSW.

.....
ĈEFPROPAGANDISTOJ. Ni ĝojas avizi, ke S-roj S. Wanmer kaj E.G. Littleton (Qsld.) enoficiĝis kiel ĉefpropagandista komitato de AEA. Tiuj sinjoroj jam de longe havas la estimon de samideanoj ĉie pro ilia bona, energia disfamiĝado, kaj la asocio danke akceptas ilian servon. Ĉiu ŝtata propaganda sekretario, kiel ank-aŭ la grupaj laborantoj, ĉiel helpos ilin en tiu grava laboro.

ceptas ilian servon. Ĉiu ŝtata propaganda sekretario, kiel ankaŭ la grupoj laborantoj, ĉiel helpos ilin en tiu grava laboro.

Membroj turnu sin al tiu komitato pri prop. aferoj. Sendu al ili tranĉaĵojn pri int. lingvo aperantajn en lokaj gazetoj, por ke ili havu daŭran informon pri propagando en ĉiu landparto.

Adresu la Komitaton pere de S-ro S. Wanmer, 176 Jubilee Ter., Bardon W4, Brisbane, Q.

D-ro C.J. Caldera, 220 St. Georges Ter., Perth, kaj Westralian Esp. Soc., c/o A.E. Chamberlain, 55 Kenny St., Bassendean, WA, agos kiel prop. sek-ioj en WA.

KORESPONDA KURSO. La Estraro decidis, ke AEA alprenu al si la popularan korespondan kurson bonvole disponigitan de BEA. En Britujo la kurso ĝuas grandan sukceson. Ni esperas ricevi sufiĉe da ekzempleroj por ebligi komencon en Marto aŭ Aprilo. Via estraro invitas donacojn de membroj aŭ grupoj, tiel starigante propagandan kason, kiu ebligos reklamon de la kurso. Sendu donacojn al la subskribinto.

EKZAMENOJ. Estas plaĉe, ke la ekzamenoj antaŭ ekzamenistoj kaj korespondaj estas daŭre popularaj. Ni admonas ĉiun seriozan E-iston konfirmi sian studon per ekzameno. Skribu al Pastro C.C. Cowling, St. Mary's, Tasmanio, aŭ kiel laŭ detaloj en Jarlibro p. 11, kaj en AEM Okt-a n-ro.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ. Membro kun AEM 5ŝ.; AEM al nemembroj 3/6; pagu al F-ino W. ADDIS, 25 GREVILLE Ave., FLINDERS PARK, ADELAIDE. (Ne al la Sekretario).

G.H. HILLERMAN (Sekretario)

BOX 75, DEVONPORT, TAS.

KVINSLANDA VIRINO GAJNAS PYKE-PREMION.

La Pyke Memorial Prize estis fondita de Aŭstraliaj E-istoj por honori la memoron de S-ro J.G. Pyke. La premion (kvin gineoj) ricevas ĉiujare tiu homo, kiu per ekzameno estas rigardata kiel la gajninto post malpli ol jaro da studado. Por 1943 gajnis ĝin S-ino T.B. Freeman, Columboola, Western Line, Kvinlando. Tiu sinjorino, leginte en Februaro artikolon pri Esperanto en The Queensland Countrywoman, tuj eklernis la lingvon. Tiel bone ŝi studis, ke post malpli ol ok-monata okupado ŝi facile venkis.

Koran gratulon!

Henderson. Faru nur tion, kio vin spirite superigas kaj samtempe utilas al tuta homaro.

ZAMENHOFA FESTO EN MELBURNO.

En sia kunvenĉambro 15.12.43 la Melb. E. Klubo sukcese celebris la datrevenon de la Zamenhofa naskiĝo. Pli ol 60 ĉeestis, inter ili S-ino Moore, kiu salutis la klubon nome de la Hobartanoj kaj Tasmaniaj E-istoj ĝenerale. La arĝintoj reve dronis en ondoj da plaĝa sono, kiu perpiane inundis la ĉambron pro la lerta ludado de F-ino A. Godfrey; S-ino Craigie ĉarme kantis Angle kaj E-e; donis plezuron ankaŭ S-ro Lawrence Cowan, bone konata radiartisto, kiu baratone melodiis en maniero vere vibriga. Inter la programeroj zumis arda babilado, kaj post manĝeto finiĝis la lasta kunveno en la komforta ejo de McEwan's Bldgs. La klubĉambro nia de nun estos tiu de la HENRY GEORGE SOCIETY, preskaŭ kontraŭ la Independent Church, Collins St.

S-ro Rawson raportis pri la Pyke Memorial Examination:-

Premion de kvin gineoj gajnis S-ino T.B.FREEMAN, Columboola (Q). Atestkartojn gajnis F-ino H. SYCAMORE, Brisbane; S-ro J.K.BROWN, Brisbane; S-ro ERIC STEVENS, Sidnejo; S-ro W.SINCLAIR, Melbourne. (Kvin kandidatoj el Kvinslando, kvar el Viktorio, du el Nov-Sud-Kimrujo.)

RENDEVUA KONKURSO: KELKAJ sendintaj verkaĵojn tamen ne sendis la enirpagon ŝilingan. Tiu pago estas nur nominala kaj helpus al la kaso de la gazeto. (de S-ro HEARNE.)

"QUEENSLAND COUNTRYWOMAN."

La suprenomita gazeto en sia Decembra numero presis leteron de la Prezidantino de la B.E.A. (London.) Ni aperigas parton de ĝi por interesi al niaj legantoj.

30 Lansdowne Rd.
Muswell Hill, London N 10.

To the Editor,

I was extremely interested to see your issue of Feb. 1 with its article on Esperanto. Mrs. Langtree kindly sent me a copy of it, knowing it would interest me as president of the British Association, and I have passed it on to many other Esperantists in this country.

It is rather wonderful to feel that there exist, apart from the major matters of international policy, so many interests com-

mon to us in the home country and to you at the other end of the world. Esperanto has been very much in the forefront here lately; the British Esperanto Association now has a larger membership than ever before; more than 2300 people have recently enrolled for the correspondence course and over 24,000 signed a petition drawing the attention of the Board of Education to the advisability of introducing Esperanto into the school curriculum. It is already taught in some schools during school hours, and in many places as an extra subject after school. Over 2000 teachers signed the petition, and there is now a Society of British Esperantist Teachers, which is working hard, publishing text books for school use, and organising holiday courses....

Margaret Jay
President, B.E.A.

BUTLER and BASIC.

Opposition springs up to Mr. Churchill. It comes, not from the Labour, Liberal or Communist Party, but from the Esperanto Party. They do not approve of the favour which the Prime Minister shows to Basic English.

Mr. Butler tells me so. Not Mr. "Rab" Butler, the Education Minister. He is a member of the Cabinet's Basic English Committee. But Mr. Montague Butler, the Education Secretary of the Esperantists.

Mr. Butler has a small, pointed, white beard and wears an open-necked shirt. He can fairly be called a practising Esperantist since he was married in Esperanto and brought up his children to speak it before they learned English.

He thinks that Basic English may be all very well as a stepping-stone for foreigners who wish to learn English. But as an international language Basic is the bunk.

It is simply, he says, a kind of pidgin English. If you wanted to order minced veal and onions in Basic you would have to address the waiter like this: "Young beef cut up very small with white roots that make the eyes full of water." Mr. Butler did not tell me the Basic for ~~sau~~sages.

"And how," he asks, "would English people remember what English words they have to forget in speaking Basic?"

-----"Daily Express" (London).

Pres-eraroj en Decembro:- 37/7 pro (por) 37/14 strukturo.
Typewriting errors in this number will be noted in our next.
Note also: p.41, 17 de mals ĉefdelegito. Last p. Ŝia Grafina
Moŝto, Lia ~~Reĝa~~ Moŝto.

KASAJ AFEROJ.

Kotizoj kaj Abonoj. Membroj kaj legantoj estontece bonvolu NE SENDDU kotizojn au abonojn al la Sekretario, sed prefere al F-ino ADDIS, 25 GREVILLE AVENUE, FLINDERS PARK, SOUTH AUS. Ĉi tiun novan arangon ni faris por faciligi la laboren. Bonvolu noti la ŝangon en via Jarlibro.

Ni memorigas la Aliĝintajn Grupojn kiuj ankoraŭ ne pagis la Grupo-Kotizon ke ĝi jam ŝuldiĝas.

KVITANCOJ RICEVITAJ. W.A.E.L. 6/-. W.E.S. 6/-. Lieut. Stephens 10/- S-ro E. Stevens 5/-. S-ino Langtree 5/-. F-ino Telfer 5/-. S-ro E. Dougan 5/-. S-ro T. Dudley 3/6. S-ro A. Shain 5/-. S-ro R. Brown 5/-. S-ro E. Shelton 5/-. Pastro Noake 5/-. S-ro Chamberlain 5/-. S-ino Groeneweg 10/- donaco al la gazeto.

Al "Ĝenerala Kaso" £1/4/-. Al Gazeta Kaso £2/16/6.
Gazetaj Elspezoj £4/3/11. En la Gazeta Kaso £1/5/11.

-----W.ADDIS (Kasistino).

(La suba anekdoto ilustras amuzmaniere la amikan konkursemon inter la Usona kaj la Aŭstralia armeoj. Inter la ceteraj Aŭstraliaj armeopartoj la Naŭa Divizio ŝajne ĝuas vastan reputacion kiel prifierinda soldataro.

A QUESTION OF WORTH.

At a camp up North a picture night for troops at 6d. a ticket. An American and an Australian sat side by side while a newsreel showed fighting on Guadalcanal Island. The Japs were at the receiving end of the business and the American became excited. Said he: "Jest look at them thar Yanks!" The Australian answered not a word. A little later the American, again ecstatic by reason of further exploits by his countrymen, burst out: "Look at 'em! They are all Yankees!" At this the Australian turned his head queously and drawled: "What else do you expect for sixpence---the Ninth Division?"

DEMANDO PRI VALORO.

Ĉe tendaro(1) en nordaŭstralia loko oni prezentis filmon por soldatoj, kiuj enirpagis po ses penceoj. Sidis flank-al-flanke Usonano kaj Aŭstraliano. Novaĵfilmo montris Usonanojn batalantaj venke kontraŭ Japanoj sur Insulo Guadalcanal. La Usonano, ekscitiĝinte pro la faroj de siaj samlandanoj, diris al la Aŭstraliano: "Rigardu, ke ili estas Usonanoj!" La Aŭstraliano fermlipe mutis. Post iom da tempo la Usonano denove ekfervoris: "Rigardu, ke Usonanoj ili ĉiuj estas!" Je tio la Aŭstraliano plendete turnis al la kapon, demandante: "Kion vi esperatendis vidi kontraŭ pageto sespenca---la Naŭan Divizion?" (1) kamploĝejo, kampadejo, tendokampo.

-----H.M.COHEN.

PREFIXES.

BO- BO- denotes relationship by marriage, and is equivalent to
DUON- in-law. LI ESTAS MIA BOPATRO, he is my father-in-law.

GE- DUON- also relates to marriage, meaning half-, or step-.
PRA- MIA DUONFRATO, my half-brother, or stepbrother. It is
DE- also used with such words as DUONPAGO, half pay, DUONJARA,
DIS- half-yearly, etc.
FOR-

EK- GE- Vidu Lecionon 6.

MAL- PRA- denotes great distance of time, past or future. In
NE- relationship, it is the equivalent of the English "fore"
SEN- or "great", "grand"---PRATEMPO, primitive time, PRAAVO,
RE- great grandfather, PRAPATROJ, forefathers.
MEM-

SIN- DE-, DIS-, FOR-, all give an idea of separation or change
VIC- of position. Thus, birds on a tree can (1) DEFLUGI, i.e.,
FI- fly down from the tree to the ground, or (2) DISFLUGI, i.e.,
FUŜ- fly in different directions, disperse, or (3) fly away al-
ĈEF- together from the tree, i.e., FORFLUGI.

EKS- EK- denotes an action just begun, sudden, momentary. ŜI
EKKANTIS, she began to sing, EKDORMI, to fall asleep, EK-
PLORI, to burst into tears. KIAM MI EKPRIPENSAS, When I begin to
think... EKIRI, to start.

MAL-, NE-, SEN-, give an opposite sense to the word they precede.
We have already had MAL- and NE-. SEN- means literally "without".
ĈESI, to stop, SENĈESE, ceaselessly; SENCO, sense, SENSENCA, with-
out meaning, senseless; SENIGI JE, to deprive of, SENKAPIGI, to
decapitate (sen-kap-ig-i).

RE-, like the English means "back" or "again". REFARI, to remake,
REJETI, to throw back; REPAGI, to pay back; REFORMI, to reform.

MEM-, and SIN-, are used to translate the English "self". If the
idea is reflexive, it is better to use SIN-. SINDEFENDO, self-
defence, (one defends ones self, oni defendas sin). SINDONO, de-
votion (i.e., gift of self) SINREGO, self control (self-rule).
But if the idea is not reflexive, use MEM-, MEMEVIDENTA, self-
evident, MEMSTARA, self-dependent.

VIC-, denotes the English "vice", LA VICPREZIDANTO, the vice-
president, VICADMIRALO, vice-admiral.

FI-, FUŜ-, both have a bad meaning, the former in a moral sense.
FI-! For shame! FIAGO, a bad action, FIVORTO, a bad word. But
FUŜ- means badness of quality. FUŜI, to bungle, make a mess of
a thing; FUŜKONSTRUI, to jerry-build; FUŜSKRIBI, to scribble;
FUŜPENTRI, to daub (or PENTRACI); FUŜRIPARI, to tinker (or RIPAR-
ACI); FIPENSO, a shameful thought, FUŜPENSADO, muddled thinking.

ĈEF- is the equivalent of the English chief, main, prime, head.
ANGELO, angel, ĈEFANGELO, archangel, ĈEFURBO, capital city.
EKS- former, late. EKSKAPITANO, ex-captain, EKSURBESTRO, ex-mayor.
EKSIGI, to dismiss, EKSIGI I, to resign.

TRADUKU! LA REĜO KAJ LA PAĜIO. el The Esperanto Guide
de M.Hyde (slightly altered)

Unu tagon Frederiko Granda sonorigis, kaj neniu venis. Li malfermis la pordon, kaj trovis sian paĝion kiu estis dormanta en brakseĝo. Li aliris al li, kaj estis vekonte lin, kiam li rimarkis la angulon de letereto, kiu elstaras el lia poŝo. Li estis scivol-ema, kio ĝi estas, prenis ĝin, kaj legis. Ĝi estis letero de la patrino de la junulo, dankante lin pro tio, ke li sendis al ŝi el sia salajro (salary) por helpi ŝin en ŝia mizero. Ŝi finis dirante, ke Dio (God) benos lin pro lia fila amo al ŝi. Leginte tiun leteron, la reĝo prenis kelke da oraj moneroj, enŝovis ilin (pushed in) kune kun la letero en la poŝon de la paĝio, kaj mallaŭte reeniris sian ĉambron. Iom poste li sonorigis tiel laŭte, ke la paĝio vekigis, kaj iris al la reĝo. "Vi bone dormis", diris al li Frederiko. La paĝio penis senkulpiĝi sin, kaj en sia embaraso metis la manon en la poŝon. Li sentis la monon, eltiris ĝin, kaj estis plena de miro (surprise) kaj malĝojo. Li paliĝis, kaj rigardis la reĝon, verŝante torenton da larmoj, kaj ne parolante eĉ unu vorton. "Kio estas?" diris la reĝo. "Kio do estas al vi?" "Ho, via moŝto," diris la junulo, sin ĵetante sur la genuojn, "oni volas ruinigi min; mi ne scias, de kie venas tiu ĉi mono, kiun mi trovas en mia poŝo." "Mia amiko," diris Frederiko, "Dio ofte sendas al ni bonon dum nia dormo; sendu tion al via patrino, kaj certigu (certigi, to assure, make certain) al ŝi, ke de nun mi prizorgos ŝin kaj vin."

There are three ways of saying "ask" in Esperanto---(1) PETI, to ask a favour: MI PETIS LIN SKRIBI AL MI, I asked him to write to me; VENU, MI PETAS, Please come; MI PETAS takes the place of our "Please," (2) DEMANDI, to ask a question, MI DEMANDIS AL ŜI ĈU ŜI ESTAS SANA, I asked her if she were well, (3) POSTULI, to demand as a right. LI POSTULIS FERION POST JARO SE LI KONSENTUS LABORI POR MI, He demanded a holiday after a year if he should consent to work for me.

Could you answer these questions?

- (1) Why in the above story are tagon, poŝon, ĉambron, genuojn, in the accusative? Why is poŝo, line 19, not in the accusative?
- (2) Why the present tense, line 4, for elstaras; line 5 estas, and why estis in the next sentence?
- (3) Could you explain the adverbial endings---dankante, leginte, mallaŭte, verŝante?

THE
A U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y .

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Vol 4, No. 5, FEB., 1944.



EDITED BY
F.R.BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSENDON W5. VIC.

LA

AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooo

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Snerbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

oooo

"BENOJ" AL BASIC.

La lastatempaj vojaĝoj de certaj Anglalingvaj ŝtatviroj batis al ili en la kapo la fakton, ke ne tutĉ la mondo parolas la Anglan. El tiu konstato venis al ili la ideo, ke tre oportune estus se la universo tiun lingvon ja uzus. S-ro Churchill kaj Prez-o Roosevelt do donis al Basic sian aerecan benon. Sed la belaj vortoj, eĉ de bonaj kaj grandaj homoj, ne portas en si ĉiujn faktorojn necesajn por sukcesigi tiun aŭ alian projekton; skeptikaj homoj bezonas ankoraŭ multon da atesto, antaŭ ol ili kredus ke Basic taŭgas por vortvesti la homan menson kaj spiriton. La sonora retoriko de Churchill mem certe ne estus ebla inter la limoj de ĝia troprema kadro.

La granda nombro da Angle-parolantoj estis unu el la faktoroj, kiuj decidigis S-ron Ogden elekti la Anglan kiel sian labormaterialon. Sed tio, ke la Angla estas lia patralingvo estis sendube alia faktoro, kaj povas esti, ke iam elpaŝos ne-Anglaj Ogdenoj kun sia Basic-Franca, -Hispana, -Rusa, ĉar anoj de tiuj lingvoj malsaĝe agas, akceptante la spiritan regadon implicitan en tia lingva cedo. Vere, ĉ. 200,000,000 uzas la Anglan, sed la alta nask-poeco de la Sovet-Unio tre povas alvenigi tiun ŝtategon al lingva unuo de 300,000,000 antaŭ la jaro 2000. Post jarcentoj da Imperiismo nur 13 p.c. de Britaj regatoj parolas la lingvon de siaj mastroj. Wells diris ("Anticipations"): "Oni miras trovi, kiel malrapide la Angla disvastiĝas, eĉ kontraŭ rivaloj ŝajne multe malpli oportunaj. Ankoraŭ ĝi ne povas forpuŝi la Francan en Franca Kanado, kaj estas dubinde, ĉu ĝi venkos en Sud-Afriko post cent jaroj da Brita regado."

La provo de B.E. "traduki" la Sanktajn Skribojn elvokis iom da vinigra kritiko de certaj Anglaj gazetoj. "The New Statesman and Nation" acide komentis: "Kie la Nova Testamento en Basic ne idiote fuŝplaŭdas en maro da longaj frazaĉoj, tie ĝi estas rekte sengusta, kruda aŭ absurda. Foje, tamen, iuj frazoj sekvas la Jakoban tradukon sufiĉe fidele, ke ni tolerus ilin... Pro la mizero de sia vortprovizo, kaj ankoraŭ pli pro la mallerteco kun kiu

Ĝi estas uzata, Basic ŝanĝis la Novan Testamenton en ion, kio ne havas eĉ la valoron de simpla esprimado de la faktoj. Ni nur povas demandi al ni: "Kian plian detruigon nun preparas ĝiaj aŭtoroj?" "John o' London's Weekly", nevarme taksinte la N.T. en Basic, dubis, ĉu ĝia "neriĉa stilo" bone servus ĉe la Malnova Testamento. "Se La Alta Kanto de Salomono perdis sian vortvoluptecon ĝi perdis ankaŭ sian sencon." Ĝi aspektus kiel grapolo (1) da vinberoj post formango de la beroj." Kaj ni vidis, kio okazis al la plej majesta, time solena kaj mistika sentenco en la mondliteraturo: "En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron....."

Basic neas, sed Prof-o Joad kaj aliaj jesas, ke sinteza aŭ arte-planita lingvo solvos la internacilingvan problemon. Certe estas, ke komence de la Hitlera erao Esp-o (sinteza lingvo) havis inter 1½ kaj 2 milionojn da adeptoj (The Language Problem": Durrant, 1943), kaj ĝia perspektivo estis je la plej belpromesa. En Francujo, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Skandinavio elstare ĝi plezuris pri alta oficiala patronado, kaj solide fortikigadis sian pozicion. La Nazioj ŝanĝis tion. Ili vidis en Esp-o "filaboron de internacia Judismo," "minacon al la klareco de pur-Germana naciismo" kaj tielade plu. En 1936 Hess kaj Himmler dekrete frakasis la potencan Germanan Esperanto-Asocion; tiu tragedio ripetiĝis ĉie, kien rampis la "bruna pesto."

Basic asertas, ke, kiom koncernas la Aziajn milionojn, Esp-o estas nur ankoraŭ unu Eŭropa dialekto. Ĉu vere? La "Enciklopedio de Esperanto" difinas 20 paĝojn da dense kompostita teksto al Esp-a agado en Japanujo, kiu lando plivaste ol ajna alia uzis Esp-on en la scienca vivo.

Esperanto rapide reviviĝis post la milito de 1914-18; ĝi same faros post la nuna. Tiu ĉi racia kaj arta sintezo de la Indo-Eŭropaj lingvoj, kiu povas prifleri tradukon de "Pan Tadeuz" (Mickiewicz) kaj de la "Inferno" laŭ la Dantea tercino, neniel devas timi antaŭ sistemigita lulilpepado taŭga nur por infanĝardeno.

(1) Kunaĵo da floroj aŭ fruktoj pendantaj laŭlonge kaj ĉirkaŭ flanke de komuna trunketo. "Plena Vortaro" de S.A.T.

-----F.R.BANHAM.-----

The boosting of Basic has opened for Esperanto opportunities for publicity it has never had before. Its name is coming more and more before a public awakening to the need for an international language.

MR. CHURCHILL'S BASIC COMMITTEE.

The task of this committee is simply to examine Basic English regarded as a possible international language. It may report unfavorably; this could lead to the adoption of Esperanto instead. Even if the committee report in favour of B.E. this would not altogether be bad from our point of view, because there are four points to notice:--

- (1) The committee is a purely English affair, concerned in the first instance solely with Britain and America. It is in Europe that the language difficulty is really acute.
- (2) Other countries would hardly accept the solution. Certainly not our defeated enemies.
- (3) If B.E. were introduced into all or some British schools, after a year or so teachers would be protesting against the bad effect it was having on their pupils' ordinary English.
- (4) A normal Englishman could not carry on conversation in Basic because he could not remember what to forget in order to do so.

BASIC ENGLISH.

As a linguist (Russian, German and French), it appears to me that the main objections of most Europeans to the use of Basic English as an international language are:--

- (1) Nearly all the Europeans do not know and cannot pronounce the following words correctly:--The, that, there, thy, &c, the nearest sounds are ze, zat, zair, zy, &c.
- (2) Most Europeans pronounce w like v, while German or Dutch v is f or ph.
- (3) Most Europeans invariably pronounce a like ah, e like a, i like e; e.g., fare like fah-ray, or far-a; fire like fee-ray; fir like fear.

I believe at the present time there are thousands (not millions) of Europeans using Esperanto.---R.W.H. (North Fitzroy)

BELGA PROFESORO, JEAN TIMMERMANS, en Julio (Oxford) asertis antaŭ kunveno de kleruloj, ke "international trade and scientific intercourse require a language simple, as well as precise and invariable. In order to reach this goal it is essential to use an artificial language, with simplified grammar, and a definition of scientific precision for the meaning of the words used." (Internacia komerco kaj scienca interrilato bezonas lingvon simplan, krom preciza kaj nevariebla. Por ke tiu celo atingiĝu, neceso estas uzi artefaritan lingvon kun simpligita gramatiko kaj science preciza difinado de la vortsignifoj). "British Esperantist" Nov-Dec. 43.

JAPANAĴ TEKNIKAĴ STUDENTOĴ lernas per Rusaj, Anglaj kaj Germanaj

lernlibroj, ĉar ili povas legi en tiuj lingvoj sed ne paroli ilin. Mi ne scias, kiel ili povas fari tion. Mi renkontis "profesoron" de la Angla lingvo en Tokio, kiu ne povis paroli eĉ vorton de la Angla. Mia scio de la Japana konsistis en la mendo "Du bierojn, mi petas," sed ni konversaciis sufiĉe inteligente en Esperanto. Mi havas antaŭ mi nun lian karton personan. Ĝi havas skribon en Esperanto: "Profesoro de la Angla lingvo ĉe la Sepa Altlernejo, Tokio;" sed li ne povis diri eĉ "Good morning." (El artikolo "Seeing the World" de T. Mason en Students' Quarterly Journal of the Institution of Electrical Engineers, Ju, /43.

TIUJ KVAR VIRTOJ.

(De Ralph R. GIFFEN. "Fact", 23/5/43.)

Kvin viroj konversaciis en oficira ĉambro de arma posteneble en Shangri-La. Kvar estis lokaj kuracist-oficiroj kaj intimaj amikoj---Usonano, Anglo, Ruso kaj Ĉino. La kvina viro estis kirurgo tiel genia, ke li aparteniĝis al la tuta mondo.

Ridetante la Usonano alparolis la Ĉinon: "Viaj samlandanoj estas famaj pro la virto de pacienco, sed al mi tio aspektas multe pli kiel malvirto. Vi atendas, ke afero okazu, anstataŭ mem okazigi ilin."

La Ĉino respondis: "Vi Usonanoj fieras pro via kuraĝo kaj iniciatemo---sed mi vidas troriskemon kaj impulson."

La Ruso ekparolis: "Mi povus multon diri por ĉiu el vi, sed mian anglan kolegon mi ne povas kompreni. Li estas konata pro sinregado, pro la fakto, ke li ne permesas al sentemo devojigi lin. Sed al mi tio ŝajnas esti manko de simpatio."

"Dum," la brita doktoro respondis, "la granda kunsentemo, pri kiu vi Rusoj fieras, ŝajnas al mi malforta sentimentaleco. Rigarde tion kaj vian ĉiaman pesimismon mi miras, ke vi iam efektivigas ion."

La eminenta kirurgo diris nenion, kvankam li ridetis tolereme. Mallonge poste li adiaŭis. La kvar amikoj daŭrigis la interparolon. Jen subite la pordo brumalfermiĝis, kaj japana soldato eniris la ĉambron.

Kiamaniere li sukcesis preterpasi la gardistojn, neniam klariĝos. Tiuj viroj savis la vivojn de multaj soldatoj ĉiutage---savis ilin, por ree batali---do la Japano venis, por mortigi ilin.

Sed ĝuste kiam li premis la ĉanon, la Usonano eksaltis. La pafilo bruegis, la korpo de l' Usonano tordiĝis, tamen li sukcesis, frapjeti la pafilon de l' Japano planken, poste li fulmrapide elpoŝigis sian revolveron kaj mortpafis la entrudiĝinton.

Liaj tri amikoj rapide levis lin. La Ruso malkaŝe ploris. "Estis tiom brave!" li plorĝemis, "Kaj nun li mortas. Mi venig-

os la eminentan kirurgon." Li rapidkuris el la ĉambro. La brita kaj ĉina kuracisto esploris sian vunditan kolegon. Estis grava vundo proksime ĉe la koro. Rapide ili preparis la Usonanon por operacio; ĉiu el ili sciis, ke li ne estas sufiĉe lerta, por savi ĉi tiun karan amikon. Sed kiam la momento por la operacio venis, la eminenta kirurgo enrapidis la ĉambron.

Lia esplorado daŭris nur momenton. "Mi devas operacii en sekundoj," li diris, "sed la paciento ankoraŭ estas konscia. Se ni atendas, por havigi anestezion, li mortos, kaj se ni ne faras tion, la nervofrapo de la operacio mortigos lin!" La brita doktoro milde flankentiris lin. Eĉ lia fera sinregado ne povis forteni la doloron de lia vizaĝo, kiam li frapis sian amikon al la makzelo kun sia tuta forto. La kapo de l'Usonano ruliĝis flanken, liaj okuloj fermiĝis, kaj lia korpo restis senmova.

Post kvarona horo la eminenta kirurgo paŝis malantaŭen kaj kviete diris: "Li vivos." Post kiam iliĉiuj esprimis sian grandan ĝojon, la eminentulo parolis. "Nu, ĉu vi komprenas, kiom malmulte vi estimis unu la alian?" li demandis.

"Sen la troriskema kuraĝo de l' Usonano la Japano estus mortiginta vin ĉiujn.

"Sen la sentimentaleco de l' Ruso, nia amiko estus paginta per sia vivo. Nur ĉar mi estis venigita senprokraste, mi povis malokazigi la morton.

"Kaj ĉar la Anglo posedis la sinregon, fari ion, kion li malamis el tuta sia animo, la paciento ne mortis pro nervofrapo."

En ĉi tiu momento la pordo ree malfermiĝis kaj dua Japano direktis sian pafilon al la grupo. Pafu ekbruis, kaj la Japano mortfalis.

Kvar okulparoj koncentre rigardis la pistolon en la mano de l' Ĉino. Li ridetis. "Mi pensis, ke ili sendos alian," li klarigis, "do mi atendadis dum la tuta tempo."

-----P.E.SCHWERIN. (Trad.)

JUNA EDISON. Antaŭ ol riĉiĝi, Edison loĝis en la kamparo. Amiko kiu vizitis lin, rimarkis, ke la pordo sin malfermas tre nebone. Tuj ĉe ekpuŝo ĝi iom forte rezistis la premon, kaj la amiko do demandis: "Pro kio Edison ne oleis la hokojn?"

La famiĝonta inventisto ridetis.

"Ĉar mi elpensis aparateton, per kiu 50 litroj da akvo pumpiĝas en mian rezervujon ĉiufoje kiam malfermas iu la pordon."

"Cosmoglotta," Svisujo, Marto/43

HUS M.J. Kiam ajn en ia afero mi ekaŭdos pli bonan opinion, mi volonte forlasos la mian, sciante tre bone, ke scio nia eta estas kompare kun tio, kion ni ne scias.

DIVERSAJ TRADUKOJ DE FAMA POEMETO."GLEICHES" (Goethe).

Über allen Gidfeln
 ist Ruh.
 In allen Wipfeln
 spÜrest du
 kaum einen Haüch.
 Die Vögel schweigen im Walde.
 Warte nur; balde
 ruhest du auch.

.....

Over all the hill-tops
 Is quiet now.
 In all the tree-tops
 Hearest thou
 Hrdly a breath.
 The birds are asleep in the trees;
 Wait; soon like these
 Thou too shalt rest.

(Longfellow)

Super pintoj pendas
 Silent'.
 Vi apenaŭ sentas
 Spiron de vent'
 Sur arbfoli'.
 L'arbar' ne resonas jam trilon.
 Baldaŭ---trankvilon!---
 Kuŝos ankaŭ vi.

(Kalocsay)

Super pintoj briliĝas
 Stelar',
 Spiret'apenaŭ
 Audiĝas
 En la arbar';
 Birdetoj silentas lace.
 Ankaŭ vi, baldaŭ,
 Restos pace.

(K.J.Hirschel)

Sur ĉiuj montosuproj
 Regas ripozo;
 En ĉiuj branĉfolioj
 Vi sentas
 Ventospiron apenaŭ;
 Birdetoj silentas en la arbaro;
 Iom atendu, baldaŭ
 Vi ripozos ankaŭ.

(D-ro Noel)

Sur ĉiu montkapo
 Mallaŭtas.
 En ĉiu arbalto
 Vi aŭdas
 Spireton apenaŭ.
 La birdoj silentas dormfalde.
 Atendu nur; balde
 Ripozos vi ankaŭ.

(F.R.Eanham)

Over all summits
 Peace now.
 In all tree-tips
 Hearest thou

Hardly a breath.
 The wood-birds have silenced their song.
 Only wait; ere long
 Thou, too, shalt rest.

(F.R.Banham)

LA VOKO DE L' NORDO.

Depost jarcentoj kuraĝaj homoj el ĉiuj nacioj riskis siajn vivojn, por enpenetri la glaciajn regionojn de la Norda Poluso. Tiuj fabelaj regionoj, kie la jaro havas nur unu tagon de ses monatoj kaj unu same longan nokton, ĉiam denove okupis la fantazion de la homaro kaj allogis milojn da aventuruloj kaj esploristoj per nerezistebla voko. Inter ili la esploristo kaj filantropo Fridtjof Nansen estis la vera pioniro de la moderna polus'-esplorado. Ĉiam denove li riskis sian vivon kaj provis, utiligi siajn spertojn en la norda regiono por la progreso de la homaro. Pri unu kriza situacio, kiun li travivis dum sia fama "Fram"-ekspedicio, li mem rakontas jenon:

"Vendrede, la 12-an de Junio (1895), ni foriris je la kvara matene kun ĉa veloj sur la glitveturiloj. Estis glaciĝinte, la neĝo estis iom pli firma, kaj la nokta vento promesis bonan taglaboron. La aero estiĝis tiel klara, ke ni fine sukcesis, tute facile elrigardi malproksimen enlanden. La insuloj en la oriento estis for, kaj en la okcidento la lando montris larĝan markolon. Bedaŭrinde la vento ĉesis, la glacio estiĝis pli kaj pli malglata; evidente ni denove ekvenis sur flosantan glacieron kaj ni progresis nur malbone. Sed en la aero ni perceptis, ke ŝajne en suda direkto estas akvo, kaj iom pli malproksime---je nia ĝojo---ni kapablis aŭdi ondomuĝadon. Kaj nun la akvo jam estis tute najbare. Do, rekte tien, kaj jen la blua akvo-supraĵo etendiĝis antaŭ niaj piedoj. Rapide ni kunligis la kajakojn, hisis la velon, kaj la tutan tagon ni daŭrigis nian veturadon. Ofte la vento estis tiel forta, ke la ondoj superverŝis la kajakojn; sed tiujn etajn ŝprucakvojn ni tute ne priatentis. Ni atingis la promontoron Kap Barents, kaj suden etendiĝis la alta maro ĝis la horizonto. Fine do ni estis en la sudo de tiu ĉi insul-labirinto, kiu tiom longe estis firmiteninta nin.

Gajhumore ni vespere haltis sur la glacio, por iom streĉi niajn rigidajn krurojn. Samtempe ni esperis, havi pli bonan elrigardon okcidenten de iu firma punkto surtera. Sed kiamaniere fiksi la ege valorajn boatojn al la glacio? "Ni prenu velrimenon!" konsilis Johansen, kiu jam staris sur la glacio. "Ĉu ĝi estos sufiĉe forta?" mi demandis. "Certe," li respondis, "mi ja uzis ĝin dum la tuta tempo por la velo de mia glitveturilo!"---"Nu, ĝi sufiĉos, por firmiteni la malpezajn kajakojn?" mi diris kaj fiksas ilin per la rimeno, konsistanta el strio de kruda balen-haŭto, al ski-bastono en la glacio. La vento malfortiĝis; do, ni ne havis grandan ŝancon, kaj, kiam ni staris tie...., Johansen subite ekkriis: "Dio mia, jen flosas niaj kajakoj!..." Ni fulmrapidis malsupren, sed la kajakoj jam estis for tre longan distancon, la rimeno estis deŝirita. "Jen mia poŝhorloĝo!" mi ekkriis al Johansen kaj tuj forĵetis miajn vestojn, por naĝi pli bone. Mi ne riskis, tute senvestigi min, ĉar tiukaze mi eble ekhavis spasmon.

LA VOKO DE L' NORDO.

Depost jarcentoj kuraĝaj homoj el ĉiuj nacioj riskis siajn vivojn, por enpenetri la glaciajn regionojn de la Norda Poluso. Tiuj fabelaj regionoj, kie la jaro havas nur unu tagon de ses monatoj kaj unu same longan nokton, ĉiam denove okupis la fantazion de la homaro kaj allogis milojn da aventuroloj kaj esploristoj per nerezistebla voko. Inter ili la esploristo kaj filantropo Fridtjof Nansen estis la vera pioniro de la moderna polus'-esplorado. Ĉiam denove li riskis sian vivon kaj provis, utiligi siajn spertojn en la norda regiono por la progreso de la homaro. Pri unu kriza situacio, kiun li travivis dum sia fama "Fram"-ekspedicio, li mem rakontas jenon:

"Vendrede, la 12-an de Junio (1895), ni foriris je la kvara matene kun ĉa veloj sur la glitveturiloj. Estis glaciĝinte, la neĝo estis iom pli firma, kaj la nokta vento promesis bonan taglaboron. La aero estiĝis tiel klara, ke ni fine sukcesis, tute facile elrigardi malproksimen enlanden. La insuloj en la oriento estis for, kaj en la okcidento la lando montris larĝan markolon. Bedaŭrinde la vento ĉesis, la glacio estiĝis pli kaj pli malglata; evidente ni denove ekvenis sur flosantan glacieron kaj ni progresis nur malbone. Sed en la aero ni perceptis, ke ŝajne en suda direkto estas akvo, kaj iom pli malproksime---je nia ĝojo---ni kapablis aŭdi ondomuĝadon. Kaj nun la akvo jam estis tute najbare. Do, rekte tien, kaj jen la blua akvo-supraĵo etendiĝis antaŭ niaj piedoj. Rapide ni kunligis la kajakojn, hisis la velon, kaj la tutan tagon ni daŭrigis nian veturadon. Ofte la vento estis tiel forta, ke la ondoj superverŝis la kajakojn; sed tiujn etajn ŝprucakvojn ni tute ne priatentis. Ni atingis la promontoron Kap Barents, kaj suden etendiĝis la alta maro ĝis la horizonto. Fine do ni estis en la sudo de tiu ĉi insul-labirinto, kiu tiom longe estis firmiteninta nin.

Gajhumore ni vespere haltis sur la glacio, por iom streĉi niajn rigidajn krurojn. Samtempe ni esperis, havi pli bonan elrigardon okcidenten de iu firma punkto surtera. Sed kiamaniere fiksi la ege valorajn boatojn al la glacio? "Ni prenu velrimenon!" konsilis Johansen, kiu jam staris sur la glacio. "Ĉu ĝi estos sufiĉe forta?" mi demandis. "Certe," li respondis, "mi ja uzis ĝin dum la tuta tempo por la velo de mia glitveturilo!"---"Nu, ĝi sufiĉos, por firmiteni la malpezajn kajakojn?" mi diris kaj fiksas ilin per la rimeno, konsistanta el strio de kruda balen-haŭto, al ski-bastono en la glacio. La vento malfortiĝis; do, ni ne havis grandan ŝancon, kaj, kiam ni staris tie...., Johansen subite ekkriis: "Dio mia, jen flosas niaj kajakoj!..." Ni fulmrapidis malsupren, sed la kajakoj jam estis for tre longan distancon, la rimeno estis deŝirita. "Jen mia poŝhorloĝo!" mi ekkriis al Johansen kaj tuj forĵetis miajn vestojn, por naĝi pli bone. Mi ne riskis, tute senvestigi min, ĉar tiukaze mi eble ekhavis spasmon.

Sammomente mi saltis en la akvon. Sed la vento blovis for de l' glacio, kaj la malpezaj kajakoj kun la alta takelaĵo donis bonan subtenon al ĝi. Ili jam troviĝis danĝere malproksime. La akvo estis glacia, kaj naĝi en vestoj estis diable malfacila laboro. Sed la kajakoj flosis for kaj for, ofte pli rapide ol mi kapablis naĝi. Ĉu ankoraŭ estos eble, finfine atingi ilin? Sed kun ili la tuta vivespero nia fornaĝus! Ĉio, kion ni posedis, estis sur ili; ni havis eĉ ne tranĉilon ĉe ni! Ĉu mi ekhavas spasmon kaj dronus, aŭ ĉu mi naĝus reen sen la kajakoj, tio estus tute la sama rezulto. Mi puŝis min antaŭen per forto de l' malespero. Lacigante mi naĝis surdorse kaj vidis Johansen, kiu kuris tien kaj reen ĉe la glaci-bordo; poste li konfesis, ke tiuj estis la plej teruraj momentoj en lia tuta vivo. Kion li faru? Ke mi atingus la kajakojn, li ne kredis, kaj kion helpus, se li same ĵetus sin en la akvon?---Kiam mi denove reen turniĝis, la kajakoj jam ŝajnis al mi esti iom pli proksime. Mia kuraĝo kreskis, kaj mi duobligis miajn klopodojn. Sed jam mi eksentis, ke miaj membroj rigidigis. En la venonta momento ĉio estus vana! Miaj movoj pli kaj pli malfortiĝis...sed tamen la distanco samtempe mallongiĝis. Ĉu mi atingus la kajakojn spite de ĉio? Antaŭen per lasta forto! Fine mi povis elstreĉi la manon al la skio, kiu kuŝis transverse sur la ŝip-malantaŭaĵo. Mi ekkaptis ĝin, trenis min al la rando de l' kajako kaj jam kredis min savita. Sed mia korpo estis tiel rigida pro malvarmeĝo, ke mi sentis min ne-kapabla, engrimpi la boaton. Ĉu spite de ĉio do estus tro malfrue?---Tia sukceso kaj tamen nenia savo?---Mi superforte klopodis, kaj fine mi suprenigis unu kruron sur la randon de la glitveturilo. Plien kaj plien mi suprenŝovis min. Fine, jam tute sensenta, mi sidis supre---Kaj en tia stato antaŭenremi la ligitajn kajakojn? Kiamaniere disigi unun de la alia antaŭ mia tutkorpa glaciĝo? Nur plej intensa remado povus ree varmigi mian sangon. Mi remis, remis kontraŭ la vento, havante en mia maldika lana ĉemizo la impreson, kazaŭ ĝi trablovis mian korpon. Mi tremis, kaj la dentoj klakadis. Sed mi eksavis min el la komencanta glaciĝo. Frapo post frapo--tre malrapide mi alproksimiĝis al la bordo.--Kio do flugis tie ĉe mia ŝipantaŭaĵo? Du ĉas-birdoj! Ni havis tiel malmulte da manĝaĵoj, ke la nura ideo, samtempe kunporti nian vespermanĝon, elektris min. Mi ekprenis mian pafilon kaj mortigis ambaŭ birdojn per unu pafo. Johansen pro tio ektimis, kiel li poste konfesis al mi. Li imagis, ke akcidento okazis, ke mi frezeziĝis.

Fine mi atingis la glacian bordon. Johansen alrapidis kaj helpis al mi eliri. Mi preskaŭ ne plu kapablis, teni min staranta. Li forŝiris la vestojn de mia korpo kaj surmetis al mi la malmultajn sekajn vestaĵojn ankoraŭ disponeblajn. Poste li sternis la kuŝsakon sur la glacio, enigis min kaj kovris min per la velo kaj ĉio krome atingebla. Daŭris longan tempon, ĝis kiam mi ne plu tremis kaj eksentis la revenantan varmon en la korpo. Mi ekdormis, dum Johansen starigis la tendon kaj preparis la du bird-

Sammomente mi saltis en la akvon. Sed la vento blovis for de l' glacio, kaj la malpezaj kajakoj kun la alta takelaĵo donis bonan subtenon al ĝi. Ili jam troviĝis danĝere malproksime. La akvo estis glacia, kaj naĝi en vestoj estis diable malfacila laboro. Sed la kajakoj flosis for kaj for, ofte pli rapide ol mi kapablis naĝi. Ĉu ankoraŭ estos eble, finfine atingi ilin? Sed kun ili la tuta vivespero nia fornaĝus! Ĉio, kion ni posedis, estis sur ili; ni havis eĉ ne tranĉilon ĉe ni! Ĉu mi ekhavas spasmon kaj dronus, aŭ ĉu mi naĝus reen sen la kajakoj, tio estus tute la sama rezulto. Mi puŝis min antaŭen per forto de l' malespero. Lacigante mi naĝis surdorse kaj vidis Johansen, kiu kuris tien kaj reen ĉe la glaci-bordo; poste li konfesis, ke tiuj estis la plej teruraj momentoj en lia tuta vivo. Kion li faru? Ke mi atingus la kajakojn, li ne kredis, kaj kion helpus, se li same ĵetus sin en la akvon?---Kiam mi denove reen turniĝis, la kajakoj jam ŝajnis al mi esti iom pli proksime. Mia kuraĝo kreskis, kaj mi duobligis miajn klopodojn. Sed jam mi eksentis, ke miaj membroj rigidigis. En la venonta momento ĉio estus vana! Miaj movoj pli kaj pli malfortiĝis...sed tamen la distanco samtempe mallongiĝis. Ĉu mi atingus la kajakojn spite de ĉio? Antaŭen per lasta forto! Fine mi povis elstreĉi la manon al la skio, kiu kuŝis transverse sur la ŝip-malantaŭaĵo. Mi ekkaptis ĝin, trenis min al la rando de l' kajako kaj jam kredis min savita. Sed mia korpo estis tiel rigida pro malvarmeĝo, ke mi sentis min ne-kapabla, engrimpi la boaton. Ĉu spite de ĉio do estus tro malfrue?---Tia sukceso kaj tamen nenia savo?---Mi superforte klopodis, kaj fine mi suprenigis unu kruron sur la randon de la glitveturilo. Plien kaj plien mi suprenŝovis min. Fine, jam tute sensenta, mi sidis supre---Kaj en tia stato antaŭenremi la ligitajn kajakojn? Kiamaniere disigi unun de la alia antaŭ mia tutkorpa glaciĝo? Nur plej intensa remado povus ree varmigi mian sangon. Mi remis, remis kontraŭ la vento, havante en mia maldika lana ĉemizo la impreson, kazaŭ ĝi trablovis mian korpon. Mi tremis, kaj la dentoj klakadis. Sed mi eksavis min el la komencanta glaciĝo. Frapo post frapo--tre malrapide mi alproksimiĝis al la bordo.--Kio do flugis tie ĉe mia ŝipantaŭaĵo? Du ĉas-birdoj! Ni havis tiel malmulte da manĝaĵoj, ke la nura ideo, samtempe kunporti nian vespermanĝon, elektris min. Mi ekprenis mian pafilon kaj mortigis ambaŭ birdojn per unu pafo. Johansen pro tio ektimis, kiel li poste konfesis al mi. Li imagis, ke akcidento okazis, ke mi frezeziĝis.

Fine mi atingis la glacian bordon. Johansen alrapidis kaj helpis al mi eliri. Mi preskaŭ ne plu kapablis, teni min staranta. Li forŝiris la vestojn de mia korpo kaj surmetis al mi la malmultajn sekajn vestaĵojn ankoraŭ disponeblajn. Poste li sternis la kuŝsakon sur la glacio, enigis min kaj kovris min per la velo kaj ĉio krome atingebla. Daŭris longan tempon, ĝis kiam mi ne plu tremis kaj eksentis la revenantan varmon en la korpo. Mi ekdormis, dum Johansen starigis la tendon kaj preparis la du bird-

ojn por la vespermanĝo. Kiam mi vekigis, la manĝaĵo delonge estis preparita kaj bolis super la fajro. Varmega supo kaj bonega viando rapide forigis la lastajn sekvojn de mia naĝ-ekskurso."

-----K.SCHWERIN.

MIA VOĈO. (El PUNCH--London)

Ili ne aspektis tiaj homoj kiuj volonte detruus mian mondan feliĉon. La knabino havis allogan amikecan rideton kvazaŭ ŝi opinias, ke la vivado estas amuza; la viro aspektis simpatia, kvazaŭ li kutimas konsoli la lacajn vagantojn de tiu ĉi valo de la veado.

Mia voĉo po ses pencoj! Certe gramafona disko de mia voĉo valoras ses pencojn! Kia plezuro por miaj maljunaj gepatroj! Kia mirego kiam ili trovas mian voĉon sur la matenmanĝ-tablo! Kiel ili kuregos al la gramafono, lasante la lardon kaj ovojn malvarmiĝi dum ili sidas kun larmoj de ĝojo en la okuloj, kaj aŭskultas al la voĉo de sia amata filino.

Tiu estas kiel mi mense bildigis la aferon.

Mi frontis kontraŭ la mikrofono. Kion mi diros? Je tiuj ĉi okazoj mi kredas, ke homoj sendas inspirajn mesaĝojn aŭ iĝas rave humorecaj, sed dum la sago moviĝas al KOMENCU, ĉio, kion mi povas memori estas, ke mi lasis miajn plej bonajn ŝtrumpojn hejme ĉe mia lasta vizito. Mi tiel diris. Kaj ŝtrumpoj kondukis al ŝuoj kaj koltukoj kaj gantoj, kaj atentigo ne tro manĝigi mian hundon. Mi streĉe ekpenis rericevi la spirit-ĉeeston. Mi estis jam duonvoje kaj ankoraŭ mi diris nenion humorecan aŭ inspiran. Mi decidis fari ŝercon.

Mi faris la ŝercon.

Certe, certe tiu estas la lasta ŝerco, kiun mi iam ajn faros. Ĝia trafeco mankis ĉar mi ne rimarkis ke la sago atingas HALTU.

La simpatia sinjoro kompleze diris: "Nu, vi povas aŭskulti al via propra voĉo!"

Mi ridetaĉis. Mi ĉiam iom ŝatis mian voĉon. Agrabla, mi imagis, interesa; eble ne bela, ne vere bela, sed tia voĉo pri kiu ĉiu ajn virino povus prifieri.

Mi metis la fonojn al miaj oreloj. Mi aŭskultis. Mi aŭdis tian voĉon kiun oni imitas en ĉiu pantomimo, tian voĉon kiu iĝas diri la patron: "Devus estinta ĉemane sitelo kiam naskiĝis tiu virino."

Tio estis mia voĉo. Ne eblis erari. Tie troviĝis la peto por ŝtrumpoj kaj gantoj el la maldekstra tirkesto. Tiuj estis miaj vortoj....

"Er," (1) mi diris al la simpatia sinjoro, ĉar la ĉarma knabino aspektis iomete amuzata---"er," mi diris, preskaŭ ne deziranta malfermi la buŝon---"ĉu vi opinias ke eble la maŝino estas

iometedifekta?"

"Lasu min aŭdi," li respondis afable, levante la fonojn. "Ne, sinjorino, tio estas tre bona reprodukto. Ja tre bona."

Mi pagis miajn ses pensojn. Mi trafis la buson malĝustan celvojon. Mi trafis la buson ĝustan celvojon. Mi eliris ĝin. Mi kuregis al la Embankment. Virino demandis al mi la vojon al Trafalgar Square.

Mi skuis la kapon.

"Scusi, Signora, Espagnole, étrangère," mi respondis, farante mian eblon aspekti kosmopolita. Neniam, neniam mi ree parolus nenecesan vorton.

Mi fâligis la voĉon en Riveron Thames. Miaj maljunaj gepatroj manĝus la lardon kaj ovojn varmaj. Mi skribus por la ŝtrumpoj. Mi reiris al mia ĉambro. Mi rampis supren la ŝtuparojn, evitante amikecan inviton al taso da teo. Survoje mi renkontis F-inon Smithers. Aĉa virino!

"Vi aspektas laca, mia karulino," diris F-ino Smithers, per kiu ŝi signifas, "Vi aspektas malbela, kaj mi ĝojas, ke mi vidas vin malbela."

"Mi ja estas iom laca," mi respondis, ĉar glora devenĝo fontis en mi; "Mi ĵus faris diskon de mia voĉo. Mia karulino, estas mirinde! Nur ses pensojn! Mi faris ĝin por miaj gepatroj! Vi kaj via fianĉo devus ambaŭ iri kaj havi ankaŭ unu por vi."

"Nu, tio estas bona ideo," diris F-ino Smithers.

Ĝi estas tre bona ideo," mi respondis.

Kaj tio estas vera, ĉar se ekzistas unu persono en Londono kiu havas pli malbonan voĉon ol F-ino Smithers, tiu estas ŝia fianĉo.

Aŭ, pliĝuste, tion mi dirus antaŭ horo. Nun, ve! Mi soias alian.

(1) Zam. uzas Eh similence.

-----L.E.BAILEY (Trad.)

TRADUK-KONKURSOJ.

TRADUKO de KONKURSO 7. (Kompilita el 3 ensendaĵoj.)

Loĝi en nura apartemento estas kontraŭ mia naturo. Mi ankoraŭ insistas, ke mi ne estimas la modernan civilizacion, ĝis ĝi povos ebligi, ke ĉiu homo havu kelkajn jardojn da grundo, kiujn li povos nomi siaj propraj, kie li povos planti pizojn kaj tomatojn, kaj kie liaj infanoj povos kapti grilojn kaj fariĝi komforte malpuraj. Mi diris, ke mi ne fidus la kombinaĵon de butonoj, komutiloj, ŝrankoj, kaŭĉukaj matoj, ŝlosil-truoj, dratoj kaj ŝtelist-alarmiloj, kiun oni homas hejmo en la moderna civilizacio. Mi ĉiam kaŝridas, kiam iu moderna vendisto provas impresi min pri la moderneco kaj konveneco de miksdevena aĵo, kiu estas kanapo tage kaj lito nokte. Mi ĉiam diras al li, ke mi ne

impresioj. Kanapo estus nura kanapo, kaj lito lito. La alligbla kanap-lito estas por mi simbolo de la kripligado de la moderna hejmo kaj de la tre grava fakto, ke la moderna civilizacio tromp-prenas de l' homo lian gustan lokon sub la suno.

Venkinta Grupo: SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Tradukota teksto Konkurso 9.

Everyone is interested in birds' eggs. For most people, unfortunately, this interest does not extend beyond admiring them for their beauty and smooth shape. Some look upon them as philatelists look at foreign stamps, as something to be added to a collection, the more to be coveted if they happen to be rare. Such people cannot see beyond the coloured shell; they miss the real meaning of the egg.

Many birds' eggs are indeed beautiful to look at, but it is certain that for the parent birds this is a very minor consideration. Once the chicks have safely emerged the shells are carefully removed or the female may even eat them. It is the life inside the shell which is the important thing.

(Wings of the Wild. W.Kenneth Richmond)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.3.44.

P.E.SCHWERIN, Flat 1, Carabella Flats, McDougall St.,
Milsons Point, N.S.W.

B.E.A. EXAM. RESULTS.

DIPLOMA:-

F.A.PITT (With honor); Mrs.O.GLENIE; O.P.DAVIES, all Victoria.

ADVANCED CORRESPONDENCE EXAM:-

D.C.MILLER, W.Australia.

PRELIMINARY:-

Mrs. M.R.WOOD, Tasmania.

H. en C. "Apologio" ne signifas "pardonpeto". La Esperanta vorto konservas la sencon de la Greka "apologia", nome "parola aŭ skriba defendo kaj pravigo de io aŭ iu, solene farita. Ekz., la apologio de Sokrato.

ASOCIAJ AFEROJ.

EKZAMENOJ. La Komisiito por Ekzamenoj, Pastro C.C.Cowling, St. Marys, Tas., avizas kelkajn lastatempajn ŝanĝojn faritajn de B.E.A. pri la Diploma Ekzameno. Estontece:-

- (1) Kandidatoj povas fari la skriban parton nur per korespondo, simile al la Per Koresponda Ekzameno por Progresintoj.
- (2) Nur Speciala Ekzamenisto povas regi la parolan parton de la Diploma Ekzameno.
- (3) La pagoj estos---skriba parto, 14/-, parola parto 4/6.
- (4) Oni povas aparte fari la du partojn.
- (5) Specialajn Ekzamenistojn oni baldaŭ enoficigos en ĉiu ŝtato.
- (6) Ne necesas atendi la enoficigon de novaj Specialaj Ekzamenistoj, oni povas tuj fari la skriban parton, kaj la parolan poste.
- (7) Por la skriba parto oni devas-skribi rekte al Pastro Cowling, sendante la pagon.
- (8) La kondiĉoj de la Prepara Ekzameno restas neŝanĝitaj.

Espereble pli kaj pli da niaj anoj konfirmos sian scion de la lingvo per ekzamenoj. Bonvolu noti la ŝanĝojn sur paĝo 12 de la Jarlibro.

LIBROSERVO. Bonvolu noti sur paĝoj 14 kaj 19 de la Jarlibro, ke la nova adreso de nia Peranto en Viktorio estas S-ro F.PITT, c/o Mentone Grammar School, Mentone, sll VIC.

Ĉar oni ne plu povas importi aŭ fabrikigi metalajn insignojn, ni aranĝis la fabrikadon de celuloida speco de insigno. Sur ora fono, la verda stelo havas trans sia mezo la vorton "Esperanto", Belaspekta, ĝia prezo estas 1/- kaj oni povas aĉeti ĝin ĉe niaj Perantoj. Sendkosto 2½d.

Ni memorigas legantojn pri la ebleco importi librojn tenatajn de nia Servo, kontraŭ antaŭpagita mendo al la Sek. Jen kelkaj importindaj libroj:- Sep Vangofrapoj (Ĵus eldonita) 5/-, Luno de Izraelo, Aventuroj de Marteno Drake, Naiveco de Pastro Brown (G.K. Chesterton), Viro el Francujo, Riĉa kaj sen Mono (Oppeheim), Si (Rider Haggard), Vojo Returne, ĉiu 6/6 bindita. Vortaroj--Fulcher and Long, 12/6, Millidge 16/6. Por agrafo mendo ĉiam aldonu 10 Pencojn.

PROPAGANDA FAKO Bonvolu noti, ke S-ro H.BYATT, 10 Mackenzie St., ~~Wembley Park (W.Aus.)~~ estas Propaganda Sekretario por W.Aus, nomita de W. E. Societo. (H.BYATT, ...Wembley Park, W.Aus.)

KORESPONDA KURSO. Ni memorigas legantojn pri la stablo de Koresponda Kurso en Marto aŭ Aprilo kaj pri la dezirindeco fari donacojn por reklami ĝin. Sendu donacojn al la Sek.

KOTIZOJ kaj ABONOJ. Membro kun A.E.M. 5/-, A.E.M. al nemembroj

3/6. Pagu al F-ino W.ADDIS, 25 Greville Ave, Flinders Park, Adelaide, S.Aus. Ĉiam montru vian volon pri sendata mono. Sur poŝtbileto ne enskribu la nomon de urbo en kiu oni kontantos ĝin.

-----G.H.HILLERMAN (Sekretario)
Box 75, Devonport, Tasmania.

KVENSILANDO. Kiel kutime la Zamenhofan feston ni celebris fervorege. En ĝia antaŭtago 4BK brodkastis parolon de S-o Wanmer, kiu trafe skizis la vivon kaj verkon de la Pola bonfaranto. La bankedo bele sukcesis. S-ro C.Kidd prezidis antaŭ granda ĉeestantaro. Li toste proponis "La Reĝo", S-ro T. Suess "La Tago Celebrata," kaj S-ro Mills "Nia Usona Vizitanto" (S-ro J.L.Reith). La paroloj estis en E-o. Postmanĝe la kunvenintoj ekzamenis kun intereso kong/resfotojn de Bournemouth, Edinburgh kaj aliaj grupoj; ilin pruntis S-ino J.Langtree de Bundaberg. S-ino H.Warner Angle deklamis la Miltonan "Odo al Sia Blindeco," kaj, nome de Kaporalo H.L.Williams, kiu ne povis ĉeesti, S-o B. Cuvet legis E-an tradukon de tiu poemo. Imprese deklamis F-ino Rose Macpherson (originale), ankaŭ F-ino Marie Lowe. Dolĉvoĉe kantis lernantoj de S-ino Blanche Milner; S-inoj R.S.McGeoch kaj Ferguson lertlude akompanis. Krome, komuna kantado. Sorĉsone fortepianis F-ino Muriel Hume---S-ro K.Brown vibrige violonis. Tiu sinjoro plie kontribuis, prezentante la propran kolorfilmon de la Granda Barrier Rifo.

KASAJ AFEROJ por JANUARO 1944.

Preseraro en Nov. Gazeto. Sub. Enspezoj por la Rondo legu S-ro Lamb (dujaroj) 7/-

KVITANĈOJ RICEVITAJ. Amiko 10/- donaco. Lieut. Towsey 5/-. F-ino Kemp 5/-. F-ino Carrick 5/-. S-roj Chambers, Ayling, King, Craig, Grant 25/-. D-ro kaj S-ino Caldera 10/-. S-ino Hintze 5/- donaco. S-ro Hehir (2 jaroj) 10/-. S-roj F.Clifton, R. Craigie, Crowe, R.G.Lees, M8LCleery, 25/-. S-ro E Hearne 8/-. F-inoj J. Willans, L.Morphy 10/-.

Al Generala Kaso £1. 10.0. Al Gazeta Kaso £4.8.0

Gazetaj Elspezoj £3.15.4. En la Gazeta Kaso £1.18.7.

RESPONDOJ al LETEROJ RICEVITAJ de la KASISTINO.

S-ro J.Rose, New Guinea. Mi ricevis leteron kun Guinea Gold sur la sepa. Nur kvin tagojn survoje. Eksterordinare rapide, ĉu ne? Mi dankas vin pro ambaŭ, kaj skribos baldaŭ. Bonŝancon, Jim.

S-ino B.Westbrook, Hobart. Akceptu multajn dankojn de mia familio, miaj geamikoj, kaj mi mem por la pamfleto. Ni trovis ĝin tre TRE INTERESA, kaj ankoraŭ ĝi vojaĝas tra la oficejo en la G.P.O.

S-ino Groeneweg. Queensland. Mi sendas specialan dankon al vi pro la donaco al nia kaso. Nur per ĉi tiuj donacoj ni povas daŭni presi la gazeton. Novjar-salutojn.

S-ino Motteram. West Aus. Dankon pro via letereto kaj abono. Mi intencis respondi al vi, sed ial ne faris tion. Bondezirojn por la novjaro, kaj ne hontu pro via Esperanto, ĉar mi mem ne estas perfekta.

S-ino Hintze. Coburg. Mi ricevis de vi longan leteron, kaj nov-adresojn, kaj abonojn antaŭ kelkaj semajnoj, kaj devas diri dankon ree, amikino mia. Respondo venos baldaŭ; bonsanecon kaj bonŝancon por 1944.

S-ro A.Shain, Boxhill. Mi ricevis leteron de Harry ankaŭ. Nun mi scias kial miaj oreloj varmegiĝis, ĉar kompreneble mia nomo ne estis menciata inter vi...ĉu? Salutojn al vi kaj la familio de Adelaide.

Lieut. Stephens. West Aus. Mi devas gratuli vin pro via batalo kontraŭ Basic Eng. en la "Broadcaster," Via abono estas nun pagita ĝis Jan. 1946. Dankon pro la informajo pri arma poŝto.

S-ro Lamb, Sydney. Du leteroj kaj du dek ŝilingoj alvenis hodiaŭ. Specialan dankon al la bonkorulo kiu donis la dek ŝilingojn al la kaso. Mi gratulas vin pro la novaj studentoj. Salutojn al S-ino Lamb kaj vŝ.

S-ro C.P.Hehir. Kalgoorlie. La kotizo al la A.E.G.M. kaj Aus. Esperanto Asocio estas 5/- jare. Do vi nun pagis ĝis Aprilo 1946. Novjar-salutojn al vi.

S-ino E.Sainsbury. Hakea. Via bonvena letero alvenis hodiaŭ. Ĉu vi povas doni al mi la novajn adresojn de tiuj, kiuj iris al Perth? Mi gratulas vin pro la leteroj en la "Broadcaster." Ne sendu la varmegan veteron al Adelaide, mi petas.

W.ADDIS (Kasistino)

25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide, S.Aus.

Antaŭ kelkaj monatoj leganto plendis pri la vorto "ol" post "antaŭ", diranta ke tio tute ne necesas.

Lastatempe aperis en ĵurnalo amuza ekzemplo de miskompreno kiu okazis pro manko de tia komparativaĵo en la angla.

Post aŭto-akcidento diris ŝi: "How dare you swear before me?"
Respondis li: "I didn't know you were going to."

Nu, Esperante tiu dusenca ŝerco ne obliĝus, ĉar ŝi NE diris "Kiel vi kuraĝas malbeni antaŭ ol mi?"

Male, ŝi diris: "Kiel vi kuraĝas malbeni antaŭ mi?" nome,
"In my presence."
L.E.B.

LETEROJ al LA REDAKTORO.

de William Bailey, L.K.

SONORI AŬ SONORIGI?

....I will do what I can in reply to your letter. Since receiving it I have collected all the phrases with sonori and sonorigi which I have been able to find in Zamenhof literature. The result is: I cannot find any evidence for regarding sonori as a transitive verb. Only two of my quotations have accusative nouns after the verb sonori:

Kiam la sonorilo sonoras la liberecon. (Rabistoj 110/6)
La preĝejaj sonoriloj sonoris la komencon de la Kristnaska festo. (Fabeloj 111, 31/30)

But does sonori in these two sentences correspond with the usual function of a transitive verb, namely, to denote an action which passes across from one person or thing to another? I think not. I cannot see that the bells do anything to the liberty nor to the commencement of the Christmas festival.

In seventeen of my quotations the phrase actually ends with sonori or sonoradi.

Moreover, I cannot see that sonori, defined in the Universala Vortaro by means of three verbs used in both senses, is there by limited to one of those senses.

Against the evidence here adduced, the opinions of the most "eminentaj vortaristoj" have no weight with me....

(Legantoj turnu sin al paĝo 10 de nia Oktobra numero.)

C.C.Dornbusch. En via Januaro numero aperas sur paĝo 55 jena informo pri Aŭstralio: "Kelkaj arboj niaj, havante dekmilojn da folioj, ĵetas nenium ajn ombreon, ĉar ĉiu folio turnas sian randon fronte al la suno." Mi vizitis Botanikajn Ĝardenojn en Melbourne, Sydney, Brisbane, kaj Rockhampton, kaj loĝadis enlande en N.S.W. kaj Queensland, sed neniam mi vidis arbon kiu ne ĵetas ombreon. Ankaŭ mi neniam vidis arbon kies ĉiuj folioj estas ordigitaj laŭ direkto de la sunradioj. Ĉu estas eble ke oni povus ricevi botanikajn kaj vulgareajn nomojn de tiuj arboj? Aŭ ĉu estas rakonto de vojaĝanto-ŝercotrompo?

Reciproke al via Saluto 1944 bonvole akceptu miajn bondeziraĵojn kaj ankaŭ dankojn pro valora laborado de vi kaj viaj lertaj gehelpantoj por progresigo de Esperanto.

Typing errors in this and our last number will be noted in our next.

<u>PREPOSITIONS.</u>	Most of these you have already had.
al	<u>MALGRAŬ</u> , notwithstanding, in spite of. LI SUKCESIS,
anstataŭ	<u>MALGRAŬ</u> GRANDAJ MALFACILAJOJ, he succeeded in spite
antaŭ	of great difficulties. SPITE also can be used in
apud	this sense, with a somewhat stronger meaning, as a
ĉe	preposition, SPITE ĈIUJ LIAJ ARGUMENTOJ, in spite of
ĉirkaŭ	all his arguments.
da	<u>ANTAŬ</u> and <u>POST</u> both relate to <u>time</u> and <u>place</u> . When
de	<u>ANTAŬ</u> relates to place it means <u>before</u> , in front of.
dum	ONI METĈIS TELERON ANTAŬ MI, they put a plate before
ekster	me. When it relates to <u>time</u> , it means before, ago.
el	ANTAŬ NE LONGE, not long ago, ANTAŬ KELKAJ SEMAJNOJ,
en	some weeks ago. In order to avoid ambiguity, when
ĝis	ANTAŬ is used to express time, it is generally foll-
inter	owed by ol. LA MALLIBERULO ALVENIS ANTAŬ OL LA JUĜ-
je	ISTO, the prisoner arrived before the judge (arrived)
kontraŭ	the "ol" giving the idea of comparison between the
krom	arrival of the judge and the prisoner as regards <u>time</u>
kun	but for <u>place</u> one says merely LA MALLIBERULO STARIS
laŭ	ANTAŬ LA JUĜISTO.
malgraŭ	
per	<u>POST</u> meaning after, is ambiguous in English, e.g.,
po	He came after me might mean (1) behind, (2) later,
por	and this same ambiguity may occur in Esperanto if
post	we are not careful. POST LA REGINO VENIS LA DU PAĜ-
preter	IOJ, KIUJ PORTIS ŜIAN TRENAĴON, (place), After the
pri	queen came the two pages who carried her train.
pro	POST TRI MONATOJ ESTOS LA EDZIĜO DE S-ro SMITH KAJ
sen	S-ino JONES, kiu ESTAS VIDVINO DE ANTAŬ TRI JAROJ.
sub	(time).
super	
sur	Prepositions do not take the Accusative except to
tra	show "motion towards". (Lesson 7)
trans	

See Lesson 8 for adverbs formed from prepositions, but note the following rule, Whenever a preposition is not followed by a noun or pronoun, it must be the adverbial form. LABORU ANTAŬE LUDU POSTE, work beforehand, play afterwards. LI KURIS APUD MI, he ran near me, but LI KURIS APUDE, he ran near by.

Sometimes adverbs precede prepositions. MEZE DE LA KAMPO, in the middle of the field, FUNDE DE KESTO, at the bottom of the box. LI VENIS KUNE KUN SIA FRATO, he came together with his brother.

A few adverbs which are used in this way are sometimes followed by the preposition and sometimes not, if they are not, the complement must be in the accusative to show the omission. KONFORME

AL TIO, KONFORME TION in conformity with that: RILATE AL LIA KARAKTERO. RILATE LIAN KARAKTERON, in relation or as regards his character.

When LA follows a preposition which ends in a vowel, the A of the LA may be replaced by an apostrophe. LA FINO DE L' MONDO. This is called ellipsis, and is often done in poetry to accommodate the metre, and sometimes in prose when the writer wants to sound poetical.

The ending O may be treated in the same way in poetry :-
TRANS LA MONT' KAJ VALO, across mountain and vale.

TRADUKU! LA KORNIKO KAJ LA VULPO. El Esp-o Guide de Maurice Hyde.

Al ni ripetas ĉiam saĝo, Ke flato estas abomena; vane tute: En koron la flatul' penetras sendispute. Korniko trovis ie pecon da fromaĝo. Sur abion sidiĝinte Kaj appetite matenmanĝi intencinte,- Sidante, el la bek' ĝi la fromaĝon tenis. En tiu sama temp' la ruza vulpo venis. Odoro de l' fromaĝo ĝin haltigis: La vulpo vidas ĝin--la vulpon ĝi ĝojigas. Al arbo la fripon' sur piedfingroj iras, La voston svingas, kaj apenaŭ spiras, Kaj tiel dolĉe, tiel ĉarme diras: "Kolombo mia, kiel bela! Koleto kia, okuletoj! Kaj kia eksteraĵ' ĉiela! Beketo kia kaj plumetoj! Kaj certe devas esti via voĉ' anĝela! Ekkantu! Se vi bone kantas, kara mia, Kun eksteraĵo ĉarma kaj belega tia, Vi estus birdo-reĝo nia!" Pro laŭdoj la kornikon kaptis kvazaŭ morto, De ĝojo en la brust' spirado haltis, Kaj pro afabla de la vulpo laŭda vorto La malsaĝule grakis per la tuta forto: Elfalis la fromaĝ'---kun ĝi la vulp' forsaltis.	ripeti, to repeat flato, flattery vane, in vain flatulo, flatterer penetri, to penetrate disputi, to dispute korniko, crow fromaĝo, cheese arbo, fir tree appetite, with appetite intenci, to intend beko, beak ruza, wily odoro, scent, smell halti, to halt (intr.) fripono, rogue piedfingro, toe svingi, to swing spiri, to breathe kolombo, dove kolo, neck anĝela, angelic laŭdoj, praises brusto, breast afabla, kind graki, to croak
--	---

de I.A.KRILCV: el la rusa tradukis V.N.DEVJATNIN.

Sometimes in Esperanto, a pronoun follows a noun in order to express affection: PATRINO MIA, mother mine.

THE
A U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y .

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Vol 4 , No. 6 , MAR. , 1944 .



EDITED BY
F. R. BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSENDON W5., VIC.

O-O-O
LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooo
Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

oooooooo

POLITIKAJ GLOBTROTANTOJ.

Nuntempaj verkistoj, precipe tiuj kiuj pri traktas politikajn kaj internaciajn problemojn, estas kategorieblaj en du klasojn: (1) Homoj kiuj vaste vojaĝas en Eŭropo kaj multe rigardas, kaj (2) homoj kiuj restas hejme kaj multe pensadas. Kiam la pensuloj vojaĝas kaj la vojaĝuloj pensados, tiam la mondo eble ricevos politikajn verkojn nek tro abstraktajn, nek tro sensaciajn.

Se verkanto celas elmontri la veron kaj malkaŝi la malveron, li devas esplori ne la simplajn okazaĵojn, rezultaĵojn, sed serĉi en la mistera kampo kie ludas la instinktoj, deziroj, avidoj kaj impulsoj jam de la raskomenco formantaj parton de la homa naturo, Bombo falas sur Eŭropan urbon. Terura kaj spektakla afero. Grupo da Faŝistoj aŭ Komunistoj kantas, flagflirtigas, kolorĉemize brilas. Okulfrapa vido. Sed por funde sciigi pri tio, kial popoloj amas al tiaj manifestacioj kaj strangaj vestomodoj, ni devos studi la kulton de la ritoj praaĵ kaj modernaj, misteran eternan allogan kiu tiel forte efikas sur la emociojn. Se ni efektive deziras ne plu vidi bombojn fali sur senkulpaĵajn viktimojn,

ni devas pacience trovi kaj analizi la senraciajn kredojn kaj timojn kiuj pelas homojn dispecigi aliajn homojn.

Ĝiusemajne nove "ĉefverko" aperas el la plumo de iu globtrotanta raportisto. Ĝi portas kun si odoron de korditfumo. La militkrioj de rivalaj partioj oreliširas tra ĉiu ĉapitro. Se vi volas scii kian truon faras maŝinpafa kuglo tra dika vitro, aŭ kian sonon faras falanta bombo, vi trovas tiajn verkojn altvaloraĵ. Sed se vi serĉas la bazkaŭzojn de la tragedioj kiuj nun inferigas la mondon, vi ne tiros multe da helpo el tiuj reklamataj verkoj.

Verkoj pri mondpolitiko devus havi kiel ĉefan celon: studi faktorojn kiuj kondukas al milito, revolucio kaj aliaj sociaj perturboj, kun intenco akiri scipovon regi kaj direkti tiujn faktorojn por eviti la sociajn dolorojn. Malgraŭ la maro da libroj, tiu celo ne estas atingata, ĉar la gravega laboro, lumi la publikan menson pri internaciaj demandoj, estas preskaŭ tute

las/ata al "gento" da ĵurnalistoj kies ĉefa celo estas produkti librojn de speco "vaste-venda politika." Ŝajnas timinde ke la diable malfacilaj enigmoj de la postmilita tempo neniam ricevos finajn solvojn se daŭre regnos la spiritojn sensacion-ĉasistoj, kiuj kuregas tien-reen en Eŭropo avide flar/serĉantaj "plejlast-ajn novaĵojn."

Bertrand Russell, Aldous Huxley, C.E.M. Joad kaj H. G. Wells dediĉis la vivon al profunda studado de la risortoj de homa agado kaj la kompleksaj problemoj de internaciaj rilatoj. Ties verkoj estas aĉeteblaj. Malgraŭ tio ni vidas ŝajne inteligentajn homojn legantaj kaj laŭdantaj verkojn kiuj estas nenio ol politikaj "ekscitromanoj." "Mi Venis el Francujo," "Mi estis Nazia Flugarmeano," "Mi estis la Sekretario de Churchill," Kian kontribuon al la terurantaj taskoj de la nuna socio povas fari tia speco de ĵurnalajtoj?

En 1937, du jaroj antaŭ la plej granda katastrofo de la historio, Aldous Huxley verkis "Ends and Means." Ne politika ĵurnalisto li estas, sed unu el la plej penetraj pensuloj de la jarcento. Lia verko ne estis krude ekscita; male, serioza studo de la danĝeraj politikaj inklinoj kiuj tiam pli kaj pli premis la popolojn ĝis la abismo. Ĝi senpasie, logike ekzamenis Komunismon, Faŝismon kaj informis pri la diversaj formoj kaj ŝajnaspektoj sub kiuj tiranio kaj totalismo false sin prezentas, montris kiel diktaturoj enrampadas nerimarkate sub fumŝirmo de artifiko. Ĝi solene avertis ke preskaŭ ĉie oni uzas malbonajn rimedojn, erare kredante ke tiamaniere oni trafos bonajn celojn. Joad, Russell kaj Sir Norman Angell simile verkis en la antaŭ-1939aj jaroj, sed ankaŭ al ili malprosperis forturni la kataklismon, ĉar, ni devas supozi, ke interalie ili ne verkis sufiĉe emocikirle, spektaklece, kaj prezentis pensojn tro subtilajn por la mensa kapablo de homoj kredantaj, ke manporti internacian vojaĝlibron aspektigas ilin pli intelektaj ol legantoj de krimromanoj.

La Aliancaj Nacioj reprezentas sistemon de interna administrado senfine preferindan ol la totalismo de la Akso. Sed ĉu la demokracioj havas planon per kiu justo, juro, ordo benos la internacian sferon? Nune oni elgurdas oceanojn da vortŝaŭmo pri Novaj Ordoj kaj Liberecoj kiuj venos post la buĉado. Sed pri la ĉefgrava demando oni aŭdas preskaŭ neniom: Ĉu la postmilita mondo estos sana socio en kiu internacia juro regos, aŭ ĥaoso en kiu universala barbareco orgios? Estas malutile paroli pri novaj ordoj kaj liberoj por nacioj kiuj povus starigi sin solaj jugantoj en disputoj kontraŭ aliaj nacioj. Ĉar tiaj nacioj povus, per simpla militdeklaro, forbalai en du-tri horoj la liberon kaj ekonomian progreson de sia kaj de aliaj popoloj. Devas esti solvita antaŭ ĉiuj aliaj la problemo de internacia paco, de maniero en kiu la diversaj rasoj povus kunvivadi harm-

onie. La taskon povos fari nur la seriozaj pensemuloj. Eble la solvo jam ekzistas. Sed vi ne trovos ĝin en facile vendeblaj verkoj de ĵurnalistoj-globtrotantoj.

Elangligis FRB.

(Mi ne plene konsentas kun la aŭtoro. Almenaŭ unu tielnomita "ĵurnalista" libro meritas atentan legadon---"Last Train from Berlin" (Howard Smith). Verkita en "popolana" lingvaĵo, ĝi penetre sed pikinterese analizas la internan staton de Hitlerujo ĝis Decembro 1941, kiam Smith, Usona raportisto, devis fuĝi sialanden. Koncerne la estimindan Aldous Huxley, ni rajtas demandi al ni: Ĉu Britujo restus nekonkerita je la fino de 1940 se, anstataŭ simplaj homoj, tiu lando estus enlogata de Aldous Huxley-oj?

Rimarkoj de la Tradukinto)

B.B.C. ORGAN AND BASIC (16 Sept. 1943)

Pro la komplezo de nekonata amiko en Okc. Aŭs., W. Hanson, mi povas represigi tiun ĉi leteron el "The Listener," gazeto de la B.B.C.: "Should we have Basic English?": The fact that Mr. Churchill ~~Mr. Churchill~~ has appointed a Ministerial Committee to study and report on Basic English is encouraging. It does at least indicate that the problem of language diversity has now been realised as an anachronism that must be eliminated. With the growth of international organisation that will follow this war, it will become even more urgent, when the efficient working of complex affairs of state will depend on a common code of expression. Yet is Basic English to be this medium? The objection to any one national tongue is that it confers an advantage on a particular section of the community. In any case, as E.D. Durrant says in "The Language Problem": "The conscious desire to foist one's language upon the world in a pidgin or emasculated form seems unique in the annals of linguistic self-respect." What will the people of other nations have to say about it? After all, it is for them and they will decide. (How would we react to the suggestion of Basic German?) Surely the only true solution is a constructed auxiliary language that is not the property of any one nation. Esperanto, a well established and a living language which arouses no national jealousies, has been fully tested for over half a century. Easily acquired and capable of expressing the finest subtleties of thought, it meets the needs of specialists and serves the common folk everywhere, who can fraternise on terms of complete equality. From this ideal the language was born---in Poland---and today as all

as all Esperantists testify it is imbued with the very spirit of international concord.

L.G. WATSON (Bristol)

GRANDINDUSTRIULO. (El "Punch")

Diris mia amiko Pokvisl: "Se Skrogit naskiĝus en pli alta soci-medio, li tre riĉiĝus en la grandindustrio. Nur malmulte da bonokazoj prezentas sin al li en la modesta ofico zorgi-purigi lu-etaĉaron, sed malgraŭ tio, li bele sukcesis en unu-du rimarkindaj aferoj. Ekzemple pri la perdmatoj."

Mi enpensiĝis. "Ĉu Skrogit estas vireto kun senesprima viz-aĝo kaj nematuraj lipharoj?"

"Jes," respondis Pokvisl, "sed tiu senesprima mieno maskas unu el la plej fortaj inteligentoj de nia epoko. Sendube vi rimarkis, ke sidas mato ekster la pordo de ĉiu ĉambro? Observema homo, vi krome rimarkis, ke la matoj havas nesamajn desegnojn. Ĉies fono estas bruna, sed iuj havas elegantajn krucaĵojn verdajn aŭ ruĝajn, aliaj havas kvadratajn desegnojn, ankoraŭ aliaj estas beligitaj per diversaj kombinoj de cirkloj. Tial ke la arkitekto planis la loĝejblokon dum ebria duonkonscio, estas neeble, ke la loĝantoj tenu la matojn interne de la pordoj; sekve ŝtelemuloj facile prenas ilin. Kelkaj luantoj subite perdis la matojn, kvazaŭ ilin forprenus nevidebla mano. Antaŭ ses semajnoj ankaŭ mia malaperis. Ĝi estas sorĉe bela mato, kun bontona strio verda; larmoj perlis ĉe mi---mi esperas ke ne larmoj de malforta karaktero---kiam mi informis al Skrogit pri la tragedio, petante ke li aĉetu por mi novan."

"Ĉu li kompatis vin?" mi demandis.

"Ja, li estis eĉ helpdezira. Li diris, ke li povus vendi uzitan, nur iomete uzitan maton kontraŭ dek ŝilingoj. Pro aparta bonŝanco (li klarigis) iu ekŝanta lu-tenanto petis lin trovi aĉetulon; al li la afero ŝajnis vere di-aranĝita. La proponata mato estis trokoloraĉa objekto, kun verda floro meze, kaj ruĝaj makuloj. Viŝi botojn sur la malnova mato ĉiam donis senton de esteta plezuro, kaj mi ofte pensis dolĉe-melankolie pri la bonaj tempoj jam for. Prezentu al vi, kiel mi mirfrapiĝis, post kelke da tagoj, ekvidante mian malnovan verdstriitan maton ekster la pordo de 14a ĉambraro en apuda bloko. Mi frapis la pardonon, petis la loĝanton (iu Majoro Pik) pri tio, de kie li aĉetis la maton, ĉar jam de junuleco mi serĉis ĝuste tian. "Se vi povas nomi ĝian aĉetlokon mi kuregos tien por akiri antaŭ ol la stoko forvendiĝos!"

"Domaĝe, mi ne povas," li negaje respondis, ĉar mi brokante aĉetis ĝin de S-ro Skrogit post ol mia propra perdiĝis antaŭ ses semajnoj." "Ĉu via malnova havis floron ĉemeze?" mi pafis. "Jes vere," li konfirmis; "bela mato ĝi, kun verda floro kaj treege bontonaj ruĝmakuloj."

Pokvisl paŭzis dramece. Mi demandis, ĉu li indigne al Skrogit akuzis. Li skuis la kapon. "Se vi iam loĝus en luĉambraro vi sciis, ke la homoj ne senpune ofendas la dompurigistojn. Iliaj fortoj multe superas viajn, ĉar centmaniere tiaj uloj povas venĝi sin. Ili povas vorte ofendi viajn vizitantojn, flustri al vendistoj, ke ili saĝe aferus kun vi nur kontraŭ tiantanta mono; rifuzi malfermi la stratpordon al vi, kiam senŝlosila lace hejmrevenas je noktomezo. Ne, mi ne rekte akuzis lin. Sed mi deziris iel sciigi al li, ke lia fikonduto ne plu estas sekreta. Mi signiftone kaj lertemfaze parolis al li pri matoj ĝenerale, dirante inter alio, ke jam de mia matmalapero mi ne sentis plezuron matviŝi la botojn. Mi esperis, ke tio pikos lian konsciencon."

"Ĉu pikis?" mi scivolis.

"Ne," respondis Pokvisl. "Post du tagoj li metis al mi ankoraŭ unu dekŝilingan proponon. Liadire, eksiganta luinto vendis al li verdestriitan maton, kies desegno tre plaĉus min. Li tial fide aĉetis ĝin, samtempe prenis la liberon doni al rubisto mian neamatan florar-desegnan.....Jes, vi divenis! Vizitante al Majoro Pik, mi vidis, ke sian florar-desegnan li jam rehavas."

----- F.R.BANHAM. (trad.)

ENIGMOJ. (N. indikas vorton kun gramatika finaĵo)

(1) TRINKAĴO.

Mia unua litero estas en parol sed ne en kant;
Mia dua litero estas en fingring sed ne en gant;
Mia tria litero estas en karmin sed ne en flav;
Mia kvara litero estas en hero sed ne. on brav;
Mia kvina litero estas en modern sed ne en freŝ;
Mia sesa litero estas en ĉeval sed ne en bov;
mia sepa litero estas en planed sed ne en sun.
Mia tuto estas agrabla somera trinkaĵo.

(2) GRANDIĜA VORTO.

Mi estas sufikso kaj memstara vorto; aldonu kapon, mi fariĝos teksebla ŝtofo; aldonu voston, mi fariĝos granda teritorio; aldonu kapon, mi fariĝos parton de la piedo; enmetu literon, mi fariĝos astro.

(3) DU-VORTO.

Vegetaĵo kiu perforte forprenas, estas legomo.

(4) LOZANĈO.

1, Litero. 2, Granda ŝtono. 3, Li havas multe da mono.
4, Insekto. 5, Alligi. 6, Ascio. 7, Litero.

Por solvoj v.p. 92

-----"ANO."

LA SENKOMPATA KAPITANO.

(Malnova Germana Popolkanto).

Strasburgo, ho Strasburgo,
Belega urbo vi,
Sennombraj militistoj
Mortrestas tie ĉi.

"Neniam mi redonos
La filon ja al vi.
Sur vasta bataalkampo
Pafmorti devas li.

Multege da beluloj,
Kuraĝon en la kor',
Postlasas la gepatrojn
Laŭ senfidela mor'.

"Sur vasta, sur larĝega,
Kun kuglo en la kor',
La amatino kvankam
Pereas pro dolor'."

"Solece, tre solece,
Karuloj, restas vi,
En Strasburg', ja en Strasburg'
Soldati devas ni."

Ŝi ploras, ŝire plendas,
La kor' doloras ŝin ---
"Adiaŭ, pleĵamato,
Ni ne revidos nin."

Gepatroj plende petas
Al kapitan':... "Sinjor',
La filon liberigu,
Kompaton en la kor'!"

Strofo 1. Strasburgo estis granda garnizona urbo, kaj en la popola menso ĉi eble simbolis la tombon de la amataj filoj volonte soldatiĝintaj.

Strofo 2. "senfidela (treulos) moro". La junaj viroj, avidaj al gloro kaj aventuroj, rekrutiĝas, tiel forlasante "laŭ senfidela moro" sia, la kompatindajn gepatrojn.

Tradukis K.HIRSCHEL, Eks-ano de la Germana kaj Aŭstralia armeoj, trifoje dekoraciita, sepfoje ĉakritita, eterne seniluziita.

ESPERANTO EN MAROKO: La E.-movado en Maroko datiĝas nur de 1936-7. Antaŭ 1936 izoluloj troviĝis en Hispana Maroko sed en Franca Maroko S-ino Irene Pink ekpioniris en Okt. '37. Ŝiaj propagandaj vojaĝoj kaj korosp. kursoj rezultigis delegitan ret-on modestan. Aperis prop. art. en la ĉefaj ĵurnaloj. Sam-oj el

Eŭropaj landoj vizitis la ĉarma ekzotikan Marokon, kaj la prez. de la Franca Societo por Prop. de E. Tiam la milito! De interne venis la plej sentata malamikeco. Oni "ne deziris" nian movadon. Ni tre suferis pro neagado dum tiu sufoka periodo kaj revis pri liberigo. Ĝi venis. Estis la 11 Nov. '42, kiam Usonaj soldatoj forigis Germanan senton kaj influon. Sed nia laboro ankoraŭ lamis, ĉar interne nenio ŝanĝis tiom longe kiom la lokaj servuloj de Germanujo regis en la lando; ĉar la Usonanoj ne okupiĝis pri nia administrado. Tamen iompostiom oni ŝanĝis la oficistojn, kaj nun ni antaŭenpuŝas nian aferon malgrandpaŝe. Kores. kurso funkcias; S-ro Thollet radiparolis, sed kurso perradia ne okazis (eble post la milito); ni havas kelkajn novajn delegitojn kaj lokaj gaz. eĉ akceptis reklametojn por E. (Resumo de art. de I.F. en "Esp. Int." Nov. Dec. 43)

Rim. de la Red. --Korespondemuloj povus skribi al S-ino Irène Fink, 5 Rue Savorgnan de Brazza, Casablanca, Maroko.

S-ro C. Thollet, Avenue Clemenceau, Port Lyautey, Maroko.

F-ino A. Bienvenu, rue Docteur Beuffeuil, Khemisset (des Zemmour), Maroko.

.....

"Malgranda Revuo" (32 p.) eldonita de Stellan Engholm (Svedujo). I.E.L. klopodos perili por tiu gaz.

"Papeles," Hispanlingva, Kubo. "Resum-gazeto" kiu enhavas kelke da Hispanlingven-trad. pecoj el Esp. gaz., inter ili art. pri Zamenhof.

ASOCIAJ AFEROJ.

KOMITATO. Jen la nomoj de la komitatanoj de la Asocio por 1944 kaj 1945:

BRISBANE ESP. SOCIETY: Ankoraŭ nomota.

SYDNEY ESP. SOCIETY: S-ro P. Schwerin.

MELBOURNE ESP. CLUB: S-inoj F. Rawson, A.C. Hintze.

TASMANIAN ESP. ASSN: S-roj G. Chatterton, G. Hillerman.

WESTRALIAN ESP. SOCIETY: F-inoj O. Stremple, A.L. Bailey.

WESTERN AUST. ESP. LEAGUE: F-ino Edith Willis, S-ro R.F. Stephens.

KOMITATANOJ "B" - ALBLEKTITAJ: F-ino W. Addis (S. Aus.),
D-ro A. Binichorici, (Corrigin, W. Aus.)

LIBROSERVO. Jen mallonga listo de libroj, kiujn ni povas importi kontraŭ antaŭpagita mendo. Por aergrafa mendo aldonu 10 pencojn---prezoj enhavas sendkoston:- Vivo de Zamenhof, La Dormanto Vekiĝas (H.G.Wells), Panny (Edna Ferber), Pinokjo (La Fama Infanrakonto "Pinocchio")---ĉiu 6/6. The Language Problem---its History and Solution (Durrant) 10/-, Jane Eyre 8/6, Iallierter 10/-, Romano pri Afrika Bieno 3/9, La Sunkrono 6/-, Undino (Olive Schreiner) 5/3, La Biblio 9/-, Vivo de nia Sinjoro Jesuo (Charles Dickens) 9/-, Komerca Vortaro 3/3. Ni memorigas vin, ke niaj Perantoj nun havas la belan celuloidan insignion 1/- sendkosto 2^{ad}.

KORESPONDA KURSO. Ni danke ricevis la jenajn donacojn por la reklamo de la nova koresponda kurso:- F-ino Carrick 1/6, Sydney Esp. Socy 5/-, F-ino W. Addis 1/-, S-roj F.Pitt 10/- kaj G.H. Hillerman, 10/-.

Ni denove esprimas la esperon, ke ĉiu ebla membro kaj grupo helpos nin en la starigo de ĉi-tiu kurso, kies reklamo kaj starigo povus multe kontribui al la forto de la grupoj. La kurso uzota estas tiu, kiu en Anglujo jam varbis 2660 lernantojn, La populara Correspondence Course B.E.A. Flenajn detalojn ni baldaŭ anoncos.

ALIGINTA GRUPO. La aliĝpeton de Western Australian Esperanto League akceptis la Asocia Komitato la 31an de Decembro 1943. Elkoran bonvenon al la Ligo.

----- G.H.Hillerman (Sek.)
Box 75, Devonport, Tas.

KASO

Kvitancoj Ricevitaj---Syd. Esp. Soc. 6/-. S-inoj Hanrahan, Sainsbury, V.Baker, Dollahan 20/-. S-roj F.Schwerin, Wanmer, Porter, Cuvet 20/-. S-ro K.Hirschel 3/-. S-ro E. Walker 12/6. S-ro Dwyer 4/7¹/₂. Ges-roj Couche 10/-. S-ro A. Turner (2 jaroj) 10/-. S-ro A.C.Boyle (2 jaroj) 10/-. F-inoj Strempele, Curtis, Bird, Jarvis 20/-. S-inoj Back, Hewison, Douglas, 15/-. F-ino L.O'Connor. S-ro Moore 5/-. Rev. Rymer 8/6. Donaco al la AEM 10/-....£7-19-7¹/₂.

Al Ĝenerala Kaso...£2-5-0. Al Gazeta Kaso £5-14-7¹/₂.
Gazetaj Elspezoj £3-16-5¹/₂. En la Gazeta Kaso £3-16-9.

F. W. ADDIS, (Kasistino),
25 Greville Ave. Flinders Park,
Adelaide, S.Aus.

NOV-ZELANDA REGISTRARA DECIDO FAVORA AL ESPERANTO. Ni ĝojas informi, ke laŭ raporto en "La Interna Ideo" la N.Z. poŝto jam de nun repermestas Esperanton uziĝi kiel lingvo por eksterlandaj komunikoj. Per tiu paŝo la registaro de tiu laŭfame progressa lando forigas makulon de maljusteco aŭ malsaĝeco. Laŭ nia nuna scio la nura lando ankoraŭ persistanta en tiu stranga sinteno estas Portugalujo. Eĉ en la plej kriza tempo Britujo neniam malfavore agis kontraŭ Esperanto poŝte aŭ alimaniere. F.R.B.

QUEENSLAND. The Brisbane Society began the year with a larger attendance than usual, and keen interest was manifested. The classes which preceded the business and social part of the evening were conducted by S-ro Menzies (senior), F-ro Carrick (intermediate), and Fro H. Sycamore (junior). S-ro C.Kidd was re-elected representative on the A.E.A. for 1944-5. The programme for the year includes moving or still pictures by S-roj Kidd, J. Nebe (with Mr. H.N.Love as lecturer) and K.Brown, also an epidiascope evening and an evercirculator evening for students, reminiscences by S-ro Menzies, who was, years ago, an overseas Samideano, a display of travel photographs by Mr. O.H.Behncken, and impromptu speeches in Esperanto.

S. WANMER.

LA RENDEVUA KONKURSO. Ok rakontoj ricevitaj. La juĝanto (S-ro F.R.Banham) donis poentojn laŭ ilia presindeco en organo kia AEM. Celante tion, li elektis per la premio "Bonŝanca Eniro." Tiun sendis S-ro N. Brodie, de Wembley Park, W.Aus. La premio estas libro de Eleanor Dark, "The Timeless Land." Por tio la grupo dankas S-ron S. Ling. Ĉar laŭ la opinio de la juĝanto estis tre maldika margeno inter "bonŝanca Eniro" kaj "Ok Flavaj Teleroj", oni donacis duan premion al S-ino O.Glenie de Melburno, kiu ricevis libron "Historio de la Lingvo Esperanto" (E.Privat) donacitan de S-ro C.W.Ballard. Ĉiu rakonto estos legata antaŭ la grupo kaj poste sendata al AEM por presado se la redaktoro akceptos ĝin.

Ĉar la Rendevua Grupo pensis, ke Esp-istoj povus esti ankaŭ verkemuloj, ĝi forte esperis, ke eniroj venus el ĉiuj partoj de Aŭstralio kaj per tio bona helpo estus donita al la AEM. Ĝi bedaŭras, ke tiu helpo ne venis el ĝia iniciato. Tamen, estas certe, ke la konkursantoj, per sia verklaboro, plibonigis sin en la uzo de nia lingvo.

TROVITA! Virina saketo, lasita en mia aŭto dum ĝi staris en strato. La perdinto povas rehavi ĝin kontraŭ la kosto de tiu ĉi reklamo. Se la perdintino povos kontentige klarigi al mia edzino kiel okazis, ke ĝi estu en mia aŭto, mi mem pagos la reklamkoston. (Usona gazeto.) F.PITT. (trad.)

ERRORS in Jan. no. p 54, linio 3, lasta strofo "for de ĉi;" En piednoto leg u "pelas".

Feb. numero. p. 64, 6 de mals. vinagra; p. 67 "ke aferoj okazu." 69/3 Gipfeln; 70/6 de malsupro "grandan ŝancon, multe antaŭvenni hodiaŭ. Mi suprengrimis proksiman monteton, kaj, kiam ni staris" 74/1 aliigebla. 75/9 de mals. aergrafa.

LETEROJ AL LA REDAKTORO.

De S-ino GROENEWEG. Mi vidis en la Februara numero kelkajn remarkojn de "Linguist" (R.W.C., Fitzroy) pri la Holanda lingvo. Li diras i.a. ke la Germanoj kaj Holandanoj diras V simile al F aŭ PH. Permesu min certigi vin ke la Holandanoj ne prononcas V kaj F same. Ni diras VERS ne FERS (pocmo); VOLK ne FOLK (popolo); VISCH ne FISCH (fiŝo); VRIEND ne Friend (amiko). Estas granda eraro en Holanda lingvo, kiam oni ne prononcas diference inter V kaj F. Se oni ne lernis korekte paroli la lingvon, oni faras tiujn ĉi erarojn. koncerne la prononon de A, E, I, multaj homoj pensas ke estas 'la Aŭstralianoj' generale, kiuj fuŝas la vokalojn. Sed multe da instruistoj, eĉ B.A-oj, faras tion. Mi opinias, ke edukitaj "Eŭropanoj" bele parolas la Anglan, sed kompreneble mi ne parolas pri tiuj homoj kiuj "pick up" lingvojn. Mi renkontis (as) samlandanojn kiuj parolas la Holandan aĉe, sed tio ne signifas ke oni parolas tiel en Holando se oni efektive bone lernis la lingvon.

De 57860, L.A.C.LINTON(K.G.), Hut 49, Group 631, RAAF, Nowra. Mi certe ne konsentas kun tiu diro, ke certaj Aŭstraliaj arboj ne ĵetas multan ombbron. (p 55, Jan. N-ro de la AEM). Mi supozas, ke oni aludas al la eŭkaliptoj. Ili certe ne ĵetas multan ombbron, sed tio estas ĉar ili ne havas multe da folioj.

De KARLO MADRIGALO. En ĉiu aperinta numero de AEM aperas poemĉo. La verkantoj aŭ tradukantoj ŝajne estas nur duono de dek du. Ĉu la ceteraj legantoj de AEM transsaltas ilin kiel mi faras? Ankaŭ ĉu ni ne havas sufiĉon de la traduk-konkursoj? Se ili estas daŭrigotaj mi sugestas, ke oni traduku Aŭstraliajn verkojn, ekzemple The Loaded Dog (H.Lawson), The Fate of the Alida (Louis Becke) kaj simile. Per tio la tradukoj farus komencon de Aŭstralia antologio.

PASCAL B: Ĉiu nia preferenco bazas sur la kapablo de la prudento. Nur la prudento superigas nin en la mondo. Do ŝatu kaj gardu tiun ĉi havaĵon, kiu lumigas nian vivojon kaj montras la diferencon inter la bono kaj la malbono.

SOLVOJ. 1. LIMONADO.

2, An - LAN - LAND - PLAND - PLANED.

3, RAB-ARB, RABARB.

4.

K
rOk
riĈul
KOCINIL
kuNig
lig
L

BALDAŬ AŬ BALDE?

En la Feb. n-ro, p. 69, estas: "balde ripozos vi ankaŭ." Iuj legantoj demandis pri la boneco de tiu formo. Responde mi citus el "Plena Gramatiko de E-o" (Kalocsay kaj Waringhien), p.54 (2a eld): "La aŭ-adverboj (morgaŭ, hieraŭ, k.t.p.) propre estas puraj adverboj, tiel do nenio motivas ilian apartan formon. Jam okazis provoj uzi ilin en simpla adverba formo (morge, hiere k.t.p.), kio cetere kunportus ankaŭ la simplan formon adjektivan (morga, hiera...) kaj substantivan (morgo, hiero...). Tiuj provoj eĉ estas oficiale tolerataj de la Lingva Akademio (Raporto de prezidanto Emile Boirac, Oficiala Gazeto, Apr. 1910). La grandan forton de la E-a traducio pruvas tio, ke tiu ŝanĝo, malgraŭ siaj avantaĝoj kaj malgraŭ la oficiala nekondamno, tamen ne povis enhejmiĝi.

"Laŭ la diro de Zam. la aŭ-finaĵo en la adverbo "ne apartenas al la radiko" kaj oni povas ĝin-anstataŭigi per apostrofo: ankor', apen'. Sed krom kelkaj sporadaj provoj en la poezio, ankaŭ tiu permeso de Zam. ne estis atentata."

S-ro Butler en British E-ist, Jan. 1906, konfirme skribis: "En 1909 la Akademio permesis la paralelan uzon de anke, apene, morgo, k.s. Do tiutempe mi ne estus nominta ilin eraraj. Tamen la vivo montris, ke oficiala tolero ne suficis vivigi formojn, kiujn la E-ista mondo ne bezonas."

Mi ne laŭvorte konsentas kun M.C.Butler. Malofte uzado aŭ malmulta ŝatado de permesata formo tute ne igas ĝin erara. Se tio estus vera, la litero "Ĥ" estas jam erara. La permeso uzi "-e" anstataŭ "-aŭ" estas dia donaco al la poetoj precipe, kaj mi miras ke la aŭtoroj de la "P.G." tiel nevarme parolas pri ĝi.

En la citita poemeto "balde" perfekte rimiĝas kun "falde"; kiel alie oni fari povus, jam sciante pri la permeso?

Fine, konjektu: kial Zam. kreis la vortojn en -aŭ?

-----F.R.B.

La presistino treege bedaŭras, ke ŝi perdis la notojn de S-ro P. Schwerin pri la traduk-konkurso. Ne troviĝas tempo por havigi alian ekzemplon. Ŝi petas mil pardonojn de la anoj de tiu konkurso kaj aparte de S. Schwerin mem. Ili aperos en nia venonta numero.

L.E.B.

We have already seen that POR before a verb means in order to, NI TRIS POR VIDI LA KURICISTON, we went to see (in order to see) the doctor.

But when the POR is followed by KE, it implies a desire, and is followed therefore, by the Imperative, POR KE VI TRANĈU LA KUKON, (cake) MI DONAS AL VI TIUN ĈI TRANĈILON, In order that you may cut the cake, I give you this knife. POR KE VI ESTU ELEKTATA, VI DEVAS ESTI TRE POPULARA, in order to be elected, you must be very popular. MI VOLAS ĈION FARI, POR KE VI ESTU KONTENTA PRI MI, I wish to do everything so that you will be satisfied with me. (Notice, we must say KONTENTA PRI, not "kontenta kun").

VE means Alas! Woe! HO, VE! Oh dear! VE ~~ZAL~~VI, Woe unto you! It can be used as a prefix: VEKRIADO, lamentation, VEASPEKTA, woe-begone; VEA, VEPLENA, woeful.

You have already had AJN used with K words, but it is also used when any in English means any whatever. "What will you have?" "Oh, anything (whatever---i.e., it doesn't matter what). DONU AL MI ION AJN, Give me anything. VENU IAM AJN, Come at any time (you like); KIU KOMENCU? IU AJN, Who is to begin? Anyone (whatever, i.e., it doesn't matter who) IU AJN POVUS TION FARI! Anyone could do that! NENIO AJN, nothing at all; ĈIO AJN, absolutely everything. Do not put DE between two nouns when it means "named", even when in English we use of. La monato Aŭgust, the month (of) August. LA KONTINENTO EUROPO, The continent (of) Europe. DU PAROJ STRUMPOJ, Two pairs (of) stockings.

There is no Indefinite Article in Esperanto like our a in English, and the definite article LA is used much as we use "the", but there are a few differences.

(1) It is usually used before nouns denoting the totality of persons and things, where we omit it. LA HOMO ESTAS MORTEMA, Man is mortal; LA MEDICINO ESTAS SCIENCO KAJ LA PENTRADO ARTO, Medicine is a science and painting an art. LA AZENOJ AMAS LA KAROJN, Donkeys love thistles; LA VENTO OFTE KAŬZAS DETRUON, wind often causes destruction. In this case Vento means "wind" in general, but "To-day we shall have wind," meaning some wind would be HODIAŬ NI HAVOS VENTON. Similarly HAJLO FALAS, Hail is falling, means some hail, but LA HAJLO ESTAS TRE MALUTILA AL LA VINBEROJ means hail in general and grapes in general.

LA is not used before proper names. DANUBO, the Danube, ALPOJ, the Alps.

It is used, however, if the proper name is preceded by a qualifying word. LA GLORA POETO, DANTE, LA BONA REĜINO, VIKTORIO.

LA is often used where we use a pronoun if there would be no doubt to whom the LA refers: MI HAVAS DOLORON EN LA KAPO, I have a pain in my head (I couldn't have a pain in anyone else's head!) In the same way, when there can be no doubt, it is used in speaking

of relatives: MI AMAS LA PATRÓN, I love my father; KIE ESTAS LA KUZO? Where is your cousin?

LA is nearly always used before numeral adjectives showing the day, hour, month, etc. Hodiaŭ estas la dek-naŭa de Aŭgusto, Today is the 19th. of August, but it is optional before the names of the seasons, and also between each separate noun and adjective. EN LA VINTRO, or EN VINTRO; LA ARBOJ, LA FLOROJ KAJ LA KRESKAJOJ DE LA ĜARDENO for LA ARBOJ, FLOROJ, KAJ KRESKAJOJ (plants) de...

ESTI always takes the nominative case, even when it is understood and not actually expressed. At first sight the sentence MI TROVIS LA GLAVON AKRA looks wrong, and MI TROVIS LA GLAVON AKRAN looks right. They are both right, but have different meanings. In the first sentence ESTI is omitted, and the full sentence MI TROVIS LA GLAVON ESTI AKRA, i.e., I found that the sword was sharp, while the second sentence means I found the sharp sword.

Now turn to Lesson 12, line 2: (la reĝo) TROVIS SIAN PAGION KIU ESTIS DORMANTA EN BRAKSEĜO could have been expressed equally well by leaving out "kiu estis" and saying (la reĝo) TROVIS SIAN PAGION DORMANTA EN BRAKSEĜO.

TRADUKU! RAKONTETO el The Esperanto Guide, de MAURICE HYDE.

Iam estis knabo, kiu vojirante rompis (broke) nuksojn (nuts); jen li trovis unu vermboritan (worm-bored), kaj en la sama momento li renkontis Satanon (Satan).

"Ĉu estas vere," diris la knabo, "kion oni diras, ke Satano povas tiom malgrandigi sin, kiom li volas, kaj trairi truon (hole) de kudrilo?"

"Jes," respondis Satano.

"Montru tion al mi, kaj enrampu ĉi tiun nukson," diris la knabo; kaj Satano tion faris. Kiam li estis enrampita tra la vermtruo, la knabo ŝtopis (plug, close) ĝin per peceto de ligno. "Nun mi vin havas tie ĉi," li diris, enposigante la nukson.

Irinte iom da distenco, li venis al forĝejo; li eniris ĝin kaj petis al la forĝisto dispecigi tiun nukson por li.

"Jes, tio estas tre facile farota," respondis la forĝisto, kaj prenante la plej malgrandan martelon, (hammer) li metis la nukson sur amboson (anvil) kaj ekbatis. Sed ĝi ne difektigis. (difekti-to damage) Li prenis martelon iom pli grandan, sed ankaŭ ĝi ne estis sufiĉe peza; li prenis ankoraŭ pli grandan, tamen kun sama rezulto. Nun la forĝisto koleris, kaj prenis la martelegon. "Mi do vin dispecigu," li diris, ekbatante tiel forte, kiel li povis; jen la nukso frakasigis (frakasi, to smash) tiel, ke la ducno de la tegmento deflugis de la forĝejo kun krakego (kraki, to crack), kvazaŭ la dometo estus falonta.

"Mi opinias, ke Satano estis en la nukso," diris la forĝisto.

"Li tiel estis," diris la knabo. (De P.Chr.ASBJOERNSEN; el la

(FINO) dana-norvega lingvo tradukis H.Th.Thomsen)

THE
A U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y .

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Oficiala Organo de la AŬstralia Esperanto-Asocio.

Vol 4, No 7 *Apr.* ., 194*4*



EDITED BY

F.R.BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSENDON W5., VIC.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC. o

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

LINGUISTIC IMPERIALISM.

An article under the above title appeared in "TREK" (S.Africa) Dec. 12, a trenchant analysis of Basic as an International Language. It came to the conclusion that the motive behind Basic is essentially political, being advocated in order to further Anglo-American domination of the post-war world.

The Spread of a language is due to the political, cultural and/or military ascendancy of the people speaking it. Latin, as the result of Roman conquests, supplanted the indigenous tongues of the conquered territories, a process aided by the cultural superiority of the Romans. After the fall of the Roman Empire, Latin remained the international language of learning. Many of the languages of Europe are directly descended from Latin; others did not attain their full literary independence till the common tongue had been enriched by extensive borrowings from Latin. Any international language based on European tongues must be largely Latin. Esperanto is.

Analogously, English became the dominant language of the British Isles as a result of direct conquest followed by political and cultural ascendancy. The spread of English through the world was a direct result of imperial expansion and trade monopoly, both due to the vigour of British capitalism. The end of the eighteenth century saw the growth of nationalism in colonial countries and development of rival imperialisms; these led to the weakening of British influence and so to a retreat in the language field. This, however, was partly offset by the great development of America, and the question is: Will the resources of a combined British Empire and America give these countries the power to gain world acceptance of English in some form?

But this combination, powerful as it would be, would not surpass in culture or technique any of the advanced nations, while the tendency in backward countries would be to develop their own culture and technique on internationalistic lines

till they reached the level of advanced countries. A free and united China, for example, would raise her industrial and cultural level through the medium of her own tongue.

The merely wide diffusion of English would hardly induce others to use it as an international language. Indeed this, for these others, would be an argument against its adoption, since it would give more power to an already powerful group. Daily use of a language confers an unfair advantage on those for whom the chosen language is also their mother tongue; ask those who have seen conferences swayed by those freely able to use the adopted speech medium.

The same arguments are valid against Basic. If it is to become capable of expressing the refinements of technique and literature it must augment its vocabulary till it passes the line that divides it from standard English. An "International Language" that failed to express what a developed national language can is not worthy of adoption.

Esperanto may not have acquired all the powers of expression which centuries of evolution have given the advanced languages, but it does not fall far short and fifty years of practical use have shown its flexibility and power of expansion. If it is found that for some branch of art or science Esperanto terms are lacking, the vocabulary can be easily enriched by adopting those terms most international. There has never been an Esperanto army, but a future Esperantist general could summon a committee to get his military terms standardised. The same thing is valid for national language as the history of Afrikaans demonstrates.

(Condensed from "Per Unu Voĉo", Bulteno de la Laborista Esperanto Kunularo, Box 7356 Johannesburg, S. Africa; Feb. 1944)

BASIC ENGLISH TO BE ENCOURAGED.

London March 9th. In the House of Commons to-day, Mr. Churchill said that the Government was greatly impressed with the possibilities of developing Basic English.

It was not envisaged, he declared, that Basic English should be established in place of any existing languages, but as an auxiliary international language. The question of whether it should be taught in British schools was under consideration.

Meanwhile, British diplomatic and other representatives overseas had been instructed to encourage the use of Basic English, and it was proposed to undertake experiments in its use in certain colonies. The BBC had been asked to broadcast lessons in Basic English in their programmes for the forces.

PASKON, 1942, LIBJO.

Ankoraŭ lacaĵ, venis ni el dormo pena
 En kiu hantaĵs nin alarma sent' batala,
 Kaj el defendaj truoj al ĉiel' matena
 Rigardis---kiel strange ruĝa ĝi fatala:
 La suno levis sin en ŝtormo senvidiĝa,
 Jen estas Paska Tag', sed portis ĝi en si
 Nenian sonon pri deveno sankta sia
 Ve male, kuĝla fajf', bombad', artileri'
 Detruis. Prezenton vipis for blasfema forto.
 Ho, kiel do signifas Krist-partira morto?

Tradukis F.R.B. pardonpete al Lieut.
 Austin, "Qsld. Countrywoman," Junion 1943.

STRANGAJ SENSOJ.

La aŭdado de homo ne sufiĉas, por distingi multajn sonojn, kiuj estas aŭdeblaj al aliaj estaĵoj. Iu hundo-fajfilo, en/komercigita antaŭ nelonge, eligas noton tiel altan, ke homaj oreloj ne povas aŭdi ĝin, dum hundoj perfekte aŭdas la sonon.

Ekkono pri la maltaŭgeco de la homa orelo sugestis al scienco la verŝajnan solvon de l' malnova mistero de la kantantaj musoj. Dum jarcentoj mirigitaj mastrinoj raportis, kutime nepruveble, pri musoj ekkantantaj. Nuntempe novaj eksperimentoj indikas, ke musoj verŝajne dediĉas grandan parton de sia tempo al kantado; la kantoj estas bone aŭdeblaj al aliaj musoj kaj ege plaĉaj, sed ili estas tiel alte agorditaj, ke nur tre malofte homa orelo kapablas, aŭdi ilin. La homoj, kiuj fakte aŭdas la etajn mus-melodiojn, disponas pri la sama aŭdpovo, kiel la malmultaj homoj, kiuj laŭdire aŭdas la "silentan" hundo-fajfilon.

Estas strange, ke nia universo estas laŭtplena je sonoj kaj kantoj, kiujn ni homaj estaĵoj tute neniam aŭdas, samkiel ĝi estas (laŭ unu entomologiisto) plena de lumoj kaj koloroj, kiujn formikoj vidas perfekte, sed ni ne vidas.

Vespertoj, kiuj ĉasakiras sian manĝon dumnokte kaj flugas je terura rapideco, ofte krakfalus en kontraŭaĵojn, se ili devus fidi al sia vidpovo. Anstataŭe, ili havas misteran krom-senson. Iliaj oreloj kaj eble la delikata membrano de iliaj flugiloj, estas tiom subtile sentemaj al ŝanĝoj de aer-premo kaj de sonondo, ke ili povas "aŭdi" objektojn en la mallumo, antaŭ ol ili povas vidi ĝin. Sciencistoj antaŭ nelonge liberigis vesperton, kies okuloj estis bendokovritaj, en ĉambro krucigitan de retaro el piano-dratoj. La vesperto---farita vere "tiel blinda kiel vesperto" per la bandaĝo---flirtis ĉirkaŭe en la ĉambro je maksimuma rapideco dum pli ol unu horo kaj neniam tuŝis unu draton.

Kial hundoj montras misteran malamikecon al personoj, kiuj timas ilin, tute egale kiom perfekte tiaj personoj kaŝan sian timon? Studentoj de besta vivado asertas, ke timigita homo elsendas tim-odoron, nesenteblan de homaj naztruoĵoj, kiu tamen havas strange frenezigan-efekton al hundoj. Multaj ekspertoj, inkluzive de la mortinta naturisto W.T.Hornaday, kredas tiun teorion. Ke hundoj posedas sens-perceptojn, kiujn homoj malhavas, estas indikita per esploroj de l' fama besto-psikologiisto Engelmann. En unu serio de eksperimentoj, por determini la hundan kapablon de aŭda lokalizado, tintilo estis batita, kelkfoje malantaŭ unu de du paper-ekranoj, kelkfoje malantaŭ la alia. Engelmann iom post iom malgrandigis la distancon inter la ekranoj, por eltrovi la gradon de la hunda lokalizad-kapablo. La eksperimentoj malkaŝis, ke la ege suba hundo havas son-lokalan senson tre superan al tiu, kiun posedas la plej akut-aŭda homo. Engelmann plue trovis, ke katoj kaj kokidoj havas distingigan aŭdpovon, kiun homoj malposedas.

-----P.SCHWERIN. (Trad.)

BONŜANCA ENIRO.

(Originale verkita de S-ro N.BRODIE, 43 McKenzie Street, Wembley, Okcidenta Aŭstralio; ĝi ricevis la premion ĉefan de la Rendevua Klubo, Melbourne.)

Andreo ekleviis siajn okulojn de la ĵurnalo kaj pripensadis. Liaj pensoj vojaĝis en alian mondon, la mondo de fiktiveco, kie oni povas vivi tiamaniere, kiamaniere oni sentas esti plej taŭga por si mem, ne kiel sur ĉi tiu vivejo de malpaco kaj malamo.

"Pri kio vi pensas?" demandis Filiso, kiu okupate pretigis la miksaĵon por kuiri iom da biskvitoj plej preferataj de Andreo.

"Nu, Finjo, mi ĵus legis en ĉi tiu ĵurnalo pri verkaĵa konkurso. Tiu, kiu verkos la plej bonan historion, gajnos valoregan premion---senpagan vojaĝon Anglujon por du personoj---kaj---"

"Nu! Kiel koncernas nin tio?" senpacience interrompis Filiso.

"Ho, neniel, mi supozas," diris Andreo, "sed mi estis pripensanta pri la ŝanco, ke, se mi verkos historion, eble mi povus gajni la valoregan premion."

"Sensencaĵo," diris Filiso, "vi ne povas verki ian verkaĵon legindan. Vi eĉ ne povas paroli inteligente plejfoje, kiam vi parolas al mi."

"Bonan vesperon, patrino," Andreo diris, kiam li ekrimarkis la eniĝon de sia bopatrino tra la pordo.

"He, panjo, de kie vi venis? Ni ne vin vidis dum tuta semajno. Ĉu vi fartas bone?"

"Jes, ĉio fartas bone al mi. Mi decidis hodiaŭ matene, ke mi vizitos vin ĉi-vespere por eltrovi ĉu vi bonsadas kutime, sed,

dum mi envenis, mi aŭdis vortojn disputemajn. Ĉu ĉi estas bona?"

"Ho, jes," respondis Filiso, "estas nenio serioza. Anĉjo jen subite decidis ke li povas skribi historion sufiĉe bone por gajni konkurson. Mi opinias ke estus pli utile se li irus ekstere kaj hokus por mi iom da brulligno. Kia estas via opinio?"

"Nu, eble Andreo havus ŝancon gajni la premion, sed mia parte mi ĉiam opiniis ke oni bezonas multe da cerbopovo por sukcese verki ian historion."

"Ho! Dankon, patrino, dankon por via supozigaĉo. Iam vi ambaŭ eltrovos ke mi ne estas tiel stulta kiel vi ŝajnas opini."

Parolinte tiujn ĉi vortojn, Andreo malplaĉege eliris el la ĉambro, kun la okuloj ekbrilantaj pro kolero. Post kiam li senkoleriĝis, Andreo definitive decidiĝis provi la verkadon de ia historio. Malrapide li kunkolektis siajn ideojn, kaj iom post iom verkiĝis lia unua mallonga historio. Dum tri monatoj Filiso rimarkis strangan trankvilecon en la maniero de sia edzo, sed li parolis nenian vorton pri sia sekreta celo. Finfine kompletigis la tasko, sed la rezultato ne kontentigis Andreon, kaj li humiliĝis je la penso ke Filiso parolis prave unuafoje.

Iutage, alveninte hejmon post plenokupata tago ĉe la oficejo, li trovis sian edzinon en la kuirejo, kie li kutime ŝin trovis. Metante la manuskripton sur altan breton, li sufiĉe kuraĝis por diri al Filiso, "Nu, mi verkis tiun historion pri kiu mi parolis al vi antaŭ kelkaj monatoj, sed mi timas ke vi bone sciis miajn kapablojn, kiam vi esprimis la opinion, ke mi ne povas verki legindan historion. Jes, ĝi ne estas taŭga por enigi ĝin en la konkurson."

Unue Filiso tentiĝis inciteti lin, sed rimarkante la iom malkontentan esprimon sur la vizaĝo de sia edzo, ŝia koro subite iĝis kompatoplena al li. Antaŭ ol ŝi povis diri ion simpatian, li eliris el la kuirejo kaj nenio plu diriĝis pri la afero. Je la sekvinta tago Filiso legis la historion, kiun Andreo peneme verkis, kaj ŝi estis surprizata eltrovi ke laŭ ŝia opinio, ŝia ambaŭ edzo ja estas kompetenta verkisto. Ŝi pensis al ŝi: "mia kara vivkunulo estas tro modesta. Mi poŝtsendos lian verkaĵon por enigi ĝin en la konkurson." Tion faris Filiso sen plua prokrasto.

Kelkaj monatoj preterpasis, dum kiu tempo Andreo kaj Filiso trapasis kutime plimalpli trankvilan neekscitan vivadon. Filiso tute forĝesis pri sia ago forsendi la verkaĵon, kaj Andreo tage vizitis sian oficejon, kaj sian libertempon li pasigis pretigante kelkajn bedojn en sia ĝardeno, el kiuj, printempe, li arde atendis detranĉi multajn faskojn da diverskoloraj, bonodoraj floroj.

Unu tagon alvenis poŝte oficialaspekta letero. Filiso miro ĝin malfermis kaj legis la frapan novaĵon ke ŝi estas la gajninto de la ĉefpremio en la verkaĵa konkurso. Momente ŝi estis senparola pro mirego, sed baldaŭ rapidis en la domon. Denove ŝi legis la neatenditan sed plaĉegigan novaĵon.

"Mi devas sciigi panjon tuj," diris ŝi, kaj senprokraste, senĉapelo, rapidegis el la domo. Ŝi eĉ tute forgesis ŝlosi la pordon. Alproksimiĝante al la hejmo de sia patrino, Filiso subite ekvidis ŝin, kaj laŭte ekkriis, "Panjo! Panjo! divenu tion, kio okazis. Divenu!"

"Mia kara infano, kio estas? kial tia ekcitiĝo?"

"La verkaĵo de Anĉjo gajnis la premion. Li estas fama verkisto. Mi ĉiam sciis ke li estas lerta viro. Mi certe elektis bono, kiam mi al li edziĝis."

"Ho! Do li finfine verkis historion pri kiu vi lin incitetis?"

"Jes, sed mi ne sufiĉe lin plaĉis. Tamen mi konstatis ke estas laŭdinda peno, kaj poŝtendis ĝin al la komitato konkursa."

"Mi certe havas lertan bofilon, kaj ne surprizas min ke li sukcesis."

Filiso apenaŭ povis atendi ĝis la hejmalveno de sia kara Anĉjo, sed fine ŝi ekvidis lin alproksimiĝanta al la pordego. Ŝi tremis pro ekscito, kaj ŝiaj okuloj ekbriletis. Li ridetis kiam ŝi ekprenis de li lian lunĉskatolon, sed, kiam ŝi surhokigis lian veston kaj ĉapelon, la nekutima atento igis lin suspekti ruzon.

"Kio estas al vi?" li diris. "Ĉu vi gajnis unuan premion en loterio, aŭ eble vi deziras pelton de modo plej lasta. Vi bone scias ke mi ne havas la monon por tiaj aferoj."

"Tute ne," respondis Filiso kun petole trembrilaj okuloj. "Jen! Legu ĉi tion."

Andreo ekprenis la leteron kaj legis kiel ordonita. Dum li legadis, la rideto malaperis de lia vizaĝo, ĉar laŭ la enhavo li sciigis ke lia edzino estas la gajninto de la verkaĵa konkurso, la sama kiel tiu en kiu li estis intencinta esti konkuranto. Ho, kia humiliĝo! Filiso unue mokis je liaj ambicioj kaj poste verkis gajnan historion. Li sentis kvazaŭ la koro ĉesos funkcii. Neniam denove li povos kunvivi kun tia supera persono.

Filiso divenis liajn pensojn, kaj ĉar ŝi vere amis sian Anĉjon, ŝi rapide pacigi lian menson. "Vi aspektas kiel viro humiliĝita kaj malkontenta," ŝi diris. "Kial? Vi devus esti tre plaĉata, ĉar estis via propra verkaĵo, kiun mi enigis en la konkurson sub mia nomo."

La lumo de vero subite iluminis lian cerbon. La rideto revenis kaj disvastiĝis tutvizaĝe.

"Finjo, estas vere, kion vi ĵus diris?"

"Jes, Anĉjo, nun mi scias tion, pri kiu mi ĉiam opiniis;

ke mi havas tre lertan kaj cerbe-fortan edzon."

Andreo miris je la virina nekonsekvenceco, sed, pro sia nuna feliĉa humoro, li vole pardonis ŝin.

"Nu, karolino," diris li, ŝin kisante, "baldaŭ ni vojaĝos al Londono. Ĉu jes?"

EL LETERO DE ELEGGANTO.

...kompreneble, ke iu plendis pri la poemoj. Iu plendos malgraŭ ĉia klopodo al perfekteco. Persone mi ĝue rimarkis la poemojn, sed turnas sen lego aliajn paĝojn, kiuj sendube plaĉas al via plendinto. Tiaj plendoj ne estas justaj. Supozeble neniu ajn legas ĉiun artikolon aŭ anoncon en ĉiutaga gazeto, tamen senplenda abonas daŭre. Do, kiel supozu, ke ĉiu linio en nia gazeto ĉiam plaĉos al ĉiu okulo? Ne tro atentu la plendojn. Unu plendas, dek ĝojas! Mi mem povas nur gratuli vin pri eminente sukcesa kaj bona entrepreno.

TRADUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 8: (Kompilita el 3 tradukoj.)

La patrino de Karolino estis kuirinta ian novan cerealon por matenmanĝo. Karolino opiniis ke ŝi ĝuos ĝin. Ŝi metis plenkuleron en la buŝon. La rezulto estis tiel neatendita kiel ŝi estis teruriga. Freskaŭ sammomente ŝiaj lipoj kaj lango ŝvelis ĝis duoblo de norma grandeco; fortega tuso atakis ŝin, kaj ŝajnis al ŝi, ke ŝi sufokas. La malantaŭa parto de ŝia gorĝo ŝvelis, kaj Karolino senkonsciigis. Ŝia patrino, freneza pro timo, venigis kuraciston apude loĝantan.

D-ro Smith, rapide ekkonante la situacion, plenigis sian injektilon per Adrenalino kaj injektis ĝin en la brakon de Karolino. Necesis kelkaj injektoj, antaŭ ol ŝi denove tute bonfartis, sed frue en la posttagmezo ŝi ludis ĉirkaŭ la domo, kvazaŭ nenio estis okazinta.

Venkinta Grupo: MELBOURNE ESPERANTO CLUB.

Tradukota teksto. Konkurso 10:

Cargo planes flying loads from the U.S. to Alaska have been performing miracles. Recently, when the Nome hospital burned,

two cargo planes flew in a 24-bed replacement, complete from X-ray machines and beds to hypodermic needles and rubber gloves, only two days after the old one burned. Another time, a whole sawmill--saws, belts, machinery--was flown in by a single plane. These cargo planes can carry either freight or troops. A series of bolts can convert them in less than an hour to big hospital ships with four tiers of bunks. The walls are lined with metal "bucket seats" for troop carrying. The seats button up to the walls, when the plane carries freight.

(Alaska Special. Sigrid Arne, Flying Magazine.)

.....

Traduko de Konkurso 9. (Kompilita el 3 tradukoj)

Ĉiu interesiĝas pri birdoj. Por la plejmulto da homoj ĉi tiu intereso malfeliĉe estas limigita al admiro de iliaj beleco kaj glata formo. Iuj rigardas ilin laŭ maniero de filatelistoj rigardantaj fremdlandajn poŝtmarkojn, nome kiel aĵojn aldonotajn al kolekto, kiuj estas des pli avidindaj, se ili hazarde estas maloftaj. Tiaj homoj ne povas vidi trans la koloran ŝelon; ili malkomprenas la veran signifon de la ovo.

Multaj birdoj ja aspektas belogaj, sed sendube tio estas por la gepatraj birdoj tute negrava konsidero. Post kiam la birdidoj sendifekte elŝeliĝas, la ŝeloj estas zorgeme forigitaj aŭ la birdo eble eĉ manĝas ilin. Estas la vivo interne de la ŝelo, kiu gravas.

Venkinta Grupo: WESTERN AUSTRALIAN ESPERANTO LEAGUE.

Tradukota teksto Konkurso 11:

That is the great impression I have retained of my journey--Hatred--artificial hatred nourished by the propaganda of the 'good men'. If any moral conclusion can be drawn from the many and divers specimens of humanity that I have described--it is the absolute necessity for all the peoples to unite. I do not mean the union of a few countries under the double protection of engine-driven wings and mouths of murderous cannons against an axis of other countries, but a total union of all nations in the understanding of their mission of human co-operation.

To the old nationalist dogma, whose anarchist force and morbid influence has been the cancer of humanity, we must oppose the new theory of the Unity of the Human Race.

(Paul Duner: A Year and a Day.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.5.44.

Mi denove petas ĉiujn klubojn, regule partopreni la laboron.

Venontmonate mi publikigos la rezulton de la unuaj dek konkursoj.

P.E.SCHWERIN,

Flat 1, Carabella Flats, McDougall St., Milsons Point, N.S.W.

ESPERANTO-GAZETO EN SUD-AFRIKO.

Ni forte ĝojas ekscii, ke en Sud-Afriko oni finfine povas havi propran Esp-organon. Ĝi estas "Per Unu Voĉo," bonege produktata hektografiaĵo. La enhavo estas alte interesa, kaj la lingvo kaj stilo imitinde puraj. Plejparte en Esperanto, Angla; kun iometo da Kabholanda. Saluton!

Adreso: "Per Unu Voĉo," Bulteno de la Laborista Esperanto-Kunularo, Box 7356 Johannesburg, S.Africa. Redaktas ĝin W.F. Holt. 27¹/₂ d. p.m. aĉetas ekzemplonon.

AEM-anoj povas ricevi la Sud-African Esp. gazeton, pagante per Esp-aj literaturaĵoj aŭ PER NEŪZITAJ POSTMARKOJ de sia lando egalvaloraj al eksterlanda leterafranko por ĉiu ekzemplero.

ASOCIAJ AFEROJ.

KOMITATO. Brisbane Esperanto Societo nomis S-ron Clement Kidd, kiel sian reprezentanton ĉe La Asocia Komitato dum 1944 kaj /45.

PREZIDANTO. Kun plezuro mi anoncas ke S-ino Florence Rawson de Melbourne Esp. Club denove elektigis Prezidantino de Aŭstralia Esp-Asocio. La elekto de la aliaj Estraranoj nun okazas. Espereble ĉiu membro donos al ŝi laĵalan helpon kaj subtenon.

KORESPONDA KURSO. Ĉi tiuj notoj pretiĝas tro frue por permesi kvitancon de iuj donacoj rezulte de nia peto en Marto. Tamen ni denove atentigas vin al la granda bono, kiun faros donacoj uzotaj por starigi kaj reklami tutlandan korespondan kurson. La Kurso-librojn ni jam ricevis kaj niaj Perantoj en Melbourne kaj Perth havas provizon.

La prezo estos 8/6 por la tuta kurso. Ni intencas aranĝi instruistojn en ĉiu ŝtato, tiel faciligante korespondadon inter instruistoj kaj lernantoj.

EKZAMENOJ. Ni denove admonas ĉiun membron, kiu ankoraŭ ne tion faris, konfirmi sian konon de la lingvo per ekzameno. Ni tre deziras pligrandigi la nombron da Diplomitoj en nia lando. Oni povas fari la Komencan Ekzamenon antaŭ Ekzamenisto (Kosto 7/6) La Diploma Ekzameno oni faras en du partoj---(a) skriba

parto per korespondo (14/-) kaj (b) Parola parto antaŭ ekzamenisto (4/6.) Ne necesas fari la komencan ekzamenon antaŭ ol entrepreni la Diplomon. Skribu al Pastro C.C.Cowling, St. Mary's (Tas.), kiu estas nia Komisiito por Ekzamenoj.

-----G.H.HILLERMAN, (Sekretario)

KASO de la AEM.

Kvitancoj Ricevitaĵ dum Marto:

Rondevua Konkurso 6/- . S-ro Hillerman 10/- . S-ro Love 5/- .
S-ino Freeman 14/- . F-ino Lambert 5/- . S-ino Crockett 5/- .
S-ino Dunn 5/- . S-ro Lanyon 10/- . S-ino Breakspear 5/- .
Bris. Esp. Soc. 3/- . Donaco £1.10.0.....£5.8.0.
Al la Ĝenerala Kaso 12/- . Al Gazeta Kaso £4.16.0.
Gazetaĵoj Elspezoj £3.10.7. En la Gazeta Kaso £5.2.2.

Eraro en Feb. kontoj. ' i
Legu F-ino L.O'Connor 5/- .

W.ADDIS (Kasistino)
25 Greville Avenue
Flinders Park
South Aus.

ERAROJ en la MARTA NUMERO:- p.82, 14 de la mals. "nova"; 19
de mals. "allogon"; 83/12 "demokratioj"; 89/11 "insignon";
lastpage 16 de mals. "distanco".

NEKROLOGO: Je 19 Junio 1943 D-ro A.Ratten, 83-jara, en Melburno. Li estis lerta lingvisto, kaj dum 20 jaroj membro de B.E.A.

Al LEGANTO. Pri "tioj, kioj, k.t.p.

(Zamenhof.) "Teorie la ĵus diritaj formoj tute bone povas havi multenombrojn tiel same, kiel ili havas akuzativon; sed en la praktiko mi ne konsilas al vi uzi la diritajn formojn en multenombro, ĉar laŭ mia opinio ilia senco tion ĉi ne permesas. TIO prezentas ja ne ian difinitan objekton, sed ian bildon restas ĉiam ununombra sendepende de tio, ĉu ĝi konsistas el unu objekto aŭ el multaj. Tamen se aperas ia tre malofta okazo, kiam la logiko postulas, ke ni uzu la diritajn vortojn en multenombro, tiam la gramatiko de nia lingvo tion ĉi ne malpermesas. Ekzemple: "Lia potenco konsistas el diversaj ioj, el kiuj ĉiu aparte per si estas ne grava, sed ĉiuj kune donas al li grandan forton." (La Revuo, 1907 Junio)

TIUJ. Prononcu kiel "too-ee", kun la fina -ee tre mallonga.
TIUJ sonas kiel "tee-oo-ee", kun la akcento sur "tee" kaj la
 fina -ee mallonga. Estu zorga ne longigi la finan -ee, kaj
 eviti la eraron akcenti -oo.

-----"Per Unu Voĉo," Jan.44.---

AVIZO! La Sekretario avizas, ke dum Aprilo li transloĝigos ĉi
 Canberra (A.C.T.). Li petas, ke oni adresu korespondajn per-
 sone al li jene "Mr. G.H.Hillerman, C/o Box 75, Devonport,
 Tas." Tuj kiam eble li avizos la novan adreson en la regist-
 ara urbo.

ESPERANTAJ LIBROJ EN URBAJ BIBLIOTEKOJ:- Ŝajne nur malmultaj
 scias, ke en ambaŭ sekcioj, reserĉa kaj prunta, de la Publika
 Biblioteko en Swanston St., Melburno, troviĝas Esp. libroj. Se
 vizitanto ne propraserĉe ricevas la deziratan de la bretoj, li
 petu oficiston, por ke tiu havigu al li el la interndome ten-
 ata rezervo. La bretspaco de la montra ĉambro havas limon; do
 ne ĉiu verko povas vidiĝi de la ordinara publiko. Petu ĉe la
 reserĉa sekcio (Inquiry Room) konojn pri Esp. verkoj posedataj.
 Sur la listo sidas ekzemple la bela Vivo kaj Verko de Albrecht
 Durer. Supozelne ĉe la ceteraj ĉefurboj simile statas.

BASIC ENGLISH IN INDIA. Statements were made (in the recent
 broadcast in favor of Basic) which seem to require consider-
 able qualification...In the United Provinces we have actually
 experimented with Basic in the Government Training College at
 Allahabad for the last three years...Results have not borne
 out the claims made for Basic. There is no greater speed in
 the acquisition of English as a communication language, which
 is the chief claim of the system; and the transition to the
 use and understanding of literary English has proved very diffi-
 cult...in fact, Basic to these children is a different langua-
 ge, and no easy path to follow in using or understanding Engli-
 sh. Our experience--and I think we have given it a fair trial
 --has not encouraged us to continue its use.

As these somewhat vague and wishful-thinking statements as
 to the use of Basic for teaching Indian students a proper und-
 erstanding of and facility in English may do harm, I have thou-
 ght it necessary to give the results of actual experiments.
 (signed) J.C.POWELL-PRICE, late Director of Public Instruction
 United Provinces, India.

(from The Listener, London, 2 December 1943.)

THE
A U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y .

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Vol 4 , No. 8 , MAY. , 1944 .



EDITED BY
F. R. BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSEN LON W5., VIC.

LA AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Lingve controlas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

- o -

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

KVAR VOJOJ AL MONDLINGVO.

Ŝajnas, ke ekzistas nur kvar vojoj laŭ kiuj la homaro povas marŝi al mondlingvo, samgrave ĉu oni rigardas ĝin kiel universalan helplingvon, ĉu kiel la solan parolmedion de ĉiuj homoj sur la tero.

- (1) LA FANDIĜO de ĉiuj lingvoj en unu solan, kiel rezulto de rasa aŭ internacia mikado.
- (2) LA IOMPOSTIOMA kultura kaj ekonomia regado de unu potenca lingvo super ĉiujn aliajn, ĝis ĝi fine absorbos ilin. Tiuj ĉi estus tre longaj procezoj---eble miljarojn.
- (3) Akcepto fare de la registaroj de iu nacia lingvo, por uzado en internaciaj rilatoj.
- (4) Akcepto de la registaroj aŭ la popoloj de konstruita neŭtrala helplingvo.

- (1) IOMPOSTIOMA FANDIĜO de ĉiuj lingvoj en unu solan.

Oni foje aŭdas opinion, ke unika sinteza lingvo naskiĝos simple pro la intermiksado de la homoj pro la ĉiam pli kaj pli kreskantaj trafikfaciloj kaj interkomunikiloj. Tion asertas STALIN antaŭ la ĝenerala kongreso de sovetoj en 1930. Li diris:

Rilate la malproksiman perspektivon pri naciaj kulturoj kaj naciaj lingvoj, mi ĉiam akceptis kaj daŭre akceptas tiun Leninan koncepton, ke en la periodo de l'mondskala venko de la Socialismo, kiam ĝi plifirmiĝos kaj eniros la moraron, naciaj lingvoj neeviteble devos kunfandiĝi en unu komunan lingvon, kiu, kompreneble, estos nek la Rusa, nek la Germana, sed io nova.

Nu, Stalin, kiu neniam studis la problemon de I.L., nek indikis kiel tiu kunfandiĝo okazos, nek montris al atestaĵo subtene al tio. Ni devas supozi, ke, laŭ la Marksa teorio de historiaj procezoj, la diigitaj produktofortoĵoj faros la aferon tute bonorde. Lanti, en sia "Leteroj" prikomentas la dirojn de Stalin jene: Tiu vidpunkto estas absolute erara. Ekzistas neniua tendenco al kunfandiĝo ĉe la grandaj civilizitaj lingv-

oj....Sendube tiuj lingvoj evoluas, aliĝas pli malpli rimark- eble...sed tiu evoluoj okazas ne en la sama direkto, ne tendenc- as al unueca tipo. Ĉiu evoluas laŭ siaj propraj leĝoj, laŭ sia propra spirito. Tion instruas la lingvoscienco."

Prof-o T. Cart, de la Sorbonne, nomis falsa tian rezonadon de la kunfandiĝa skolo, aldonante, ke en la 19a jarcento sendu- be multaj fakuloj havis eraran opinion, ke la lingvoj emas kvaz- aŭ centraliziĝi, per tio rajtigante la fakulojn koncepti la ebl- on, ke finfine unu-du ĉefaj lingvoj regus la teron. Sed hodiaŭ estas pli da literaturaj lingvoj ol en 1914j. La naciaj kune- tiras sin en politikajn aliancojn, sed intensa nacia spirito pelas ilin tigre gardi siajn lingvajn privilegiojn. Ĉirkaŭ 80 lingvetoj en Rusujo, kun registara patronado, sekvadas tute ap- artajn liniojn de disvolvo. Ĉeĥa kaj Kataluna, spite la atenc- ojn subpremi aŭ malfortigi ilin, tamen estas kaj restas viglaj, fervore kulturitaj de la fidelaj. La Hungara, la div. idiomoj de la Balto, kaj nombro da Slavaj idiomoj en sudorienta Eŭropo, plejparte renaskiĝintaj ĉe la disfalo de Aŭstrohungarujo kaj la disdivido de okcidenta Rusujo, ĉiuj kuniĝas por doni fortan at- eston kontraŭ la teorio, ke la lingvoj de la mondo nature kaj neeviteble formos sin en unu. Lingvoj pruntas vortojn kaj fraz- turniĝojn unu de la alia, sed tute ne la sintakson. Krome, eĉ tiu tendenco al formado de komuna scienca terminologio ricevas baton pro Germana, Turka, Hinda, Japana kaj aliaj naciismaj provo- j esprimi sin per pure indiĝenaj vortoj, forĵetante la "fremdajn."

(2) UNU NACIA LINGVO SUPER ĈIUJ.

Tiu superregado povus esti (a) pro milita venko, kiel ĉe Romio; (b) pro kulturo, kiel ĉe Grekujo; (c) pro komerco, kiel ĉe eble Anglo-Usono. Sed la historio instruas, ke grandskale akiri lingvoteritorion ne ankaŭ signifas daŭre tenadi ĝin. La Greka kaj Latina, iam interlingvoj en limigita senco, jam de longe ĉesis esti tiaj. La ŝancoj de la Franca lingvo ludi tiun rolon ŝajne ankaŭ forperdiĝis antaŭ longaj jaroj. La ĉionvenka ekspansio de Ludoviko xiv kaj Napoleono, la pretendataj kval- itoj de la lingvo mem, klareco-precizeco, kaj ĝia favorita loko en la lernejoj studlistoj tra la mondo, ĉio ĉi tio ne povis disvastigi ĝin en rimarkinda grado. Ankaŭ ni devas supozi, ke la Angla jam atingis sian plej altan punkton, Nur malrapide ĝi vastiĝas, konkure kontraŭ eĉ multe malpli oportunaj lingvoj. Ankoraŭ ĝi ne povas elpuŝi la Francan el Franc-Kanado, kaj en Sud-Afriko estas tre dubinde, eĉ post jarcento de Brita regado, ĉu ĝi iam supervenkos la Kabholandan. Citadi altajn ciferojn pri la Angla kiel "administra" lingvo eble aspektas impresa por multaj, kiuj respekte klinas la kapon antaŭ la milionoj, sed ilia praktika signifo estas malmulta. Ili konsistas preskaŭ tute el la Hindoj, kiuj estas ne nur tute nesciaj pri la Angla, sed vaste analfabetaj en siaj propraj lingvoj. La efektivaj

parolantoj de la Angla formas pli-malpli kompaktan mason, kaj tial nur ete influas sur la grandajn lingvoblokojn ekster Nord-Ameriko kaj la blankaj partoj de la Brita Imperio. Diradi pri la relativa facileco de la Angla gramatiko, eĉ se vera, ne estas tre trafa. La facileco aŭ malfacileco de iu lingvo ne tre gravas en sia natura aŭ historia disvastiĝo. Por la ĉiutaga vivo unu lingvo estas sambona kiel alia. Ĝia vivo aŭ pligrandiĝo ne dependas de siaj propraj kvalitoj, sed de la sukceso de la nacio aŭ raso parolanta ĝin. Oni tute ne rajtas aserti, ke la plej bona aŭ la plej oportuna lingvo venkos tra la mondo, pro siaj esencaj meritoj, aŭ eĉ ke iu tia simpla lingvo iam estiĝos. La malfacileco de la Japana lingvo neniel efikis kontraŭ la sukceso kaj tre lerta kompetenteco de la Japanoj. La greka certe estis multe pli bona ol la Latina, tamen la Grekoj estis venkitaĵoj de la Romianoj. Jes, en la ĉiutaga laboro unu lingvo estas sambona kiel la aliaj.

(3) AKCEPTO DE NACIA LINGVO.

Ĉefa barilo kontraŭ akcepto de nacia lingvo estas la senduba kultura kaj ekonomia avantaĝoj, kiujn tia akcepto alportus al la elektita nacio. Estas neimageble, ke, ekzemple, la Hispane-parolantaj popoloj, havantaj komercan kaj lingvan teritorion preskaŭ tiel grandan kiel la Anglo-Usona, konsentus ricevi la Anglan kiel internacian. La komercaj kaj alispecaj prizorgoj de Britujo kaj Usono estas ja multe disvastigitaj kaj altsignifaj, sed kompare kun la tuta cetera mondo la Angle-parolantoj estas nur malgranda minoritato. Ekpaŝo akceptigi la Anglan aŭ alian lingvon kiel I.L. kaŭzus bojkoton de ĝi fare de la ceteraj nacioj, kiuj tute ne konsentus vidi ĝin ĝui tian unikan prestiĝon.

Sed estas ankoraŭ alia konsideraĵo. Ni imagu hipotezan akcepton de nacia lingvo. Kio okazus? La masinstruado de fremda lingvo en la lernejoj ĝis nun tute ne rezultigis rimarkindan disvastiĝon de ĝia praktika uzado kaj influo. La netan dividendon oni devas rigardi kiel efektive senkuragiĝan, konsiderante la grandegan elspezon de tempo kaj pacienco, kiun oni devas jaroj aldediĉis al la instruado de la Franca. Tiu lingvo, male al ĝenerala kredo, estas unu el la plej subtilaj lingvoj de Eŭropo (komparu p.56,58, "Marta."); la Itala aŭ la Hispana, pli simpla ol la Franca, almenaŭ laŭ la fonetika vidpunkto, povus esti pli oportuna atingi la celon pro kiu oni instruas la Francan en ĉi tiu lando, nome, doni al lernantoj sentojn kaj konceptojn pri la granda literaturo de lando alia ol la propra.

(4) AKCEPTO DE KONSTRUITA LINGVO.

La solvo, tial, ŝajnas esti: adopti artefaritan lingvon, simplan, neŭtralan, bazitan sur la ĉefidiomoj de Eŭropo. Kelkaj el tiaj projektoj jam pasis en limigitan praktikon. La

plej vaste uzata estas Esperanto. Tia lingvo ofendus neniun, ne donus nemeritan avantaĝon, sed allogus tre multe da homoj studi kun profito la naturon kaj strukturon de la propra gepatra.

Universa lingvo ne povas pasi certan punkton de facileco; tiu limo estas jam preskaŭ atingita. Inter estontaj projektoj kaj la nuna ĉefa estos tiom tre eta diferenco koncerne facilecon, ke konkurenco montriĝas absurda. Ni prenu Esperanton, facilan, bonan, kaj persistu uzi ĝin!

-----FRANK R. BANHAM.

UNU MONDO.

(Ĉapitro 1 el "One World" de Wendell Willkie)

En kvarmotora Consolidated bomb-aeroplano, transformita por transport-servo kaj funkciigita de Usonaj arme-oficiroj, mi forlasis Mitchell Field, New York, la 26an de Aŭgusto (1942), por vidi kiom eble plej multe de la mondo kaj de la milito, de ĝiaj batal-frontoj, ĝiaj gvidantoj kaj popoloj. Akurate kvardek-naŭ tagojn poste, la 14an de Oktobro, mi surteriĝis en Minneapolis, Minnesota. Mi ĉirkaŭvojaĝis la mondon, ne en la nordaj latitudoj, kie la periferio estas malgranda, sed sur vojo, kiu dufoje transpasis la ekvatoron. 3

Mi estis veturinta entute 41,000 mejlojn, kio---rigardata kiel nombro---ankoraŭ nun impresas kaj preskaŭ konfuzas min. Ĉar la vera impreso de mia vojaĝo ne estis unu de distanco for de aliaj popoloj, sed unu de proksimeco al ili. Se iam ajn mi havis dubojn, ke la mondo estiĝis malgranda kaj tute interdependa, ĉi-tiu vojaĝo estus tute foriginta ilin.

Estas eksterordinara fakto, ke por la flugado de ĉi tiu grandega distanco ni estis en la aero ne pli longe ol tuton de nur 160 horoj. Ni kutime flugis de ok ĝis dek horoj potage, kiam ni veturis; tio signifas, ke el la sumo de kvardek-naŭ tagoj, destinitaj al la vojaĝo, mi pasigis proksimume tridek tagojn surtere por la plenumo de la farendaj taskoj.

La fizika streĉo, movi de unu lando al alia, aŭ de unu kontinento al alia, ne estis pli laciga ol la veturoj, kiujn usona komercisto eble faras ĉiun tagon de sia vivo, por daŭrigi sian negocon. Fakte, moviĝi ĉirkaŭe en la mondo ŝajnis esti tiel facila, ke mi promesis al la prezidanto de granda centra Siberia republiko, reenflugi unu semajnfino en 1945 por unutaga ĉasado. Kaj mi intencas, plenumi la promeson.

Ne plu ekzistas malproksimaj ejoj en la mondo. Mi spertis per ĉi tiu vojaĝo, ke la miriadaj milionoj da homaj estaĵoj en la malproksima oriento estas same proksimaj al ni, kiel Los Angeles estas al Novjorko per la plej rapidaj trajnoj. Mi ne povas ne kredi, ke en estonteco ĉio, kio koncernas ilin, devos koncerni nin, preskaŭ tiom, kiom la problemoj de la homoj en Kalifornio koncernas la homojn de Novjorko.

En la estonteco nia pensado devos esti mond-ampleksa.

----- (S-ino) K. SCHWERIN.

INTERNACIA VAGONARO.

Sinjoro kun malhelaj okulvitroj faris nervan eksuĉon al sigaredo, jetis ĝin el la vagonfenestro kaj denove ekprenis tabakujon kaj alumeton.

--"Miaj nervoj neniam perfidis min!" li pensis. Eĉ nek tiam, kiam mi trompis la bankon Credit Lyonnaise, nek ĉe la falsado de la bildoj; tamen ĝuste tiuĉifoje, kiam ĉio estas longtempe forpasinta, mi sentas min nervstreĉa!--. Kiu povus vidi en mia nuna persono tiun maljunulon, kie en Dusseldorf restadis, aŭ la ĝibulon, kiu tra Aŭstrio vojaĝis, aŭ la estimindan instruiston, kiu honoris Florencon per sia vizito? Tri homoj, tri bone luditaj roloj, kiuj provizore aperis kaj fine formalaperis.--

Li malestime puŝis perpiede la gazeton sub la benkon. --"En ĉi troviĝas mia personpriskribo, se ili sciis, kiu malaperigis la dokumentojn de la ŝtaltrusto. Nu, ĉu la sinjoroj de la kriminalpolico efektive suspektus?---Simple absurda estas tiu ĉi sento. Post ne pli ol du horoj mi estos en Marsejlo---ĉiu danĝero estos for---kaj kiam mi havos ĉe mi la dokumentojn en Nov-Jorko, kaj kiam mi ilin transdonos al S-ro Higgins, jen riĉa rekompenco por mi!

--Cannes --li murmuris, kaj premis sin en angulon dum la halto. "Pesta limakulo. Sed jam nun nur unu halto, nome Toulon, poste venas Marsejlo---"

Iu vokis nomon, "Lambier." Mekanike ripetis ĝin la sinjoro kun malhelaj okulvitroj---"Lambier."

--"Telegramo por S-ro Lambier," vokis servisto kuranta laŭ la koridoro.

--"Diablo min prenu!--sakris la sinjoro, ekstaris, puŝis la kapon el fenestro por venigi al si la telegramportanton.

--"He, donu al mi!--"

--"S-ro Lambier?--"

--"Kiu alia?--"

--"Certe.--"

Li rapide ekrigardis la adreson: "Donu al S-ro Lambier trajno-35 Ĝenovo-Marsejlo," kaj febre ŝiris la koverton. Tiam legis: "Atenton! Polico serĉas viron kun krokodilleda valizo."

-- Pesto! Kiel li devis aĉeti ĝuste tiun ĉi frapaspektan valizon. Restas nur, ke li kiel eble plej baldaŭ perdu ĝin. Lerta bubo, tiu Jim! Bone, ke li lasis lin postresti por observi. Hm, nur en la lasta horo povis la polico suspekti. En Ventimiglia oni lasis lin sendemande pasi la kontrolbarieron. Tre simple: en vasta tereno la valizo flugos elfenestren, tuj kiam la trajno estos en libera vojo. Aŭ, plibone, kiam ponto vidigis. Li peze mallevis la valizon el la kuŝneto kaj ĝin mal-

fermis. Ja ĝi.. estas frapaspekta objekto, vere unikaĵo. Rekta arestmandato!

Li prenis el ĝi dikan koverton kaj metis ĝin zorge en internan poŝon de sia frako. Tuj poste envenis kupeon sinjoro, kiu ekokupis angulon apud la pordo, prenis gazeton elpoŝe kaj droniĝis en ĝi.

Kio nun? Li febre cerbumis. Se la fremdulo kunvojaĝos ĝis Marsejlo, perdita estas ĉiu eblo forĵeti la valizon.

--Ĉu "forgesi" ĝin, forirante de la trajno? Tro necerte. La noveveninto tre povus postkuri min por redoni.

--Serĉi alian kupeon? Io devas faratiĝi---tre baldaŭ, rapide!

Ceremonie S-ro Lambier prenis sian paperujon el la brustpoŝo, eltiris el ĝi faskon da monbiletoj, skrupule kalkulis ilin kaj fiksis ilin en la valizo. Ferminte tiun ĉi, li peze ĵetis ĝin en la kuŝneton; tiam, tirante la vojaĝĉapon sur la brovojn, li dormeme dorskliniĝis.

Kiam la trajno eniris la stacidomon de Toulon la fremdulo stariĝis, explore rigardante la endorme-aspektan samkupeanon. La trajno jam unu minuton haltis en la stacidomo; ankoraŭ la fremdulo hezitis deĝi ĝin. Subite li faris rapidan paŝon al la fermokula Lambier, restis krimgeste staranta momenton, poste faris ankoraŭ paŝon, kaptis la valizon de el la kuŝneto kaj rapidis el la kupvo.

S-ro Lambier plaĉate grimacis.

Ne ŝanĝante la sidlokon, li rigardetis sur la peronon kaj, dum la vagonaro ekmoviĝis, vidis ke du homoj, civilvestito kaj policano, arestas la fremdulon, kiu kun la krokodilhaŭta valizo flug/paŝe celis la elirejon.

Al Lambier la animo faciliĝis. Zumante arieton, li ĵetis la okulvitrojn el fenestro, vidis ilin dissplitiĝi kontraŭ fervoja digo, disŝiris la telegramon en pecojn, kiuj fordancis kun la vento. Poste du semajnojn la policĉefo de Toulon ricevis telegramon:

"Sinceran dankon pro via bonkoreco. Lasu trankvila la sinjoron, kiu ŝtelis mian valizon el krokodilledo. Li neniel rilatas la aferon de la ŝtaltrusto. La valizon, kune kun ties enhavo, kiel rekompencan transdonu al li, kiu tiel trebone min servis."
(H.K.BRESLAUER)

-----F.R.BANHAM (Trad)

NEDERLANDA ESPERANTISTO, S-ro C.H. GEENAN, SALUTAS LA MOVADON EN AŬSTRALIO.

Samideane mi salutis la tutan movadon en Aŭstralio. Mi tre ĝojas ke mi jam amikiĝis kun kelkaj el vi. Ili videble havas verajn idealojn E-ajn. Al ĉiuj kiujn mi vizitis mi dankas pro ilia sincera bonvenigo. Mi min sentis kiel en la propra hejmo. Mi, kiu dum ĉi tiu milito jam konatiĝis kun multe da E-istoj tutmondaĵ, scias ke ili faras sian eblon; ankaŭ vi faras la plej bonan favore al E-o. Kun plena fido mi rigardas la antaŭenpuŝon

de la movado en Aŭstralio.

Ni ĉiuj brave kontraŭstaras la milit-maoson. Gesam-oj en Aŭstralio! Ankaŭ vi havas gravan taskon en la daŭrigado de E-o; sur viaj ŝultroj kuŝas respondeco por ĝia vivo en tiu ĉi mondparto. Hele kaj klare mi vidas la stelon en la malproksimo. Pli kaj pli ĝi brile alproksimiĝas, kaj finfine ni vidos la belan stelsimbolon sur ĉiu vestaĵo.

Ne Basic English aŭ simila fariĝos internacia, sed nur nia Esperanto. Per Esperanto al fratigado! Ni baldaŭ venku! Ĉu mi rakontu iom? Do.....

MIA VIVO EN FRANCA KONCENTREJO.

Franca flago montris al mi ke ni jam alvenis en la koncentrejon "De Recebedon" en Toulouse. Preterpasinte diversajn oficerojn, mi, kune kun aliaj kaptitoj, eniris karceron. Grandega estis la nombro, laŭdire ĉirkaŭ 2000 personoj. Viroj kaj virinoj. Ĉiu rigardis al mi kun petanta vizaĝo, sed mi ne povis helpi. Ĉi tie sin trovis diverslandanoj, kaj unu ne komprenis la alian. Sed baldaŭ mi konatiĝis kun Hispana kaptito, membro de la Esperanto-movado. Tio ĝojigis al mi, tamen ni ambaŭ suferis. La E-a Klubo en Toulouse iom helpis al ni, kelkfoje sendante nutraĵojn. Tiuj geamikoj pensis pri nia suferado, kaj mi neniam forgesos ilin.

Miaj kunkarceranoj estis Germanoj, Belgoj, Francoj, Poloj, Svisoj k.t.p. sed la plejparto estis Hispanoj. Dum kelke da jaroj tiuj Hispanoj geviroj sin trovis en la sama kaptejo---jaroj de : malsato kaj mizero. De ĉi-2000 homoj mortiĝis ĉirkaŭ ses ĉiutage, kaj la nombro de malsanaj ne estis kalkulebla. Multe da ili teren-falis kaj mortis. Aliaj iris malsanulejen kaj mortis post tagoj aŭ semajnoj. Sed mi kaj aliaj restis---vivantaj kadavroj. Dum unu monato mia pezo malaltiĝis 15 kilogramojn. Iu Marokano ankaŭ sin trovis kun ni. Ĉi tiu bona homo nek sciis legi nek skribi kaj estis ĉirkaŭ okdekjara. Pro la milito li alvenis en Francujo kaj oni donis al li ripozon en terura koncentrejo. Jen nia taga menuo: Matenmanĝo. Kafo sen sukero, sen lakto. 150 gramoj da nigra pano. Tagmanĝo. Supo farita el akvo kaj iom da brasiko, terpomoj kaj sardinoj. Vespermanĝo. Guste la sama.

La fiŝetojn ni manĝis kun kapo k .t.p. kaj poste ankoraŭ ni diris: "Estas bongusta, ĉu ne?" tamen post la manĝado mi min sentis kvazaŭ mi ne ankoraŭ manĝis dum kelke da semajnoj. Vere terura vivo.

Iutage oni nin informis pri alveno de kelke da Amerikaj ĵurnalistoj. En la nomita tago ni ĉiuj manĝis kiel princoj kaj ni jam pensis pri plibonigo en la koncentrejo, sed la sekvinta tago estis ĝuste la samaĉa!

La mallibereco sin sentigis kaj la malsato ankoraŭ pli. Tamen mi estis feliĉa kompare kun miaj geamikoj kiuj jam mortis

pro malsato. La kaptitoj estis diversprofesiaj---doktoroj, advokatoj, profesoroj, komercistoj k.t.p.---sed ili havis nur unu personon: liberecon por fari, agi, paroli. Pro tiu fakto ili sin trovis en terura bestejo, bravaj herooj, kaptitoj en Faŝistaj manoj.

C.H.GEENAN.

(S-ro Geenan estas submarŝipisto en la Nederlanda mararmeo. Li vizitis la Melb.Esp.Klubon. Plua aventuro aperos en venonta numero.

RADIO: S-ro Allan Turner ree konsentigis stacion 3SR elsendi Esp-an horetan monate. Li parolados el 3SR je la 13.5.44, je 6.30 p.t.m .

S-ro BERNARD LONG (Anglujo) informas nin pri erareto en LA RONDO, Aug. 1943, p. 319 (piede). Ni uzis "musko" por la Angla "musk" (la parfumejo, ne la ne-plu-parfumhava planto). La vorto devas esti "mosko", ĉar "musko" signifas "moss".

E-ro W.DRUMMOND antaŭ ne longe ricevis surprizan donacon de D-ro F.E.Williams (Fiĝio). Ĝi estas karto de dumviva membreco de la Internacia Esperanto-Ligo, kaj reprezentas esprimon de danko pro la konigo kaj instruado de Esperanto, kion donis al li S-ro Drummond antaŭ multe da jaroj. D-ro Williams estis juna medicina studento, kiam S-ro Drummond konsilis lin lerni Esp-on. Tion li faris, kaj post tiu paŝo ĉiam sentis sin danka pro la valorega konsilo. Estas rimarkinde, ke la patro de D-ro Williams kiel unua atentigis S-ron Drummond pri Esp-o, montrante al li gazeteron pri tiu lingvo. La patro ne estas Esp-isto! M.C.

LETEROJ al la REDAKTORO.

De A.C.H. Rilate la Aprilan AEM. En la nuna tempo, kiam artikoloj aperas en ĵurnaloj kaj gazetoj favore al Basic English, estas urĝe necese aperigi en nia Esperanto-gazeto pri-Basic'ajn artikolojn. Sed kial ni reklamas por konkuranto, kiel en la Aprila AEM, sen akompanantaj notoj por gvidi "ŝanceliĝulon"? Ne ĉiu novulo kapablas decidi por si mem inter du "tielnomitaj" helplingvoj. La pridiskutata paragrafo estas mispaŝo miaopinie. Kion opinias aliaj legantoj?

De NEŬTRALULO. Mi rimarkis sur p. 97 de la AEM paragrafon pri Basic English en Anglujo, kaj gratulas vin pri ĝia apero. Tro multaj el ni emas malestimi, eĉ ignori la pretendojn de niaj kontraŭuloj aŭ pro malkuraĝo, aŭ pro politiko (tiu ĉi erara, laŭ mia opinio). Tamen absolute necesas ke ni, Esperantistoj, konu niajn malamikojn, la argumentojn kiujn ili prezentas kaj ilian progresadon. Ĝi neniel alie ni povas plene sukcese batali kontraŭ ili, kaj ŝajnas al mi, ke Basic estas nuntempe nia plej grava malhelpo.

Do mi gratulas kaj dankas vin pro la militiro kiun vi kon-

dukas en la AEM kontraŭ Basic, pli ol unu fojon mi mem utilis la AEM kiam mi bezonis informon kontraŭ Basic por parolado kun por-Basic-a amiko.

KVINSLANDO. An interesting talk on developments of the Esperanto movement in the mandated territory of German New Guinea was given to members of the Q'land Society by Mr. F.T. Simon, for several years official interpreter at Rabaul. Mr. Simon's residence there coincided with Mr. Maurice Hyde's term as auditor in the Commonwealth Public Service. These two enthusiasts tried out Esperanto with natives, including young Chinese. They found the experiment interesting and satisfactory. It was a unique linguistic adventure, for it was necessary to bring into play four languages to carry out their scheme. As the natives understood German better than English, translations were made from English textbooks into German, then into their language and finally into Esperanto. Unlike the late Director of Public Instruction of the United Provinces in India, with Basic English and the Indians, these teachers found that the natives made good progress in Esp-o. Mr. Simon went to Rabaul in 1920. Returning to Sydney he organized the 4th Australian Esperanto Congress (Sydney 1923), a great success from the propaganda standpoint, and a number of Esp-o groups was formed as a consequence. Two years later he attended the 5th, which took place at Melbourne. Out of it arose the Australian Esp-o review "La Suda Kruco," Mr. Simon was president of the Sydney Society in the late 20's and of the Brisbane in 1930. The speaker exhibited books of newspaper and other clippings of interest and value.

S. WANMER

NUN NI AGU! Venis tempo agi. Vi ĉiuj ja legis en gazetoj ke Churchill laboras energie por Internacia Lingvo, nomata de li Supra-Nacia; kaj ne Esperanto, sed Basic Eenglish estas lia favorato. Li jam puŝis sian "Idon" en la Parlamenton.

Certe, niaj Britaj sam-oj fervore baraktas, sed ni ankaŭ devas helpi ilin, sendante individue amase niajn mallongvortajn (eĉ sur poŝtkartoj skribitajn) rekomendojn por Esperanto al ĉiuj Ĉefministroj de Nov-Zelando, Kanado, Aŭstralio, Sudafriko, al Prezidanto Roosevelt kaj Marŝalo Stalin.

Mi persone jam skribis leteron kaj enmetis en la koverton presitajn propagandaĵojn ("Esperanto, and why we need it"; "Esperanto in School"; "Esperanto at a Glance") kaj sendis registrite al Churchill kaj Curtin. Mi preparas sammaniere leterojn al Fraser (N.Z.) Generalo Smuts, MacKenzie King kaj Mme Eleanor Roosevelt; kaj mi invitas ĉiun sam-on kaj Esp societojn kaj grupojn sendi leterojn al tiuj personoj; nur amasa atako konvinkos ilin atenti la Esp-an movadon. Menciuj vian socian staton: farmisto, profesoro, pastro, doktoro, instruisto, laboristo k.c. Mi subskribis kiel Rusa Ortodoksa Pastro, unu mia amiko kiel Rusa inĝeniero, eksfabrikisto; tio multe valoras.

Mi jam ricevis de S-ro Curtin respondon: "On His Majesty's Service. Prime Minister, Canberra. 31 March 1944. Dear Sir, I am desired by the Prime Minister to acknowledge your letter of the 29th instant and to thank you for forwarding the booklet and pamphlets dealing with the Esperanto language. Mr. Curtin has noted your suggestion. Yours faithfully, E.W.TONKIN, Private Secretary."

Mi preparas por S-ro Curtin ankaŭ kajeron kun eltranĉoj el "British Esp-ist" pri diversaj Anglalingvaj artikoloj pri Esperanto.

-----INOCENTO SERIŠEV, Box 2988 NN, Sydney.

BALDAŬ AŬ BALDE?

Al A.E.M. Zamenhof diris, en la unua Esperanto-libro: "La tutan gramatikon de mia lingvo oni povas bonege ellerni en la daŭro de unu horo." "Se vi prenos verkon...vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas ĉiam kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro." La "plena gramatiko de Esperanto" li donis al ni en la dek ses reguloj kaj sufiĉajn vortojn por komuna uzado, Kabe, Grabowski, Bourlet, D-ro Vallienne, "Ivan Malfeliĉulo", "Zanoni" kaj multaj aliaj trovis tiujn rimedojn tute sufiĉe. Ĉu ni nuntempuloj ne danke akceptas ilin? Ĉar nun ni ankoraŭ havas la saman gramatikon sed ankaŭ oficialajn aldonojn al la vortaro. Mi kredas ke la Rondo-A.E.M. faris gravan malhelpon al Esperanto, serĉante kaj uzante formojn por ŝanĝi la gramatikon kaj tiel fari tiel malfacilan lingvon tute alian ol la Zamenhofa Esperanto. Ni havas la "plenan gramatikon" postlasitan de Zamenhof, kaj ŝajnas al mi tute nenece ke Kalocsay kaj Waringhien eldonu alian "Plenan Gramatikon" kiu, laŭ via eltiraĵo, volas fari ŝanĝojn en la Zamenhofa sistemo. Kial deflankiĝi nur por fari malfacilaĵojn? Ĝis nun la pli bonaj Esperantistoj ne aprobas la ŝanĝon de la aŭ-adverboj kaj eĉ ne volas havi duoblojn por ili. Mi estas uzanto de la Zamenhofa Esperanto kaj mia konstanta penso estas rezistigi ĉian ŝanĝon de formo, tiel ke Esperanto ĉiam restas Esperanto de unu generacio ĝis alia senŝanĝe, krom de la natura evoluado de ĝia uzo.

KARLO MADRIGALO.

RESPONDO DE LA REDAKTORO. Mi devas supozi ke K.M. erare subkomprenis el la titolo "Baldaŭ aŭ Balde?" la kroman nocion: "Kiu estas korekta..?" Domage. Mi ne volis tion. Neniel temas pri korekteco de tiu aŭ alia formo. Unu estas Zamenhofa; la dua estas tolerata de la Lingva Akademio, do certe ekzistrajta.

Nia amiko tro multe prenas per unu gluto; alivorte, fulme faras tro facilajn konstatojn. (1) Li kaj mi eble ne konsentus pri la senco de la vorto "gramatiko". Certe estas ke, "lerninte la gramatikon en la daŭro de unu horo", la studanto trovas ank-

oraŭ multon lernotan. La dek ses reguloj ne ĵetas lumon sur mil aferoj pri kiuj devas scii E-isto celanta akiri fundan konon kaj bonan stilon. Ekzemple, pri la ĝusta uzo de "po", "jam", kazo post "spite" kaj "kiel"; la korekta uzo de la adverba participo (nominativo absoluta), de la predikateca adjektivo (li trovas la knabon loĝanta), de la uzo de verbtempoj en apartaj aŭ dubaj okazoj (li vidis, ke ŝi estas bela), (ne)transitiveco, la "misteroj de la verboformoj (-us, -u) kaj multaj aliaj. Li lernas pri tio el "Lingvaj Respondoj" kaj bonaj instrulibroĵoj, kaj per absorba observado en nia bela literaturo. Tio povus postuli jarojn; efektive multaj homoj kolektadas lingvajn konojn kaj "perfektiĝadas ĝis la morto, eble pluen.

Ankaŭ pri la signifo de "natura evoluado" la homoj povas nesamopini. La unua generacio de E-istoj uzadis formojn kiujn hodiaŭ la plimulto rigardas kiel arkaikajn. En la Fundamenta Krestomatio kaj la fruaj antologioj (Grabowski, Kabe) atenta leganto trovas ilin ne malofte. "Ĝisostuloj" ilin ankoraŭ imitas, pensante per tio servi al la lingvo, konservante eĉ neklarajn, "lignecajn" esprimojn. Aliektreme estas riskemaj eksperimentuloj, serĉante ĉiam novajn impresmanierojn, muldante la lingvon laŭ ĉia postulo de la artformoj.

(2) K.M. tute misasertas, deklarante ke la gazeto "ŝanĝas la gramatikon." Ekzistas atesto absolute neniam por tio. Fakte estas ke la subskribinto en poemo plenrajte uzis unu formon toleratan de la L. Komitato. Mi ne volis atendi la tagon kiam "la pli bonaj Esperantistoj aprobos..." Jen ĉio. Grandigi tiun perfekte honestan fareton ĝis krimo kontraŭ la unueco de la lingvo, jen drasta troigo! La konata malsimpatio kiun K.M. sentas al la poezio sendube malebligas lin eĉ paciencete konsideri la apartajn problemojn de E-istoj laborantaj sur tiu artkampo.

(3) En paca mondo la verkintoj de "Plena Gramatiko" pli efektive ol mi farus la rebaton siapartan. Mi simple diru ke mia "ol-tiraĵo" neniel indikas ke ili volas "fari ŝanĝojn". Zelota akuzemo faras nenion bonan.

(4) Povas esti ke K.M. pli klare perceptas ol mi pri tio, kio konsistigas rompon de la Fundamento. Mi nur diru, ke jam longe Esperantologoj malkonsentas inter si pri tiu demando. Ekzemple, ĉu "aliam, aliel" k.c. estas kontrafundamentaj? Tiujn formojn uzadis miloj da bonaj E-istoj, sed disputeble.

Ni jam havas "preludo, prelego, preskribo". Se iu, ekzemple, enkondukus "pre-" kiel prefikson paralele uzeblian kun "antaŭ-" (prehistorio), sendube K.M. ne aprobus, sed jam almenaŭ du fojojn la Lingva Akademio akceptis similan paŝon: ĉe -aĉ anstataŭ "malbon'" kaj mis- anstataŭ "erar'". Tiel provi ne estas atenci la Fundamenton. Provi novan prepozicion kia "par" aŭ "disde" povas esti por multaj nediskrete, nesage, nenecese, sed ĝia kontraŭfundamenteco estas almenaŭ disputebla. K.M. admirante uzas la nomojn Bourlet kaj Grabowski. La famaj "Babiladoj" de Bourlet en la Revuo klare montras ke ankaŭ li devis ricevadi akrajn rip-

roĉojn de la lingve konservativa Cart pri supozataj nekonformaĵoj kun la Fundamento. Kiom koncernas al Grabowski simple ne estas vera, diri ke li "trovis tiujn rimedojn tute sufiĉe." Mi konsilas varme ke nia kritikinto legu en "Sinjoro Tadeo", kiun tradukis Grabowski. Li trovos inter aliaj: "juni", "nomatis", "mastro 'as fore"; "is plej estimata;" "anstat'", "presk'." Ĉu K.M. aprobe vidus en A.E.M. tiujn formojn de la admirata Grabowski? Li legante lernos pri ankoraŭ da harstarigaj eksperimentoj; sed Zamenhof plene aprobis la verkon, danke, ĝ-ĉje.

J.en Kl.

RESPONDOJ PRI LINGVOJ. Vi demandas, ĉu estas korekta la frazo: Mi legas dek kvin paĝojn potage. Ni direktas vian atenton al Cox 259 (22) kaj al Lingva Respondo 42, kie Zam. skribis: "Oni ne povas diri, Je 30 mejloj po horo, sed oni devas diri Po 30 mejloj en horo." "Po" signifas "at the rate of"; "se mi veturos en ĉiu tago po dudek mejloj, mi finos la tutan vojaĝon en ses tagoj," estas bona ekzemplo de klasike korekta uzado.

To en K. La signeto ~ estas de Anglaj presistoj nomita "breve". La ^ estas Esperante nomita "supersigno", kaj la koncernaj literoj do "supersignitaj", aŭ "ĉapelitaj." La unua estas esprimo Zamenhofa; iu alia geniulo elpensis la duan.

He. en L. La Zamenhofa verbo por traduki la Anglan "to terrorize" estas "teruri", ne "terurigi". "Vi teruras min per sonĝoj" (Ijob 7/14); Millidge, Plena Vortaro SAT. "Terurigi" signifas "igi teruranta."

Em en A. "policy", La Plena Vortaro donas kiel la duan signifon de "politiko": Generala agmetodo. "Prudence" kaj "discretion" la Angloj ofte uzas kiel eufemismojn por "timemo", "malkuraĝo". He prudently refrained from attacking: Li time.... Komparu:- Discretion is the better part of valor, proverbo ofte citata por defendi homon aŭ pravigi agon en kiu montras sin evidenta manko de kuraĝo.

RAKONTETO. Dum duonhoro Cuthbert aŭskultadis al riproĉo de la patro pri la malbonecoj de malfruj enlitiĝoj kaj malfruj leviĝoj en la sekvintaj matenoj.

"Neniam prosperos al vi," diris lia patro, "krom se vi plibone rekomencu. Notu! Ĝuste la frua birdo kaptas la vermon."

"Ha, ha!" ridis Cuthbert, "Kio pri la vermo? Kion kaptis li pro sia fruleviĝo?"

"Mia filo," respondis la patro, "tiu vermo, neniam la tutan nokton al lito iris; li estis survoje hejmen."

KASO KVITANCOJ Ricevataj dum Aprilo 1944.

D-ro kaj S-ino Binicovici 24/4. S-roj Newton, Stone, Jack 10/6. S-ro F.V.Taylor (2 yrs) 10/-, S-ino M.Ling 5/-, F-inoj A. & E. Godfrey 10/-, S-ro H.M.Cohen 5/-, S-ro G.Szekfy 5/-, S-ro R.Lechmere 5/-, S-ro F.Pitt 5/-, M.Maddern 5/-, S-ro L.Fekonja (2 yrs) 10/- F-ino Telfer (kurso) 5/-, F-ino H.Sycamore 5/-, S-ro F.A.W.Thomas 5/-, S-ro W.Drummond 5/-, S-ro C.Geenan 5/-, S-ro Peck 5/-, S-ro H.Byatt 5/-, S-ino B.Jones 5/-, S-ro Ken Linton 5/-, F-ino Carrick 3/- . £7.2.10.

Al la Generala Kaso £1.14.6. En la A.E.M.Kaso £6.-.11.

W.ADDIS. 25 Greville Avenue, Flinders Park, S.Aus.

(Eraro en Marta Kaso. Legu £4.12.2 en la Gazeta Kaso.)

PREGADO EN ESPERANTO. "Mi ĉeestis kunvenon de la -- Grupo Esperanta. Tio estis la dua fojo je kio mi aŭdis Esperanton parolatan, kaj la unua je kio mi mem parolis ĝin. Mi partoprenis la diskuton kaj, post la kunveno, la prezidanto min demandis: kiel mi, izola studanto, povas tiel flue paroladi en tiu lingvo? Mi konsentis lin informi, kondiĉe ke li promesos uzi mian apartan metodon. Li certigis min ke li tiel promesas kaj rekomendos ĝin al aliaj. Rekte rigardante lin en la okuloj, mi milde diris ke mi kutime faras la privatajn preĝojn en Esperanto. (Pastro R.E.Fairbairn, Windermere, Kanada, en "Guardian" (Englujo), citita en "British Esperantist," Jan. 44.) Sendita de Deaconess MAGAREY. (Trad. de F.R.B.)

DEACONESS. (1) Diakonino en la antikva Kristana Eklezio kaj en kelkaj modernaj eklezioj. (2) Edzino de diakono (laŭ la Usona verkisto O.W.Holmes) (3) La nomo de virinoj apartenantaj al iuj Protestantaj religiaj societoj bonfaraj, kun celoj similaj al tiuj de la Romkatolikaj "fratinoj de la Karitato" (Sisters of Mercy).

LOGIKECA! (El ekzamendem/andaro.)

Demando: Kiu, vi opinias, venkos la militon? Donu vian kialon. Knabineto responde: Mi opinias, ke Anglujo venkos, ĉar oni nomas Anglujon la Patrino-lando, kaj Germanujon, la Patro-lando, kaj kiam la patrino kaj la patro kverelas, estas ĉiam la patrino kiu venkas.

THE
A U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y .

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Vol 4 , No. 9 , JUNE. , 1948 .



EDITED BY
F. R. BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSENDON W5., VIC.

LA AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

- o -

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

LA ŜLOSILO AL KUNLABORADO.

(ĈERPITA el "The France of To-morrow," D-ro Albert Guerard.
Harvard University Printing Office, 1942.)

Doktoro Zamenhof sekvis pli konscie kaj pli difinite ol Pastro Schleyer la regulojn laŭ kiuj nun lasas sin gvidi ĉiuj interlingvistoj. Lia Esperanto evidente estas Novlatina kaj natura lingvo, kun nur malmultaj nekongruaj elementoj. Sed Esperanto ne prenas normalan lokon en la evoluado de internaciaj lingvoj: oni povus nomi ĝin "mutacio" (1), kiu estiĝis pro hazardo de l'genio. Kreaĵo de unusola menso, ĝi havas la virtojn kune kun la nekompletecoj de verko de l'arto. Ĝi havis jam de naskiĝo kaj retenis dum 50 jaroj forte individuan karakteron, strangan kaj nevenkeblan vivpotencon. El tio devenas ĝia senduba allogpovo; ĝi ricevas amon kaj malamon kiel nur povas tion io vivanta....

En la laboro de Zamenhof estis multe pli alia ol la simple lingvistika. Li estis unika ĉe la lingvofaristoj pro sia mirakla sed modesta kombino de idealismo kaj praktika prudento. Unuflanke li formulis, pli klare ol siaj kunkampanoj, la internan ideon, tiun flaman fidon al homa frateco, kiu ankoraŭ restas nia espero. Aliflanke li metis la bazon, kiu faris ke Esperanto estas la unu decidiga eksperimento inter tiom da mortnaskaj projektoj. Definitive konsentu pri kelko da necesoj, tiam, anstataŭ konstante "plibonigi" vian lingvon, uzu ĝin kiom multe vi nur povas. Sekve de tiu principo Esperanto pie konservis ĉiujn fruajn difektojn, de kiuj kelkaj grave malhelpis ĝin. Sed ĝi ankaŭ pruvis ke arta lingvo konservi sian unuecon kaj kontinuecon en 50 landoj kaj dum 50 jaroj. Tiu demonstracio povus veni nur tiel, kaj ĝi estas trege grava. Pro la fidsento kreita de tiu deva stabileco oni uzis la lingvon por centoj da volumoj kaj revuoj pri ĉiaj aferoj---de la traduko de la Biblio, Vergil, Shakespeare kaj Goethe, ĝis ordinaraĵoj kaj farsoj. Zamenhof neniam kredis ke li estas neeraripova; lia politiko ne devenis el obstino kaj trofiero. Li deziris teni Esperanton sensanga en ĝia esenco por ke ĝi daŭre laboradu. En tio li sukcesis. Al la hodiaŭa mondo Esperanto proponas sin ne nur kiel grandskale kaj multjare pruvita ri-

medo, sed ankaŭ kiel solvo kiu, negrave kiom neperfekta, estas akceptinda, kaj ĝi havas la grandegan avantaĝon esti tute uzpreta. (Guerard ĉi tie verkas simpatie pri Occidental kaj Latino sine Flexione).

Esperanto, Occidental kaj Latino s. F. estas praktikaj solvoj, tuj uzeblaj. Tiuj tri, en diferencaj gradoj, proponas la samajn necesegajn kvalitojn---Natureco, Neŭtraleco, Facileco. La rajton de ilia pretendo al neŭtraleco iuj povas dubante ne plenkredi, ĉar tiuj planlingvoj favoras la Anglolatinan grupon kontraŭ German-Slava, kaj la Eŭropan kontraŭ la Orienta. Sed absolutan neŭtralecon ni povus havi nur per absoluta artefariteco. Pri timo fari la lingvon tro facila por kelkaj, ni devus fari ĝin ekstreme malfacila por ĉiuj. La grado de neŭtraleco estas jam sufiĉa se la lingvo adoptota estas nenacia. Basic English ne estas neŭtrala en spirito; Esperanto, Occidental kaj Latino estas.

Fervoraj homoj foje tro asertas la facilecon de artaj lingvoj. Tolstoj lernis Esperanton en kelke da horoj, kaj kiu ajn Okcidenta klerulo povus legi Latino (sine Flexione) je unua vido. Kompreneble Slavo, Germano aŭ Aziano ne povus tion; eĉ bona lingvisto devas studi kaj sin ekzerci antaŭ ol flue paroli-skribi helplingvon. Tamen, subtaksante pri troigoj, ni rajtas kredi ke Esperanto, Occidental kaj Latino estas konsiderinde pli facilaj ol la plej bonaj (2) historiaj lingvoj Miaopinie neŭtraleco estas pli grava ol facileco; sed la avantaĝo pro facileco estas havinda.

..... en ĉiu homo dormas iu Hitler, avida faratigi sian volon kaj superigi sian tribon. Multaj Usonanoj, ne konscie-imperismemaj, tamen tro facile konkludas ke kiam la mondo resobriĝos ĝi adoptos la lingvon krome kun la manieroj de Hollywood. Inter la Anglaj radikaluloj ankoraŭ vivas tre forta izolemece, kiu estus ridinda se ne tiel ploriga. H.G.Wells riproĉas la homaron ke ĝi ne kreas Mondoŝtaton---sed tiu Wells'a mondoŝtato devas paroli Angle! Subtila logikisto S-ro Ogden estas pri tiu punkto ... neklarmensa. Lia Basic estas rimarkinda pedagogia faraĵo; oni povus nomi ĝin "la Angla lernebla preskaŭ senlarne." Sed malgraŭ sia aŭdace simpligita gramatiko kaj bele neta vortareto ĝi restas ja Angla lingvo.. Ĝi ne penas ordigi la kaprican literumadon kaj konfuzan prononcadon de l'tradicia Angla. Homoj ekirantaj jam de Basic nepre iros en la norman Anglan, kaj ili trovos ĝin unu el la plej kernecaj kaj idiotismoriĉaj lingvoj en la mondo---tio estas: unu el la plej malfacilaj.

RIMARKO DE LA RED. Ni aperigas la supran, ne ĉar ni ĉiupunkte aprobas ĝin, sed pro ĝia gravo kaj intereso. Serĉu la verkon en la Ĉefurba Biblioteko.

(1) "mutacio": la vorto estas en Hortikultura Terminaro (Neergaard). Sponta estiĝo de nova formo el burĝono, de kiu evoluigas branĉo kun ecoj genetike deviaj de tiuj de la cetera planto. Figure aplikata al lingvoj, "mutacio" havas similan sencon.

(2) "the best". Eble la aŭtoro volas komprenigi "the easiest", "the best fitted for world use;" sed restas dubo.

-----Tradukis F.R.BANHAM.

La sekvanta artikolo de S-ro W.Chandler, membro de S.E.S., estis publikigita anglalingve en "Education", oficiala gazeto de N.S.W. Public School Teachers' Federation. La substrekitaj vortoj estas ankaŭ en la originala artikolo en Esperanto.

ESTOS.

De LA REVANTO.

Mi staris ĉe la portaloj de la Halo de Tempo kaj frapis. Kaj unu venis kaj malfermis al mi, kaj lia vizaĝo estis ĉa vizaĝo de instruisto, kaj ĝi estis kiel la vizaĝo de iu ajn alia viro, nur ĝi estis pli milda; kaj estis klare, ke liaj manoj estis tenintaj la manojn de multaj etaj infanoj, kaj ke neniu ĝi timis lin.

Li precia min je la mano kaj kondukis min antaŭen---mi ne scias je kiom da jaroj---en ĝardenon plenan de flora perfume kaj de birdaj kantoj, sed pleje de ridado---brila ridado de infanoj. kiu konis nek iun timon pro la estonto nek iun enuon de la nuno.

Kaj li petis min rigardi, kaj mi vidis trupon de ekscititaj junuloj, ĉiu el ili kun vojaĝ-ekipaĵo. Ili kolektiĝis sur perono kaj gaje amasiĝis en vagonaron; kaj la vagonaro estis egala al hejmo, escepte ke ĝi havis ankaŭ lernej-vagonon kaj librejon de mirigaj volumoj, kaj laborejon ekipitan de infanmezuraj stabloj kaj maŝinaro. Nun mi timis ke la ĉeesto de iu, kies manoj kaj piedoj portas la katen-postsignojn de "Routino" (Red Tape) povus alarmi la infanojn; sed mia gvidanto diris: "Ne timu, ili ne vidus vin; kaj eĉ se ili farus tion, ili ja lernis pri vi en siaj sociaj studoj kaj scias, ke vi pli bedaŭrinda estas ol timinda.

Mi petis lin, informi min pri la vagonaro; kaj li respondis, ke tiu estas nur unu el multaj, ĉar tiasama vagonaro estas disponebla por ĉiu centoj da infanoj en la dua duono de ilia 13-a jaro, laŭlonge kaj laŭlarĝe en la tuta lando. Mi dubis, sed li diris: "Ne, Kamarado, ĉar vi vidas nur la veron." Kaj tiele estis. Kaj li rakontis al mi, ke en ĉi-tiu tempo vojaĝado estis ekkonita kiel naskiĝ-rajto de ĉiu infano, kaj ke ses-monata vojaĝo tra la propra lando estas donacita al ĉiu infano je la finiĝo de kvar-jara supera kurso en sociaj studoj.

Poste subite la trajno estis en stacio meze de ĝardeno, proksime al bela urbo kaj longe for de l'bruo de flanken-puŝantaj ŝarĝveturiloj. Kaj kvar geinstruistoj eniris la trajnon. Ĉiu kunprenis 25 infanojn, kaj ili iris: unu al la supro de proksima monto, alia al rivero, sur kiu veturis grandegaj ŝipoj; tria al granda kaj moderna fabriko, kaj fine kvara al art-galerio---ĉar la urbo estis moderna kaj de alta kultur-nivelo.

Kaj posttagmeze ĉiuj rapidigis ilin al la Infan-Instituto, kie la infanoj de la urbo amuzis tiujn de la vagonaro per muziko kaj dramo.

Kaj la postan tagon ree aliaj grupoj vizitis la monton kaj la riveron kaj la fabrikan kaj la galeriojn. Kaj en la posttagmeze de tiu tago la infanoj de l'vagonaro amuzis siajn gastigantojn de hieraŭ.

La sekvinta tago estis libera por la infanoj, kaj kelkaj pasigis sian tempon kun krajono kaj peniko; aliaj, ree skribis leterojn aŭ priskribojn de la aĵoj viditaj; dum ree aliaj okupiĝis pri muziko aŭ metioj aŭ flankokupoj.

Tiel ni vojaĝis de loko al loko, haltante kelkfoje nur malmultajn horojn, sed ĉiam tiamaniere, ke ĉiu infano povus lerni ĉion kion ĉiu urbo povas instrui pri artoj kaj metioj, pri geografio kaj historio kaj pri biologio kaj naturstudado. Kaj ĉiam estis tempo, en kiu la infanoj de la vagonaro povus intermiksi kaj libere konversacii kun tiuj de la urbo, tute sen malhelpo pro la ĉeesto de instruistoj.

Poste antaŭ ol ni eksciis ĝin, tutaj ses monatoj estis pasintaj; kaj la vagonaro staris ree ĉe la perono en la ĝardeno, sed la infanoj estis foririntaj. Tamen denove mi aŭdis la ridadon kaj voĉojn de ekscititaj infanoj---tiufoje de pli maljunaj infanoj. Kaj mi vidis en distanco ŝipon ekvojaĝantan, kaj ĝiaj balustradoj estis borderitaj de junuloj kaj junulinoj.

Mi rigardadis dezireme, ĉar ĝi jam forlasis la kajon. Kaj mia gvidanto, ridante pri mia mieno, diris: "Kunvenu, Kamarado; vi havis sufiĉe por unu tago. Ili estas la dekkvin-jaruloj ekveturantaj por sia rondvojaĝo ĉirkaŭ la mondo. Ili foriros por unu jaro kaj vizitos ĉiujn landojn. Ili lernis Esperanton, por ke ili komprenu kaj estu komprenataj, kien ajn ili iras; kaj iliaj sociaj studoj dum du jaroj preparis ilin por ĉi tiu travivaĵo. Vi kaj mi naskiĝis tro frue. Sed eble ni estos elektitaj, por iri kun ili, ĉar multaj instruistoj devas akompani ilin dum tiu mondvojaĝo."

Kaj post momento mi staris depove ĉe la portaloj de la Halo de Tempo; kaj jen! mi staris antaŭ tabulo kaj frapis per eluzita polvo-viŝilo.

-----PAUL E. SCHWERIN. (Trad.)

LA AVENTUROJ DE S-ro GEENAN, NEDERLANDANG.

Post kiam la Germanoj okupis Nederlondon, S-ro Geenan decidis fuĝi al Anglujo, ĉar li timis ke kiam li fariĝos sufiĉe aĝa li devos aliĝi la Germanan armeon aŭ servi en kampo deviglabora. Nur 16-jara, li kaŝe ekiris for de Nederlando kun biciklo direkte al la Belga landlimo, kiun li transpaŝis. Malfacile sed sukcese li emigis Germanan oficulojn ŝanĝi lian nomon en Francan, kaj post longa penado li trovis sin en Francujo, sed sen pasporto (falsita!), kiun li jam perdis. La Gestapo lin arestis, liberigis, rearestis kaj sendis al koncentrejo por jaro. Tie estis aferstato

terura, manĝaĉo mizera, meze ses malsatmortoj ĉiutage, kadavroj kadavroj longe neenterigitaĵ. Liberigite, li proksimiĝis al la landlimo al Vichy-Francujo kaj denove arestiĝis. Kulpigite pro nehave de pasporto aŭ atestkarto kaj suspektate pri spionado, li ricevis ultimaton konfesi en kvar tagoj ke li intencas fuĝi Anglujon kiel spiono. S-ro Geenan rifuzis konfesi tion, spite vizagbatojn. Lia ĉambro estis malpura, senlita, rubplena, preskaŭ li ne povis kuŝi. La kvaran tagon Geenan iris antaŭ la kapitanon, atendante ricevi mortkondamnon, sed mirige ricevis anstataŭe libereigon, ĉar la aŭtoritato en Parizo letere informis la tiulokan ke la akuzato estas tro juna por esti spiono (!). Oni liberigis lin, ordonante ke li iru en Nederlondon anĉaŭ ol pasos du tagoj. La tiuloka policĉefo estis Esp-isto kaj donis monon, konsilon kiel plejbone pasi en Vichy-Francujon. S-ro Geenan faris tion. Denove arestita, li devis kelkatempe labori por Nederlanda terkulturisto en Vichy-F., kaj fine li atingis la Hispanan landlimon; sed antaŭ ol li povis trapasi ĝin oni ankoraŭ fojon pune devlaborigis lin per tri monatoj. Dumkarcere per manĝo helpis lin Franca Esp-istino, iama plumamiko; ĉe liberigo per mono. Li transgrimpis la Pireneojn en Andoron, tra neĝo dika tri metrojn, sed resendigis Francujon! Je la dua provo li elektis kaŝrampi laŭ la Andoba limo kaj estis jam bone interne de la 30-kilometra marĝeno kiam denove li trafis en areston. Je tio li ŝajniĝis sin Usonano, kio bone servis al li, ĉar bonhazarde la policĉefo estis inklinema al aferoj Usonaj, tial kontaktiĝis kun la Usona ambasadorejo en Madrid, kiu sendis veston, monon per kiu S-ro Geenan finfine venis en la Hispana ĉefurbon. Ĉe la ambasadorejo li informis pri sia artifiko ŝajniĝi sin Usonano. Ili bondezire forsalutis lin. Tra Portugalujo li fine atingis Anglujon flugboate. Tie oni komence suspektis lin spiono, sed post renkonto kun liaj Reĝino kaj Kronprinceĝo ĉio iris glate. Li penis rekrutiĝi al la Nederlanda Flugarmeo en Anglujo, sed oreldifekto tion malebligis. Tamen li sukcesis fariĝi submarŝipano.

Lia vizito al la Melburna Esperanto-Klubo estis vera plezuro al la klubanoj, kiuj amare bedaŭris ke nur unu semajnon li povis resti en Melb. Li amas Esperanton, prefere parolas ĝin malgraŭ scipovo de kvin lingvoj.

S-RO GEO. HILDERMAN. Lia provizora adreso estas "c/o 184 The Boule/vard, Strathfield, N.S.W." Bonvolu, nur pri urĝaj aferoj. Pro lia treokupateco la "Asociaj Notoj" ne aperas.

LA TASMANIA ESPERANTO-ASOCIO donacis unu funton al la kaso de la projektita korespond-kurso, kaj esperas, ke ĉiu aliĝinta grupo ankaŭ subtenos tiun ĉi bonegan entreprenon, tiel videble montrante ke ili pretas ludi gravan rolon en la antaŭen-igo de Esperanto en Aŭstralio. Dankon al T.E.A!

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY propagandas en la "Domain".

La 7an de Majo S.E.S. aranĝis propagand-paroladojn en la Domain, Sydney. Ĉirkaŭ la estrado, dekorita per Verda Standardo, kolektiĝis dum la tuta daŭro de 1' posttagmezo ĉirkaŭ 200 personoj. Unue samideano Rutland montris en humorplena, slangoriĉa parolado la neceson kaj praktikan utilecon de internacia komunikilo. Poste nia nederlanda samideano Geenan, vestita en pure blanka marist-uniformo, parolis en Esperanto pri siaj spertoj en la okupataj landoj Eŭropaj, pri sia rifuĝo de la Gestapo tra Belgujo, Francujo, Hispanujo kaj Portugalujo al Anglujo, pri siaj vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo en submarboato nederlanda. Samideano kaporalo Smith forte tradukis la paroladon anglan, frazon post frazo, kaj la arda entuziasmo de la du junuloj en ilia verbado kuntrenis la aŭskultantojn. Plurfoje la policistoj devis atentigi nin, ke la finhoroj jam alvenis, antaŭ ol la vigle diskutanta homamaso fine disiĝis.

La 14-an de Majo la propaganda estis ripetita kun eĉ pli granda sukceso; 500 personoj aŭskultis.

Nova Czch-metoda kurso estas aranĝita kun 24 komencantoj, gvidita de S-ino Schwerin.

ELBOURNE. La monata kunveno de la Esperanta Rendevuo okazis 28/4/44 en ĉambro de la Henry George Club, Melbourne.

La prezidanto, S-ro E.S.Hanks, dankis S-ron Szekfy pro donaco de tre bona elektra kruĉo. Tiu ebligas la preparadon de teo, kaj tetrinkado estas ĉiam tre ŝatata ero en la programo.

LA ESPERANTA RENDEVUO anoncis novan LITERATURAN KONKURSON por la nuna jaro, 1944; por originala proza verko en Esperanto. Ni esperas ricevi provojn el ĉiuj ŝtatoj.

KONDIĈOJ. Ne estos enirpago. (La premio estos Esp-a libro.) Sugestita longeco; 500 ĝis 1500 vortoj. Skribu nur plum-nomon sur la verko. (En la lasta konkurso anoj ne bone atentis tiun informon.) Nepre lasu spacojn inter la linioj kaj marĝenon de almenaŭ unu colo ĉe ĉiu flanko de la paĝo. Sendi kune vian nomon, adreson, kaj plumnomon, en sigelita koverto.

La decido de la juĝanto estos fina. La "Aŭst. Esperanto Monthly" rajtas presi iun ajn de la verkoj, laŭ elekto de la Redakcio.

Ĉiu provo devas esti, antaŭ la fino de la jaro, en la manoj de S-ro E.S.Hanks, 736 Sydney Rd. Coburg, N 14, Melbourne, VIC.

NI DEZIRAS sciigi la anojn, ke la horeto de S-ro ALLAN TURNER ĉiun duan Sabaton monate ĝis plua informigo okazos.

La venonta okazos Sabaton, 10an Junion 6.30 p.t.m..

NEKROLOGO. TREWIN. En Aprilo 24 ĉe Colac, Serena Trewin, vidvino de Francis Trewin. S-ino Trewin estis fervora Esperantistino dum dudek kvin jaroj. Dum ŝi loĝis en Bayswater (Vic.) ŝi fondis kaj kondukis Esp-an grupon, kiu floris multajn jarojn. "La Suda Kruco"

aperigis kelkajn el ŝiaj tradukoj; unu aperis en "La Rondo" (Julio 1942, p 133). Lastatempe S-ino Trewin preskaŭ blindiĝis, kio malebligis pliajn laborojn por la lingvo, kiun ŝi tiel varme amis.

----- C.W.B.

KASC de la A.E.M. Kvitancoj ricevitaj dum Majo 1944. S-ino Wood 5/- . S-ro Prodie 5/- kaj 5/- por nova konkurso. S-ro Thompson 5/- . S-ro Ballard 5/- . S-ro Hudson 5/- . S-ino Westbrook 5/- . £1-15-0. Al A.E.A. 14/- . En Gazeta Kaso £3-18-1d.

W.ADDIS, 25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide, S.Aus.

(Would the member who received A.E.A. Year Book instead of the April Magazine please return same to the Cashier as the addresses are required for reference.)

TRADUKO de KONKURSO 10. (Kompilita el 3 tradukoj.)

Ŝarĝ-aeroplanoj transportantaj ŝarĝojn de Usono al Alasko plenumadis miraklojn. Antaŭ nelonge, kiam la Nome Hospitalo forbrulis, du ŝarĝ-aeroplanoj alportis 24-litan anstataŭaĵon, kompleta de X-radiaj aparatoj kaj litoj ĝis subhauĵaj injektiloj kaj kaŭĉuk-gantoj, nur du tagojn post la forbrulo de la malnova. Aliajn fojon, kompleta segejo-segiloj, rimenoj, maŝinaro-estis altransportata de unu sola aeroplano. Ĉi-tiuj ŝarĝ-aeroplanoj povas transporti aŭ ŝarĝon aŭ soldataron. Per serio da boltoj oni povas transformi ilin dum malpli ol unu horo en grandajn flughospitalojn kun kvar vicoj da kuŝejoj. La flankoj estas interne kovritaj de metalaj "sitel-sidoj" por soldatar'-transporto. La sidejoj estas butone fikseblaj al la muroj, kiam la aeroplano transportas ŝarĝon.

VENKINTA GRUPO. Sydney Esperanto Society.

TRADUKO de KONKURSO 11. (Kompilita el 3 tradukoj.)

Jen estas la granda impresio, kiun mi retenis de mia vojaĝo: Malamo-, artefarita malamo, nutrita per la propagando de la "bonaj homoj". Se iu morala konkludo estas deduktebla eĉ la multaj kaj diversaj homaj specimenoj, kiujn mi priskribis, --ĝi estas la absoluta neceso, ke ĉiuj popoloj unuiĝu. Mi celas ne la unuiĝon de malmultaj nacioj sub la duobla protekto de maŝin-movitaj flugiloj kaj murdemaj kanon-buŝegoj kontraŭ akson de aliaj landoj, sed la kompletan unuiĝon de ĉiuj nacioj komprenantaj sian mision de homara kunlaborado. Al ĉi malnova naciisma dogmo, kies anarkia potenco kaj rezana influo estis la kancero de l'homaro, ni devas kontraŭstari la novan teorion de la Unueco de la Homaro. VENKINTA GRUPO: Melburna Esperanto Klubo.

TRADUKOTA TEKSTO. Konkurso 12.

Spring came to Paris with a rush after one of the coldest and most paralyzing winters imaginable. Thousands of people not actively concerned in the conduct of the war threw off their feelings of impotence and numbness, and came back to life and the capital. For the first time since October, children were playing in public gardens. The cafe terraces were full again, and on Sundays as large a crowd as usual was taking its promenade in the sun. First the magnolias in the gardens of the Avenue Gabriel came into bloom. Next came the chestnut trees, green and whiter and fresher than ever. Less overcrowded than usual emptier of motor traffic, Paris had a peculiar air of nostalgic beauty. (C. Denis Freeman & D. Cooper: The Road to Bordeaux)

Tradukaĵoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.6.44.

P.E.SCHWERIN,

1 Carabella Flats, McDougall St., Milson's Point, N.S.W.

LETEROJ AL LA REDAKTORO.

De S-ro ALLAN TURNER. Bonvolu permesi ke mi danku al ĉiuj kiuj respondacas pri nia Gazeto. Sendube ĝi tre valoras al la Movado en Aŭstralio kaj multe helpas fortigi ĝin. Ni izoluloj envias ĉiujn kiuj povas ĉeesti kunvenojn kaj diskuti, paroli, kaj progresi pri ĉiuj flankoj de la Lingvo.

En "Verkoj de Fez" ni legas---"Kiu legis verkaron de Zamenhof povas facile konstati, ke lia lingvo---eĉ en klasikoj---estas simpla, senpretenda, neefektanta, kaj tamen tre riĉa je formo kaj enhavo, antaŭ ĉio---agrabla komprenebla. Zamenhof sciis diri ĉion eĉ plej subtilan klare kaj elegante, lia penso havas precizan esprimon, la frazoj fluas libere, kvazaŭ el korno de abundo."

Sendube oni povas ĝui la kapablon lingve akrobati, sed eble tio kio aspektas al iuj el ni esti akrobatoj estas nur sumo el jaroj de parolado kaj pensado inter Esperanto-parolantoj.

Tamen iom konsternas min la lertaj frazoj de multaj Esperantistoj, kaj mi suprenrigardas al la altaĵoj lingvaj kiujn ili okupas, enviante ilin pri tiaj geniaj kvalitoj mensaj, kaj malesperante ke mi iam povas atingi eĉ la montetojn de lingvaj kapabloj, sen menciigi la montojn de plen-lingva scio. Mi vidas ilin argumenti, batali, lukti, barakti, sed, ĉiam la klereco, la lerteco, la vikleco superregas ĉion. Kiel simfonio leviĝas la belaj vorturnoj, la sonoraj frazoj, la majestaj lingvaj esprimoj, ĝis frapas min la pensego ke supre en la altaĵoj lokiĝas nun nia Esperanto, flua, belsona, perfektigema, ideojn vestante kaj disvastigante, vortojn kirlante: pardonu al mi ke mi ne plue povas parole vojaĝi. Pro miaj malkapabloj lingve, laŭ simplaj rektaj vojoj devas iri mi, ĝis burĝonos la oportuno eniri rondon kie parolos samideanoj la lingvon laŭ ĉia ĝia amplekso, kaj kie eble, iom post iom, mi pov-

os akiri guton el tiu riĉa fonto el kiu la spertulo ĉerpas siajn logajn lingvaĵojn.....

Kelkaj sam-oj subtenis min ĉe 3SR per poŝtkarto aŭ letero al la estro, sed eĉ p-karto de anoj de tempo al tempo grave helpus influ kaj favoremigi la estron al ni.

Gratulon ke viaj artikoloj aperis en kelkaj gazetoj. Mi esperas aperigi pli da ili tie ĉi. Ĉu aliaj povus fari tiel en siaj antaŭurbaj gazetoj? Eble The Country Press volonte akceptus tiajn artikolojn.

JOAB ELJOT 2 Cambridge-st., Willoughby, N.S.W., skribas, ke li tre volas adresojn de homoj pretaj ricevi lian gazeton.

"LA FAMILIA RONDO." Ni ricevis leteron de la redaktorino de tiu bona gazeto Angla. Ŝi rimarkigas, ke ni represis en Sept. numero (p.243) pecon supre de la nomo "Pastro W.J.Downes". Ni eltiris ĝin el la supra gazeto sed forĝesis citi la fonton. Ni petas pardonon. F-ino Hylida Mayne daŭrigis: I receive a copy of La Rondo fairly regularly from Edgar Walker---an Australian---who is longing to get back to Australia! I always read it with great interest and profit. I congratulate you on a great piece of work. I know, only too well, the labour involved in the editing of an Esperanto magazine. You and your helper, Miss Bailey, are to be commended for undertaking the task and for so ably carrying it out. All success to you both and to all who help you in any way. I send cordial greetings from my Federation. We hope some future day, when the war is over, to meet some of you at another International Conference. May that happy day come soon.

The year 1943 has been a record one in every way for Esperanto in England (Britain). We have had thousands of new students and our book sales have been abnormal. So we feel greatly encouraged to continue our efforts. We hope that things are going well with you also.

If ever you, or any of your fellow-Esperantists feel inclined to write an article, story, or poem for the pages of La Familia Rondo we shall be delighted to consider it for publication.

With every good wish, Via kunlaborante, HYLIDA MAYNE, "Woodbine Cottage" Tarlton, Cirencester, (Glos.) England.

A. GROENEWEG. Mi forte emfazas ke "A.C.H." estas prava, malaprobante ke en "La A.E.M." propagando estas farita por "Basic E." Se "Tory" malfermus sian matenan gazeton kaj trovus en ĝi leteron en kiu Socialismo estas laŭdata, kion li pensu? Basic English ricevu laŭdon aliloke ol en nia Esperanto-gazeto. Ni ne estas malkuraĝuloj en tio ke ni tenas al niaj principoj aŭ emas malestimi eĉ ignori la pretendojn de niaj kontraŭuloj; ni certe ne bezonas laŭdi iliajn ideojn en nia propra gazeto. Ni ne klopodu esti amikoj kun ĉio (eĉ se ni kredas al frateco), ĉar tio estas malprincipaĵo.

RESPONDO. Ni denove rimarkigas, ke la koncerna gazetraporteto estas neniel laŭda aŭ mallaŭda, sed nur (ni rajtas supoz) sim-

ple fakta. En la sama numero troviĝas du fortaj rebatoj kontraŭ Basic, kiujn la kritikantoj ŝajnas tute ignori. Sanige estus, se aperigo de tia raporto stimulus legantojn al pli pozitiva laboro ol nenioatingaj ŝikanoj.

DUONTAGA EKSKURSO.

En 1913j ., dum mia loĝado en Dorset, okazis duontaga ekskurso de Bournemouth al Cherbourg. Ĉar mi neniam antaŭe estis en fremda lando, mi decidis iri. Nepovante paroli france (malgraŭ multa studado dum multaj jaroj), mi prepare trovis en la Jarlibro la nomon-adreson de la tiea delegito de la U.E.A. Fine mi kunportis malfluidan manĝaĵon por la vojaĝo, esperante, ke tiel mi evitos malmalsanon malgraŭ la fakto, ke en infaneco mi ofte vomis. Ĝis tiam, krom vizito al la Insulo Wight, mi eĉ ne iris surmare.

Frumatene ni ekvojaĝis de la vilaĝo bicikle al la stacio kaj fervoje al Bournemouth kaj fine surŝipiĝis iom ekscitite. Mi aŭdis kunvojaĝantojn diri, ke la maro estas tumulteta, sed ĝi ŝajnis al mi sufiĉe trankvila kaj mi eĉ ne sentis tutvojaĝe la plej etan naŭzon---ĉagrene al kunulo, kiu fiere sed vane atendis similan sukceson. Mi ĝuis la manĝaĵon kaj avide alrigardis al la sudo por ekvidi la nekonatan fremdlandon. Kaj jen, en la plej norda urbo de Normandujo staris vere "normanda" preĝejo kaj tipa marbordhaveno. Ni alvenis!

Unue mi vagis tra la stratoj ĝis mi trovis la poŝtoŝtacion, kaj sen tro da malfacilo havigis al mi 25-centiman poŝtmarkon. Nun la bildovendisto, ĉe kiu mi esperis aĉeti poŝtkarton por surprizi la parencojn. Mi trovis tiam en tabakejo, kie oni akceptis anglajn monerojn kaj eĉ parolis angle kaj vendis p.m. Fakte, jam tie estis iuj el miaj kunvojaĝintoj aĉetantaj. Ĉagrenita sed kontente, mi skribis kaj enpoŝtigis la kartojn kaj tiam iris por serĉi la straton Lafajette, kie loĝis mia estonta amiko. Ne fidante mian paroleblon, mi skribis en poŝtlibro la demandon "Où est la rue Lafajette?" kaj legis ĝin al policano, kiu respondis: ke ni jam estas tie. Tial mi baldaŭ trovis la domon kaj ekkoniĝis kun kuracisto, kiu ĝis tiam ne aŭdis pri mi, nek min atendis. Tio estis mia unua provo de la amikiga povo de la "kara lingvo" (krom perletero) kaj ĝi efikis! Li min akceptis tuj kiel kvazaŭ longeperditan fraton; kaj ni babilis vigle ĝis telefona voko devigis lin foriri al-paciento. Kaj poste ni interŝanĝis leterojn.

-----PASTRO L.LONG.

SPERTOJ en NOVA GVINEO.

by R. J. Stevens

Estis preskaŭ la noktomezo. La luno ne brilis. Densa, nigra nubaro kaŝis la ŝtelojn. Ie, en Aŭstralio, longa vico da soldatoj vagis malrapide el la tendaro, laŭlonge la torda vojeto al la stacidomo. Unu post la alia, la militistoj marŝis peze ŝarĝitaj kaj grumblantaj, laŭ soldata kutimo. Flustrita blasfemo romp

la plendadon, kiam Johano stumblis, piedfrapante arbradikon kaj falante teren kun siaj pakajoj. Sed ne gravas! Oni elektis lin kaj liajn kamaradojn, por speciala, grave sekreta tasko. Post ne longe, ili enŝipiĝos kaj foriros al loko nekonata. La granda eventuro jam komenciĝis. Ili enbrajnis. Nenia vagonara fajfilo sonis por esprimi "Bonan vojaĝon" kiel dum la lasta milito. Ne kuniĝis amikoj aŭ amatoj por flirtigi standardojn kaj krii "Ĝis la revido!" Kiel ŝtelistoj en la nokto, la soldatoj foriris. Sed ili estis la fieraj filoj de la gloraj ANZAKOJ. Ankoraŭ forte batis la koroj de bravaj junuloj, kiuj denove forigos la potencon de malnoblaj malamikoj. Paco por la homaro, libereco, garantio de vivrimedoj kaj feliĉo por ĉiu homo estas la laŭdinda celo. Pasis kelkaj tagoj. "Tero videbla" subite ekkriis maristo. Tuj poste, la krio resonis tra la tuta ŝipo kaj ĉiu soldato streĉis la okulojn por ricevi sian unuan ekrigardon de la lando. Estis la insulo Nova Gvineo. Ofte Johano revis pri vizito al tiu lando; nun la revoj estis realiĝontaj. Kion li vidos? Unue vidiĝis

nur silueto de montaro ĉe la horizonto; baldaŭ la ŝipo eniris belan golfeton kaj kviete naĝis sur trankvila akvo inter altaj montoj riĉe kovritaj per ĉiuspecaj tropikaj kreskaĵoj. Malantaŭ kaduka kajo, staris kelkaj kabanoj kaj miloj da kokosarboj. Ĉe la marbordo, li vidis fremdajn homojn, preskaŭ nudajn. Poste, la soldatoj nomis tiajn brunkolorajn indigenojn "Frizharuloj." Johano rimarkis ke la tero estas koto, kotega! Tiam, li ne sciis kiom da tempo li devos loĝi en la kunesto de kokosoj kaj koto!

Veturiloj portis ilin al tendaro, kiu troviĝis sur koto kampoj. Johano laboris en koto, batalis en koto, marŝis en koto, kaj en ĝi manĝis, dormis sed eĉ ŝercis! Li lernis kiel konstrui al si litaĉon el bastonoj, branĉoj kaj folioj el la ĵangalo. Ĉiutage pluvegis, ĉiunokte ankoraŭ pluvegis! Ŝajnis ke la tuta maro ŝvebis super la loko. Antaŭ ne longe Johano lernis la vorton "Tanani," kiu en la frizharula lingvo signifas "Bonantagon;" tre fiere pro tia lerto, li salutis indigenon per tia vorto. La viro ridetis kaj agrable respondis Angle, je granda ĉagreno de Johano. Multaj indigenoj povis iomete paroli kaj kompreni la Anglan lingvon; kelkaj estas tre lertaj, kaj parolante kaj skribe. La Frizharuloj estis tre amikemaj kaj helpemaj. Ili laboris je transportado de armiloj kaj provizaĵoj, konstruado de stratoj kaj kabanoj.

Iam, la oficiro elektis Johanon kaj tri aliajn soldatojn por speciala tasko, kaj diris: "Starigu antaŭan postenon ĉe la supro de tiu monteto, de kiu vi povos rigardi la tutan golfeton; jen boateto por la veturado al marbordaj vilaĝoj je la montbazo. Starigu komunikadon per radio aparato antaŭ la sunleviĝo." Kiam Johano alvenis ĉe la vilaĝo, indigenoj ne ĉeestis; do la kvar soldatoj komencis suprenporti la provizaĵojn, armilojn, radioaparaton k.t.p. post nur kelkaj minutoj, ili jam spiregis kaj ŝvitegis, ĉar la ŝarĝo estis peza, la vojeto kruta kaj la temperaturo tre alta; la atmosfero estis malseka kaj vaporeca. Ŝajnis al ili ke ili ne povos fini la taskon ĝustatempe. Tiam anĝelo aperis, laŭ la formo de Frizharulo! "Se vi helpos nin, mi vin donacos maĉtabakon," diris Johano. La nigra anĝelo rigardis la soldatojn

kaj la pakajojn, tiam, ridante, li respondis: "Mi helpos; mi havigos pliajn homojn." Laŭte li vokis, laŭ stranga lingvo, kaj baldaŭ aperis dekkvin Frizharulojn. Ili interbabiladis iomete kaj tuj poste, komencis suprenporti la tutan pakajaron. Post ne longe ili finis la portadon kaj ricevis la promisititan pagon. Baldaŭ Johano starigis la postenon, funkciigis la radio-aparaton kaj sendis la atendatan komunikaĵon al sia oficiro. Poste la Frizharuloj kolektis trunketojn, interplektis foliojn, kaj per tiuj materialoj ili konstruis bonan sekan kabanon kun bambua planko.

Unu tagon, baldaŭ post la alveno, Johano ricevis informon de flugmaŝina gvidisto, disaŭdige; li sciigis ke granda militŝiparo Japana estis alproksimiĝanta la golfeton. Johano tuj informis sian oficiro, kiu preparis ruzan kaptilon por la malamikoj. Li aspektis ke la Japanoj ataku la aviadilejon; do, li aranĝis siajn soldatojn laŭ la flanko de la grundo plej malproksima al la marbordo. La etendaĵo inter ili kaj la maro estis tute ne defendata. Je la deka horo vespere, la silento estis subite rompata per surdiga bruego de multaj pafilegoj. La Japanaj militŝipoj bombardis la marbordon. Tuj poste, sentoj da malamikoj atakis, sed la Aŭstralianoj kaŝitaj malantaŭ la aviadilejo, eksplodis eĉ ne unu pafilo. La Japanoj ne konis la forton de la kaŝita roto kaj estis tre aplombaj pro antaŭaj venkoj aliloke. Tie ĉi ni estis pretaj kaj sufiĉe fortaj. Kun terura bruego la Japanoj atakis, pensante ke tio timigus nin. Ili ne trovis Aŭstralianojn je la mara flanko de la aviadilo, nek sur la ebenaĵo mem. Ili opiniis, ke la defendantoj jam forkuris pro timo. Fieraj, kaj ĉoĉe bruaj, ili tiam marŝis, roton post roto, trans la ebenaĵon. Kiom la Aŭstralianoj sopiris por premi la ĉanojn de la pafiloj! Subite la antaŭaranĝita signalo aperis kaj tuj poste, ĉiuj pafiloj sprucis kuglojn sur la Japanojn. Ili haltis momente pro granda surprizo kaj tuj forkuris pro pli granda timo. Sed multaj falis antaŭ ol ili ekkomprenis la okazintaĵon, kaj malmultaj atingis la militŝipon. La ruzo sukcesis.

Aliaj nokton, la oficiro sendis patrolon per motorboato, por akiri informojn pri la malamiko sur apuda insuleto. Johano estis la patrolon. Revenante ili renkontis japanan militŝipon, kiu pafis kaj trafis la boateton; tiu ĉi disrompiĝis kaj preskaŭ tuj subakviĝis. Johano, spite de vundoj, naĝis al la marbordo, kie amikaj Frizharuloj trovis lin, tutlacigitan, je la mateno. Sed liaj kamaradoj neniam plu aperis! Post mango kaj trinko la indiĝenoj donis al li, kiel malliberulon, Japanon, kiun ili antaŭe kaptis. Tial, Johano revenis al sia roto kun la malliberulo, kaj kiam fine ili atingis la postenon, post longa marŝado, kaj kaptis into kaj kaptito falis teren pro malforteco.

Malario atakis Johanon, sed li baldaŭ resaniĝis kaj denove iris al sia posteno sur la monto, ĉar li ankoraŭ volas plue batali por rapidigi la alvenon de la paco al la tuta mondo.

 Feuchtersleben. La tuta sekreto, plilongigi sian vivon konsistas en la ĵeno: ne malplilongigi ĝin.

LETERO al la REDAKTORO. (malfrue ricevita) de S-ro HANKS.

Mi aŭdis ke kelkaj anoj ne ŝatas poezion en nia gazeto. Mi mem ŝatas vidi ĝin tie kaj kredas ke plibonigas la nivelon havi bonajn, ĉu originalajn ĉu tradukitajn. Tre plaĉas al mi legi bonan tradukon de "My Country" (Dorothea Mackellar); "Where the Pelican Builds Her Nest" (Mary Hannay Foote) kaj aliaj Aŭstraliaj verkoj. Jen komenco por estonta Aŭstralia antologio. Mi volonte donus premion se vi trovas la ideon taŭga.

Resp. de la Red. Ni tre dankas al la bonkora Sinjoro. Ni lasas la decidon al la ĝenerala voĉo de la legantaro.

B.E.A. Exam. Successes:

DIPLOMA. F-ino L.E.BAILEY (With Distinction) Adelaide, S.Aus.
S-ro R.F.STEPHENS, Leederville, W.Aus.

ELEMENTARY. D-ro A.EINIHOVICI (With Distinction) Corrigin, W.Aus.
S-ino I.EINIHOVICI.
F-ino E.CHANDLER, Perth, W.Aus.
F-ino R.TELFER, Adelaide, S.Aus.

Mr. WILLIAM GALLACHER, M.P. in the House of Commons urged Mr. Churchill to "ensure that when Basic English is being taught the clear Scots pronunciation should be used, and thereby avoid the "fluctuating and irritating noises generally made by the English...". The chances of Basic English can perhaps be best expressed in that famous saying: "Never in the story of Democracy will so few be fooled by so many efforts to make so much ado about so little."
("Per Unu Voĉo", Sud-Afriko)

KIAM HENRY FORD unue ekvidis koloran mapon de kvindek ĉefaj vivantaj lingvoj, li rimarkis: Do la plej granda bezono de nia tempo estas ankoraŭ 49 mortintaj lingvoj.

THE
A U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y .

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Vol 4, No.10, *July*, 194*4*



EDITED BY
F.R.BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSENDON W5., VIC.

LA AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

- o -

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

KIAL LI IRIS ALILANDEN. de C.W.BALLARD.

Frue en la lasta jarcento du junuloj, Henriko Fleming kaj Rikardo Widehope, decidis kunigi siajn kapablojn kaj monhavojn por fabrikadi tapiŝojn en la urbo Fancourt. Post kvindek jaroj iliaj tapiŝoj estis bone konataj tra ĉi tuta Anglujo kaj eksterlande, en Eŭropo kaj en kolonioj de Britujo. Tial la firmo, jam tre riĉa kaj potenca, akiris la admiron de la loĝantoj de Fancourt. Arturo Fleming, el la tria generacio, estis unu el la plej amataj inter la lokaj junuloj. Ĉe dancaranĝoj li kompreneble havis sidlokon sur komitato kaj, rilate al kriketo, post lia Oksforda kurso li ĉiam estis inter tiuj, kiuj ludis por sia urbo.

Subite malaperis el la societaj rondoj tiu ĉi eminentulo inter la junuloj de Fancourt. Demandite, la patro seke diris, ke li iris eksterlanden. Lia malapero kaŭzis sensacion dum nelonga tempo; poste ĝi forpaliĝis el ĉia memoro.

.....

La urbon Christchurch, en Nov-Zelando, oni priskribis kiel simila al Angla urbo. Oni atribuas tion al la klopodoj de la Nov-Zelanda Akci-Kompanio Primigrula kaj al la aktiva intereso de la Ŝtateklezio. Miaj gepatroj dum multaj jaroj loĝis proksime al Fancourt, kaj kiam mia patro, Johano Gledhill, decidis en 1879 migri al Nov-Zelando li trovis alian sidlokon en Christchurch por si kun edzino kaj mi kaj la pli juna fratinetto.

Kiam mi estis tre juna, mi observis la Anglan alaŭdon, la leporon kaj, kun infana ĝojo, la ranunkolojn kaj lekantetojn en herbejo ĉe angulo de la rivero Avon. Kiam mi iomete pliaĝis mi tre miris trovi, ke en malpli ol tridek jaroj oni konstruis tre belegan katedralon, laŭ desegno de Sir Gilbert Scott, kun tre alta turo de kia mi aŭdis la inspiran sonon de Angla sonorilaro. La muzeo, la Universitato, la Provinca Kunvenejo, unu granda lernejo kaj unu-du pontoj trans la Avon, ĉiuj estis konstruitaj el masonita ŝtono. Ankaŭ estis la unua fervojo en Nov-Zelando, tiu de Christchurch ĝis Lyttelton, kies dumejla tunelo trairis la Port-

montetojn.

Foje lernejknaboj, dum ferioj, ĝuis plezuran ekskurson. Ekzemple, ni iris tra Bingsland, kie ni vidis kuniklojn kaj leperojn, kaj aŭdis elĉefe la ravan kanton de alaŭdoj. Aŭ ni pli malproksimen marŝis norde ĝis la marbordo, kiam pliaĝa kunulo parigis "Redshanks" (vadula birdo, samgranda kiel kolombo, kun ruĝaj kruroj kaj bluetaj plumoj) kaj "Caw Caws" (speco de papago). La viandon de ambaŭ birdoj la patrinoj metis en bongustajn pasteĉojn.

Kiel vi poste vidos, mi devas menci la piedircon trans la montetoj Cashmere. Tiuj ĉi sidas proksime du mejlojn sude de Christchurch. Eble ili ricevis la nomon fare de Sir Cracroft Wilson, kiu iam deĵoris en Cashmere, venis el Hindujo kaj aĉetis tercon, kiu etendis sin sur partoj de la montetoj. Sir Cracroft havis Hindajn servistojn, kiuj, kondukante kaleŝon tiratan de muloj, faris frapan impreson al la civitanoj de la urbo.

Piedirante trans la montetoj eble ses mejlojn, ni alvenis golfeton "Pigeon Bay" (Kolomba Golfeto). Ne malproksime de la vilaĝeto estas Maoria "pah" (indiĝena loĝloko). La ĉefa okupo de tiuj indiĝenoj estas kolektadi ostrojn, kiujn ili vendas ĉe Lyttelton. Leĝanta kun ili estis blanka homo, kiun oni nomis "Old Arty Fleming" (maljuna Arturo Fleming).

.

Du-tri jaroj pasis, en kiu mi legis la librojn de mia mortinta avo. Mi rave sekvis la romanon historion de la verkoj de Scott, Dickens, Dumas, Jen la patro diris, ke nun mi efektive sufiĉe maturiĝis por trovi komercan okupon. Bonŝance mi ricevis oficon de komizbubo en konata negocista firmo. Iam ĝi sendis min al banko por aĉeti bankan traton. En ties vestiblo mi vidis forirantan Maljunan Arturon Fleming. Li estis pli ĉifoniĝinta ol kiam mi unue lin vidis; en la manoj li tenis retan portsakon en kiu Ĥusis ostroj. Mi pensis, ke li jam vizitis la bankon por peni vendi ilin. Post la mendo de latrato, la komizo, kiu estis unu el miaj lernejaĵkunuloj, diris al mi: "Ĉu vi vidis la romacon el Pigeon Bay?" "Jes, mi renkontis lin kiam mi eniris. Ĉu li intencis vendi ostrojn tie ĉi?" "Ho ne. Li estas 'remittance man' (persono, plej ofte malfortkarakterata, kiu regule ricevas subtenmonon de parencoj en Britujo). Ni vidas lin de fojojn ĉiujare." "Kompatindulo. Mi esperas, ke li nun aĉetos decan vestaron. Ĉis revido, Fredĉjo!"

.

Vintro estas malvarmega; do, vespere mi ofte restis en la domo kaj penis relegi la preferitajn librojn postlasitajn de mia avo. Esplorante la titolojn, mi trovis unu kun vorto "Taglibro". Tuj mamenmaris, ke mi ne legis ĝin, ĉar mi pensis, ke ne multe min interesus la enhavo, kiun mi supozis esti trivialaj rakontetoj pri kiuj mi havis nenian aŭ preskaŭ nenian scion. Foliumente la lib-

ron, tamen, mi ekvidis la nomon "Fleming", kaj la sekvantan mi legis:

"Dum monato mi neniam vidis Arturon Fleming. Famo diras, ke troa drinkado ĉe la urba Klubo dum bilardo kaj ludkartoj emigis al kartludantoj riski por iom granda monsumo. Ĉe la fina kartludo juna Fleming trovis, ke liaj ŝuldatestoj atingis jam kolosan sumon. Li ne povis pagi el propra poŝo. Petado al la patro fine rezultigis pagon de liaj ŝuldoj pro honoro, sed sub la nepra Kondiĉo, ke li senprokraste foriros el Anglujo, kaj sen adiaŭoj. Oni diras, ke li iris al Nov-Zelando."

Jes, Mi kredas, ke mi lin vidis tie.

INTERTEMPO SUR LA MONTETOJ. de C.J.CALDERA.

Estas memoro de junaj jaroj, kiu perdiĝas en nebuleco kaj samtempe revivigas al mi tre agrablan imagon de mallonga libertempo, inter kampoj de belegaj kaj bonodoraj diantoj, sur la montetoj de Koldirodi, vilaĝeto kiu situas en la parto de la golfo de Genovo, pli proksime limiĝanta al la franca teritorio.

Dum terurege malvarma vintro, mi infektiĝis per gripo, kun pneŭmonia komplikaĵo, kaj post resaniĝo, la kuracisto forsendis min de la urbo, en kiu mi loĝis, por fortikiganta libertempo al la Ĝenova golfo, kie, eĉ vintre, la vetero estas milda pro la favora influo de varmetaj marfluoj, vonantaj el la suda parto de la Mezmara.

Mia patrino luprenis domon, situantan en la mezo de oranga ĝardeno, apud la marborda sabiaĵo. De tie vidiĝis la mirinda panoramo de la maro kaj la ritma frapetado de la ondoj, rompiĝantaj sur la sablaĵon; tio agadis sur la streĉitaj homaj nervoj kvazaŭ dormigilo.

Unu tagon, kiam mi estis ĝuanta la ravan maran vidaĵon, kuŝanta sur kanseĝo, aŭdiĝis, el interne, fremda vira voĉo; post kelkaj sekundoj, la parolinto aperis tra la pordo kun mia patrino kaj salutis min nome. Altkreska, larĝŝultra, blondhara viro stariis miaflanke; unuavide, mi ne rekonis lin, sed kiam li afable sidigis sin sur la kankuŝejo apud mi, subite revenis al mia memoro la imago de simila junulo, kun kiu mi ludis antaŭ kelkaj jaroj. Sendube li estis la sama persono! Dek jaroj pasiĝis de post la lasta renkonto. La natura sinretiremezo de junago faris min silentema, sed lia afableco kaj interesigo por mia sanstato gajnis rapide mian konfidon; post duono de horo ni jam fariĝis amikoj kaj subite, turnante sin al la patrino, li petis ke ŝi permesu ke mi iru kun li al la vilaĝo sur la montetoj, kie li loĝas, dum unu tago. Li estis al mi kuŝo kaj praktikis la kuracistan arton en la vilaĝo Koldirodi. Lia bona parolado pri la sanfavora influo de la klimato de la montetoj persvadis mian patrinon, kaj antaŭ ol mi havis tempon por pensi pri la afero, oni enmetis mian valizeton inter la faldojn de la kaleŝkovrilo, kaj mi mem sentis

min suprenlevata de paro da fortaj brakoj, sur la sidejon de la malnovmoda veturilo, flanke de la kuzo. Kiam mi adiaŭis, kraketo de la vipo ekkuretigis la ĉevaleton, kiu komencis troti tra la palmornamitaj stratoj de "Bordighera". Sur la trotuaroj kaj promenadoj amaso da personoj marŝadis, vestitaj laŭ la plej malsamaj manieroj. Dum la vintro en tiuj jaroj, kunvenis sur la Liguran marbordon loĝantoj de ĉiuj malvarmklimataj nacioj de Eŭropo, kaj precipe Angloj, Germanoj, Francoj, Rusoj, k.t.p. Ekster la lokaj loĝantoj tre malmultaj italoj iris, vintre, ĉe la marbordo. Prezentu al vi la multkolorajn, diversformajn, diversnaciajn vestaĵojn rimarkeblaj ĉe tiu promenadejoj!

Tiaj spektakloj, intereseĝaj por virinoj, ne tre allogis min, junulo. Mi pli multe admiris la naturajn belecojn kiuj ne mankis sur tero, sur akvo kaj subĉiele. Transirante la urbon, ni devojiris dekstren, tra kampara vojeto, kiu suprengrimpis, serpentumante, inter centjaraĝaj olivarboj kies branĉoj, turniĝantaj en la plej strangaj manieroj, aspektis al mi kiel brakoj, de gigantoj, kiuj malaltigis sin por kapti min en la veturilo. Iafoje frapetis mian vizagon nigra olivo, pendantsanta el branĉeto, preta por kolektiĝo. La irado en la olivarbaro okupis ĉirkaŭ unu horon; la vojeto ĉiam grimpadis, kaj tie kaj aliloke, libera spaco permesis al mi la admiradon de la pejzaĝo, kiu fariĝis pli kaj pli ĉarma. Kiam ni atingis la pinton de la monteto, mirinda plezurvido atendis min; la ebena supraĵo etendiĝis ĉirkaŭ unu mejlon kaj kampoj de diverskoloraj dianoj kovris ĝin; ĝi estis kiel magia, giganta arlekena vesto, kovranta la teron per pecetoj flavaj, ruĝaj, rozkoloraj, blankaj, puncaj, kaj kiam la vespera venteto ekblovetis, tiu amaso da koloroj ekondetis gracie, kaj tre delikata dia perfumo trapenetris miajn naztruojn aliĝante min, pro admiro kaj netaksebla plezuro, en vera statuo. Mi tute ne povis paroli kiam mi ekrigardegis, ekstaze; fine, satigante la okulojn per tiu mirinda vidaĵo, mi turnis min en la direkto de la maro, ~~moviĝantaj tien kaj reen, sur la sablaĵo.~~ La ĵus lumig/itaj elektraj lampgloboj sur la avenuoj iom briletis kaj ŝajnis briliantojn enteksitajn proksime de la fringo de la monteta verdkovrilo.

Mi sentis la monon de mia kuzo afable prenante min ĉe la brako kaj lia klara voĉo diranta: "Ankaŭ mi sentis la saman mutan admiron kiam mi alvenis ĉi tie; la pejzaĝo estas tiel bela, ke eĉ la bestoj ĝuas ĝin. Sed niaj kompatindaj kamparanoj, kiuj devas kreskigi ĉi tiujn florojn por la plezuro de la riĉuloj, kaj kurbiĝas longajn horojn sarkante, elfosante k.t.p. fariĝas eĉ pli lacaj ol la bestoj kaj, fininte la laboron, ili nur volas rapidi hejmen por manĝi kaj enlitiĝi; la tempo mankas al ili por ĝui la belecon de la panoramo, kaj la troa laceco faras ilin nesentemaj al la allogo de la naturaj mirindaĵoj. La perfumo de la floroj ne povas fortevenki la malbonodoron de la ŝvitantaj korpoj; ilia nazo nur perceptas tian malŝatindan odoraĉon, kaj ĉar ili ne posedas taŭgan bankuvon en la dometaĉo, ne povas bone purigi sin post la laborado, kaj la malbenita odoraĉo trapenetas iliajn vestojn kaj sekvas ilin ĉie, kiel la malbeno de malriĉeco."

Unuafoje en mia vivo mi estis aŭdanta tian detalan priskribadon

de la homa mizero,, kaj la parolanto faris ĝin tiel senteme, ke ĝi faris sur mia koro profundan impreson. Mi bone sciis kiom da mizeruloj ekzistis en la "lando de floroj kaj kantoj" sed neniam mi komprenis antaŭe, kiamaniere la mizero kaj laceco povas influ, malpermesante al la viktimoj la gaudon de naturaĵ plezuroj, kiujn ni opinias ĝueblaj de ĉiuj. Sed post plua pensado, mi tute konsentis kun la filozofiema kuracisto, kaj mi mem, dum mi servis en la granda milito, faris sperton tute similan. Brako ĉe brako, ni formariĝis de tiu sorĉema loko al la vilaĝo, kaŝita en densejo de junaj olivarboj, enlande, ĉirkaŭ ducent metrojn malproksime. Li akompanis min al sia dometo, unu eta, ŝtonkonstruita, kies fasado estis el rozkolora stuko. Li estis fraŭlo kaj dungis maljunan kamparaninon kiel servistinon. De malgranda enirejo ni paŝis en mangoĉambron, en kies mezo estis tablo, kovrita per blanka tuko kaj mangilaroj, preta por la vespermango. Post rapida purigado ni sidiĝis ĉe la tablo kaj la servistino alportis, envice, supon, bolitan kokidaĵon, rostitajn vegetaĵojn, fromaĝon kaj fruktojn; la mango finiĝis kun glaseto da preskaŭ senalkohola ruĝeta vino, kiu faris mian gastiganton pli parolema ol antaŭe. Evidente, mankis al li taŭga kunularo por konversado en tiu izolita vilaĝeto, kaj li profitis sian ŝancon! Dum la vespero mi ne eblis paroli ĉar li neniam sin interrompis en la unuflanka konversado. Li rakontis al mi la kialon de la alveno en ĉi tiu vilaĝeto. Post kiam li diplomigis kiel kuracisto, li intencis resti ĉe la Universitato kiel asistanto, sed iu onklo, ekskolonelo, kiu malamis lin pro politika malkonsento, baris al li la vojon, sciigante la aŭtoritatojn pri la ideoj de la nevo. Fakte, la junulo guis la legadon de politikaj kaj ekonomiaj verkoj, kaj okaze esprimis admiron pri la teorioj de Marx; tio estis sufiĉa kialo por la malamo de la onklo. De tiam, li decidis forvojaĝi de la urbo, kaj akceptis ĉi tiun kuracistan oficon en la kamparo. La loko estis belega sed senespera rilate al la kariero. Li ne gajnis sufiĉe por savi la necesan monon kiu ebligus al li reiradon al iu Universitato por perfektigi sian edukadon. Krome, li havis tro senteman koron, kaj kiam li vidis senmonajn malsanulojn, kiuj ne povis sekvi liajn konsilojn pri kuracado pro manko de mono, li ne povis eviti helpi ilin finance, ankaŭ se tiu agado malproksimigis la eblecon de pliboniĝo de lia kariero. Li konfesis al mi ke li neniam en la vivo malamis homojn, sed la malhonesta persekutado de la onklo, nur pro malsameco de ideoj pri homa socio, tre amarigis al li la sentojn.

De kiam li alvenis al la vilaĝo, li klarigis al la kamparanoj la socialismajn principojn; li helpis ilin starigi kooperan societon, kiu tre plibonigis la vivnormon de la kamparanoj, ĉar tiamaniere ili aĉetas la komercaĵojn pogrande kaj ŝparas elstaran procentan. Pro tio la riĉaj komercistoj kontraŭstaras lin kaj penas fari al li la vivon nevivinda.

Kiam li finis sian verakonton, li ekleviis la ŝultrojn kaj subite deklamis al mi la poemon de "Carducci"---"La taksistoj", kiun la itala poeto verkis, prenante la ideon el "Zeitgedichte" de H. Heine. Mi neniam antaŭe auskultis al la deklamo de tiu poemo; li elparolis ĝin kun tiom da varmece kaj sento, ke ĝi profunde impres-

ĉiŝis en mia animo. Ankoraŭ nun, kiam mi relegas tiujn versaĵojn, mi retravivas tiun epizodon de mia vivo.

Mi pasigis la nokton en malgranda ĥitĉambro, kaj la sekvantan matenon mia kuzo reveturigis min hejmen. Pripensinte la okazintaĵojn en silenta ripozo mi devis konsenti, ke la mallonga kunesto kun tiu lerta kaj kuraĝa batalanto malfermis al mi novajn limojn de pensado. Ĝi devigis min mediti pri la mondaj aferoj, ne nur laŭ la limigita vidpunkto de persona kariero, profito, aŭ familia utilo, sed laŭ pli alta, pli morala, pli ĝusta vidpunkto: persona kaj homara intermiksitaĵ; ĝi devigis min pensadi pri la mizero, la malsato, la malsano kaj la malvirto, kiuj subpremas, pereigas, prodegenero, tiom da homoj, kaj ankaŭ mi devas konsenti, ke la frua disvolviĝo de tiaj pensoj helpis min elekti karieron, kiu ofte donis al mi la plezuran eblecon malpezigi la suferojn de la homaro.

NENIAM ESTAS TRO MALFRUE POR LERNI.

Laŭ Longfellow tradukis F.R.BANHAM

Kun okdek jaroj peze sur la korpo,
 Katono (1) glora Grekan lingvon lernis;
 Je same granda aĝo la "Edipon" (2)
 Sofoklo per la Majstra menso tornis;
 Kaduka jam, konkurse Simonido (3)
 Premion poezian gajn-baraktis;
 En aĝo naŭdekjara Teofrasto (4)
 "La Homajn Karakterojn" verke traktis;
 Ĉaŭcero, la belkanta, sesdekjare
 "Rakontojn Kantaburajn" fin-kreadis (5).
 Ĉe urbo Vajmar okdekjara Gete
 En "Faŭston" la eternon enspiradis (6).
 Ĉu do ni nin sidigu senfarade
 Kun plendo: "Nokto venas, tago pasis"?

Ho ne! Ankoraŭ taskoj laŭkapablaj
 Al maljunuloj foje sin allasis!
 Kaj dum la lum' vespera formortiĝas,
 La steloj (for tagtempe) brilfortiĝas.

(1) Latine: Cato. (2) OEdipus. (3) Simonides (floris 538 A.K.) ĉisvivis la 90-an aĝaron. (4) Theophrastus. Lempriere asertis ke li komencis la "Karakterojn" en sia 99-a jaro, kaj mortis 107-jare, priplorante la mallongecon de l' vivo. (5) Tio ŝajnas tre dubinda; la naskdato de Chaucer ne estas certa. (6) Jes, la duan parton; la unua aperis en lia 59-a jaro.

EPIKTET: La kontenteco ne bazas sur granda riĉhavo, sed sur ne multaj bezonoj.

ENIGMOJ. de IOM.

(N.) INDIKAS VORTON KUN GRAMATIKA FINIĜO.

1. KVADRATO. (1) Siropa restaĵo. (2) Ekzistas interne (3) Besto (4) Grava societo.
2. GRANDIĜA VORTO. Mi estas sufikso; aldonu kapon, mi movas boton; aldonu kapon, mi aplikas forton sur ion; aldonu voston, mi estas rekompenco; aldonu voston, mi estas kondiĉo aŭ bazo.
3. DU-VORTO. Havanta palporganojn, mi estas deviga restado en aparta loko pro malsano.
4. DUOBLA AKROSTIKO. Mia unua vico estas dolĉa bakaĵo. Mia lasta vico estas loko kie troviĝas granda aro da domoj. Mia tuto estas vegetaĵo kiu produktas manĝeblan frukton.

HELPILOJ. 1. Esti interkonforma kun. 2. Vundo de histo. 3. Biblia supernatura estaĵo.

5. AD SSSS
AD SSSS

6. KOLEKTA VERKO Antaŭmetu du literojn al ĉiuj subaj vortoj por fari kvinliterajn vortojn. La novaj literoj sinsekve formas kolekta verkon:- EST PER MAT PAR TOL.

(Solvoj sur p. 144.)

ASOCIAJ AFEROJ.

EKZAMENOJ. Denove ni memorigas membrojn pri la ebleco konfirmi la studon partoprenante la ekzamenojn de B.E.A. Ĉiu, kiu volas tion fari skribu rekte al la A.E.A. Komisiito por Ekzamenoj, Pastro C.C. Cowling, St. Mary's, TAS. Por studentoj, kiuj volas studi per korespondo al la grado de la Diploma Ekzameno, ni povas importi de Anglujo "Standard Advanced Correspondence Course." Mendu rekte ĉe la Sekretario (Adreso ĉi sube)---Kosto 30/-

KORESPONDA KURSO. Ni jam havas en Aŭstralio ekzemplerojn de la "Popular Correspondence Course." Grupoj kaj Individuoj, kiuj volas uzi ĝin, skribu rekte al S-ro F.PITT, c/o Mentone Grammar School, Mentone, (Vic), kiu aranĝas instruanton en via propra ŝtato---la kurso estas por komencantoj kaj kostas 8/6.

PROPAGANDO. Ni petas ĉiun Grupon kaj individuon sendi raporton pri efektivigita propagando al la ĉefpropagandista komitato, c/o S-ro S.WANMER, (Qld). Ĉiam nepre faru tion, por ke tiu komitato plene sciigu pri propagandaj metodoj kaj rezultoj en ĉiu landparto.

GRATULON. Al la Esp-istoj en W.A., kiuj jam unuigis en unu granda grupo. Sendube aferoj tie ĉi pli rapide progresos nun. Tre

laŭdinda estas ilia propagando uzanta cirkulerojn. 5000 jam disdoniĝis, plia 5000 baldaŭ estos pretaj. 1000 librossigniloj ankaŭ disdoniĝas per librovendisto.

SEKRETARIA ADRESO. Bonvolu daŭre uzi la provizoran adreson ĉi sube. La sekretario sin movas de Urbo al urbo sed tiu adreso ĉiam trovos lin.

G.H.HILLERMAN (Sekretario)

c/o 184 The Boulevarde, Strathfield, N.S.W.

KASO de la A.E.M.

KVITANCOJ ricevitaĵoj ĝis 16 Junio, S-ro Hearne 5/-, S-ro J.Stevenson 5/-, S-ino A.C.Hintze 5/-, S-ro Rawson. 5/-, S-ino H.Davies 3/-, S-ro O.Davies 5/-, Ges-roj Hanks 6/6, S-ino Stope (2 jaroj) 7/-, S-ro Cowly 5/-, £2-6-6.
Al A.E.A. 9/-. En la Gazeta Kaso 2-0-8.

W.ADDIS, 25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide, S.Aus.

WE MUCH REGRET that the name of the author of the sketch "SPERTOJ en NOVA GVINEO" was omitted in our last number. This sketch was written by R.F.STEPHENS.

MORTO de R.H.GEOGHEGAN, Pioniro. Turnu vin al La Rondo, Marto 1943, p. 252, kaj legu liniojn de tiu treege malnova Irlanda Espisto. Nun ni devas sciigi, ke li mortis en Alasko 27 Oktobro 1943 je aĝo 77. Li korespondis kun Zamenhof en la jaro mem de la apero de Esp-o (1887), kaj verŝajne estis la unua Anglalingvano kiu lernis la lingvon. Li kompilis la unuan fidindan lernlibron por Angleparolaj landoj. Studis ĉe Oksfordo, tre vastekona lingvisto. Post 1891 li iris Alaskon, tie studis la Aleŭtan idiomon rilate kun la Usona Enlanda Dep. Per brulego en 1904 li perdis ĉiujn leterojn de Zamenhof kaj aliaj amikoj, ankaŭ kolekton da ĉiu libro kaj gazeto ĝis tiam aperinta en Esp-o. Ĝis la lasta spiro li konservis intereson por Esp-o. Forpasis mirinda homo.

QUEENSLAND. La jarkunveno de la Societo unuanime elektis S-ron J.McDonald prez-o, S-rojn H.N.Love kaj T.Suess viprez-oj kaj reelektis F-inojn E.B.Carrick kaj Rose McPherson hon. sek-lino kaj kasistino respektive. La jarraporto montris ke la Societa agado estis tre interesiga kaj riĉe donis felicajn prezentadojn ekster la kutimaj lecionoj. La eksprez-o (S-ro Clem Kidd) bele regalas alestantojn per koloraj filmoj. Ankoraŭ unu interesan programeron

provizis S-ro Sues, kiu iam korespondis kun ĉirkaŭ kvindek sam-ideanoj en multaj landoj. La parolanto rakontis kelke da instruaj kaj amuzaj historietoj kaj montris poŝtkartojn ricevitajn el transmaroj. La demonstracio klare pruvis ke diligenta Esp-isto havas la tutan mondon sur la manplato.

Inter vizitantoj al la kunveno estis S-inoj J.W.Langtree Bundaberg, kaj J.A.Chandler, el Taragoola en regiono Port Curtis. S-ino Langtree en Brisbane faris bonegan propagandojn. Ŝi skribis al la Guberniestrino (Lady Wilson) kaj ŝia eminenta gasto (S-ino A. Grenfell, el Anglujo, monda prez-ino de la Junvirina Kristanasocio), kiuj vizitis Kvinlandon. S-ino Langtree en sia letero pledis la pretendojn de Esp-o kiel senmutigilo ĉe la virinorganizoj de la mondo.

S.WANMER.

WESTERN AUSTRALIAN ESPERANTO LEAGUE.

LETERO al la REDAKTORO. Laŭ la ordono de mia Prezidanto, S-ro I. Masel, mi havas plezuron komuniki al vi, ke je la 25a de la pasinta Majo, okazis la unuiĝo de la Western Australian Esper. Society kun nia Ligo. La okcidentaŭstralia Esperantistaro, nuntempe, denove kunlaboras kaj nin esperas, ke la progreso de la movado en ĉi tiu Ŝtato, en la estonteco, estu ankaŭ pli rapida ol kiu ĝi estis dum la pasinta jaro.

C.CALDERA.

SOLVOJ de la ENIGMOJ. 1. KVADRATO. MELAS ENEST LEPOR ASOCI STRIG
 2. GRANDIGA VORTO. EM REM PREM PREMI PREMIS.
 3. DU-VORTO. KVAR-ANTEN. KVARANTEN.
 4. DUOBLA AKROSTIKO. KUK. URB. KUKURB. 1. KongrU 2. Ulcer
 3. KeruB.
 5. PAR AD, OK S, PARADOKS.
 6. KOLEKTA VERKO. KR-EST ES-PER TO-MAT MA-PAR TI-TOL
 KRESTOMATI.

ERAROJ en nia LASTA NUMERO. p 125/4 de mals. monon (ne nomon)
 127/16 propagando. 134/4 Vidu apartan noton pri Ĉioscia &c.
 134/4 Tre plaĉus al mi....

LINGVAJ NOTOJ.

"Elder children." P.S. en S. Certe ne traduku tiun per "pli maljunaj infanoj." Ĉu vi intencas komprenigi, ke la unue menciitaj infanoj estas "maljunaj?" Kaj tiuj ĉi eĉ pli maljunaj? Facila eraro. Legu anstataŭe: "malpli junaj infanoj." His elder sister

aged four years,....(lia malpli juna fratineteto,....) Ĉe anoncoj pri geedziĝoj en kiuj trovas sin la Angla "eldest daughter" oni ĝentile tradukas per "plej aĝa" aŭ "unuenaskita" (se tio estas vera); tute ne per "plej maljuna".

"Ĉio(n)pova" k.t.p. En tiaj kunmetaĵoj Zamenhof foje uzis la mezan "n", foje ne. Eliro 30/10 ĉiopardonan; 1 Sam. 2/3 ĉioscianta; 2 Kron. 2/12 ĉiokomprenan; sed Sentencoj de Salomono 3/20 ĉionsciado. Vidu Millidge sub "ĉio" kaj "nenio", ankaŭ Plena Vortaro. Kofman, en sia traduko de Iliado (1895-7) uzis "ponardegojnjetistoj". Komparu la Zamenhofan "librojrimeno" (strap for books, Rabistoj 16).

BARAKTI, LUKTI, BATALI. Barakti signifas "forte akui la membrojn, luktante por sin liberigi". Ĝi havas ankaŭ figuran senco de "forte penati eligi sin el malfacilaĵoj k.t.p." Lukti sig. (1) korpe batali kontraŭ iu; (2) peni, klopodi por venki malhelpon aŭ atingi malfacilan rezultaton; kaj (3) la Angla "to wrestle" (sporto). Batali: peni por venki atake aŭ defendi; peni por superi kontraŭaĵon: ataki aŭ defendi per spiritaĵoj armiloj. (laŭ peto de A.T.)

Pri CERTA: Zamenhof en "Lingvaj Respondoj" skribis "Krom sia ĉefa senco, la vorto "certa" havas la sencon de "iu" (ne en la senco de "kiu ajn", sed en la senco de "iu difinita"); la uzado de "certa" en la senco de "iu" tute ne estas franclingvaĵo, ĉar tiel same oni uzas tiun vorton en la lingvoj germana, rusa, pola kaj aliaj.

Sed la Plena Vortaro SAT avertas: Pli bone estas en tiu senco (3. Difinebla sed ne difinita, ĉar oni ne volas aŭ ne bezonas difini) uzi IU, IA aŭ KELKA, IOMA, por eviti konfuzon kun la sencoj kaj 2 (Nedubanta; Nedubebla).

Serĉu en via Esperanto-Biblio sub "certain" (per Konkordanco), kaj legu inter aliaj: iuj viaj poetoj (Agoj 17/28); ia timoplena atendo (Heb. 10/27); Li difinis iun tagon (Heb. 4/7); unu verino.. levis sian voĉon (Luke 11/27); similas al unu reĝo (Mat.22/2).

Entute mi konsilus uzi "certa" nur laŭ sencoj 1 kaj 2 en P.V. Nedubanta. Senduba, nedubebla.

"AĜA"...havanta aĝon. Sekve, "He is an aged man": Li estas mult-aĝa, grandaĝa, profundaĝa viro. P.V. SAT difinas (sub 1) "larga" kiel "granda laŭ la direkto perpendikulara al la longeco", kaj "longa" kiel "havanta grandan etendon laŭ sia plej granda dimensio" sed en frazo: "The length of the journey intimidated the weak man" mi tradukus per "la trelongeco..." se nur pro emfazo. Kvalit' kaj humor' estas aliaj radikoj pri kiuj oni devas zorge uzi ilin.

AKCEPTI, RICEVI. Jen utilaj nuancoj por kiuj tiuj vortoj estas uzebaj laŭ Zamenhof modelaj: Li akceptis seriozan mienon. Li denove ricevis la konscion.

OBTENI. Tiu neologismo ŝajnas nenecesa. Ni jam havas "ricevi, havas "ricevi, havigi al si, preni (take), klinpreni (pick up), alpreni (assume, take to oneself), akiri, irpreni (fetch) F.R.B.

TRADUKOTA TEKSTO KONKURSO 13.

Washington Wonderland. Someone down in the line in the War Department not long ago suggested the destruction of a big pile of old, unimportant and ragged records to make room for current filing. The written proposal was submitted and referred from one official to another, in the usual routine, until quite a new file had been built up on it. Finally a dozen or more officials had approved destroying the old papers and at last the order came through to burn them. But the final authority had added the provision: "Provided that copies are made of all papers destroyed."

Pathfinder, Readers Digest. Jan. 1944.

Tradukoĵ devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.8.44.

P.E.SCHWERIN, Carabella Flats McDougall St., Milsons Pt. N.S.W.

B.E.A. Ekzamenoj. Ni bedaŭras eraron en la Junia numero. Sur p. 134 la nomo "Fraulino Bailey" devus havi sub titolo: "Advanced Examination: Written Part." anstataŭ sub "Diploma."

SNIPPETS from "British Esperantist" (Mar. 1944): "Basic E. has offered many useful opportunities for Esperanto propaganda...our 'competitors' have not only increased public interest in an international language but have brought direct benefit to the Association---since inquirers who investigate the position realise that Esperanto has already solved the problem in practice and that theoretical solutions are of merely academic interest."

"There are 2647 members of the B.E.A. Of these 1062 are Individual Members of the I.E.L. This membership represents only a small part of the Esperantists in Britain, and while 5000 should be attainable at no distant date, a minimum of 10,000 should be the aim."

"The Cornhill Magazine" for January has an article against Basic English by Rose Macaulay, which James Agate approved in recent BBC talk. S.P.E. (Society for Pure English) Tract xlii Basic. Clarendon Press, 1/6. Serious criticism of Basic from literary point of view, by G.M.Young.

The 4th Edn. of Cox has been reprinted with list of corrections. 372 pages.

THE
A.U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y.

-o-

LA

AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Vol 4, No. 11, August 1944.

EDITED BY

F.R.BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSENDON W5., VIC.

LA AŬTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

IMPERIA BASIKO (1)

En la disputado pri Basiko iuj ofte forgesas ke la lingvon de S-ro Ogden konsideris la Registaro kelke da jaroj antaŭ ol S-ro Churchill fariĝis ĉefministro. Jam antaŭ la milito la Kolonia Oficejo kaj similaj ŝtataj departementoj interesiĝis pri Basiko kiel eventuala komunlingvo por la Imperio. Ili konstatis ke estus neprave antaŭsupozi ke la pliparto de Afrika, Hinda, Malaja kaj Ĉina popoloj sub Brita regado unu belan tagon jam funde finlernos da Anglan. Kiom longe la pura Angla status kiel la normo, tiom longe oni rajtus supozi ke ne pli ol eta nombro el la koloniaj regatoj parolus puran, dum la granda plimulto parolus ian piĝin-Anglan. La unua grupo fariĝus privilegia administra klaso, speco da mandarena, babua kasto, kio neniel estus dezirinda. La ŝtatorganoj do decidis uzi Basikon anstataŭ piĝino kaj planis milionope presigi Basikajn lernolibrojn por la kolonianoj.

La hazardoj de la milito---kaj eble ĉar Churchill estas tre malkompetenta lingvisto---emigis la Registaron pli etendi sian patronadon de Basiko de la Imperia ĝis la internacia kampo. Ĝi jam prenis difinitajn paŝojn servigi Basikon kiel helplingvon internacian kaj administran. Ne nur ke "kelkaj koloniaj Registaroj invitiĝos eksperimenti...per uzo de tiu ĉi simpligita lingvo kiel ilo por iaj administraciaj instrukcioj", sed ankaŭ: "diplomataj kaj komercaj reprezentantoj en fremdaj landoj ricevos peton streĉeble disvastigi Basikon kiel internacian lingvon."

Negrave kiom malsupera aŭ supera estas Basiko kompare kun piĝino aŭ artefaraj helplingvoj, la homoj ĝenerale konsentas inter si ke ia komuna lingvo estas dezirinda por vojaĝantoj kaj komercistoj, kaj tre havinda estus ia ĉiuloke komprenata komandovorto por la Imperia administracio. Sed la homoj tute ne konsentas inter si ke Basiko estas taŭga por servi kiel lingvo diplomatia por oficiala interkomunikado ĉe la nacioj. Tamen la Registaro ŝajne intencas uzi Basikon por tio. Se ne, kial ĝi eldonis tekston de la Atlantika Ĉarto kiel sian unuan Basike verkitan "White Paper?"

La Basika reviziaĵo de la Ĉarto, krom tio ke ĝi estas iom pli longa ol la originalo, ankaŭ iom multe sence-diferencas de ĝi. En la originalo la Unuigintaj Nacioj deklaris ke ili "seek no aggrandisement, territorial or otherwise." En la Basika "their countries will do nothing to make themselves stronger by adding more land or increasing their power in any other way." Kio estas multe pli specifa. En la originalo "they desire to see no territorial changes that do not accord with the freely expressed wishes of the peoples concerned." En la Basika ne okazos ŝanĝoj "without the freely voiced agreement of the men and women whose interests are in question." Kio estas multe malpli specifa. "Agreement" sonas kvazaŭ popolaj voĉdonadoj devos sekvi la ŝanĝojn, ne antaŭiri ilin. La originalo antaŭvidas "a wider and permanent system of general security;" la Basika mencias pri "a wider system of keeping the general peace more solid in structure." Ni sentas foreston de la vorto "permanent."

La demando tuj leviĝas: Ĉu la Registaro pretekste uzis Basikon por povi eldoni oficialan "gloson" (2) de la Ĉarto? Supozinde ne, ĉar neniu alia Registaro ricevis peton ke ĝi akceptu la Ĉarton en la Basika formo. Tamen restas la frapa strangaĵo ke la Kabineto ial elektis por tiu helplingvo ne komercan aŭ administran tekston sed ĝuste diplomatan.

La vero estas ke la pura Angla ankoraŭ ne proviĝis adekvata kiel lingvo diplomata. Jam de la fruaj tagoj inter naciŝtatoj la Franca tion rolis. La Pariza Konferenco de 1918 kiel unua donis al la Angla oficialan starlokon en la diplomatio. Eĉ hodiaŭ mankas al la Angla ekvivalentoj por la pliparto de la teknikaj terminoj de la diplomatio. Kia, ekzemple, estas la Angla por coup d'etat, demarche, dementi, detente? Kiel precize distingi inter accord, entente, treaty, alliance? Ili aspektas proksimume sinonimaj en la Angla sed ili havas signifojn precize distingajn en la Franca. En la diplomatia kampo sin trudus bezono pliriĉigi la Anglan preferere ol premi ĝin en pli striktan kadron. Sed la ordinara homo ne amas la harfendaĵojn. Li bezonas simplan lingvon per kiu li povas esprimi simplajn ideojn; kaj li havas iluzion ke plejparte liaj ideoj estas simplaj. Se li estas Anglo li bonvenigos Basikon, ĉar lerni ĝin postulos malpli da peno ol lerni eĉ la plej basikan Francan aŭ -Hispanan, aŭ la plej simplan artefaran lingvon kia Esperanto. Se li estas neAnglalingvano ankaŭ li bonvenigos ĝin, tamen li miros, eksciante ke ĝi forigas eĉ ne unu el la esencaj malfaciloj de la Angla---inter ili la indikoj de pezo kaj mezuro, moneroj, kaj la fantazia silabado. Sed tiu miro foriĝos kiam lumos al li la vero ke fari ŝanĝojn en tiuj aferoj estus efektiva ĝeno por la Angloj.

(De J. Hampden Jackson en The Eastern Daily News, Norfolk, England. 18.4.44.)

Tradukis F.R.BANHAM.

- (1) Colin Evans B.A., D.B.E.A., en "Esperanto Internacia" pledas por tiu formo, ĉar "Brita-Amerika-Sciencā-Internacia-Komerca" (!)
 (2) Per "gloss" la aŭtoro ne precize volas diri la difinon de

"gloso" en Esperanto, sed tre verŝajne "sofisman, artifikan interpreton."

Ni ne apréobas ĉion supre verkitan, precipe en la lasta paraĝrafo, sed presigis ĝin pro la kritikemo kontraŭ la projekto kaj la konduto de la Brita Kabineto koncerne ĝin. La rimarkoj pri la maladekvateco de la Angla kiel diplomatia lingvo nepre pensigos la seriozan Esperantiston pri la urĝa neceso kompili en Esperanto aŭtoritatan vortaron de terminoj uzataj en la diplomatio kaj administracia ŝtataparato. (Rimarkoj de la tradukinto, F.R.B.)

THE NEW FOREST.

de L.E.BAILEY.

Ne malproksime de la urbo en kiu mi loĝadis antaŭ ol mi alvenis al Aŭstralio sidas regiono kiu nomiĝas "The New Forest," Esperantigita "La Nova Arbaro." Sed tiu traduko estas ne tute kontentiga ĉar tiu regiono estas multe pli ol arbaro, nome, aro da arboj. Ĝi enhavas multajn arbarojn, vastajn spacojn da grundo, nudaj krom eriko, filikoj kaj tiaj, ankaŭ vilaĝojn, eĉ grandajn domojn kvazaŭ kasteloj, preĝejoj. Riveroj fluas tra ĝi, kaj sterniĝas tie kaj ĉi tie marĉejoj kaj ŝlimejoj. Fakte, ĝi kovras ĉirkaŭ naŭdek tri mil akreojn, el kiuj du trionoj apartenas al la ŝtato, kaj ĝi estas unu el la malmultaj arbarregionoj nun troveblaj en Anglujo.

Eĉ angle "The New Forest" estas hodiaŭ titolo neĝusta, ĉar ĝi tute ne estas nova. Vilhelmo la Venkulo tiel nomis ĝin en 1076. Antaŭ tiam ĝi estis la ĉaslando de la okcidentaj saksaj reĝoj, ĝis la normanda invado en 1066. Kvin tiaj regionoj, el kiuj La Nova Arbaro estis unu, estas nomitaj en La Juĝtaga Libro (1). Kiam Vilhelmo venkis Anglujon li tre avidis teron por sia propra uzado. Li baldaŭ al si prenis sesdek ok arbarojn krom parkoj, kaj ĉasejoj diversloke en Anglujo. Sed tio ne kontentigis lin, do li alprenis ankaŭ tiun arbaron, kiu perfekte taŭgis lian celon. Por tio li kruele kondukis kontraŭ la loĝantaroj. Malŝparado kaj senigado de ilia lando, detruo de iliaj hejmoj harmoniis kun la senkompato de lia karaktero. Pro tiuj malfeliĉejoj kiujn li surmetis sur la loĝantarojn, tiuj ĉi rigardis kiel juĝo de Dio, ke li tie perdis siajn tri filiojn, Rikardon, imago de la patro, mortigitan de cervo, alian Rikardon, kaj Rufon mortigitan per sago. ĉe Lyndhurst en La Nova Arbaro troviĝas ŝtono kiu, laŭdire, montras la lokon kie falis Rufo. La malbonaj agoj de Vilhelmo oni rememoris longe post la malamo de la angloj kontraŭ la Normandoj forpasis.

Daŭradis la kruelaj leĝoj de Vilhelmo la Venkulo. Eĉ en la regado de Henriko II en 1184 neniu estis permesata vendi aŭ doni sian propran lignon. Do grandaj arboj ne povis esti faligataj, kaj sekve, ili iĝis la propraĵo de la reĝo. Neria printempa paŝtaĵo estis permesata. Spite la bezonoj de la loĝantaroj vastaj teroj estis enfermitaj, kie nur la reĝo kaj lia sekvantaro rajtis

sagĉasi cervojn. Nenia tanisto aŭ felisto estis permesata en La Arbaro. Unuvorte, tiu "Arbara Leĝo" faris el la regiono spacon de "proklama regiono" kie la leĝo de la lando tute ne rilatis, kaj rajtoj de propraj ekzistis nur sub kondiĉoj kiuj plejparte celis la konservadon de ĉasaĵo por la reĝo, komplete sen konsiderado por la bontato de la popolo.

Ĉe Verderek Hall ĉe Lyndhurst troviĝas postrestado de tiuj leĝoj kaj kutimoj, nome la krimula juĝejo, kie tiuj kiuj ofendis kontraŭ la leĝoj de la Arbaro estis juĝataj. Tie estas la plej primitiva akuzitejo (dock) en Anglujo, en kiun grimpis aĉuloj, kompatindaj, tremantaj, kun la atendo esti kripligotaj aŭ blindigotaj. Sur la muro pendas piedingo kiu, laŭdire, estis tiu de Rufo. Eble jes, eble ne. Almenaŭ ĝi estas videble piedingo de la periodo en kiun povus enŝoviĝi dike maŝaja piedo kun larĝaj feraj piedfingroj, sufiĉe dikaj kaj larĝaj por la plej multpeza rajdanto en lia maŝvesto. Tiaj piedingoj, legendo diras, estis tiel larĝaj, ke ĉiuj hundoj kiuj ne povis trapasi ilin oni rigardis kiel kapablaj ĉasi cervojn, do estis kripligataj.

Dum la tagoj de Henriko III la leĝoj estis iom moderigataj, kun aldono de kelkaj privilegioj kiuj, kredeble, estis la origino de multaj "Arbarrajtoj" demandataj hodiaŭ. Unu el tiuj rajtoj donas al tiuj, kiuj loĝas en dometo posedanta apartan specon de kameno, permeson paŝtigi unu-du bestojn kaj porkojn en la Arbaro. Tia kameno pruvas la antikvecon de la dometo.

Antaŭ kelkaj jaroj ni pasigis someran ferion en tia dometo. Ĝi ja estis malĝova! Kiam ni piediris sur la planko, ĝi kurbiĝis. Do ni elserĉis la plej nefirmajn lokojn kaj super ili starigis seĝojn, ĉirkaŭ ĉies dorso ni ligis banton el rubando kiel signo, ke tiun seĝon oni ne devas movi, oni devas promeni ĉirkaŭ ĝin. Ni ne estis la solaj loĝantoj en tiu antikva ĉambro. Nokte malaperis ĉiu ero de nutraĵo ne formetita. Sendube musoj! Do, por amuzi min, en iu vespero, mi lumigis kandelon kaj starigis ĝin sur la tablon. Tiam mi sidiĝis, dorse al la kandelo, kaj senmove restis, tute senmove, preskaŭ ne spirante. Multan tempon mi sidadis, daŭre tutsilenta. Post pli da tempo, ĉe la angulo de la tranĉilujo mi ekvidis du brilajn, rondojn okuletojn. Ili scivoleme rigardis min. Mi daŭre sidadis kiel peco de meblaĵo. La muso, tre singardema, fine kuraĝis antaŭen iri unu-du paŝojn. Mi aspektis kiel nevivanta! Ĝi pli antaŭen alvenis, kaj tiam post ĝi apeŝis alia muso, kaj alia, kaj alia, ĝismpost nelonge pli ol mi povis kalkuli. Amaso da ili! Centoj da ili! Ili kuris ĉie, laŭ la bretoj, la randoj de la teleroj kaj tranĉilujo, ili ekrigardis la internon de tasoj kaj vazoj. Ili prenis kernojn de prunoj el pelvo inter la antaŭaj piedetoj kaj puŝe portis ilin for de la vido. Ili kovris la supraĵon de la kuirejo flanktablo, kaj bele estis rigardadi iliajn sentimajn, naturajn moviĝadojn, iliajn ludojn inter si, la ĉason kaj provon kapti la voston unu de alia, kaj la petolaĵojn de la infanetoj, kaj kelkfoje patrinon kiu boksas la orelojn de sia ideto. Finfine mi moviĝis, kaj Klik! Nenia muso videbla!

Estas vere ke la leĝoj de la arboroj kaj iliaj plenummanieroj estis kruelaj. Tamen iom da bono rezultis, ĉar ili konservis antaŭikvajn arbojn kaj iliajn primitivajn ĉirkaŭaĵojn, kiuj alie estus detruitaj. Dum la manko de intereso kaj malforta administrado de Karlo I kaj la Respubliko la arboj estis difektitaj, sed dum la plejfortaj regadoj de Jakobo I kaj Vilhelmo III la arboj plinombriĝis kaj kreskis.

Hodiaŭ la administrado de tiu regiono estas sub la Akto de 1877 kiu establis ke ĉie, krom dudek mil akreoj, fermitaj de 1700 restu malferma kaj sovaĝa. Tie ĉi la Arbaraj Leĝoj ankoraŭ validas kaj protektas la arbojn de malŝparo kaj rabado. Tie ĉi ankoraŭ vagas cervoj, vulpoj, sciuroj, lutroj, serpentoj venenaj, ankoraŭ tie ĉi flirtas la flugiloj de papilioj kiuj estas de specoj ne aliloke troveblaj---vera mirlando, hodiaŭ kiel en antikvaj tagoj.

OK FLAVAJ TELEROJ. de S-ino F. GLENIE.

Mi unue ilin vidis en antikvaĵejo en urbeto proksime al la marbordo, tiujn ok flavajn telerojn. Ilia brileco trafis miajn okulojn ĉiam, kiam mi preterpasis la vendejon.

"Aĉetu nin," ili ŝajnis diri, "aĉetu nin, kaj metu nin en pli taŭga kaj bela loko." "Kiaj belaj teleroj," mi murmuris en mi mem, kaj iu eta voĉo kvazaŭ flustris, "Jes aĉetu ilin, ne ofte vi havas okazon havigi tiajn belajn objektojn." "Ne, ne," diris alia eta voĉo, "Vi havas nek utilecon por tiaj aĵoj, nek vian propran hejman en kiun enmeti ilin. Jam via patrino plendas ke vi havas tro da senutilaĵoj ĉirkaŭ ŝia domo---libroj, bildoj, fotografiaĵoj, kaj tiel plu." "Sed kiel domaĝe ke ili devas resti en tia maltaŭga loko, inter polvkovritaj libroj kaj malmodaj mebloj," diris la unua voĉo pli laŭte ol antaŭe." "Sed vi he bezonas ok flavajn telerojn," insiste diris la dua voĉo pli kaj pli mallaŭte kaj malproksime. "Ne gravas, ili estas belaj, mi deziras ilin," mi preskaŭ kriegis, "kaj iafoje mi intencos aĉeti!"

Mi ofte preterpasis la vendejon, rigardante malantaŭen kaj turnante bankbileton en mia monujo. Do unu tagon mi eniris la butikon kaj petis pri la kosto. Ĝi estis granda, pli granda ol la valoro de la bankbileto kiun mi tiel ofte turnis en mia monujo, ĉar la teleroj estas faritaj el kara angla porcelano. Mi hezitis pro animskuo, sed mi ne povis kontraŭstari ilian allogon, do mi pagis la monon, ilin pakis en valizon kun multe da pajlo, kaj

iris al la semajnfindometo kie mi libertempis.

Mi diris nenion pri la aĉeto, sed kaŝis la valizon sub la lito ĝis venus la tempo kiam mi estus preter por hejmen iri post la ferio. Fine la tago venis. "Ho," diris mia frato, portante miajn valizojn al la omnibuso, "Kio ajn estas en ĉi tiu eta valizo? Ĝi estas tiel peza kiel oro." Mi nur ridetis, kaj nenion respondis.

Kiam ni estis pakataj en la omnibuso veteranta al la stacidomo, tiam mia patrino diris al mi, "Mi rimarkis antaŭ ol foriri ke tiuj ok flavaj teleroj, kiujn vi tiel admiris estas aĉetitaj, eble de iu, kiu havas pli monon ol saĝon." "Jes, eble," mi murmuris, "ja ekzistas tiaj homoj."

Atinginte la hejmon post longa veturado, mi denove kaŝis la telerojn sub la lito, ĝis mi povos decidi kion fari pri ili, sed iutempe kiam neniu rigardis, mi elprenis ilin el ilia kaŝloko por admiri ilin. Ili ja estis ok pecoj da beleco, ok pecoj de mirinde flavaj koloraĵoj, eĉ ŝajne ok pecoj de la suno mem. Ili tiel bril- etis ke ili kvazaŭ donis lumon al la ĉambro.

"Metu nin," ili petoleme ŝajnis diri, "en plimtaŭga loko, ni estas tiel belaj kiel la sunbrilo, flavaj kiel la hellantoj kiuj kreskas en la ĝardeno. En valizo sub lito ne estas ĝusta loko por ni." "Ni ne apartenas al tia ĉirkauaĵo."

Sed mi silentis, kaj scivolis pri la porcelana aro. "Kiu estis," mi enpensis, "kiu estis la artisto kiu planis ĝin. Mi povas imagi, ke kiam la aro estis fabrikata, la artisto diris "Nun mi devos fari ion speciala, simpla, formaata, bele kolorigota. Jes, mi uzos flavkoloron, gajan hel flavon." Verŝajne li planis kaj fabrikis pli ol ok telerojn. Almenaŭ estis dudek teleroj ankaŭ taso kaj tasteleroj, kaj eble kruĉo kaj sukeroĵo. Sed kie estas la cetero de la aro nun? Eble fordonita aŭ rompita, kiu scias? Kaj nur restas ĉi tiuj ok belaj teleroj kaŝitaj sub mia lito.

Kaj nun, mi ne scias kion ajn fari pri ili---la tre multekostaj aĉaj objektoj! Ho ve! Mi ekpensis pri la utilaj aĵoj kiujn mi tiam povis anstataŭ-aĉeti. Sed mi opinias ke, se homo konservas ion ajn, dum sufiĉe longa tempo, homo fine povas uzi ĝin. Do mi denove metis la telerojn en sian kaŝlokon, ĝis venus tia feliĉa tempo.

Post longe, vizitis nin kara amikino kiu ĵus edziniĝis en alia urbo, kaj ŝia patrino. Ni ĉiuj vigle interbabiladis pri la edziĝ-festo, ankaŭ pri la malfacilo aĉeti meblojn kaj aliajn aĵojn por la domo.

"Estas bedaŭrinde," murmuris ŝia patrino aparte al mi, "ke Elizabeto ne povas aĉeti tion, kion ŝi bezonas. Ekzemple, ŝi havas bluan ŝrankon, antikvan pecon de meblo, kiu apartenis al nia familio dum multaj jaroj. Taŭgas por ĝi aŭ flavaj aŭ orkoloraj porcelanoj, sed nuntempe tiaj aĵoj estas neaĉeteblaj. Ŝi havas kvar aŭ kvin flavajn pecojn, sed ne sufiĉon por plenigi la bretojn. Kia domaĝo," ŝi sopiris, "sed Elizabeto devas atendi ĝis la fino de la milito por aĉeti plu."

Mi fariĝis enpensa kaj fine parolis. "Mi havas por Elizabeto edziĝdonacon, kiu, mi opinias, tre plaĉos al ŝi. Mi devas logi ŝin en mian ĉambron antaŭ ol ŝi hejmeniros kaj ĝin donos al ŝi."

Do mi ja faris tion, kiam ŝi estis preter por iri. Ĝoje rid-

ante, ŝi prenis la valizeton kaj diris, "Kio ajn troviĝas en ĝi? Ĝi estas peza kiel oro."

"Jos, ĝia enhavo aspektas iom kiel oro, sed ne malfermu ĝin nun," mi avertis, "ĝin portu hejmen, kaj tiam ĝin enrigardu."

Post ŝia foriro mi enpenŝiĝis pri la afero, sed mi estis kontenta, kaj sopiris "Fine la teleroj iras al sia ĝusta loko."

Kaj nun, kiam mi vizitas mian amikinin kaj trapasas tra la salono kie troviĝas la blua ŝranko kaj ĝiaj enhavaĵeroj, mi ne scias, ĉu la kialo estas la movado de la kurtenoj, aŭ la suno tra brilanta tra ili kaj faranta ombrojn, sed ŝajnas kvazaŭ ili palp-brumas je mi---tiuĵ ok flavaj teleroj!

TO THE DISTANT ONE.

Roses here I pluck for thee,
In this alien land;
Dearest, would that they could be
Placed in thy sweet hand.

Ah! Before such journey's done,
Over weary miles,
From the rose the beauty's gone---
Fleeting are her smiles.

Never should a lover roam
From his loved one's door
Farther than the rose's bloom
Holds its freshness pure:

Farther than the searching bird
Forage brings for nest
Or the space its song is heard
Sounding down the west.

NICOLAUS LENAŬ, 1802-50.

"An die Entfernte."
Trans. F.R.BANHAM

AL LA FORULINO.

Por vi rozon ŝiras mi,
Ekzilulo sola,
Ho se porti povus mi
Ĝin al mano mola!

Ve! antaŭ la vojaĝ-fin',
Post laclonga iro,
Ĝia bel' forlasus ĝin---
Volkus la admiro.

Saĝa viro ne sin trenas
For de land', karulo,
Foren pli ol roz' retenas
Floron sen makulo:

Foren pli ol birdo trovas
Aĵojn nestkonstruajn,
Aŭ pli for ol flugi povas
Ĝiaĵ notoj fluaĵ.

Tradukis F.R.BANHAM.

LA PLEJ MALGRANDA GAZETO EN LA MONDO.

Ĝi fondiĝis en 1941j. en Hosen (Danujo) kaj regule aperas ĉiun semajnon por la uzo de unu sola---familio. Ĝia direktoro estas iu redaktisto, pasia genealogo, kiu dediĉis sin de kelka tempo serĉadi la proprajn antaŭulojn. La vivantaj membroj de lia familio nombras centon, tial por eviti laboron regule leterkorespondi kun la 100 parencoj, li presas efektivan gazeteton, kiun lia vasta familio abonas. La organo, "La Familio Damgaard," enhavas biografiojn, nekrologiajn artikolojn, celebroy de naskoj kaj datrevenoj---mallonge

ante, ŝi prenis la valizeton kaj diris, "Kio ajn troviĝas en ĝi? Ĝi estas peza kiel oro."

"Jos, ĝia enhavo aspektas iom kiel oro, sed ne malfermu ĝin nun," mi avertis, "ĝin portu hejmen, kaj tiam ĝin enrigardu."

Post ŝia foriro mi enpenŝiĝis pri la afero, sed mi estis kontenta, kaj sopiris "Fine la teleroj iras al sia ĝusta loko."

Kaj nun, kiam mi vizitas mian amikinin kaj trapasas tra la salono kie troviĝas la blua ŝranko kaj ĝiaj enhavaĵeroj, mi ne scias, ĉu la kialo estas la movado de la kurtenoj, aŭ la suno tra brilanta tra ili kaj faranta ombrojn, sed ŝajnas kvazaŭ ili palp-brumas je mi---tiuĵ ok flavaj teleroj!

TO THE DISTANT ONE.

Roses here I pluck for thee,
In this alien land;
Dearest, would that they could be
Placed in thy sweet hand.

Ah! Before such journey's done,
Over weary miles,
From the rose the beauty's gone---
Fleeting are her smiles.

Never should a lover roam
From his loved one's door
Farther than the rose's bloom
Holds its freshness pure:

Farther than the searching bird
Forage brings for nest
Or the space its song is heard
Sounding down the west.

NICOLAUS LENAŬ, 1802-50.

"An die Entfernte."
Trans. F.R.BANHAM

AL LA FORULINO.

Por vi rozon ŝiras mi,
Ekzilulo sola,
Ho se porti povus mi
Ĝin al mano mola!

Ve! antaŭ la vojaĝ-fin',
Post laclonga iro,
Ĝia bel' forlasus ĝin---
Volkus la admiro.

Saĝa viro ne sin trenas
For de land', karulo,
Foren pli ol roz' retenas
Floron sen makulo:

Foren pli ol birdo trovas
Aĵojn nestkonstruajn,
Aŭ pli for ol flugi povas
Ĝiaĵ notoj fluaĵ.

Tradukis F.R.BANHAM.

LA PLEJ MALGRANDA GAZETO EN LA MONDO.

Ĝi fondiĝis en 1941j. en Hosen (Danujo) kaj regule aperas ĉiun semajnon por la uzo de unu sola---familio. Ĝia direktoro estas iu redaktisto, pasia genealogo, kiu dediĉis sin de kelka tempo serĉadi la proprajn antaŭulojn. La vivantaj membroj de lia familio nombras centon, tial por eviti laboron regule leterkorespondi kun la 100 parencoj, li presas efektivan gazeteton, kiun lia vasta familio abonas. La organo, "La Familio Damgaard," enhavas biografiojn, nekrologiajn artikolojn, celebroy de naskoj kaj datrevenoj---mallonge

dirite, ĉion, kio povas interesi al la familio Damsgaard.

-----KOSMOGLOTTA (Svisujo) 12.1943:
Trad F.R.B.

ASOCIAJ AFEROJ.

KORESPONDA KURSO. Antaŭ multaj monatoj Ni petis donacojn por establi, kaj propagandi Korespondan Kurson por komencantoj. Ĝis nun Ni ricevis £4.18/-, kaj havas promeson por pliaj du-tri funtoj. Kun la helpo de la Libro-servo, kaj tiu mono, ni jam havas preta materialon kaj organizadon por komenci la kurson. La mono por reklami la kurson estas negrandia sed ni esperas, ke ĝi kreskos rezulte de pliaj donacoj dum ni progresas kun la laboro. Bonvolu sendi iujn donacojn rekte al la Sekretario. Ju pli multe des pli vasta la reklamo.

Kompetentaj Instruistoj el diversaj landpartoj jam akceptis la taskon korekti la foliojn kaj gvidi lernantojn el iliaj propraj ŝtatoj. La Ĉefpropagandista Komitato, sub gvidi de S-ro Wanmer (Qld) kiel eble plej bone aranĝos reklamadon kun nia eta mono. Por certigi, ke ĉi lasta ne tuj forvaporigos, ni decidis pligrandigi la prezon de la kurso de 8/6 ĝis 10/-. El ĉiu kursopago ni retenos 2/- por daŭrigi la propagandan monon.

La reĝo de la kurso estos en la kapablaj manoj de S-ro F.Pitt, c/- Mentone Grammar School, Mentone VIC. al kiu oni povas skribi por informo aŭ ekzempleroj de la kurso (prezo 10/-). Ricevinte pagon por la Kurso, S-ro Pitt sendos al la lernanto la plenan kurson, instrukcion, kaj nom-adreson de la instruisto.

Ni petas la kunlaboron de ĉiu grupo kaj individuo por sukcesigi la novan fakon de nia laboro. Korespondaj kursoj sukcesis en Transmaraj landoj, ankaŭ ni Aŭstralianoj prosperigu niajn Grupojn kaj Asocion similm metode.

MEMORU, donacoj al la Sekretario; informpetoj al S-ro Pitt, kaj propagando kaj reklamado de ĉiuj al la tuta lando.

JARLIBRO. Pro la necertaj movoj de la Sekretario, ĝis nun ni ne povis aranĝi la pretigon de la Jarlibro, sed tio ne plu prokrastiĝos, Ni petas ĉiun Grup-sekretarion tuj sendi al la Sekretario liston de membroj de la Grupo, uzante mallongigojn, kiel en 1943a eldono por montri informojn pri ties membroj. Se eble bonvolu aranĝi, ke oni maŝinskribu la liston kaj uzu duoblan apacon (double spacing) inter la linioj. Tio treege malpliigos la Sekretarian laboron---sed NE prokrastu se vi ne povas maŝinskribi ĝin.

Ni simile petas la Estron de ĉiuj el la Asociaj servo-fakoj sendi plenan informon pri ties fako kaj mallongan raporton pri laboro jam farita.

Ĉiu kotizpaginta Individua Membro (IM) ricevos ekzempleron senpage kaj Grupomembroj (G-M) povos konsulti la grupon ekzempleron ĉe la Grupa Sekretario. Ĉi-foje ni intencas pretigi malgrandan nombron por vendi al personoj ne-Individuaj-membroj, prezo 2/-. Personoj kiuj ne estos Individuaj Membroj, kaj volas ricevi propran ekzempleron, devos mendi ĝin ĉe la Sekretario ANTAŬ OL la 15a Novembro. Individuaj Membroj zorgu kee via kotizo (5/-) estas pagita

al la Kasistino, F-ino ADDIS, S.Aus.

G.H.HILLERMAN (Sekretario) C/- 184 The Boulevarde, Strathfield,
N.S.W.

LA KASO DE LA A.E.M.

S-ro K.Coller 10/-, S-ro D.Guilbert 5/-, S-ro Alan Turner (donation) £1, S-ino Harris 5/-, S-ro Banham 5/-, S-ino O.Glenie 5/-, S-ino E.M.Hill 5/-, F-ino I.James 5/-, S-ro E.MacKenzie 5/-, S-ro Belcher 5/-, S-ino Mayall 5/-, S-ro Knox Walker 5/-, S-ro Schmidt (2 years) 10/-, Dr. Woolnough 10/6, Deaconess Magarey 5/-, S-ro Pryke 5/-, S-ro G.Chatterton 5/-, S-ro Pfahl 5/-, S-ro Slavoff 5/-, S-ro K.Smith 7/6, Dr. Fred Williams 5/- S-ino Mumford) 2 yrs) 10/-.

Magazines which have been lost in transit or through errors in addressing will be replaced if possible, but all communications must be sent to the cashier, who is responsible for dispatching, and not to your local club secretaries. Please allow a reasonable time to elapse before writing, and then state clearly which magazine is missing, and we will do the best we can to let you have it without further delay.

W.ADDIS (Kasistino) 25 Greville Avenue, Flinders Park, S.Aus.

LA ESPERANTA RENDEVUO urĝe vokas al vi aliĝi sian LITERATURAN KONKURSON. Vidu p.127 de Junia N-ro. Nenia enirpago. Premio, Esp-a libro. Skribu S-ron Hanks.

DENOVE "LA RONDO." La Sidneja Klubo entuziasme ricevis sugeston ke ni reakceptu la malnovan kaj originalan titolon--"LA RONDO." La dua kaj tro longa titolo de nia gazeto evidente ne plaĉis aŭ ne kutimigis sin al la granda plumulto de legantoj. Por ke nesperantistoj facile ekkonu la naturo de nia eldonaĵo, ni nepre uzos kiel subtitolon, "Australian Esperanto Monthly." La ŝanĝo efektiviĝos jam de la Oktobra numero, kiu signas novan volumon. Dum la monatoj en kiuj ni uzis la pezan formon ni rimarkis ke tre ĝenerale amikoj menciis la gazeton per la familiara kaj certe preferata--- "La Rondo," kiu estas pli neta kaj oportuna por eventuala prideseĝno.

KVINSLANDO. Sam-oj de la Brisbana Societo tre ĝuis magi-lanternan paroladon de S-ro H.N.Love ĉe la lasta kunveno. La temo estis Konstruaĵoj kaj Monumentoj de Historia Intereso en kaj ĉirkaŭ Sidnejo. La bildojn bone fotografiis S-ro Love. La kunvenintaro image iradis al multaj interesaj lokoj, kiujn vidas relative etnombraj vizitantoj al tiu ĉefurbo. S-ro Love parolis plejparte en Esp-o sed por lernantoj ripetis Jen-jen en la Angla. S-ro Love jam faris al si belan reputacion kiel magi-lanternan parolisto.

En Brisbana Courier-Mail (1 Julio) sub titolo "Obstakloj de Basic English, S-ro F.McKinnon, konata kritikisto en la redaktora stabo de tiu ĵurnalo, penetre pridemandis la pretendojn de Basiko.

Skribante pri la verko de D-ro Richards, "Basic E. and its Uses," li asertis, ke ĉefa barilo al ĝia adopto estas la forto de nacia sento, kaj la pledoj de Richards ne sufiĉe impresas por venki tiun forton.

La episkopo de Chelmsford (D-ro H. Wilson), en sia eparkia gazeto (represe Church Standard, Sidnejo), pledis por "la spirita esperanto." "La stranga antikva rakonto de la Babelturo devas sence renversiĝi; devas adoptiĝi la spirita kaj kristana esperanto kiu unuigos ĉiujn konstruantojn de plibona mondo. Mi konfesas, ke, penante prezenti al mi la moralan-bankrotigon de Eŭropo, mi sentas, ke la postmilita tempo, malgraŭ sia liberigo el sangverŝo, estas plenkla de terure krizaj komplikoj. La nura elirvojo el tia ĥaoso estos trovo de iaj komunaj moralaj kaj spiritaj sankcioj kiujn ĉiuj homoj akceptos kiel definitivajn." Ni komentas, ke se la bona doktoro ankoraŭ ne praktike uzas Esp-on, li nepre tion faru. Tiel agante, li en efektiva eĉ se malgranda grado plibaldauigos la tempon en kiuj la homoj ricevdus la spiriton de interkompreno kaj reciproka helpemo, kion li tiom arde sopiras.

TRADUK-KONKURSOJ.

TRADUKO de KONKURSO 12: (Kompilita el 2 tradukoj.)

Printempo ekvenis al Parizo rapide post unu el la plej malvarmaj kaj plej paralizaj vintroj imageblaj. Miloĵ da homoj, ne aktive koncernataj en la konduto de la milito, forĵetis siajn sentojn de senpoveco kaj sensenteco kaj revenis al la vivo kaj al la ĉefurbo. La unuan fojon de post Oktobro infanoj ludis en la publikaj ĝardenoj. La kafejaj terasoj estis denove plenaj kaj dimanĉe homamaso laŭkutime granda promenis en la sunbrilo. Unue la magnolioj en la ĝardenoj de la Avenue Gabriel ekfloris. Sekvis la kaŝtanujoj, pli verdaj kaj pli blankaj kaj pli freŝaj ol iam. Malpli hom-abunda ol kutime, pli malplena de aŭto-trafiko, Parizo havis strangan aspekton de nostalgia beleco.

Venkinta Grupo: Melbourne Esperanto Club.

TRADUKOTA TEKSTO KONKURSO 14.

Speech is foremost in importance among man's faculties. Without it in its vocal or written forms it would be impossible to conceive the existence of human society in all its complexities and variety. Not only does it distinguish him from other mammals by enabling man to communicate and record his thoughts, but its variations also constitute one of the characteristics of difference between the innumerable groups of human society. In this respect it unfortunately serves, not only as a feature of difference, but as a factor of separation, and the vehicle of thought within each language group becomes a barrier to understanding between the nations. (E.D.Durrant: The Language Problem.)

Tradukoj devas atingi la Subskribinton antaŭ 10.9.44.

REZULTO de la UNUA JARO de la TRADUK-KONKURSOJ:

La rezulto estis kalkulita laŭ jena punkt-sistemo: en ĉiu monata konkurso ricevis---la venkinto, 5 punktojn
la dua venkinto 3 punktojn
ĉiu alia partopreninto 2 punktojn.

La SUMA REZULTO: por la pasintaj 12 konkursoj estas:

(1) Sydney Esperanto Society	44 punktoj
(2) Melbourne Esperanto Club	33 "
(3) Western Austr. Esp. League	30 "

La jar-premion de A.E.A. do gajnis Sydney Esp. Society. La subskribinto donacis alian samvaloran premion (6/-) por la dua venkinto Melbourne Esp-o Club. Ambaŭ premioj estos sendataj al la koncernaj kluboj post sciigo al S-ro Hillerman, kiujn librojn ili deziras. Gratuloj al ambaŭ kluboj!

Mi tre bedaŭras, ke lastatempe kelkaj kluboj ne plu kunlaboras kaj pro tio maluzis valoran ekzercad-eblecon.

P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., Milsons Pt. N.S.W.

LETEROJ AL LA REDAKTORO.

De W.LANGHAM. La gazeto plejparte konsistas el artikoloj kaj tradukaĵoj verkitaĵoj de apartaj kaj lertaj Esperantistoj, sed ne enhavas parton por lernantoj kaj malpli spertaj samideanoj. Ĉu vi ne povus rezervi la laston paĝon por ĉi tiaj verkuloj kaj legantoj? Eble estas multaj izoluloj kaj aliaj en Australio kiuj ne havas rimedojn por plibonigi sian stilon kaj ricevi kritikon por siaj verkaĵoj. Se vi presigus ĉiumonate du artikolojn de unu-ĝis-ducent vortoj, sekvante por kritikaĵo de instruanto, mi kredas ke tio ĉi estus tre ŝatata de multaj abonantoj de la A.E.M. kaj valora por kaj novaj kaj malnovaj legantoj.

RESPONDO de la REDAKTORO. La ideo estas prove plenuminda. Sendu al mi mallongajn pecojn. Tiujn mi aperigos precize kiel mi ricevis ilin, kaj aldonos rimarkojn. Se tradukaĵoj, bonvole akompanigu la originalan.

de S-ro GEENAN. Mi kiel Nederlandano tute ne povas kompreni la morojn de la Australianoj. Ekzemple, se mi promenas kun fraŭlino en strato mi ĉiam devas rigardi, kie sin trovas la muroj aŭ domoj, ĉar oni diras ke mi devas promeni apude de la plej danĝera flanko, kiu nome estas la strato. Nu, kion mi faru se la muro teren-falus?

RESPONDO de la REDAKTORO. Malnova estas la decregulo ke viro, promenante kun virino, okupu la stratan flankon. Same en Anglujo. Ĉi estiĝis ŝajne pro ĉa fakto ke, tiel farante, viro ŝirmas virinon de la radŝprucoj de veturiloj sur la vojoj, ofte tre kotaj.

THE
A.U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y.

-o-

LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.
Vol 4, No. 11, August 1944.

EDITED BY
F.R.BANHAM, 2 BANCHORY ST., ESSENDON W5., VIC.

LA AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

--o--

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

---ooo---

DISKUTO PRI HIPOTEZA LAŬLEĜIGO DE EŬTANASIO.

(Greka EU, bona; THANATOS, morto.)

Oni povus protesti ke kuracisto, jam sciante ke la estingo de homa vivo ne plu rompas la leĝon, inklinus preni la tutan aferon en proprajn manojn kaj tiel donus mortigan drogon---kloroformon, nitroz-oksido-gason---sen atenti la leĝajn formalojn.

Responde tion, alia povus diri ke la pritimata afero estas egale ebla nun, kiel post leĝigo de eŭtanasio. La hodiaŭa kuracisto ja mem donas la mortateston, do havas ĉian facilon kaŝi sian agon. La kuracistoj havas nebonajn flankojn, kiel ĉiuj homoj kun alta sento pri personaj kaj profesiaj respondecoj. Kaj ni rimarku, la estingo de homa vivo sen la nepre plenumotaj leĝaj formaloj restus rompo de la leĝo, same kiel nun.

Oni povus due protesti ke eŭtanasio krudigus la homajn kompatemojn kaj efikus produkti rason de teranoj sen kapablo ĝuste estimi la valoron de homa vivo.

Nu, la leĝigo de eŭtanasio havus precize la malan efikon. Por subteni tiun ĉi konstaton ni nur devas rimarkigi ke ĝuste tiuj virinoj kiuj amas siajn dombestojn ankaŭ sendas ilin al mortigĉambro kiam ili estas nekuraceble malsanaj aŭ vunditaj. Male, virinoj kruelaj aŭ indiferentaj pri aliula sufero, lasas la kompatindajn bestojn dolore mortigi.

Oni povus trie protesti ke laŭleĝa eŭtanasio faciligus krimojn. Tio antaŭsupozas ekziston de krimemaj parencoj, de du krimemaj kuracistoj kaj de cetero da parencoj, amikoj, konatoj kaj najbaroj tiel stultegaj ke ili ne povis rimarki kaj malkaŝigi la kriman agon. Kie tia preskaŭ neimagebla kombino ekzistus, tie krimo estus samegale facila nune kiel post leĝigo de eŭtanasio.

Oni povus kvare protesti ke la suferanto eble agus sub finfluo de aliaj anstataŭ per propra juĝkapablo, kaj ke eble tia influo povus veni de personoj kiuj esperas profiti, finance aŭ alie, de la morto.

Tio estas vera risko, malgranda sed ĝi ekzistas. Tamen, me-

moru bone ke du kuracistoj devus certigi ke la suferanto posedas sian mensan kompetenton, kaj ke la malsano estas dolora kaj neeviteble mortiga. Tiuj du kuracistoj devus ankaŭ certigi ke, laŭ sia opinio, malsanulo perfekte komprenas tion, kion li postulas. Tiom longe kiom restus eĉ plej eta espero de liberigo el forta sufero---eĉ parta aŭ portempa libero---afliktato povus diri, ricevinte sian rajtig-ateston: "Mi elportos mian suferon tiom longe kiom mi povos; mi firme luktos kontraŭ la morto, mi kuraĝe rezistos. Kaj mi estas multe komfortata kaj fortigita tial ĉar mi posedas mian oficialan permesateston; kaj, se la malsano fariĝos tute neeltenebla, mi povos venigi kuraciston kaj ricevi pacan morton." La permesatesto restus valida dum konvena tempo, kio donus al suferanto multe da kuraĝo, konsolo kaj trankvilo.

Oni povus kvine protesti ke kuracistoj foje eraras. Kion do vi volas? Neeraripovajn kuracistojn? Tiaj ne ekzistas. Eĉ hodiaŭ, post ĉia zorgo, okazas operacioj kiuj por la okuloj de la Ĉioscia klare estus nenecesaj, senutilaj. Sed ni ne estas ĉiosciuloj, kaj la plejeblo por ni estas malmultigi erarojn ĝis minimumo. Kaj malsanoj neforigeblaj hodiaŭ povas post jaro aŭ monatoj fariĝi forigeblaj per la konstanta progreso de la scienco. Kiam oni trovos kiel kurace forigi malsanon je difinita grado de gravo, tiam malsano je tia grado de disvolvo aŭtomate malaperos de la listo de tiuj por kiuj eŭtanasio estas permesata.

Oni povus sese protesti ke Dio donis la vivon, kaj sole Dio havas rajton ĝin forpreni. En la Supera Ĉambro de la Brita Parlamento 1 Decembro 1936 Vicgrafo Fitzalan de Derwent diris:- "La Ĉiopova rezervas al Si la povon decidi pri la momento kiam la vivo ĉesu."

Nu, ni respondas tiun teorion sen demandi, kiamaniere la vicgrafo informiĝis pri la decidoj de la Ĉiopova, kaj sen aludi la terurajn erarojn faritajn en la pasinteco de homoj kiuj rigardis sin kompetentaj okupiĝi pri "la decidoj de la Ĉiopova." Dio ja donis, same kaj egale, al bestoj ankaŭ ilian vivon. Sekve tiu argumento aŭ enhavas nevalidan dedukton, aŭ ĝi kondamnas ankaŭ ĉasistojn, buĉistojn, fiŝistojn, karmangulojn, kaj ĉiujn, kiuj detruas parazitojn, pestbestetojn, fiinsektojn. Plue, se ni kontraŭagas la intencon de Dio kiam ni mallongigas la vivon, ni same faras kiam ni plilongigas ĝin. Sekve la argumento aŭ estas malprava, aŭ kondamnas la kuracistojn, la drogistojn kaj ĉiujn, kiuj glutas medikamentojn.

D-ro C.K.MILLARD, The Gilroes, Leicester (Anglujo)

-----Trad. F.R.BANHAM.

Man's dearest possession is life; and since it is given to him to live but once, he must so live as to feel no torturing regrets for years without purpose; so live as not to be seared with the

shame of a trivial and cowardly past; so live that, dying, he can say: "All my life and all my strength were given to the finest cause in the world---the liberation of mankind." LENIN.

TRADUKO. La plej kara homa posedo estas la vivo; kaj ĉar la homo vivas nur unu fojon, li vivu tia maniero, ke li sentos neniajn turmentajn bedaŭrojn pro sencelaj jaroj---en tia maniero, ke li ne hontos pro sensignifa kaj timema pasinteco---en tia maniero, ke, mortonte, li povos diri: "Mian tutan vivon kaj tutan mian fortcon mi dediĉis al la plej farinda afero en la mondo: la liberigo de l'Homaro."

----- (Kontribuis H.M.LEIGHTON, Perth)

INCIDENTO EN VARSOVIO.

de Jozefo Major en La Interna Ideo (Nov-Zelando) Dec.1943.

"Mi certe ne pagos por la terpomoj!" D-ro J. deklaris emfaze. La Pola kelnero stulte ridetis, nenion komprenante. Mi ĵus alvenis per vagonaro kaj alestis la scenon en la stacidoma restoracio. Ĉar mi konis D-ron J. mi iris al li kaj proponis mian helpon. Li diris al mi ekscitite ke li mendis biftekon kun terpomoj, ke oni alportis la terpomojn sur aparta telero kaj postulis ankaŭ apartan pagon por ili. Li aldonis ke ĉie en la mondo terpomoj apartenas al bifteko kaj oni ne pagas por ili aparte. Mi rigardis la kalkulon: la sumo disputata estis bagatelo. "Lasu disputon," mi konsilis al la doktoro, "pagu la monon kaj ni foriru." Miaj vortoj ŝajnis eĉ pli kolerigi mian samideanon. Li klarigis al mi ke li ne zorgas pri la mono sed la principo. Dum tiu ĉi tempo homoj kolektiĝis ĉirkaŭ ni kaj komencis partopreni la batalon. La plimulto turnis sin kontraŭ la fremduloj, kiel ĉie en similaj okazoj: la amaso malamas kaj timas fremdulojn, kiel instruas la psikologio. Sed kelkaj progresemaĵoj protektis nin kaj feliĉe ni ne estis batataj. Nun alvenis la direktoro de la restoracio kaj kun li mi povis interkompreniĝi France. Mi promesis al li ke mi pagos la monon por la terpomoj el mia propra poŝo, se li nur akceptos la monon de la doktoro sen terpoma krompago; nur ni jam finu la ridindan aferon. Sed nun la direktoron ankaŭ kaptis la sankta fervoro, kaj li respondis tute kolere ke li ankaŭ ne zorgas pri mono sed pri principo. "Bifteko laŭ reĝa maniero neniam estas servata kun terpomoj," li kriis, "kaj via amiko ne estas sinjoro!" La amaso ĉiam pli densiĝis kaj mi estis serioze ĝenata kiam la alveno de policano faris miraklon: la homoj forkuris, la direktoro ridetis kaj akceptis la monon kion la doktoro volis pagi. Ni ĉiuj foriris kiel eble rapide, timante areston.

Mi rakontis tiun incidenton ĉar ĝi karakterizas la tutan varsovian Kongreson. La kunsidoj estis plenaj de akraj disputoj pri

sovian Kongreson. La kunsidoj estis plenaj de akraj disputoj pri organizo, kaj la oratoroj zorgis malpli pri la afero ~~nen~~ ol pri "principoj." Ĉiuj antaŭjuĝoj de la ekstera mondo respegulis sin en nia rondo. Lingvaj baroj ne ekzistis por ni, sed politikaj, rasaj, naciaj kaj religiaj diferencoj aperis sub la verda koloro de hipokritaj disputantoj. Eble mi ruinigos la idealojn de junaj entuziasmoj, kaj eble kelkaj ne kredos min, sed, ho ve, aliaj scias ke mi diras la veron.

Mi multe parolas nuntempe pri postmilita organizo. Tamen, permesu al mi diri ke ĉiu organizo fiaskos se la homoj ne plibonigos sin mem individue. Ankaŭ en nia verda movado tia estas la vero. Ne sufiĉe estas oratori pri la interna ideo kaj en sia privata vivo adopti la malaltajn devizojn de la amaso. Esperantistoj devas vivi laŭ siaj idealoj, se ne, la mondo nur ridos pri ili.

LA PREĜEJOJ DE LONDON.

Pereis en la Granda Brulo de 1688, kiu faris finon al mezepokeca London, multaj antikvaj monumentoj, el kiuj kelkaj havis agon tiel tre grandan ke vi povus konjekt-elekti kiun ajn daton de fondo. Poste, Wren ne konstruis denove ĉiujn tiujn preĝejojn.....li rekonstruis el ili multajn, kiujn de temp' al tempo homoj detruis ĉar ili enviis iliajn stargrundojn---mono pli allogis ol la beleco kaj konsekriteco. Ne longe antaŭ la nuna milito oni malkonstruis All Hallows, Lombard Street, la preĝejon en kiu Charles Wesley faris sian unuan improvizitan predikon. Detruis ĝin ne la Nazioj sed la Ekleziaj Komitatoj, malgraŭ protestoj de la Civita Korporacio kaj la Reĝa Akademio de l'Artoj. Versajne la respondeculoj vendis la grundon al iu banko. Kvankam tre malmultaj Angloj sentis malĝojon en tiu tempo, tamen libere fluis la larmoj de multaj, kiam poste la Germanoj faris en kelke da semajnoj tion, kion la terposedantoj jam faradis dum multaj generacioj en London. Kiel tre koleraj krioj aŭdiĝus se Germanoj brulbomboj detruis la Adelphi Terrace kaj malnovan Regent Street anstataŭ la avida deziro posedi ĉiam ankoraŭ pli da grundo lumono!

H.M.TOMLINSON: "THE WIND IS RISING."
(p.102)

----- (Trad. F.R.B.)

LA PLEJ MALFACILA LINGVO EL ĈIUJ.

Rusaj lingvistoj deklaras, ke la Samojeda lingvo estas la plej malfacila kaj la plej komplikita en la mondo. Ĝis hodiaŭ oni ne povas kompili gramatikon de ĝi, tial ĉar ĉiu verbo havas sian propran konjugacion!

DE PALESTINA SAMIDEANO.

Hadera (Palestino) la monaton Aprilo 1944.

Mi dankas al vi sincere pro la oficiala organo. La bonkoremajn bravulojn de la Aŭstralia armeo, kiuj savis nin kaj nian landon de la Naziaj ungoj mi bone konas, kaj ĉiuj Hebreoj tutkore benadas ilin kaj eterne ne forgesos. Nun vi ebligis al mi ekkoni ankaŭ la Aŭstraliajn pacajn batalantojn, kiuj certe estas tiel bravaj kaj fervoraj kiel la malpacaj batalantoj por la paco de la mondo de la ronda familio.

Bedaŭrinde mi ne havas la eblon rekompenci, tiel mi sendas al vi tri versaĵojn Hebreajn de mi tradukitajn por via ŝatata organo oficiala.

Kun la plej sinceraj bondeziroj kaj salutoj al vi kaj al ĉiuj geaŭstralianoj,

Via D.J.RABINOVIC-TAJC.

KION MI DEZIRAS.

Kion mi deziras nun
Tuj--al vi ne diros--
Mi atendas ĝis la sun'
Post tagiĝ' suriros.

La unua sunrad'
Jam rakontos tiam,
En la koro kion mi
Tre forkaŝis iam.

Kaj la nova birdkantet'
Estos rememoro--
Pri la plor' de mi, homet'
Dum malluma horo.

KIAM FLORAS.....

Kiam floras verdarbetoj,
Ŝvebas, flugas kantbirdetoj,
Kaj la sun' ridetas, lumas
Ĝi al ĉiu palpebrumas--
Mi demandas je la koro:
Ĉu somera estas horo?

Floroj velkos, se mi vidas,
Birdoj en la kaĝoj sidas
Kaj la sun' malofte estas
Ne demandas mi la koron:
Mi jam konas tian horon!

LA 'HOMO KAJ LA KORO.

Tre profundan vastan koron
Ofte havas la homet'--
Ĝi posedas ĉian bonon
De plej alta epitet'.

Sed paroli kor' ne povas,
Kaj suferas ĉiam ĝi--
La plej bona bela restas
Sekretaĵo nur por mi.

POEMOJ. de A.REJZIN, . El Hebrea lingvo tradukis
D.J.RABINOVIC-TAJC.

TRADUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 13: (Kompilita el 3 tradukoj).

VASHINGTON MIRIG-LANDO.

Iu malaltranga oficisto en la Milit-ministerio antaŭ nelonge sugestis la detruon de granda amaso de malnovaj, negravaj kaj ĉifonitaj registraĵoj, por havigi spacon al kuranta aktaro. La skriba propono estis antaŭmetita kaj sendita de unu oficejo kaj unu oficisto al la alia, laŭ kutima rutino, ĝis kiam tute nova dokumentaro formiĝis per tio. Fine dekduo aŭ pli da oficistoj aprobis la detruon de la malnovaj paperoj kaj finfine la ordono alvenis, bruligi ilin. Sed la lasta aŭtoritatulo aldonis la kondiĉon: "Kondiĉe, ke kopioj de ĉiuj paperoj detruotaj estos farit-
aj."

VENKINTA GRUPO: Western Australian Esperanto League.

TRADUKOTA TEKSTO Konkurso 15:

When I attempt to find a simple formula for the period in which I grew up prior to the First World War, I hope that I convey its fulness by calling it the Golden Age of Security. Everything in our almost 1000-year-old Austrian monarchy seemed based on permanency, and the State itself was the chief guarantor of this stability. The rights which it granted to its citizens were duly confirmed by parliament, the freely elected representative of the people, and every duty was exactly prescribed. Our currency, the Austrian crown, circulated in bright gold pieces, an assurance of its immutability. Everyone knew how much he possessed or what he was entitled to, what was permitted and what forbidden. Everything had its norm, its definitive measure and weight. He who had a fortune could accurately compute his annual interest. Each family had its fixed budget, and knew how much could be spent for rent and food, for holidays and entertainments.

(Stefan Zweig: The World of Yesterday.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ 10.10.44.

P.E. SCHWERIN, Flat 1, Carabella Flats, McDougall St.,
Milsons Point. N.S.W.

En "The Argus" (Melbourn) 23/6/44 sidas modesta sed trafa reklamo pri la poŝhorlogo "MOVADO", Eŭropa fabrikmarko. En la Jarlibro de la UEA de 1931j. en listo de varnomoj oni vidas ankaŭ "Movado", kiu ankoraŭ fiere portas sian Esperantan nomon.

ASOCIAJ AFEROJ.

KORESPONDA KURSO. Ni denove memorigas membrojn pri la lastatempe starigita Koresponda Kurso por novaj lernantoj. Skribu rekte al S-ro F.A.PITT, c/- Mentone Grammar School, Mentone, VIC. por informo. Ju pli ni laboros por sukcesigi tion, des pli ni fortigos la Grupojn kaj sekve la Asocion. Parolu pri ĝi al interesitoj, precipe al tiuj kiuj ne povas viziti Klubĉambron, kaj kiom eble subtenu la Kason por propagandi ĝin. Sendu donacojn al la subskribinto. Dankojn al la jenaj por donacoj:- Membroj de M.E.K. £5; D-ro S.J.Woolnough 5/6; S-roj K.E.Coller 5/-; N.Brodie 5/-.

GRATULON. Al S-ro T.E.DONOGHUE el W.A., kiu je la 19a de Sep. solenos la 25an datrevenon de sia B.E.A. Diplomo. Espereble pli kaj pli da niaj membroj partoprenas tiun ekzamenon---skribu rekte al Pastro C.C.Cowling, St. Mary's, TAS. por informo.

BEZONATA! W.A.E. Ligo bezonas jenajn numerojn por kompletigi sian kolekton de Aŭstraliaj eldonaĵoj. "Suda Kruco"---N-roj 22, 51, 53 al 58 inkluzive, 60 al 73 inkl. 75 al 86 inkl. 154 kaj 163. "LA RONDO"---N-roj 2,3,10,11 kaj 14. Tiu Ligo volonte aĉetus ilin--skribu al D-ro C.J.Caldera, 220 St. Georges Terrace, PERTH.

SEKRETARIA ADRESO. Dum la sekvantaj 6-8 monatoj la Sekretaria Adreso estos kiel sube. Dum 3 semajnoj post 20a de Aŭgusto li estos for el Sydney.

G.H.HILLERMAN (Sekretario) 15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

A.E.A. Rilate al la elekto de la estraro de A.E.A. okazinta en Majo, mi diklaras la jenajn elektitaj. Ili, laŭ statuto, okupos oficon dum 1944 kaj 1945.

SEKRETARIO: S-ro G.Hillerman, ununanime elektita.
VIC-PREZIDANTO " G.Chatterton.
ESTRARANO: 1. " P.Schwerin.
 2.F-o W.Addis.

FLORENCE RAWSON,
 Prezidantino.

NIA OFICIALA ORGANO "LA AŬSTRALIA ESPERANTO-GAZETO MONATA."

Kun konsento de la Komitato ĝi reakceptos sian originan nomon "LA RONDO", kiu pruvigis esti pli taŭga ol la longa titolo. Ĝi havos ankaŭ subtitolon "Australian Esperanto Monthly."--

KASO. Kvitancoj ricevataj dum Aŭgusto....S-ro V.Rutland 5/-;
S-ro W.Sawers £/-; S-ro A.W.MacKenzie 5/-; S-ro E.Hart 5/-; F-ino
J.Mitchelson 5/-; S-ino Johansen 9/-, S-ro Dornbusch 5/-.

A few copies of back numbers are available from the Cashier.
State which month you require, and enclose 3d. with request.

Please leave office of payment blank on Postal Notes.

W.ADDIS, (Kasistino), 25 Greville Avenue, Flinders Park, S.Aus.

ERARO en nia Aŭgusta numero: 156/23 originala (origina).

LETEROJ RICEVITAJ.

De L.E.B. Tre interesis min legi la leteron de S-ro Hanks pri
antologio de Aŭstraliaj poemoj Esperante. Tro frue estas presi
tiam, sed ne tro frue komenci tradukojn kaj originale verkitajn.

La propono pri premio estas tre kompleza liaparte, sed mi mem
opinias ke tiu ne estas plenumbla. Poezio Esperanten estas mal-
facila kaj verki kaj traduki, kaj memevidente estus la laboro de
niaj plej lertaj Esp-istoj. De tiuj ni ne havas grandan nombron,
kaj kompreneble unu el ili devus esti juĝanto por la premio, do
necesese mankus al ni liaj tradukoj. Pro tio, mi opinias, ke pli-
bone estus, se S-ro Hanks kaj aliaj elektus la plej taŭgajn poem-
ojn Aŭstraliajn por traduko, ke LA RONDO presu la tradukaĵojn kaj
elektu la plej bonan---unu poemo po monato. De S-ro J.Eljot ni
jam havas bonegan tradukon de "Waltzing Matilda."

Se ni povus esti pretaj nun, kaj presi tiam antologion post
la milito, tiu donus al Aŭstraliaj Esperantistoj altrangan lokon
inter Esperantistoj de ĉiuj nacioj.

RESPONDO. Ni invitas tradukojn de "My Country" (Dorothea Mackell-
ar.)

De ALLAN TURNER. Ĉu la kluboj iam okazigis ekspozicion el Esp-
erantaj valoraĵoj por propaganda celo? Mi havas kelkajn, inter
ili kablogramo en Esp-o kiun mi ricevis de Anglujo je la unua
tago de la Beam-servo inter Anglujo kaj Aŭstralio, ankaŭ Esperant-
aj poŝtmarkoj.

S-ro E.HANKS tre volonte aŭdus pri surdaj homoj interesataj de
Esperanto. Lia adreso--736 Sydney Rd., N 14, VIC.

F-no M.C.TRUNDLE. May I say how much I enjoyed reading in the Aug.
number of the AFM a short paper on the New Forest? It was so in-
teresting, and unfortunately very short.....

The story of Rufus is painful. I have a little picture of the

house and the descendants of the man who found the king's body. No priest uttered a prayer over him, nor were masses said for his soul, as onemhistorian said: "The Conqueror's sins could be mentioned but not his sons." Whenever Rufus joined a gathering of men, they quietly withdrew, no one would remain.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO.

Samideanoj! Bonvolu pagi viajn kotizeojn kiel eble plej frue. Farinte tion, vi bone helpos al la I.E.L. Sendu tuj al la lokaj delegitoj aŭ rekte al la ĉefa delegito, LESLIE E.PFAHL, 64 Brighton Street, Croydon, N .S.W. Aliĝu kiel membro-abonanto kaj vi ricevos la Jarlibron kaj gazetojn (10 ŝil. jare). Varbu novajn anojn!

Via sincere, LESLIE E.PFAHL.

KVINSLANDO: Ankoraŭ unu transmara vizitanto al Brisbana Esp. Soc-
ieto---Soldato Jodeph Milan, de la Usona Armeo. S-ro Milan estas
ano de la Pan-Amerika Esperanto-Asocio, kiu kunvenadas je Hotel
New York. Li asertas ĝin la plej grava Esp. asocio en Usono. La
P-A.E.A. celas esti vere tut-Amerika, kaj lastatempe ĝia prez-o
(S-ro G. o'Connor) vizitis Brazilon, kiu lando, en almenaŭ iuj
Ŝtatdepartementoj, faris Esp-on dua oficiala lingvo. La P-A.E.A.
ĵus komencis eldoni gazeton kun identaj artikoloj en la Angla,
Hispana, Portugala kaj Esperanto, precipe por cirkulado en Sud-
Ameriko. Esp. lecionoj ankaŭ aperas en ĝi. Krom ano de P-A.E.A.
S-ro Milan estas I.E.L. delegito en New Jersey.

-----S.WANMER.

MORTOJ. Decembron 1943 en Bern, Svisujo, 71-jaraĝa Rene de Saus-
sure. Lingvisto. En serio de brilaj monografoj li defendis Esp.
kontraŭ atakoj de Ido, sed poste mem verkis kelkajn reviziaĵojn
de Esp.

Saussure---la pura, klara Mens',
La projektinto, projektonto,
Trabrilis, kvazaŭ lumofonto,
La vortstrukturnon lia Lens'. (Kalocsay).

7.10.44 en Neŭchatel, Georges Stroële, 65-jara. I.E.L.-ano,
li bonege laboris por Esp. jam de fruaj tagoj.

Stroële, el recenzista gildo
Karesas ame ĉiun belon,
Kvankam atentis la nivelon,
Recenzas li kun kora mildo. (same)

PRILINGVAĴOJ.

Ĉu "alie" povas signifi "aliloke"? En "Fabeloj de Anderson", volumo 2, p.152, linio 10: "Tie aŭ alie staris pomarbo." Ĉu vere intence Zamenhof uzis "alie" en tiu senco de "aliloke", per tio donante al ĝi duan signifon? La Fabelojn li tradukis pere de GERMANA traduko de la Dana originalo. Ĉu li lasis sin influiĝi de la elaste-senca "anderweit" (aliloke, alitempe, alimaniere)? Tia dubsenceco povas alporti al uzantoj de nia lingvo embarasojn tre malagrablajn. Unueco de vortsignifo estas pli grava ol unueco de vortformo. Tre dezirinde ja, ke unu formo regu inter bu(d)ĝeto, reviz(i)io, Aŭstrujo (-io): sed necesege, ke preciza signifu elektorato, akademio, konvencio, ministro, sovaĝa, doktoro en ĉiu kunteksto.

How long is that short piece of string? Ĉu traduki per Kiom da long(ec)o havas tiu mallonga (negranda, kurta?) peco de ŝnuro?

Pri "je" uzata kiel anstataŭaĵo de la akuzativo.

Ĉu aŭtune aŭ vintre, freŝa aŭ salita,

Vojski ĉasas je "muŝo-morto" amanita. (Grabowski, "Sro Tadeo")

(amanita, genro de fungoj, tre venena). Tiel en la pozio por rimi kun antaŭa nominativo ĝi estas tre oportuna. En la Rumana (pe) kaj Hispana (a) oni simile uzas prepozicion ĉe akuzativo. F.R.B.

The facility of artificial languages is sometimes overemphasized by enthusiastic propagandists. Tolstoy learned Esperanto in a few hours, and any Western scholar can read Latino at first sight; obviously an uneducated Slav, Teuton or Asiatic would have a harder time; even a good linguist will need study and practice before he can write or speak an auxiliary language fluently. But, after discounting extravagant claims, the fact remains that Esp-o, Occ., or Latino are considerably easier than the best historical languages... To my mind, neutrality is far more essential than facility. But the advantage of facility is not to be spurned.

...in every man there slumbers a Hitler, eager to enforce his will and assert the supremacy of his tribe. Many Americans, not consciously imperialistic, take it for granted that when the world comes to its senses it will adopt the language as well as the fashions of Hollywood. Among English radicals there survives an enormous insularity which would be ludicrous if it were not so distressing. H.G.Wells chides mankind for not creating the World State--- but the Wellsian World State must be of English speech. A subtle logician like Mr. Ogden is on this point... obtuse. His Basic is a remarkable pedagogical contrivance; it might be subtitled "English almost without tears". But with its boldly simplified grammar and its streamlined vocabulary, it remains English. It does not at-

tempt to correct the perverse spelling and the bewildering pronunciation of traditional English. Men who start with Basic will inevitably graduate into standard English, and they will find English one of the tersest and most idiomatic languages in the world---that is to say, one of the most difficult.

VORTOJ AL LA VELKIGEMULOJ.

"Por konvinki pri tio ĉi niajn aŭskultantojn, ni petas ilin prezenti al si, ke kongreso da reprezentantoj de diversaj regnoj jam efektiviĝis, kaj ni trarigardos, kian lingvon ili povus elekti. Ne malfacile estos por ni pruvi, ke ekzistas nur unu sola lingvo, kiun ili povus elekti, kaj ke ĉia elekto de ia alia lingvo estos por ili rekte ne ebla, se ili eĉ volus ĝin elekti, kaj ke se ili kontraŭ ĉiu atendo kaj spite ĉiuj argumentoj de la sana prudento tamen elektus ian alian lingvon, tiam kontraŭ tio ĉi protestus la vivo mem kaj ilia elekto restus nur malviva litero." (La supra estas el la konata artikolo de D-ro Zamenhof, Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia. Ĝi estas en La Fundamenta Krestomatio p. 268, kaj meritas la aman studadon deĉiu efektiva Esp-o.)

HOJ SINJORO DISNEY---NI P-E-T-A-S!

La filmoj devas esti korektaj en tiuj ĉi tagoj, se ne, S-ro Publika koloras kaj kriegas. Jam pasis la tago kiam filmo pri la brulo de Romo povas montri infanveturilon.

Tiele estis kiam la movbildo "Fantasia" de Walt Disney aperis sur la ekrano de Pittsburgh, Penns.

Troviĝis parto kie giganta tyrranosauro batalas ĝis morto kontraŭ terura stegosurus. Jus meze de tiu batalo, vidanto en la teatro kriegis doloran proteston.

"Ne, NE, NE!"

La krio venis de Kuratoro J. Jeroj Kaj, de Muzeo Carnegie kiu kaptis Disney en doloriga eraro. Sajne, la tyrrano estas de la kretacea periodo kaj la stego de la jurrasa, kaj inter la du periodoj pasiĝis nur eta tempodaŭro da 90,000,000 jaroj. (El LIFE)

-----L.E.B. (Trad.)

Kiam gepatroj persistas tamburi
La virtojn de propraj infanoj,
Tiam min vipas la urgo forkuri
Kun kapo krevanta en manoj.

F.R.B.

L A R O N D O.

THE
A U S T R A L I A N
E S P E R A N T O
M O N T H L Y.

-o-

Vol. 5, No.1, Oct., 1944

EDITED BY

F.R.BANHAM, 2 BANCHORY St., ESSENDON W5., VIC.

LA R O N D O.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

---o---

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.AUS.

---oooo---

EKSPERIMENTO EN LA TOLEREMECO. (1)

De Fay Jackson en The A.B.C.Weekly, 2.9.44.

Usona urbo provas la taskon kontraŭi la maltoleremecon, kaj konstrui staton de reciproka simpatio. D-ro Clyde Miller, de Columbia Univ., observis tion, kio okazis en Germanujo. Li opinias, ke tiajn malbonojn ni ne evitos per simpla malaprobo. Ni devas analize studi la koncernan socion; poste, trovinte ĝiajn nebelajn flankojn, komenci pozitivan agadon ilin forigi. Li kredas, ke Usono estas aparte taŭga laborejo en kiu fari tian eksperimenton, ĉar en tiu lando trovas sin homoj el ĉiuj nacioj, kiuj, malgraŭ intermikso en la "fandpoto," ankoraŭ sentas en si iom da antipatioj, naciaj, rasaj kaj religiaj.

Por la eksperimento elektigis Springfield en Massachusetts---urbo kun miksrasa loĝantaro de ĉirkaŭ 150,000, Usonanoj, Irlandanoj, Francoj, Kanadanoj, Poloj---kaj oni komencis en la lernejoj specialan programon, kiu havis kiel ĉefan ideon la civitaneco. Oni substrekis la kontribuon de ĉiu parto al la tuto de la socio, kaj ankaŭ tiris en lumon la antipatiojn sentatajn de tiu aŭ alia grupo aŭ individuo.

En ĉiuj lernejoj, de infanaj ĝis altaj, estis instruate pri la kontribuoj al la kreskado kaj evoluo de ilia lando, kiujn faris Judo, nejudo, negro, blankulo, kaj cetere. La lernantoj studis la elstarajn laborojn de fremddevenaj Usonanoj en kampoj scienca, literatura, arta, muzika, industria kaj civitana. Kiel parton de la lecionoj la lernantoj kompilis tri librojn---unu pri la vivspertoj de homoj de diversaj rasdevenoj, kiuj enhejmiĝis en Usono. La geknaboj serĉis la faktojn en la kampo de siaj personaj konoj. Tipaj ĉapitroj estis: Mia Onklo de Ŝotlando. Italaj Fratoj konstruas niajn Hejmojn. Mia Franca Avino. Bakisto de Bavario, ktp. Alia libro enhavis kolekton da kantoj el multaj nacioj. Kelkajn kontribuis la geknaboj, aŭdinte ilin de la lipoj de gepatroj, geavoj aŭ aliaj parencoj.

Oni emigis la lernulojn paroli kun fajrestingistoj, policanoj, terkulturistoj, kaj urboficistoj. Poste, en la klasĉambro ili pentris dekoraciajn panelojn titole La Kontribuo de la Terkulturisto al la Urba Vivo; La Laboristoj; La Registemo de Usono, kaj similaj.

Oni ankoraŭ atakis rasajn kaj religiajn malamojn, montrante per homperdaj kaj ordenaj listoj, ke ankaŭ Usonaj soldatoj kun Judaŭ fremde-sonaj nomoj bone servas kaj suferas. Religian maltoleron oni atakis, kompare studante la ĉefajn di-krédojn, konfesion, kultojn. Eĉ plie: la geknaboj ĉeestis Romkatolikajn mesojn kaj Protestantajn kaj Judajn diservojn. Aparte interesis tio, ke en la lerneja ludprezento Kristnaska enmetiĝis sceno el la Juda Ĉanuka (festo de lumoj), krom Kristana pri la nasko de Kristo.

En la lernejo por progresintoj, studentoj esploris la demandon pri labor-malpermesoj (2). La geknaboj kondamnis kontraŭnegran senton, kaj ĵuris, ke ili laboros flankalflanke kun negroj, kiam ili finos la lernarojn. Tio ne estis nenisignifa frazaĉo. Por la unua fojo la direktoro de la lernejo donis oficon al negra instruisto; tiun dungon ĉiuj plene aprobis. La Lerneja Fako de Ofic-Akirado ekklopodis havigi al negroj pli bonajn loĝkondiĉojn kaj laborlokojn.

Progresintaj junuloj parolis kun redaktoroj por sciigi, kiel tiuj kolektas novaĵojn, kaj kiel redaktora politiko tendencigas aŭ ide-nuancigas novaĵojn. Per radio kaj ĉiaj eblaj rimedoj oni emigis la gepatrojn de lernantoj pridiskuti premajn soci-demandojn. La bazideo estis: inokuli ŝtatanojn per faktoj, tiel igante ilin rezistipovaj kontraŭ ĉiadevena propagando kiu ekspluatas la diversajn antipatiojn. Oni ne kaŝas la nebonaĵojn de Usona Demokratio; male, ŝatas lunon sur ilin, por ke ili estu forigitaj, se eble.

Vi diras: "Tre interese; sed kiel tio rilatas al Aŭstralio, lando preskaŭ cent-pro-cente Brita kaj sen naciaj aŭ religiaj problemoj?" Ni respondas: Ankoraŭ ne problemoj, ŝble; sed certe antaŭjuĝemoj. El ni multaj ne tre simpatias kun la fremduloj inter ni. Ĝis nun ni sentis nur malmulte da intereso pri niaj apudaj najbaroj Pacifikaj, des malpli pri la pli foraj. Tamen, kion ili pensas kaj faras, tio grave influos sur nian landan sorton. Dume, la klasĉambroj de Springfield povas interalie instrui, ke eblas ankaŭ al ni sentadi afable kontraŭ la transstrataj najbaroj, malgraŭ ilia Judeco, Romkatolikeco aŭ alia. Ni povas lerni, ke la propra lando ne ĉiam kaj ĉiel superas la ceterajn, sed ke en fremdaj foje povas naskiĝi kre-ideoj kaj far-manieroj pli bonaj ol niaj.

Pro malunueco kaj intergenta malamo ni fariĝas viktimoj de parolistoj kiuj siaprofite celas stimuli la pasiojn, la emociojn. En la Springfield-a instruĉambro sincera grupo sukcese studas tion, kiel la homoj povas unuigi, kulturante la kritikan kapablon.

H. R. BANHAM, (Trad.)

- (1) En la Franca, Germana, Angla kaj Esp-a lingvoj "tolero" estas uzata en du sencoj: (a) pacienca suferado; eltenado, elportado. (b) indulga permesado de io, milda sinteno al io, pro grandanimeco, politiko, aŭ indiferento.

- (2) tio estas: la devigo al iaj laborhomoj, ekzemple negroj, ke ili laboru nur en difinitaj sferoj de servo---kiel hotellak-eoj, domservistoj, kelneroj, botciristoj kaj similaj, sed ne en la pli "dignaj" metioj. Kelkaj sindikatoj, laboristaj defendorganizaĵoj, ne permesas membrecon al negroj; kaj la nigrahaŭtaj soldatoj de Usono, batalante por la libereco kaj rasegaleco, devas servi en siaj propraj regimentoj. (Notoj de F.R.B.)

LA ENIGMO DE LA KUKOLO.

Kukoloj estas famaj pro la stranga instinkto serĉi taŭgajn nestojn apartenantajn al aliaj birdoj por tie demeti ovojn. Malgraŭ ke la ovoj ofte estas malsimilaj al tiuj de la veraj posedantoj de la nestoj, tiuj ne rimarkas la trompojn. Tuj post la kukolado elkoviĝas, ĝi malrapide sed metode metas sian dorson sub la korpojn de la aliaj birdoj, kaj unu post la alia, elĵetas ilin el la nesto.

De la tempo de Aristotle, tricent jaroj antaŭ Kristo, ĝis hodiaŭ, tiu konduto mirigis homojn. Dum la lastaj tridek jaroj spertaj observantoj eltrovis multon antaŭe ne konatan pri tiu stranga instinkto.

Ne ĉiu speco de kukolo estas parazita. El niaj dek kvar Aŭstralaj specoj estas unu---la "Pheasant Coucal" de norda Aŭstralio ---kiu konstruas neston kaj prizorgas siajn idojn. En Norda Ameriko neniu speco de kukolo estas parazito. Tie alia familio, la Bovinbirdo, (Cow-bird), familio ICTERIDAE, havas tiun strangan instinkton. Post la surpriza eltrovo ke aliaj specoj ol kukoloj povas esti parazitoj, sciencistoj trovis ke kelkaj aliaj specoj agas simile, nome, en Afriko la malgranda Mielgvidisto (Honey-guide) la Teksiŝto-birdo (Weaver-bird), kaj en Ameriko, unu speco de anaso.

En kia maniero tia stranga, kompleksa instinkto povas evolui? Tiu demando dum pli ol dumil jaroj ŝajnis esti nerespondebla. La laboro de Usona ornitologiisto, Herbert Friedman, pri la parazita instinkto en pluraj specoj de Bovinbirdoj donis al la mondo klarigon pri la evoluo de parazitismo en la birdmondo. Unue, oni devas rimarki ke ĉiu speco kiu estas parazito estas normala birdo. Tute ne estas pro ia korpa malformo ke ili agas tiel, ĉar, inter ĉiu familio kiu enhavas parazitojn, ankaŭ ekzistas specoj kiuj bone prizorgas siajn idojn. Ekzistas nombro da specoj de bovinbirdoj tra la du kontinentoj, Norda kaj Suda Ameriko. Jen tre interesa afero. Friedman, kiu zorge pristudis ilin, trovis ke ankoraŭ ekzistas specoj kiuj bone prizorgas siajn idojn, nome, unu el genro AGELAIOIDES, Bejflugila bovinbirdo, (Bay-winged Cow-bird.) Tiu speco estas trompita de alia tre simila. Do, ekzistas bovinbirdo kiu parazitigas bovinbirdon. Ĉiam la Krianta Bovinbirdo (Screaming Cow-bird) demetas sian ovon en la neston de la Bejflugilo-bovin-

birdo. La du specoj estas tre similaj: nur spertuloj povas distingi inter ili. Sed unu estas ĉiam parazito, kaj la alia, neniam. Kaj jen, alia frapa fakto, la Krianta Bovinbirdo kaj la Bejflugila Bovinbirdo devenis de unu speco. Do, unu speco evoluis en du formojn, unu normala kaj la alia parazita. Kaj la idoj de la Krianta Bovinbirdo neniam malbone kondutas sin kontraŭ la Bejflugilaj idoj en la nesto, sed pace loĝas kunekun ili.

Kial parto de unu speco iĝas parazito sur la alia parto? Malfacila demando.

Dum lia pacienca enketo, Friedman observis strangan konduton fare de la ŝajne tute ordinara Bejflugila birdo. Tiu speco ŝatas uzi la neston de aliaj specoj---la neokupitan neston, se eble. Sed se tiu estas netrovebla ĝi forpelas alian birdon el ĝia nove konstruita nesto. Tamen, ĝi ankoraŭ scias la konstruarton kaj, se taŭga nesto ne estas havebla, ĝi mem konstruas unu. Alia frapa fakto: En alia parto de la lando troviĝas parenca speco kiu devas ŝteli neston, ĉar ĝi tute ne povas mem konstrui.

Friedman do trovis la ŝlosilon de la Bovinbirda enigmo. La parazita instinkto evoluis grade. Inter la specoj de Bovinbirdoj oni povas sekvi la evoluon en stadioj. Ĉu tiu historio ne povas montri lumon sur tion de la plej perfekta parazito, la kukolo mem?

Ni povas vidi inter la diversaj ekzistantaj specoj de la Bovinbirdoj tra Norda kaj Suda Ameriko, la evoluon de la parazita instinkto.

(1) La speco pli kaj pli ŝatas uzi la neokupitan neston de alia speco. Jen komencas la malfortiĝo de la nest-konstrua instinkto; tre serioza afero en la evoluo de ia speco.

(2) La speco ne plu konstruas neston, sed ĉiam forprenas tiun de alia speco. Perdo de la kapableco konstrui neston en la speco.

(3) Ofte ne trovanta neston, la speco demetis sian ovon en alian neston; komence nur en unu de samspecano kiu sukcesis "ŝteli" la neston de alia birdo. Malfortiĝo de la instinkto prizorgi idojn. En tiu stadio la fremdulo ne havas instinkton mortigi la aliajn idojn en la nesto.

(4) Demetado de ovoj en neston de aliaj specoj ol Bovinbirdo. Perdo de la instinkto prizorgi idojn. Kiam Bovinbirdo estas en la nesto de ia malgranda birdo, necesas ke la granda parazito havi la tutan nutraĵon aŭ morti. La instinkto mortigi la pli malgrandajn birdidojn iĝas tre valora al la parazito. En kelkaj specoj de Bovinbirdoj la idoj mortigas la aliajn idojn per la piedoj, puŝantaj ilin en la malsupron de la nesto.

(5) Fina kaj plej miriga instinkto: la parazito elĵetas la aliajn birdidojn el la nesto. Tiu ne ekzistas ĉe la Bovinbirdoj.

Ĉu la atingo de tiu lasta instinkto bezonas grandan evoluon? La studo de la evoluo de la Bovinbirdoj okupis longan tempon kaj bezonis multajn vojaĝojn. Ĝi donis al ornitologio tre riĉan rikolto.

En Aŭstralio ne ekzistas Bovinbirdoj. Ni havas dek kvar spec-

ojn da kukoloj kaj nur unu el ili konstruas neston. Ŝajne la perdo de la instinktito konstrui neston estas pli facila afero ol ni antaŭe kredis. Inter niaj aŭstraliaj birdoj ofte ni rimarkis specojn kiuj tre ŝatas okupi la malnovajn nestojn de alia speco. Kaj ni ankaŭ havas specojn ĉe kiuj pli ol unu birdo demetas ovojn en la saman neston. El tiuj ŝajne nerimarkindaj agoj povas grade veni la perdo de gravaj instinktoj ĝis finfine la speco fariĝas tute parazita.

ERNEST S. HANKS.

RIMARKO DE LA RED.---Por mi "bejflugila" ne estas klara. "Bejo" laŭ Millidge signifas "Turkish governor"; Boirac, turka ĉefoficiro subpaŝaho.

KONKURENCO (El Punch 4.12.1935)

Troviĝas nur du butikistoj ĉe nia fino de vilaĝo Little Wobbly ---Bloggs la spicisto kaj Longfellow la feraĵisto. Ambaŭ interpretis alian mision en la vivo iom vastkoncepte, kaj Bloggs enkalculis inter siaj spicaĵoj ankaŭ tiajn objektojn kiaj harkremo, silkaj koltukoj, konfittortoj, kameretoj, hepatiloloj kaj falsaj lipharoj; dum Longfellow facilanime havis koncernon kun ĵurnaloj, tabako, razilklingoj, krom feraĵoj. Ekzistis implicita konsento ke nek unu nek la alia vendu aĵojn de specoj rajte propraj al sia konkuranto; sed antaŭnelonge Bloggs ektrovis ke Longfellow havigis al Sinjorino John-Clitheroe maldikigajn salojn, kaj ek de tiam ĉiu komencis vendi la apartaĵojn de la alia.

Dum la sekvantaj du semajnoj la vilaĝo rigardadis kun senspira intereso la batalon inter tiuj forteguloj de la komerco. La ĝentileco de ambaŭ antaŭ aĉetantoj iĝis preskaŭ naŭza, kaj ĉiu el ili faris frapajn plibonigojn en sia butikoj. Antaŭe dum jaroj ni mire cerbumis pro blanka glatbrila avizo en fenestro de Bloggs kiu lakone diris POP OFF (ekiru!) sed ree lokiginte la literojn kiuj antaŭe forfaliĝis, li nun invitis nin provgusti POPP'S TOFFEE (la sukeraĵo de Popp). Bloggs kuŝigis novan linoleumon en sia vendejo, kaj Longfellow, rebatante, aĉetis pordmaton kun literoj "BONVENU."

Jarojn kuŝis en fenestro de Bloggs vitra telero enhavanta kelkajn tre polvajn specimenojn de grandaj rondaj sukeraĵoj kun nomo Ogo Pogo Okuloj. Ni antaŭsupozis ke pro sia nova humoro li lavos la teleron, sed kiam ni vidis ke li ankaŭ lavis la sukeraĵojn, ni preskaŭ timis pri li. Longfellow senpolvigis poŝmemorlibreton de 1935j., kiu kuŝaĉadis dum dudek monatoj en lia fenestro, kaj proponis ĝin rabate.

"Ili ne povas elteni la streĉadon multe pli longe," diris Edito unu tagon kiam Bloggs du fojojn nomis ŝin "Sinjorino."
"Post nur kelke da tagoj unu el ili mortos pro trolaboro. Bloggs

metis novan pecon de krispa papero sur la mortintaj muŝoj en sia fenestro, kaj Longfellow ĉirkauŝtranĉetis la lipharojn."

Tamen, ankoraŭfoje enirinte la butikon de Bloggs, mi devis tri fojojn sonorigi antaŭ ol li konsentis eligi el la malantaŭa saloneto, kaj mi havis doloran suspekton ke la malbonaj tagoj revenis. Li ne nomis min "Sinjoro", sed montris sian antaŭan manieron, kiu ŝajne trovis impertinenta miaparte deziron ion aĉeti.

"Se vi tenadas min staraĉanta tiumaniere," mi diris kolerete, "mi transdonos mian patronecon al Longfellow."

"Estas egale al mi," diris Bloggs kontente. "Longfellow kaj mi jam decidis ke konkurenco estas neekonomia, do ni kompaniigos, kaj la venontan semajnon la du butikoj fariĝos unu."

"Vi nomos vin kio?" mi demandis. "Bloggs kaj Longfellow, aŭ Longfellow kaj Bloggs?"

"Ni multe diskutis pri tio," respondis Bloggs. "Kompreneble mi deziris 'Bloggs kaj Longfellow', kaj li deziris 'Longfellow kaj Bloggs'. Iam ŝajnis ke interkonsento estos neebla, sed fine mi ricevis trafan ideon kaj elpensis nomon kiu taŭgos al ambaŭ."

"Kia nomo?" mi scivolis.

"La Kompetentaj Provizejoj," li diris, kaj knaris ree en la malantaŭan saloneton sen ĝeno eĉ diri "Bonan Vesperon."

----- (Trad.)

ĜUSTIGO. Ni fieris legi en la I.E.L. Jarlibro historieton pri nia movado en Aŭstralio. Tamen ĝi ne estas tute ĝusta. Ne laŭfakte estas la aserto: "la grupo 'Nova Espero' en Adelaide petis F.R.Banham en Melbourne gvidi por ili tradukan rondon, kun la celo plibonigi la lingvo-nivelon de membroj." Jen la faktoj:-

Deziranta informon pri ekzamenoj, mi skribis al London. Responde, ili konsilis min kontakti je S-ro Banham, kiu proponis al mi traduk-kurson por pretigi min por la ekzameno. Rezulte, ni du solaj laboris kune du-tri monatojn. Mi tre ŝatis tiun kurson, kiu ŝajnis al mi tro valora por profiti nur al unu partoprenanto, do, post konsiderado mi skribis al S-ro Banham kaj proponis ke li donu al aliaj Esperantistoj inviton aniĝi, kaj se jes, mi bonvole farus por ili kopiojn de la necesaj folioj. Tio ja okazis. Mi ne scias kiam aliaj Sud-Aŭstralianoj aliĝis al la kurso---eble post tiu invito.

Jen kiel naskiĝis nia gazeto. Iom da tempo post ol aliaj Esperantistoj aliĝis al la Traduk-kurso, S-ro Banham demande skribis al mi ĉu mi konsentus fari kopiojn de folio pri mondmovadoj Esperantaj por enmeti kun la kurs-folioj de anoj. Kompreneble mi konsentis, kaj proponis du foliojn kune falditajn, kiel eta gazeto. Tia postulis titolon! Kaj ni, t.e.d. S-ro Banham kaj mi, diskutis pri la titolo ĝis mi sugestis "Nia Rondo," kiun S-ro Banham plibonigis al "La Rondo." Do, la letero al mi de S-ro

Banham proponanta la novaĵ-folion estis la semo el kiu kreskis la gazeto kiu de tiam tenadis la aman lojalecon kaj helpon de niaj legantoj.

----- L.E.BAILEY.

KIEL MI FARIGIS MILIONULO. (de Jozefo Major, en La Interna Ideo, Nov-Zelando, Februaro, 1944)

Estis antaŭ 25 jaroj. Mi ĵus lernis Esperanton en la Laborista Grupo de Budapest. En la Kolegio, dum matematika leciono, kiam mia najbaro legis kaŝe detektivroman, mi legis la Fundamentan Krestomation! En tiu tempo mi ne sciis, ĉu estas Esperantistoj alilande, mi nek vidis Esperanton gazeton, nek sciis pri kore respondo. Ĝis la tago kiam mi ricevis ekzotikan poŝtkarton el Aŭstralio. Ĝi estis propono pri korespondo en Esperanto.

Mia instruisto en la klubo donis mian adreson al iu, kaj iamaniere S-ro Pyke en Melburno ricevis ĝin kaj skribis al mi. Kvazaŭ bombo min trafis tiu simpla poŝtkarto. Simile al katalizilo en ĥemiaj procedoj, ĝi profunde influis mian tutan vivon. Estus tro longe detali la kialojn ĉi tie; mi kontentiĝos priskribi kiel mi fariĝis milionulo dank' al S-ro Pyke!

La unua granda kongreso post la mondmilito okazis en Prago. S-ro Pyke skribis al mi, ke li venos el Aŭstralio, kaj mi persvadis miajn gepatrojn ke ili permesu min vojaĝi "eksterlanden" por la unua fojo kaj renkonti mian foran amikon. Kaj tiel okazis. Kun korbato mi prenis la manon de la Aŭstralia samideano. Li estis bonegulo sed lia alparolo estis stranga. Mi lernis la elementojn de la Aŭstralia-Angla parolmaniero kiam mi kutimiĝis al liaj sonoj. Sed fine ni komprenis unu la alian kaj nia amikeco estis granda. Granda kaj longa; ĝi daŭris ĝis la tragika morto de S-ro Pyke, kiu malaperis el vaporŝipo sur la Hinda oceano, revene de iu kongreso... Sed en Prago li estis vigla kaj gaja. Li akompanis min al Budapest kune kun lia tiutempa sekretario, S-ro R. Rawson, libristo el Melburno kaj ĝisnun aktiva Esperantisto. Mia patrino invitis ambaŭ por loĝi en nia hejmo, kaj la du verdsteluloj de trans la oceanoj okupis la litĉambron de miaj gepatroj. Esperanton tiuj ĉi ne komprenis sed gastamaj ili ĉiam estis kaj ilia koro estis ĉiam malfermita al fremduloj. Jes, miaj gepatroj vere praktikis homaranismon, tute ne sciante pri ĝia ekzisto! Mi devas ridi kiam mi rememoras tiun semajnon. Du Aŭstralianoj subite vivis en la mezo de simpla Hungara familio. Ĉiu el ni pensis ke la aliaj estas strangaj, sed niaj kritikaj observoj estis ĉiam bonvolaj. Mi pensis ke ili kondukas alimaniere ol ni, kaj eble ili estas pravaj. Kaj mi estas certa ke S-ro Pyke same pensis.

Nu, mi ne volas streĉi vian atenton pli longe kaj mimiros al vi kiel mi fariĝis milionulo, dank' al mia kara vizitanto.

Forirante, S-ro Pyke donacis al mi unu Anglan funton. En banko mi ŝanĝis ĝin al mi en naciajn bankbiletojn kaj mi ricevis tutan amason da ili---fakte pli ol milionon! Kiel tio estas ebla? Nu, tiutempe ni vivis en periodo de inflacio. Miliono tiutempe ne estis tre granda sumo, sed por mi, malriĉa knabo, ĝi estis trezoro. Kion mi faris per ĝi? Oni ja povas diveni---mi vizitis la Esperantan librovendejon kaj aĉetis la tutan stokon. Ĝi ne estis tre granda sed mi ricevis eble dekduon da bonaj libroj kiuj permesis al mi ĝui la belecon de nia lingvo. Tiel mi perfektigis en Esperanto kaj komprenis la internan ideon dank' al S-ro Pyke el Aŭstralio. Honoran kaj aman penson al lia memoro.....

TRADUK-KONKURSOJ.

TRADUKO de KONKURSO 14: (Kompilita el 3 tradukoj.)

Parolo estas la plej grava el la homaj kapabloj. Sen lingvo---en ĝiaj formoj buŝa kaj skriba---estus neeble, koncepti la ekzistadon de l' homa socio kun ĉiuj siaj malsimplecoj kaj diverseco. Ĝi ne nur distingas la homon de aliaj mambestoj ebligante al li, komuniki kaj registri siajn pensojn, sed ĝiaj diversecoj ankaŭ formas unu el la karakterizaĵoj de malegaleco inter la sennombraj grupoj de l' homa socio. Tiurilate ĝi malfeliĉe servas ne nur kiel trajto de diferenco, sed same kiel faktoro de apartigo; kaj tio, kio estas komunikilo de pensoj interne de ĉiu lingva grupo, fariĝas barilo al kompreno inter la nacioj.

Venkinta Grupo: SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Tradukota Teksto KONKURSO 16:

I had talked on my roving trip, with barefoot men who had never seen snow, with others who had never seen the sea, or a mountain. On one side of the earth I had heard these two revered words: "Christianity," "Democracy." On the other I had watched, from afar, golden idols in temples that I was not allowed to enter. Even this universal word "freedom" that was being cried out or whispered under every latitude had not the same meaning everywhere. The freedom of the Chinese, the freedom of the Russians, was in no way comparable with that of the English or the Americans. No, the world was not small---not small even for those who travelled at full speed. The countless masses of "common men" with white, brown, black, or yellow skins did not travel in Clippers: nations did not move.

(Eva Curie: Journey among warriors.)

Tradukaĵoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.11.44.

P.E.SCHWERIN. 1 Carabella Flats, McDougall St., MILSONS POINT.
N.S.W.

PYKE MEMORIGA EKZAMENO.

Kiel en antaŭaj jaroj la Pyke Memoriga Ekzameno okazos en Novembro, kaj la komitato invitas partopreni ĉiun, kiu ne posedas ĝian atestilon.

Rajtas partopreni ĉiu Esperantisto, kiu loĝas en Aŭstralio kaj tiuj, kiuj sukcesas, ricevas atestilon de kapableco.

Studentoj, kiuj komencis la studadon de Esperanto ne pli frue ol la lan de Novembro 1943, povas konkursi por la speciala premio, (£5-5-0).

La ekzameno estas kaj skriba kaj parola. En ĉiu ŝtato en kiu troviĝas kandidatoj ekzamen-komitato estos starigota. Pliaj detaloj estas haveblaj de la Sekretario de via ĉef-urba grupo.

-----R. RAWSON.

LA LITERATURA KONKURSO de LA ESPERANTA RENDEVUO.

Eniru ĝin, senpage. Sendu vian verkaĵon al S-ro Hanks, 736 Sydney Rd., Coburg N14, Melb. antaŭ la jarfino.

ERAROJ en nia Sept. numero.

Paĝo 157, lasta kvaroj da linioj:---punkt' devus esti poent'.
160/16. Antaŭ "homoj" skribu "el ni, sed ĝenerale ili estas".
162/5 "en tiu maniero"; forstreku lastan liniojn. 163/8 de la mals.
grunda lu-mono; 166/12 de la mals, deklaras; 168/6 de la mals.
7.10.43 169, 11. precize. 19, poezio. 170 post 5 enskribu Dr.
ALBERT GUERARD. 21 koleras.

From "THE BRITISH ESPERANTIST" July-Aug. 1944

Membership of Internacia Esperanto-Ligo in 1943 was 4859 in 36 countries. Britain led with 2492, then Sweden 1336, United States 269, Australia 165, Brazil 165, Switzerland, 152.

The British and Foreign Bible Soc. has issued 10,455 La Sankta Biblio, 31,780 Nova Testamento and 20,250 other portions of Scripture in Esperanto.

Cambridge Union Society, in May defeated by 13 to 5 the motion: That this House approves of the Government's policy with regard to

Basic English,

Deaconess Magarey, of Unley (S.Aus.) passed Elementary B.E.A. Exam. Gratulon.

PROPAGANDA PRI ESPERANTO.

En la lastaj monatoj, per la A.B.C. radiostacioj, 2-3 Foje oni pritraktis la lingvo-projekton, "Basic E." Pro tio, la Melburna Esperanto Klubo petis lokon por reprezentanto de Esperanto. La A.B.C. konsentis, kaj S-ino E.S.Hanks brodkastis tra 3LO, Melbourne 28/Aug. je la 9.15 ĝis 9.30 ptm. sub titolo "Esperanto, a living International Language."

S-ino Hanks donis mallongan skizon pri la historio kaj formo de Esperanto, kaj atentigis ke ĝiaj elementoj estas grandparte "elektitaj," ne "artefaritaj."

Ŝi priskribis ĝian progreson en multaj landoj, kaj subtenis tion per interesaj rakontetoj pri la spertoj kiujn ŝi kaj S-ro Hanks travivis en Eŭropo en 1938.

Laŭ raportoj ricevita, la parolado estis klare aŭdita tra Viktorio, kaj ankaŭ en Brisbane kaj Sidnejo. Evidente ĝi altiris konsiderindan atenton, ĉar multaj skribis al 3LO, aŭ telefonis, petante pluan informon pri Esperanto.

Antaŭ kelkaj semajnoj, S-ro E.S.Hanks donis paroladon kaj demonstracian lecionon, uzante la Cseh metodon, al gejunuloj en la Preston Baptist Preĝejo. La geknaboj entuziasmis, kaj laŭ raporto, insistis uzi la vortojn kiujn ili lernis en ĉiu oportuna kaj neoportuna okazo.

AVIZO. Por nia kvina volumo ni havos novan titolpaĝon, sed bedaŭre, pro neatenditaj malhelpoj, ĝi ne estos preta antaŭ la venonta numero. Desegnis ĝin S-ro LUIS FEKONJA kaj F-ino L.E.BAILEY. Ĝi certe plaĉos al la legantaro.

EN LA JUNIA NUMERO S-ro Hanks promesis doni premion por la plej bona provo traduki la poemon My Country. Se la entrepreno ricevos ĝeneralan aprobon kaj praktikan sukceson, ni eble daŭrigos ĝin en serio, kun celo formi bazon por Aŭstralia antologio. S-ro Hanks provizus al ni poemojn de li elektitajn.

La poemo de MacKellar ne estas facile tradukebla, sed ni esperas, ke iu merite gajnos la premion. Ni aperigos la sukcesan tradukaĵon, se efektive estos tia. La ekstrema dato sendi ĝin al

la Redaktoro estas la fintago Decembra. La ĵugantoj havos la rajton reteni la premion, se en ila opinio la traduko ne estas sufiĉe bonkvalita por ricevi ĝin.

MY COUNTRY. (Dorothea MacKellar)

1

4

The love of field and coppice,
Of green and shaded lanes,
Of ordered woods and gardens,
Is running in your veins;
Strong love of grey-blue distance
Brown streams, & soft, dim skies --
I know, but cannot share it ;
My love is otherwise.

Core of my heart, my country!
Her pitiless blue sky,
When, sick at heart, around us
We see the cattle die--
And when the grey clouds gather
And we can bless again
The drumming of an army,
The steady, soaking rain.

2

5

I love a sunburnt country,
A land of sweeping plains,
Of rugged mountain ranges,
Of droughts and flooding rains;
I love her far horizons,
I love her jewel sea,
Her beauty, and her terror---
The wide brown land for me!

Core of my heart, my country!
Land of the rainbow gold,
For flood and fire and famine,
She pays us back three-fold;
Over the thirsty paddocks,
Watch after many days,
The filmy veil of greenness
That thickens as we gaze.

3

6

The tragic ring-barked Forests,
Stark white beneath the moon,
The sapphire-misted mountains,
The hot, gold hush of noon;
Green tangle of the brushes
Where lithe lianas coil,
And orchids deck the tree-tops
And ferns the crimson soil.

An opal-hearted country,
A wilful, lavish land--
All you who have not loved her,
You will not understand--
Though earth holds many splend--
Wherever I may die, (ours,
I know to what brown country
My homing thoughts will fly.

The versions of this poem vary slightly in different editions (FRB)

KASO DE LA RONDO.

CALDERA

Ricevitaj. Dr. ~~Cadell~~ don. £1; S-ino P. Byatt 5/-; S-ro Thomas 5/-;
S-ro H.M. Leighton 5/-; S-ro Buswell 5/-; S-ino Blackmore 2 yrs, 10/-
S-ro I. Masel 5/-; S-ino Greeneweg 5/-; S-ino J.L. Leahy 5/-; S-ino
E. Cadell 5/-; F-ino P. Worden 5/-; S-ino Moore 5/-; F-ino Coombs 5/-;
S-ro C. Thompson don. 2/-; S-ro R. Rawson 3/6; F-ino Trundle 5/-.

Elspezoj £3/14/7.

En la Kaso, £1 ~~1/1~~ 5/1.

W. ADDIS, b (Kasistino) 25 Greville Avenue, Flinders Park, Sth. Aus.

BEAUTIES OF BASIC.

Reported in British Esperantist July 1944.

Here are a few paraphrases into Bäsic, the hobbled, arthritic, dreary product of Mr. Ogden's wayward ingenuity," as the Spring number of "English" calls it. They appeared with others in "Punch" 26 April, 17 May, 7 June.

All went well as a marriage bell.

All went with as much laughing as the bell of a Church at which a man and woman are being joined together.

She turns from their gaze and weeps, for her heart in his grave is lying.

She makes a turn away from their long fixed looks, and makes her eyes wet, for her heart has been put on the floor of his death-place.

There came a big spider

There came a great example of a certain small insect which takes flies.

I would lay me down and dee

I would put myself on the floor and make ready for death.

The hunter is, home from the hill.

He who goes after animals is back at his house from the sloping place.

Ring out the old, ring in the new.

Make a sound with bells to say that the old is out, make a sound with bells to send in the new.

We have children, we have wives, and the Lord hath spared our lives.

We have sons and daughters, we have women joined to us in Church, and the Highest Person has kindly let us go on living.

Peel's view-halloo would have wakened the dead Or the fox from his lair in the morning.

Peel's cry "I can see him!" would have put an end to the sleep of those who were ne more Or made the desired brown animal come out from his hole in the morning.

The boy stood on the burning deck.

The boy was upright on the burning flat part of the ship.

Thou shalt not bow down to them or worship them.

You will not put down your head before them or do public acts of respect to them

With a joyful spirit, I, Sir Richard Grenville die.

With a feeling of pleasure, I, the respected horseman Richard Grenville, go to my death.

Konkludas "ENGLISH": "Estas dolore vidi eldonistojn falstumbl antaj unu sur la alian en nedeca peno ekspluati tion, kio: tre povos pruviĝi mirfrapega, neklarigebla maldiskretaĵo de fama ĉefministro. Ili elpresigas librojn ne nur por erargvidaĉi nesciant-

ajn fremdulojn, sed senhonte ankaŭ por la lingva konfuzado de niaj propraj infanoj. Ne plu niaj geknaboj nut ros sin per la norma Angla de siaj prapatroj, sed devos ekzerci sin en la misgenerita, bastarda idiomo Basic. Ni havas fidon sufiĉan al la prudento de Anglaj instruistoj por kredi, ke, esplorinte funde la pretendojn de la uzurpulaĉo, ili kontraŭos la dolĉajn allogojn de propagandistoj, kaj tenos firme al sia Angla heredaĵo."

ASOCIAJ AFEROJ.

I.E.D. La Sekretario de I.E.L. raportas, ke la membro-cifero (165) estas la plej granda iam atingita de Aŭstralio. Ĉiu individua Membro de A.E.A. estas Asocia Membro de la Ligo, kaj plie 42 samideanoj individue membriĝis. Nia celo por 1945 estu almenaŭ 200 en la diversaj katagorioj.

JARLIBRO. La manuskripto por la adresara parto fermiĝis dum Aŭgusto. Ni pretigos sufiĉe da numeroj por ebligi ĉiun novan membron ricevi ekzempleron. La Jarlibro enhavos plenan informon pri la servoj de la Asocio.

EKZAMENOJ. Ni denove memorigas samideanojn ke la tagoj de paco alportos al ĉiu grupo grandan bezonon por spertuloj. Kiom eble plej multe el ni estu pretaj por la tempo kiam klubĉambroj pleniĝos je novaj lernantoj. Nur per ekzameno vi povas kontentigi vin, ke vi ja bone uzas la lingvon. Se vi estas izolulo ankaŭ vi povas partopreni ekzamenon. Skribu rekte al Pastro C.C.Cowling, St. Mary's Tasmania, por informo.

G.H. HILLERMAN. (Sekretario)

15 Morrice St., Lane Cove, Sydney, N.S.W.

FALO de BIALYSTOK, naskloko de Zamenhof. Leteroj pri tio aperis en The Argus (Melb.), Coburg Courier (Melb), "Salt", kaj Brisbane Ĵurnalo.

Diris DAMON C. Vekiĝu kaj eluzu viajn naturajn kapablojn, kiuj certe estas kaŝitaj en via interno. Se vi ne uzados ilin, ili malfortiĝos.

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

LA RONDO



THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F. R. BANHAM

2 BANCHORY ST. ESSENDON. W.5.
VICTORIA AUSTRALIA

VOL. 5^a No. 2

Nov 1944

L A R O N D O.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooo

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

---oooo---

POET-SOLDATO DE LA LIBERIGO.

De Sir Robert Garran en A.B.C. Weekly, 23.9.44.

HEINE famiĝis precipe pro siaj senkompare belaj lirikoĵ. Ili meritas eternecon per si mem, sed ilian senmortecon garantias ankoraŭ tio, ke muzikon aranĝis por ili kompanistoj de la unua rango. Vaste konataj estas krome lia fiaskinta amo kaj la tragedio de lia sufera mortado sur la "matraco-tombo". Sed tiu malfeliĉa geniulo ludis ankoraŭ da roloj, el kiuj ĉefa estis tiu de "soldato en la milito de homa liberigo."

Heine vivis en katenita Eŭropo, kiun tiranis despotoj, feŭdaj imperiestroj, reĝoj kaj princetoj. Li revis pri nova Eŭropo---el liberaj kaj amikaj popoloj inter kiuj floros bonvolo. Li asertadis, ke lia serioza vivcelo tute ne estas la poezio, sed la realigo de la supra revo.

Li estis Rejnregionano; naskiĝis en Dusseldorf 1799, Judo. Aĝe sesjara, li vidis la Francojn okupi la Rejnprovincon kaj la disimilanan Napoleonon preterrajdi sur blanka ĉevalo. De tiam ĝis sia dektria jaro, kiam la Francoj foriris, li estis Franca civitano. Por la loĝantoj, kaj precipe la Judoj, la Franca okupado estis tempo de la lumo. Jam for ilia feŭda servuteco; ili jam havis la protekton de la Kodo Napoleona kun egaleco antaŭ la leĝo, juĝado antaŭ popolaĵ jurintoj---entute, la rajtoj de liberaj civitanoj.

Deksesjariĝinte, Heine iris nevole al onklo, riĉa bankisto en Hamburg, por trovi kareiron komercan. Kiel bankkomizo en Frankfort li suferis humiliĝon devi vivi en Juda kvartalo, kies pordo estis ŝlosita en la Dimanĉoj. Post tri jaroj lia onklo starigis lin en propra firmo---H. Heine & K-io, Komisiaĵ Agentoj---sed lia preskaŭtuja bankrotiĝo konfirmis la opinion de la bankisto, ke lia nevo estas la familia stultulo, kiu eble taŭgus kiel advokato.

La filino de la bankisto amtrompis al Heine, kiu dividis la sekvantan kelkon da jaroj inter la universitatoj de Bonn, Gottingen kaj Berlin. En tiuj li renkontiĝis kun iuj tre famaj profesoroj; ĉe Berlin li invitiĝis en la plej elitajn literaturan rondon de Germ-

anujo. Li fine ricevis diplomon de jura doktoro, kun kapo plena de poezio, historio, filozofio, kaj koro pasia por la libereco kaj homa rajto. Sur ĉion ludadis lia brila sprito, forta ridsento kaj rapire akra satiro, kiu poste gajnis al li titolon "Da Germana Aristofano."

H eine 27-jara vizitis Anglujon, ĉefe por observi kiel funkcias la polirike liberaj regadministroj. Li diligente frekventis la Parlamenton, kie li admire aprobis la politikon de Canning, batalanto por liberalismo en Eŭropo. Tiu ŝtatviro tiris Anglujon el la reakcia Sankta Alianco, denunciis la provon de Francujo subpremi la Hispanan Konstitucion, kaj jure rekonis la sendependecon de la Hispanaj kolonioj.

La revolucio en Parizo (Julio 1830) ebrige inspiris al Heine esperon, ke la liberiga tago ekaperas. Skribis li: Lafayette, la trikoloro, la Marseillaise! Nun mi scias, kion mi devas fari! Mi estas la filo de la Revolucio! Donu liron, ke mi kantu batalkant-on... Mia spirito ardas je ĝojo, kanto, sabro, flamo!"

La Julia Revolucio jetis fajerojn en Germanujon, sed espero pri flagrego baldaŭ devis morti. Al Heine logis Parizo. Li ne estis leĝe ekzilita el Germanujo, sed li bone sciis, ke resti en tiu lando finfine signifus sidi en la karcero ĉe Spandaŭ. Iompost-lome Heine afliktiĝis de tio, ke nebone marŝas lia rolo: Filo de la Revolucio. Verdire li ne estis kun ĝi konforma, nek korpe nek mense. Rafine elektema, malfortika, kun nervoj tiel agacaj, ke li ne povis dormi apud horloĝo, li povis toleri nek tabakon nek la haladzon kaj bruon ĉe samlandanaj kunvenoj. Sangiĝis ankaŭ liaj politikaj opinioj. Li havis nur tridek jarojn, dum kies plejparto li estis prefere poeto ol politikisto. Li komencis dubi ĉu sanga ribelo estas necesa survoje al libereco. Eble lia ekvido al Angla politiko inklinigis lin al pacaj reformrimedoj.

La despotoj kulturis malamikecon kontraŭ Francujo kaj maltoleron de ideoj Francaj, por ke ilia potenco fortikiĝu kaj demokratio ricevu halton. Male, Heine pionire havis la longperspektivan koncepton, ke la homa libero pliproksimiĝos se la homoj kulturos internacian komprenon kaj bonvolon. Denove do li ekprenis la plumon-batalilon, aperigante en Francaj kaj Germanaj eldonoj admirindajn prozpecojn kun celo interamikigi la popolojn. Unu temis pri Franca pentroarto, aliaj pri dramo, muziko. Lia artkribiko estis subtila kaj akrevida, kaj esprimita per ia neimitebla stilo, kiu ankoraŭ ĉarmas legantojn. Sed li lerte rilatigis arton kaj literaturon al la politika stato de la popoloj, kun sekvo ke pri ĉiu Germana eldono lin dolore ĝenis la cenzuro.

Lia "Historio de Religio kaj Filozofio en Germanujo" estas verko de ekstrema brilo kaj intereso. Klarlingve li traktis ideojn abstraktajn. Malplaĉis al li la nebula ĵargono de Germana Filozofio. Ol li neniam homo pli simple, kristale esprimis la ĉeftrajtojn de la transcendentala filozofio. Sed Prusujo lin stumbligis. Dekreto de la federa parlamento eksterlegigis ĉion de li skribitan,

skribotan. Tiu drasta edikto ne fariĝis efektiva, tamen la verkoj tiel tre suferis pro forstrekoj, ke ili efikis nur malforte.

Tamen Heine konstruis pli fortike ol li kredis, ĉar, krom atakoj rektaj, li funde influis la junan Germanujon de sia tempo, kaj tra ili ankoraŭ sur la pli postan literaturon. Lia modernemo helpis finbati la feŭdismon kaj indiki vojon al sana socio.

Antaŭ preskaŭ 90 jaroj Heine fine fermis la okulojn, sed ankoraŭ nun lia glavo akre hakas. Kiel la despotoj de lia tempo, ankoraŭ timas lin la Nazioj. Lia senmorta spirito, brak-en-brake kun Aristofano, pri tio forte ridus!

-----F.R.BANHAM (Trad.)

ESPERANTISTOJ FLUGAS DE EŬROPO AL AŬSTRALIO. (20-28.10.38)

(Daŭrigo---Antaŭaj ĉapitroj en 1942---No.16,18,23,27. 1943 No.11/12

VI. Sesa Tago: Rangoon-Bangkok-Penang-Medan-Singapore.

(Distanco 1540 mejloj; neta flug-daŭro 9½ horoj.

Jam duonon post la 3a ni ellitiĝas kaj 45 minutojn poste la aŭto veturigas nin tra la dormanta Rangoon al la flughaveno, kiu situas malproksime ekster la urbo; en la nokta mallumo dometoj kaj kreskaĵoj nur malklare siluetiĝas, sed des pli intense sentiĝas la strangaj odoroj ekzotikaj, kiuj peze plenigas la aeron saturitan de malsekeco.

Mallonge antaŭ la 5-a nia granda birdo---nia taga hejmo por pli ol semajno---leviĝas kaj superflugas la urbon, kiu kuŝas sube en la trema brilo de multaj kaj diverskoloraj lumoj. En kvieta flugo ni alproksimiĝas al la marbordo, transflugas la Golfon de Martaban kaj nun ŝvebas super la dens-arbaraj regionoj de Burma. Baldaŭ ni atingas la landlimon de Siam, kies altaj montoj estas ĝis la supro kovritaj de senvoja ĵangalo; la serpentumaj montar-riveroj ŝajne trovas nur malfacile la vojon al la valoj malsupre. Neniu homa loĝejo troviĝas tie en la ĉe-lima parto, sed en la centro de la lando la montoj fariĝas malpli altaj kaj ni transas montetajn regionojn, kie solecaj vilaĝetoj pace nestas en la valoj. Fine la ebena vidiĝas antaŭ ni: kien ajn ni rigardas, etendiĝas la vastaj inundo-regionoj de la riveroj Ta Chin kaj Noi, ŝenfinaj rizkampoj en verda akvobriilo, interrompita nur tie kaj tie de bambuo-grupoj kaj unuopaj domoj, kiuj estas konstruitaj sur fostoĵ aŭ pontonoj.


Je la 8-a ni alvenas en Bangkok, la ĉefurbo de Siam, en kies tute nova flughaveno---15 mejlojn for de la urbo---ni ripozas dum duona horo. Poste ne transflugas la urbon mem, kiu ofertas vere orientan aspekton. Urbmeze vidiĝas la larĝa duobla kurbigo de la rivero Menam, "Patrino de la Akvoj", el kiu originas la sennombraj akvo-vojoj, nomitaj "klong", kiuj trapenetas la urbon en cent dir-

ektoj kaj portas multegon de peze ŝarĝitaj ŝipetoj. Oraj pagod-pintoj, templo-turoj de blindigaj koloroj en vastaj parkoj, blankaj kaj oraj palacoj, la reĝa urbo ĉirkaŭita de tri muroj, ĉio tio prezentigas kvazaŭ songo tipe orienta.

Ofte flugante super la maro, ni sekvas la marbordon de la Golfo de Siam en suda direkto; ni vidas la banlokon Hua Hin kun la reĝa somer-palaco, vilaĝojn kun bambuodometoj, kaj el la intense blua akvo elstaras ruĝrokaj insuletoj kaj atoloj kovritaj de verdaj palmarboj. Dum ni flugas super la plej suda parto de Siam, okazas en nia aeroplano eta sensacio: la ĉefpiloto afable permesas al nia knabo, mem manipuli la direktilojn kaj tiel ŝajne piloti la aviadilon dum kelkaj minutoj; ni spiras iom pli libere, kiam la filo fiera kun ŝvelita brusto ree eksidas apud ni....

Transfluginte la landlimon de Malaya (Straits Settlements) kaj dum mallonga tempo la maron, antaŭ ni ekaperas bela insulo, sur kies ekstrema norda fino situas gaje aspekta urbo Georgetown kun modernaj vilaoj, ĉevalkurejoj kaj golfludejoj, kaj haveno plena de ocean-ŝipegoj; fakte ĝi estas konata al la plimulto de la indigenoj kaj vojaĝantoj nur sub la nomo Penang, la nomo de la insulo mem. Ni alproksimiĝas al la flughaveno, situanta en la suda angulo de la insulo, kiu estas kovrita de rizkampoj kaj palmarboj; post surteriĝo ni ĝuas tetrinkon en la apuda klubdomo, kies malferma aereca halo sub kano-kovrita tegmento havigas al ni agrablan refreŝige-

ejoj. La aerodromo estas tre malvasta, enigita inter la maro kaj krutaj montetoj; ĝi postulas majstran lertecon de nia piloto, kiu sukcesas, post nur 14 sekundoj de alveturo ekŝvebigi la aviadilon.



Ni transflugas en sud-okcidenta direkto la Straton de Malakka kaj je la 1-a atingas Medan sur la insulo Sumatra. Tio reprezentas bonan ekzemplon por la triumfo de l' homo super la naturo. Antaŭ duona jarcento ĝi estis virga ĵangalo, kiam pioniroj komencis, planti tabakon, kafon kaj kaŭĉukon. La tabako fariĝis fame konata, kaj el nenio kreskis moderna ĉefurbo kun senaj loĝkvartaloj, elektrejo, eksperimenta esploro, flughavenoj, ktp.---Tutan horon ni devas pasigi en la aerodromo, ĉar la orda disigado de la poŝtaĵoj ne estis ĝustatempe finita; nia piloto, ĉiam impulse vigla kaj agema, plendas, ke li devas malŝpari tempon ofte pro tiu kaŭzo en Medan. Fine la afero klariĝas, ni flugas nur mallonge super Sumatra, kies iam kontinuaĵoj praarbaroj estas nun ĉie interrompitaĵoj de junaj kaŭĉuk-plantejoj. En alteco de 9000 futoj ni refoje transflugas la Straton de Malakka survoje al Singapore.



Tiu belega kaj strategie grava havenurbo situas sur insulo en la Strato de Malakka; ĝi estas la ĉefurbo de Straits Settlements kaj kontrolas la tutan ŝip-trafikon al la Malproksima Oriento. Ni rigardas malsupren al la ŝoseoj kaj fervojoj kondukantaj al Singapore; jen estas la du pontoj, kiuj ligas la insulon kun la kontinento. Sur la montetoj klare vidiĝas la fortikaĵoj, kiuj protektas la urbon, kaj nun ni vidas la grandegan havenon kun ĝia labirinto de ŝipejoj, velŝipoj kaj m algrandaj boatoj ĉiuspecaj. Ni faras rondflugon super la urbo kaj surteriĝas en la aerodromo Seletar.

Post mallonga veturo tra la urbo---80% de la enloĝantoj estas ĉinoj---ni alvenas en la hotelo "Mar-vido" (Sea View), kiu situas grandioze ĉe la maro kun propra banejo, granda flegita parko kaj promenadejoj laŭlonge de la akvo. Ni disponas pri luksaj ĉambrossekvoj, kiuj estas disigitaj de la komuna promenejo ekstere nur per 5 futojn altaj ligno-muretoj. Ankaŭ la grandega manĝejo estas malferma, halo kun ronda dancareno en la mezo sub verdrila kupolo. Tie ni ripozas kaj refreŝiĝas, dum milda venteto onde tuŝas la marakvon apude kaj la vespora ĉielo pli kaj pli malheliĝas. Ĉirkaŭ ni estas mirinde harmonia atmosfero, kiu baldaŭ lulante endormigas nin.

Sed jam antaŭ noktmezo ni ekvekiĝas pro terura fulmotondro, kiu faligas torentojn da pluvakvo sur la teron....nun post jaroj, tiu subita ŝanĝo en Singapore, de paca kvieto al malama furiozo de la elementoj, ŝajnas al mi kvazaŭ antaŭdira simbolo por la postaj okazintaĵoj en la milito.....

LA SOVAĜA FLAGO.

Represita el "The Talk of the Town" en
The New Yorker, 25.12.44.

Jen stranga sonĝo.

Kiam la Tria Mondmilito jam finiĝis, ne pli ol kelkdekoj da homoj ankoraŭ vivis, kaj la tero estis maso da rubruino, viĉo terura. La transvivantaj teranoj decidis kunveniĝi por diskuti siajn problemojn kaj firmplani daŭran pacon---kion oni kutime faras post longa, elĉerpa milito. Estis 83 landoj, kaj ĉiu sendis delegiton al la konferenco. Venis Anglo, ankaŭ Peruano, Etiopo, Franco, Ĵap-Japano k.t.p. Ĉiu delegito portis kun si la patrolandan flagon, kun escepto de la Ĉino. Demandite de la aliaj: kial li ne portis flagon, li respondis, ke li diskutis la aferon kun alia Ĉina transvivanto---multaĝa kaj saĝega homo---kaj ambaŭ konkludis, ke Ĉinuĵo ne plu havu flagon el ŝtofo.

"Kian flagon vi do intencas havi?" miris la delegito de Luks-emburgo. La Ĉino miope palpebrumis, aperigis ŝuskatolon, el kiu li tiris vivan floron simile al irido.

"Kio estas?" Ĉiuj scivolis, plaĉata de la delikata simbolo.

"Tio estas sovaĝa flago (Iris tectorum: Angle "Wild flag").

En Ĉinuĵo ni jam decidis adopti ĉi tiun flagon, ĉar ĝi estas oportuna kaj universala deviza kaj krome tre bela. Ĝi kreskas ĉie en la malsekaj lokoj de la mondo, tial ĉiu homo povas ĝin observi kaj primiri. Mi proponas, ke ĉiuj nacioj ĝin adoptu, por ke estu neeble al teranoj ofendi la flagojn unu de la alia."

"Ĉu ĝi estas flirtigebla?" demandis la Usona delegito. La Ĉino movis la flagon milde tien-reen. "Jes, flirtigebla ja. Sed ĝi estas pli interesa dum ĝi ripozas, aŭ de venteto movetiĝas."

"Mi vidas, ke ĝi estas unukotiledona," (monocotyledonous: unu-sem-uj) observis la Nederlandano, kiu estis homo malmultevorta.

"Mi kredas, ke oni ne povus konstrui fortan fremdrilatan politikon ĉirkaŭ flago sama por ĉiu lando," dubis la Latvo.

"Oni ja ne," konsentis la Ĉino, "tio estas unu el ĝiaj bonaj flankoj. Mi atentigas vin, ke tiu flago iam estis ankaŭ via, Ĝi estas la plej malnova en la mondo, la origina flago, oni povus diri. Ni nun, sinjoroj, estas jam denove en nia origina stato. Ni estas tre malmultaj."

La Germana delegito severmiene leviĝis: "Mi estus ja malriĉ-spirita homo," li grakis, "se mi ne sentus min ano de mastra raso. Por tio ni bezonas flagon specialan. Natürlich."

"En la nuna momento," rimarkis la Ĉino, "la mastra raso, same kiel la ceteraj, suferas pro tio, ke ĝi estas preskaŭ malekzista. Malpli ol ducent homoj ankoraŭ restas sur la tero, kaj tiuj suferas de tromulto da standardoj."

La Patagoniano ekdiris: "Mi timas, ke la sovaĝa flago, unu por ĉiuj, estos ideo ne populara." "Sendube vi pravas," ĝemetis

la Ĉino, "sed, nune, ĉe mondloĝantaro nur ducenta, la vorto 'popul-ara' jam ne havas tro da senco. Ĝajnas al mi, 'ke bone estus agi en saĝa anstataŭ populara maniero," kaj, aperigante ankoraŭ 82 ŝuujojn, li donis al ĉiu delegito unu sovaĝan flagon kun ceremonia korpklino.

La sekvantan tagon la delegitoj reiris hejmen, mirante pri tio, kiom multe ili faris en tiom malmulte da tempo.....

Mi vekigis.

.....F.R.B. (Trad.)

LA MIGRANTO ĈE LA MUELEJO.

de JUSTINIUS KERNER.

Ĉe muelej' mi sidis
Komforte en ripoz',
Al rado mi ekvidis,
Al akva ŝprucerloz'.

Ekvidis al 'segilo
Nun kvazaŭ songe mi--
Mortige la tranĉilo
Penetris en abi'.

Ŝajnvivis la abio,
Ĝiskore vibris ĝi,
Kun surda melodio
La vortojn aŭdis mi:

"Vi venas ĝustahore,
Migrulo, tien-ĉi;
La morton, vedolore,
Por vi suferas mi.

"Vi baldaŭ ade restos
Post nuna efemer';
Mi via lito estos
En sino de la ter'!"

Kvar bretoj fale svenis--
Angoris mia kor',
Respondi mi ekpenis--
Jen ĉesis radlabor'.

-----KURT HIRSCHEL (Trad)

ASOCIAJ AFEROJ.

KORESPONDA KURSO: 30 Septembro kaj 7 Oktobro reklamoj pri ĉi tiu kurso por komencantoj aperis en ĵurnaloj de ĉiuj ŝtatoj. Ni aper-esperas ke ankaŭ aliaj propagandaj metodoj ebligos. La reklamojn en Suda Aus. kaj Okc. Aus. donacis F-ino Addis kaj D-ro Caldera. Ĉi lasta ankaŭ sendis 9/- en mono. Dankojn al tiuj! Similajn donacojn ni bonvenigus---avizu la sek-ion aŭ S-ron F.Pitt. Se vi ne povas helpi per mono, parole fortigu la kurson, propagandante ĝin kiom eble multe. Regas la kurson S-ro Pitt, c/o Mentone Grammar School, Mentone S11, VIC.

PROPAGANDO: Por helpi en la batalo kontraŭ Basic English ni rondirigis libron pri B.E. al niaj propagandistaj sek-ioj. La sek-io de A.E.A. nun volas scii kiom da progreso ĝi faris en la rondirado. Ĉu la persono kiu nun havas ĝin bonvolus sendi p.kart-an avizon? Nur sendu avizon ke vi havas ĝin; leginte ĝin, daŭrigu la rondirigon laŭ instrukcio en la libro.

LIBROSERVO. Tiu ĉi servo ankoraŭ floras. Ĝis 31.10.44 ni importis

librojn valore 40 funtojn (pogranda prezo) en tiu ĉi jaro. La pli necesajn librojn niaj perantoj en Okc. Aus., Vik., kaj Kvŝldo tenas as provizore, kaj multajn aliajn ni povas importi de Anglujo. Jen kelkaj kiujn ni povas importi kontraŭ antaŭpagita mendo:

Vortaroj: Fulcher & Long (Eng.-Esp.) 12/6. Millidge (Esp.-Eng.)
The Language Problem (Durrant) 10/- (16/6.)

Naiveco de Pastro Brown (G.K.Chesterton) 6/6.

Pinokjo, cloth 3/6; paper 4/-

Sep Vangofrapoj (eldonita dummilite) 5/-

Viro el Francujo 6/6. La Biblio 9/-. Himnaro Esp-a 3/3.

Koresponda Kurso por studentoj cele Diplomon 30/-.

Rakontoj pri Nederlando 2/3. Facila Legolibro 1/6.

Mendu pere de la Sekretario, G.H.HILLERMAN,

15 Morrice St., Lane Cove, NSW.

TRE GRAVA!

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO al MEMBRO-ABONANTOJ!

Samideanoj, bonvolu noti, ke la kotizo por 1945 iom plialtiĝos, laŭ informo de la Centra Oficejo, parte pro pli altaj kostoj kaj parte pro espero eldonadi la gazeton "Esperanto Internacia" MONATE antaŭ la fino de la jaro. La kotizo estas 9½- Angle aŭ 11/3 en Aŭstralia mono. Pagu viajn kotizojn kiel eble plej frue, ĉar la nova jaro grandpaŝe venas!

Samcelante via, LESLIE PFAHL,
(Ĉef-del.)

KVITANCOJ RICEVITAJ DUM OKTOBRO.

S-ino B.Jones, 5/-; S-ino Klussendorf 5/-; F-ino Willans 5/-; Dr. Caldera 5/-; S-ino Caldera 5/-; S-ro Gassner 5/-; F-ino Smith 5/-; Donaco 10/-; S-ro Baker 5/-; S-ro T.Wilson 5/-; S-ro Lulic 5/-; S-ino Morrison 5/-; S-ro E.M.Hayes 5/-; S-ro J.E.West 5/-; E-ino E.L.Bramall 5/-; S-ro J.Bevin 5/-.....£4.5.-.
Al la ĝenerala kaso £1.2.6. Al la Kaso de La Rondo £3.7.7.
Elspezoj de la Rondo £3.12;7. Deficito 5/-.

W.ADDIS (kasistino)

2 Greville Ave., Flinders Park, S.AUS.

LA OKTOBRA NUMERO de "Queensland Countrywoman" presis la artikolon de S-ro Banham "Esperanto versus Basic English."

L.E.B.

DEBATO EN MELBURNO. Ĉe la "Wranglers' Club" la 10a Oktobro okazis debato, kies temo estis: "Ĉu Esperanto, kiel ilo de internacia komprenado, pli taŭgas ol Basika Angla?" F-ino Stephanie Taylor jesis; S-ino Cargeeg neis. Vigla diskutado sekvis la debaton, kaj evidentiĝis ke multaj tie estas favoraj al Esperanto. F-ino Taylor tiel bone parolis pri Esperanto ke la arbitracianto deklaris sin la gajninto, Niajn gratulojn, F-ino Taylor! E.M. HILL.

KORESPONDA KURSO JAM FUNKCIAS. Mi deziras avizi, ke la Korespondokursa plano efektiviĝis la 30an de Septembro. Ĉiu instruisto en la propraj ŝtatoj reklamos en la ĵurnaloj kaj alie varbos. Ĉiu demando venos al mi, kiu sendos studlibrojn kaj instrukciojn al novaj studentoj. F.S. PITT, 63 Venice St., Mentone S11, VIC.

25a DATREVENO de DIPLOMIĜO. solenata en Perth, OKC. AŬST. La Okcidentaŭstralia Esperanto Ligo, je la 16a de Septembro solenis la datrevenon de la 25a jaro depost la akiro de la B.E.A. Diploma de S-ro T. O'Donoghue. Li estis dum la tuta tempo vigla samideano; en 1920 jam li estis Prezidanto de la Esper. Societo de Sydney; poste li fariĝis Prezidanto de la Aŭstralazia Asocio de Esperanto, kaj ankaŭ Prezidanto de la Tria Esper. Kongreso de Aŭstralio. Proksimume 40 Esperantistoj kunvenis por lin festi; paroladoj, kantoj, deklamoj pligajigis la festenon. Longe estu konservata al la Esperantistaro la kunlaborado de S-ro O'Donoghue! C.C.

VIZITO DE EMINENTA ROMKATOLIKA PASTRO AL MELBURNO.

Kun plezuro La Rondo aperigas tiun ĉi skribon de Usona Esperantista. "Tre volonte kaj dankante mi penas skribi ion taŭgan al istoj. niaj gesamideanoj Aŭstraliaj pri miaj unuaj vizitoj al la Melburna E. Klubo. Ĉar, de la komenco, ĉio iradis en maniero la plej eble kora. Unue, la letero de S-ro R. Rawson, delegito, rapide respondis al mia demando en lingvo Esperanto bele. Baldaŭ poste telefonis al mi S-ro H.M. Cohen, sekretario de la klubo, min instigante al proksima vizito al la klubejo. Kiam mi fine povis ĉeesti, mi trovis multe da amikegaj samideanoj, de kiuj preskaŭ ĉiuj parolis Esperante. La vespero pasis kun multa plezuro, malgraŭ mia malfacileco kompreni ĉion, kaj diri kion kaj kiel mi volis. Ili min faris membro honora dum mia restado en la urbo. La seriozezo de ĉi tiuj Merkredaj Esperantaj vesperoj faris al mi grandan impreson. "Facile oni komprenos, ke mi ĝojis pensi pri la gesamideanoj, kiujn mi lasis en Nov-Jorko---la grupon nomitan sur p. 168 en la Sept-a numero de la Aŭstralia Esperanto-Gazeto. Ili estas amindaj homoj kaj laboras entuziasme por Esperanto; specialan forton ili ricevas nun ankaŭ de alilandaj Esperantistoj, kiujn la milito alportis al Nov-Jorko kaj kiuj kunlaboradas bonege en la redakto

de The American Esperantist. Ili, precipe S-ro G.A. Connor, prezidanto, min interesis pri Esperanto antaŭ dek bk monatoj; ĝis tiam mi pli-malpli kredis, ke la Esperantistoj volas fari Esperanton la unika mondlingvo; cetere, mi timis antaŭ la ideo de lingvo "artefarita."

"Io pri mi mem? La sekvonta ne lacigu legantojn.

"Naskita en St. Louis (Usono) de deveno Germana, mi junvirigis en Ĉikago kaj kun dek sep jaroj fariĝis Karmelito (de la ordeno religia Karmelita en la Eklezio Katolika). Post la jaroj de studo apud Niagara Falls, Kanado, mi iris Romon ordonota. En 1930j. mi revenis al ĉikago kaj poste al Joliet (apud Ĉikago), kie mi iĝis pastro. Post ankoraŭ sep jaroj mi estis revokita Romon kiel asista oficialulo de la ordeno, sed la milito min devigis reiri Usonon, kie mi laboradis ĉe Vaŝingtono, D.C., kaj Bov-Jorko. Dum ok jaroj en Eŭropo mi loĝis en Italujo, Germanujo, Svisujo, Francujo, Anglujo, Irlando, Portugalujo, Hispanujo k.a. La lerno de diversaj lingvoj multe min helpis al la lerno (pli-malplia) kaj la estimo de Esperanto. Mi elvenis Aŭstralion la 3an de Decembro 1943, de kiam mi tre ĝojas la belecojn kaj korecojn de ĉi tiu plezuraj lando kaj popolo. Sed, por diri la veron, mi preskaŭ kredas, ke la lando kaj popolo estas tiom plezuraj, ke multaj Aŭstralianoj ne pensas sufiĉe pri la ĉielo, ankoraŭ pli bela kaj plezura.

"Lastan vorton mi permesas al mi. En la numero supre citita mi vidis kun bedaŭro artikolon pri la eŭtanasio, ĉar tiu artikolo kontraŭas la penson, ja eĉ la meman konsciencon de ĉiu Katolika Esperantisto. Ĉar, laŭ nia kredo, la eŭtanasio estas, estis, kaj estos ĉiam simpla murdo. Mi kredas, tial, ke diskuto pri tiu afero pli bone forrestus el Esperantaj rondoj, se ni volas teni la movadon efektive neŭtrala en ĉio. Ĝis la révido! Kaj dankojn multegajn!

2an de Oktobro 1944.

(V.Rev.) GABRIEL N. PAUSBACK, O.

Carm.

RIMARKO DE LA REDAKTORO.

Plene respektante la kredon de nia estimata samideano, ni tamen rimarkigas, ke nia gazeto estas tute sendepende, politike, religie. Simile al la Digests, ĝi enhavas ĉion, kio povas esti iel interesa, eĉ se disputebla. Forigi ĉion "controversial", jen paŝo simila al tio iam provita de la B.B.C., paŝo simple stulta. Ĉiu havas rajton rebati. Dum jaroj de redaktoreco mi ricevis titolon de Faŝisto kaj de Bolŝevisto, de reformemulo lingva kaj de pedanta konservatulo. Mi do jam kutimiĝis al la strangaj epitetoj. Koran saluton!

LETERO EL JUGOSLAVUJO.

De D-ro Ivo Lapenna "Esperanto Internacia" ricevis longan leteron el kiu la jena estas elĉerpita:-

"Ĝis la lasta momento ni eldonis la gazeton kaj daŭrigis la propagandon. Kiam la germanaj faŝistaj trupoj eniris la 10an de

aprilo 1941 en Zagreb, sur la stratoj ankoraŭ pendis niaj afiŝoj anoncantaj la novajn printempajn kursojn. La morgaŭan tagon la faŝista polico enpenetris la ejon de niaj societoj, detruis kaj bruligis ĉion kion ili trovis kaj arestis amason da geesperantistoj. Kompreneble, ankaŭ min oni serĉis, sed atendante areston mi haŝigis, kaj post kelkaj tagoj sukcesis forkuri el Zagreb. Inter la unuaj kiuj donis siajn vivojn por la libereco de siaj popoloj troviĝis ankaŭ multaj geesperantistoj. La membroj de la Komitato de J.E.L. (sekvas nomoj), ĉiuj samtempe ankaŭ laborantoj de LA SUDA STELO, estis jam en la unuaj tagoj kruele mortigitaj. Por doni al vi nur palan bildon pri ka Faŝista teroro mi diras al vi nur tion, ke el 150 membroj de Akademia Esperantista Klubo, ĝis nun---kiom al mi estas konata---estas mortigitaj aŭ pereis sur la batakkampoj 52 gesamideanoj. Iliaj nomoj kaj ilia heroeco, kiel ankaŭ la nomoj de dek ĉiuj aliaj pereintaj Esperantistoj, devas resti kiel brilantaj simboloj en la historio de nia movado, ne nur en Jugoslavujo sed ankaŭ en internacia kadro.

"La situacio, do, estis pli ol terura. La enlanda reakcio subtenis la faŝistojn, italajn kaj germanajn. Ŝajnis ke eliro el tiu ĉi peza situacio preskaŭ ne ekzistis. La popoloj de J.S.-ujo tamen trovis eliron. Komenciĝis la forkurado en la arbarojn kaj montojn por la defendo de la libereco kaj la lando. Sub la lerta gvidado de nia komandanto, nun Marŝalo Tito, la partizanaĵaj taĉmentoj de J.S.-ujo donis terurajn batojn al la malamiko. Ili rapide eliris el la kadro de malgrandaj partizanaĵaj taĉmentoj kaj kreskis en la hodiaŭan potencon naciliberigan armeon, kiu sukcesis preskaŭ nur per siaj propraj fortoj liberigi grandan parton de J.S.-ujo.

"Mi volas nur menciigi ke en la liberigitaj urboj kaj vilaĝoj floras jam nun, dum ĉi tiu peza milito, vere kultura kaj kleriga vivo. Ankaŭ Esperanto estas disvastigata; mi gvidas jam du kursojn, ankaŭ D-roj Jovanoviĉ kaj Kraŭs, kaj multaj aliaj. Ni eĉ havis malgrandan konferencon en Livno, kiun partoprenis 24 gesamideanoj okaze troviĝantaj en tiu urbo."

TRADUK-KONKURSOJ.

Traduko de Konkurso 15: (Kompilita el 3 tradukoj.)

Kiam mi provas, trovi simplan formulon por la epoko, en kiu mi grandiĝis antaŭ la Unua Mondmilito, mi esperas sciigi ĝian plenan signifon nomante ĝin: la Ora Epoko de Sekureco. Ĉio en nia preskaŭ miljara Aŭstra Monarkio ŝajne baziĝis sur konstanteco, kaj la ŝtato mem estis la ĉefa garantiulo de tiu stabileco.

La rajtoj, kiujn ĝi donis al siaj regnantoj, estis konvene konfirmitaj de la Parlamento, la libere elektita reprezentanto de la popolo, kaj ĉiu devo estis precize preskribita. Nia monnormo, la aŭstra krono, cirkulis en brilaj oraj moneroj---certigo de ĝia sen-

ŝanĝeco. Ĉiu sciis, kiom li posedas aŭ kiom li eajtas ricevi, kio estas permesata aŭ malpermesata. Ĉio havis sian normon, sian difinitan mezuron kaj prezon.

La havaĵ-posedanto povis akurate elkalkuli siajn pojarajn rentumojn. Ĉiu familio havis sian fiksitajn budĝeton kaj sciis, kiom ili povas elspezi por loĝpago kaj nutro, por ferioj kaj amuzoj.

VENKINTA GRUPO: Melbourne Esperanto Club.

TRADUKOTA TEKSTO, KONKURSO 17.

The towers of Zenith aspired above the morning mist; austere towers of steel and cement and limestone, sturdy as cliffs and delicate as silver rods. They were neither citadels nor churches, but frankly and beautifully office-buildings.

The mist took pity on the fretted structures of earlier generations: the Post Office with its shingle-tortured mansard, the red brick minarets of hulking old houses, factories with stingy and sooted windows, wooden tenements coloured like mud. The City was full of such grotesqueries, but the clean towers were thrusting them from the business centre, and on the farther hills were shining new houses, homes---they seemed---for laughter and tranquility.

(Sinclair Lewis: Babbitt.)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.12.44.

----- P.E. SCHWERIN, 1 Carabella Flats,
McDougall St., MILSONS POINT, N.S.W.

LA ADRESO de S-ro Leslie Pfahl estas: 64 Brighton St., Croydon,
N.S.W. vidu p. 23.

LINGVAJ NOTOJ.

BEJ'. Aldone al la notoj sur p. 6 de la Okt. n-ro S-ino A.C. Hintze metus rimarkon. ke Fulcher-Long p.339 donas la radikon ankaŭ kiel "teknika vorto por speco de ruĝbruna koloro, precipe ĉe ĉevaloj." Franca bai; Angla bay. Beja ĉevalo. Plena Vortaro (SAT) ĝin ignor-

STUDENTO kaj PROFESORO. Tiuj du vortoj posedas en multaj landoj (as. diversajn sencojn. Ekzemple "studento" signifas en la plej multaj landoj persono, kiu studas ĉe universitato (altlernejo) kaj teknika altlernejo. La vizitantoj de ĉiuj aliaj lernejoj estas simple "lernantoj". Sub la titolo "profesoro" la Francoj komprenas unue "instruisto", dume en Germanujo, Aŭstrujo kaj multaj aliaj landoj la uzon de titolo "profesoro" rajtas nur universitataj instruistoj, Kun tiuj du vortoj multaj Esp-istoj faras konfuzigan uzon: gimnaziano ĝuste nomas sin studento; ni tute ne dubas, ke gimnaziano stu-

das; tamen la uzo kaj kompreno postulas, ke oni evitu tian erarigan uzon. Pli ofte oni malbonuzas la titolon profesoro; instruisto de Esperanto laŭ kompreno de multaj samideanoj havas la ideon de universitata (ŝtata) ofico. H.T. en malnova "Esperanto" (Genevo). Studento: Lernanto en supera lernejo. (Plena Vortaro S.A.T.)

ĈIOM PRI "ANTAŬ (OL) ". Iu demandis: Kiu frazo estas korekta---Se vi vidas Johanon antaŭ Sabato, aŭ...antaŭ ol Sabato? Ĉi kredas, erare, ke oni uzas "antaŭ" nur en loka senco, neniam tempa. Mi direktas ŝian atenton al:-

Ĉio okazis antaŭ Kristnasko (Plena Gramatiko)
 La spektaklo komenciĝis antaŭ la oka horo (Vortaro de Kabe)
 La kunveno finiĝis antaŭ la deka (Plena Vortaro)
 Ne laŭdu la tagon antaŭ vespero (same)
 Oni devas pagi antaŭ la fino de la monato (same)
 Ne antaŭ (ne pli frue ol en) la sankta semajno (Wuster)
 Klopodu veni antaŭ la vintro (2 Tim. 4/21)

La pritrakto en COX (4a eld.259/3) sub "antaŭ" estas mizere maladekvata. Li povus aldoni por komparo:-

Mi venos antaŭ Sabato. Li mortos antaŭ ol Sabato plene taglumiĝas.
 Venu antaŭ la deka horo. Ne ekvidu en la keston antaŭ ol la okulos.
 deka batigos (sonigos).

Li mortis antaŭ la patro (loka uzo): He died before his father's eyes
 Li mortis antaŭ ol la patro (mortis) He died before his father did.
 Li mortis antaŭ ol la patro venis: He died before his father came.
 Li mortis antaŭ tri tagoj: He died three days ago.

ANTAŬ (prepozicio); ANTAŬE (adverbo); ANTAŬ OL (konjunkcio).

-----F.R.B.-----

AŬSTRALIO estas unu el la plej riĉaj landoj en la mondo. Inĝenieroj kredas, ke la subteraj akvoŝtatoj estas la plej ekspluataj promesriĉaj iam prisciitaj. Kial ni suferas pro pluvmanko? Tera erozio terure vastiĝas. Irigacio farus Aŭstralion lando de lakto kaj mielo, vera insula ĝardeno. La mono por fari tion estas ja tie ĉi. Brisbana kuracisto asertas, ke Aŭstralio elspezis 42 milionojn da funtoj por alkoholo, 25 m. por tabako kaj 40 m. por vetoj. Se tiu mono elspeziĝus por irigacio Aŭstralio kapablus subteni grandan loĝantaron sub sociaj kondiĉoj ebligantaj vere homecan vivon.

Verkis M.C. TRUNDLE, Tradukis, F.R.B.



LA RONDO



Kristnaskajn
Salutojn
Al ĈIAJ Legantoj



L A R O N D O.

Lingve kontrolas F.R.BANHAM,
 2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

ooo

Enhave aranĝas F-ino L.E.BAILEY,
 18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide, S.Aus.

---00000---

REDONU AL MI LA MONON!

Kara....

En la tempo kiam mi finis popolan lernejon en Londono, oni tie instruis malmulte pli ol leg-, skrib-, kaj kalkuladon. Sed sub gvido de mia ĉefinstruisto kelkaj knaboj, elektitaj supozinde pro sia inteligento supernorma, ricevis tagan dozon da Franca lingvo elementa. Tial mi povis cerbe sorbi la pligrandan parton de la unua konjugacio. Dum la sekvantaj iuj jaroj mi tiel forte penis akiri panon ke mi ne povis doni tempon al lingvoj. Mi do hodiaŭ, vivinta du trionojn de mia tera ekzisto, devas fidi al la Angla-lingva scio de fremduloj, kaj danki ke ĝi estas ordinare ne tro malbona.

Kun poŝvortaro kaj indikanta fingro mi iam rondvagis en Eŭropo, kaj povis havigi al mi ĉiutagajn bezonaĵojn; sed ekster tio mi ne kuragis lingve aventuri.

Antaŭ ne longe mi aĉetis, kontraŭ tri ŝvite gajnitaj ŝilingoj, la libron "Stories, Essays and Poems" de Aldous Huxley; mi postulas la monon redone. Tiu libro malmulte utilas al mi. Mi similas homon kun botelo sed sen korktirilo. Li ja povus forfrapi ĝian nukon, sed mi povas fari nenion. Kion mi faru el novelo kies kerna signifo kaŝe kuŝas en pecoj da Itala? Jen ekzemplo: "La letero estis mallonga kaj stile preskaŭ telegrafeca: Sono dalla Padrona, non mi piace ha rubato il mio libro non voglio suonare piu voglio tornare a casa venga subito Guido." (1) Ĉu iu murdis iun? Ĉu kadavro en la banĉambro? Ĉu.....?

"Moira" (li voĉis), "Stranom quel nome. Piuttosto ridicolo!"(2)

En ĝi estas longaj ĉenoj da Francaĵo idiotisma, buloj da primuzika Italaĵo kontraŭ kiuj la vortaroj neniom helpas, strofoj el Baudelaire kies preciza sencenhavo estas necesa por la leganto, kaj maso el originallingva Dante-verko, kio samefikus sur min ank-aŭ en lingvo Ĉina.

Tio ne estas justa! S-ro Huxley verkas ne por mi sed por leg-

antaro el Huxley-oj. Sur la koverto devus stari averto: "Se vi ne scias lingvojn vi malŝparas vian monon, aĉetante tiun ĉi libron." Aŭ, eĉ pli bone, S-ro H. rememoru ke ankoraŭ konsiderinda nombro da Angloj ne komprenas la Francan kaj la Italian. Li do helpu al tiaj per tradukoj kaj klarigoj forme de piednotoj.

Eĉ en eseo pri Hindujo li entenas la "Ecrasez l'infame" de Voltaire. Hazarde mi scias tiun trouzitan frazon, sed kial li ne povis diri "Dispremu la fian objekton," kaj per tio savi multajn el sento de kultura malsupereco?

Mi pruntis de urba biblioteko "Prelude to Misadventure" de Violet Trefusis, sed ŝtrovis ĝin ŝtufita per Franca poezio, paĝoj de Cocteau en la originala, pecoj el la poemoj de Charles d'Orleans, fragmentoj de la Germana, el kiuj nur unu havas tradukon. Preskaŭ je ĉiu pago ekaperis frazo kiu skue min haltigis.

Tio estas speco de literatura snobismo kiun mi fundkore abomenas, ĉar ĝi ĵetas lumon sur mian neklerecon, kaj elstarigas la erudicion de la verkanto. Maljuste! Ne tiamaniere kone paradaĉis Carlyle, Ruskin, E.M.Forster, Wells kaj Chesterton. Tiuj homoj indulge provizis por eduke mizeraj klientoj kaj helpis ilin trans lokoj malfacilaj.

Kiel simpla homo mi atentigus S-ron H. kaj S-inon T. al unu el miaj preferataj litlegaĵoj---Thomas Love Peacock estas ĝia aŭtoro, kaj liajn verkojn mi frandumas tiom ofte kiom tiujn de Dickens. Peacock senlace citadas el fremdaj lingvoj por pliriĉigi siajn rakontojn. Ekzemple, en "Crotchet Castle" vi trovas ĉerpojn el Pindar, Virgil, Horace, Nonnus, Aristophanes, Petronius kaj multaj aliaj---ĉiuj estas pacience tradukitaj en piednotoj.

La Huxley-verko ne povis kvietigi al mi la menson; mi do interŝanĝis ĝin je "English Mail Coach" (De Quincey), kaj strange eklegis: "Mi rimarkis al la veturigisto, kun jam trouzita citaĵo el la Eneido de Virgil: Jam proximus ardet Ucalegon (Jam la plej apuda domo brulas). Sed mi interpretis, pensante ke eble ne tre funda estas la pri-Virgila eduko de la veturigisto."

Kiam verko estas represita en malkara eldono---evidente por homoj kia mi---certe estas ke multaj ĝiaj legintencantoj estos veturigistoj, plumbistoj, lignohakistoj kaj akvoportbistoj, kies edukado ĉesigis proksimume sampunkte kiel mia. S-ro H. kaj S-ino T. bonvolu enkapigi tion al si kaj ne plu dancigi tiajn literaturajn perlojn antaŭ la okuloj de porkoj tiel malkleraj kia estas via fidinda.

F.W.THOMAS. (El "John o'London's Weekly," 7.3.44.
Tradukis F.R.BANHAM; D-ro Caldera la Italian.)

NOTOJ:-(1) Mi estas ĉe la dommastrino. Mi ne ŝatas ŝin. Ŝi ŝtelis mian libron. Mi ne plu volas ludi (muzikilon). Mi volas reveni hejmen. Mi petas ke tuj veni. Guido.

(2) Stranga estas tiu nomo. Iom priridinda.

LA FLUGO en la UNIVERSON (de Bruno H. Burgel, 1923)

Kiam en aŭtuno de l'jaro 1905 atingis nin la sciigo, ke du amerikanoj--la fratoj Wright--sukcesis, konstrui aviadilon, per kiu ili povus flugi distancon de 20,30, eĉ 50 kilometroj kaj teni sin preskaŭ 45 minutojn en la aero; tiu sciigo estis tute ĝenerale taksita kiel vere usona ŝarlatanaĵo. La ŝerc-gazetoj okupiĝis pri la afero, kaj "flugantaj fratoj" estis ŝanĝitaj en "mensogantaj fratoj."

En la jaro 1901 la usona fizikisto, profesoro Ayrton, profete proklamis: "Venos la tago, kiam la amiko alvokos la amikon per elektra voĉo malproksime trans la suprojn de la Aĉoj aŭ trans la oceanon, kaj la amiko aŭdos per sia samagordita elektra orelo kaj respondos al la voko." Mi ankoraŭ... memoras, kiel konata Berlina samfakulo de Ayrton tiam mokis pri la "usona Jules Verne." Nuntempe, post 25 jaroj, multe pli rapide ol Ayrton supozis, tio realiĝis; ni aŭdas ne nur la voĉon de l'amiko, ni aŭdas kompletajn opero-prezentadojn trans landoj kaj maroj.

Montriĝas, ke oni devas esti tre singarda pri la vorto "neeble!" La homo, la "eta dio de la tero," estas kapabla por ĉio ajn; li estas diablulo! La genia franca aŭtoro Jules Verne, pruviĝas en siaj fantaziaj romanoj kiel unu el la plej sukcesaj profetoj. La moderna submar-boato, la direktebla aerŝipo, la elektra tele-vidilo, la aŭtomobilo, artefaritaj diamantoj, la moderna motoro, venen-gasoj por la detruo de l'malamiko en milito, kaj multaj aliaj aĵoj estas eltrovitaj de la herooj de liaj romanoj longe antaŭ ol tio okazis en realeco. La antaŭsento de poeto!

Dum kelkaj libertempaj semajnoj en 1920 mi skribis mian fantazi-sciencan romanon "La Stelo de Afriko," en kiu estas priskribita la enpenetro de l' terglobo en unu el la plej grandegaj polvo-nuboj, kiuj ekzistas en la universo, okazaĵo, kiu kaŭzos novan glaciigon de la tero. Tiukaze mi provis verŝajnigi la konstruadon kaj instaladon de grandioza flugraketo, per kiu homoj elflugas de la tero en la universon. Kiom mi surpriziĝis, kiam unu jaron poste la Bremen-a astronomo, prof. Nolke, provis, en pure scienca laboraĵo pruvi, ke fakte la glaci-epoko tre verŝajne estis kaŭzita de enpenetro de nia sun-sistemo en tiujn nubojn, kiujn ni povas observi en la aster-bildo Orion. Kaj kiom pli iĝis tiu surprizo, kiam antaŭnelonge D-ro H. Oberth publikigis verkon "La Raketo al la planed-spacoj," en kiu li--helpe de ĉiuj rimedoj de matematiko kaj inĝenier-scienco--havigis la pruvon, ke nia nuna scipovo vere ebligas al ni, konstrui raket-aparatojn, per kiuj oni povus moviĝi en la universon.

El Usono ni sciigās, ke prof. Goddard de la Clark-kolegio en Worcester jam faras eksperimentojn pri de li eltrovita raketo, kiu same kiel la mia en la romano estas forpelita en la spacon per rapide sinsekvaj eksplodoj; kaj laŭ de mi ricevita privat-sciigo D-ro Oberth provas, per kolektoj finance certigi unue la konstruon de negranda raketo. Unuavide ĉio tio aŭdiĝas tre fantazie, same fantazie kiel la supre menciitaj profetdiroj, antaŭ ol ili fariĝis memkompreneblaĵoj, nome la aviadilo, aerŝipo kaj radio, submarboato

kaj aŭto. Ankaŭ la elflugo en la spacon, la foriro de la tero, estas praa sopirdeziro, pri kiu okupiĝis jam la homoj de malproksimaj jarcentoj; al ili la flugado en la atmosfero de la tero estis malklara antaŭsento de malproksima ebleco, kiu nuntempe realiĝis. Certe la forlasado de la tero estas esence diferenca afero. Transe de la ŝirma aermentelo ekzistas kondiĉoj, kiuj unuavide ŝajne sekurigas tiun mondon por eterne kontraŭ invado per la homoj. Komenciĝas la vakuo, kiu ne plu portas iun balonon, ne plu donas al iu helico medion, en kiu aerŝipo povus forŝraŭbi sin. Homo ŝvebus tie meze de absoluta vakuo, ĉiun spiron da aero li devus kunporti en taŭgaj ujoj, la rigidiga malvarmeĝo de l'malplena spaco ĉirkaŭus lin kaj devus esti venkita en lia fluganta malliberejo. Nenio renkontus lin dum lia flugado krom la meteorŝtonoj kaj falantaj steleroj, kiuj pafiĝas je kvincentobla rapideco de ekspresvagonaro kaj kiuj eventuale povus detruu lian ĉielvojaĝ-veturilon kaj lin mem. La plej eta averio de lia maŝino reĵetigus lin de mondmalproksuno al la terglobo. En ĉiam pliiĝanta rapideco li devus falegi malsupren sur ĉi tiun planedon, kaj ŝamile al meteoro li kun sia aerŝipo arde konsumiĝus kaj disŝpruciĝus en la aermaro de la tero. Sed ĉion tion la eltrovintoj de la spac-raketo mem tre stoike pripensis kaj prikalkulis, kaj D-ro Overth en la supre citita verko, kiu entenas ankaŭ multajn konstrudetalojn, kontraŭmetis al ĉio tio la trankvilan prizorgon de l'moderna inĝeniero, kiu ekfaras grandan verkon, pri kiu li scias, ke provizore ĝi estos priĝidata.

"Ne, ..nu serioze: Ĉu vi do vere kredas ebla, ke oni povos celpafi per tiaj raketoj kaj spacŝipoj, ke oni povos viziti la lunon aŭ aliajn stelojn kaj ankaŭ reveni al la tero?..."

Mi eklevas la ŝultrojn. D-ro Overth, kiu tute ne estas fantaziulo, asertas tion, donas la pruvojn por tio. Liaj konstru-planoj ekzistas tute pretaj. Cetere: en mia skribtablo kuŝas averta memorigilo. Artikolo, kiun mi skribis en la jaro 1903, en kiu mi provis prui ion, kiun tiam la tuta mondo opiniis, nome ke ne eblu fabrikaviadilojn, kiuj povus traflugi longajn distancojn.--De post ĉi tiu fiasko mi detenis min de profetado. Rilate al la raketo en la planed-spacojn mi estas skeptulo, sed...mi neniam plu diras "neeble!" Cetere: absolute ne estas intencite, tuj flugi al la luno aŭ Marso. Unue senpasageraj raketoj suprenflugu ĝis trans la aerlimo kaj servu por sciencaj esploroj; poste oni volas progresi, eksperimenti je kunhomaj flugoj por esplori, ĉu la homo tolerus ilin. Se ĉio tio sukcesus, nur tiukaze oni povus riski la eksterordinaran: la flugon al la luno!

"Ĉu tio estas ebla?"---Mi respondas per kontraŭ-demando: Kio estas neeble? Kiel diris iam Sophokles: "Multaj gigantaĵoj ekzistas, sed nenio estas pli giganta ol la homo!"

-----P.E.SCHWERIN (Trad.)

JOHN RUSKIN. Saĝeco de arto kaj saĝeco de scienco trovas sin en senprofitema servado al la bonstato de tuta homaro.

MIA KRISTNASKA PUDINGO. (J.T.P.O'Meara)

Multe da jaroj antaŭ ol la maljuniĝon indikantaj "kornikpiedoĵ" linioj komencis difektiĝian vizaĝon, kaj kiam kalvo nek ekzistis sur mia inteligentega verto nek estis pripensata, mi perlaboris la panon sur grandega paŝtbieno proksime al la konata, historia urbo Bourke en Nova Sud-Kimrujo.

Kiam venis Kristnasko kune kun ĉiuj siaj karaj memorigaĵoj kaj agrablaj akompanaĵoj, la regiono estis suferanta de longedaŭra senpluveco, kaj estis evidente, ke se la kluzoj de la ĉielo ne baldaŭ malfermiĝos kaj priverŝos la sunbruligitan teron, ĉiu bruto en sur la paŝtbieno mortos de malsato. Kune kun tri kundungitoj mi kamploĝis en loko malproksime de la biendomo. Ni interŝanĝis la kutimajn Kristnaskajn salutojn, kaj poste mi diris, ke mi pensas, ke estus rompo de la decreguloj, se ni pasigus la tagon ne farinte Kristnaskan pudington. Mi ankaŭ diris, ke mi tre malmulte scias pri la maniero ĝin fari, kaj mi proponis, ke ni kvarope interkonsiliĝu kaj kiel eble revoki en la memoron ĉiujn konsistaĵojn de la mistera kuirajo.

"Mi scias, ke faruno estas la ĉefa ingredienco," diris unu.

"Tute ne," kontraŭdiris alia; "sekvinberoj kaj Korintaj sekvinberoj estas tio."

"Enmetu pecojn de citronŝelo," sugestis tria, "kaj iom da brando por doni al ĝi guston."

Tiamaniere ni ne kontentige diskutis kvaronon da horo. Ni decidis loti pri tio, kiu devas havi la grandan taskon fari la pudington, kaj feliĉe aŭ malfeliĉe min trafis la loto.

Miaj kunuloj kaptis ĉevalojn kaj foriris de mi al sia laboro. Mi forte sentis la respondecon pri la tasko entreprenita. Apenaŭ mi ŝutis la farunon sur la tablon, unu el miaj kamaradoj returne galopis la pordon. "Hej, amiko," li ekkriis, "vi forgesis la ovojn. Mi trovis du ovojn de emuo en la arbustaro. Ili estas tiel freŝaj kiel lekantoj; enmetu ilin en la pudington, ili donos al ĝi koloron." Mi opiniis la proponon bona kaj konsentis. Unue mi dubis pri tio, kiom uzi la faruno. Tial, ke ni estis kvar, mi pensis, ke ĉirkaŭ du funtoj (0.90 de kilogramo) por ĉiu estus sufiĉa kvanto. Ne havante pesilon, mi perokule kalkulis ok funtojn da faruno (3.62 kg.), ĉirkaŭ tri funtojn (1.36 kg.) da Korintaj sekvinberoj kaj egalan kvanton da sekvinberoj. Prave aŭ malprave mi kalkulis, ke dum la bolaĵo la granda kaj pezo de la pudingo tre malpliĝos antaŭ ol finiĝos la kuirado.

Mi elŝeligis la emuajn ovojn en sitelon kaj kirlis ilin per vergeto de eŭkalipto. Mi ŝutis la kirlaĵon sur la farunon kaj sekvinberetojn, aldonis iom da akvo kaj permane komencis kunmiksi la tuton. Laborinte je tio ĉirkaŭ dek minutojn, mi ŝutis la tre glucecan kaj flavan mason sur grandan pecon de neblankigita kalikoto, kaj, uzinte tranĉilon por forskrapo de la fingroj la restaĵon, mi zorge kunligis la tukon, envolvante en ĝi la miksaĵon. Tion mi

admirinde faris, sed konsternis min la grando de la pudingo, kaj mi timis, ke nia sola poto estas tro malgranda por povi enlasi ĝin. La poto estis la ordinara tripeĉa kuirilo uzata en la sovaĝejo kaj estis mallarĝa ĉe la supro kaj malsupro kaj tiel ŝvelforma ĉe la mezo kiel la ventro de manĝegemulo. Ĝoje kaj kontente mi trovis ke la pudingo, iom premite, povis eniri la poton, kiun ĝi tute plenigis. Metonte ĝin sur la fajron, mi subite rememoris, ke mi ne metis akvon en la poton. Jen dilemo! Kiom mi vidis, ne estis spaco por akvo. Evidente nenio estis farebla, krom elpreni la pudington kaj malpliigi ĝian amplekson. Tamen mi vane penis eltiri ĝin kaj tial mi riskis meti la poton sur la fajron, pensante: "Nu, mi ne povas boligi, tial mi rostos, ĉar ni volas havi Kristnaskan pudington, kaj tian ni nepre havos, kia ajn ĝi estu."

Mi sidigis sur ŝtupo kaj atentege atendis tion, kio okazos. Baldaŭ fariĝis interna moviĝado. La pudingo komencis strange sibli kaj fari bul-bul-bul-sonojn, kaj mi flaris neplaĉan odoron de brulanta tuko. Mi longe kaj profunde konsideris pri tio, kion fari en la neatenditaj cirkonstancoj. Mi diris al mi: "Mi verŝos akvon sur la pudington kaj lasos ĝin penetri; eble tio utilos." Sur la fajro sidis kerosena ladvazo, entenanta bolantan akvon. Mi antaŭe intencis kuiri en tio pecon de pekita bovaĵo, sed tion mi tute forgesis pro mia eksciteco. El tiu ladvazo mi ĉerpis kruĉon post kruĉo da akvo kaj verŝis ĝin sur la pudington. Por ke la provizo da akvo ne elĉerpiĝu, mi metis sur la fajron ankoraŭ unu sitelon. Pasadis horo post horo, kaj de tempo al tempo mi verŝis pluan akvon por kompensi la forvaporigon.

Fine miaj kamaradoj revenis kun apetitoj intensigitaj pro la atendata Kristnaska festeno. Multfoje kaj avide ili demandis min, kiel iras la kuirado, kaj laŭtaj kaj teruraj estis iliaj minacoj de puno se la pudingo ne estos tiel bongusta, kiel ili esperas.

Kiam mi volis ne plu atendi, mi prenis la poton de sur la fajro kaj, iom timante pro ebla okaziĝo, mi komencis elpreni la pudington. La rezulto de forta tiro estis, ke peco el la kalikota tuko deigis en mia mano, ĉar ŝajne la malsupra parto jam antaŭe forbruliĝis. Ni batadis ĝin kontraŭ la tablon, kaj ĉe tio jen! eligis la supra parto de la pudingo. Ĝi bele aspektis, kaj ĝia aromo parfumis la ĉambron kaj forte rememorigis al ni la tempon, kiam ni estis junaj kaj senpekaj. Ĝis tio, bone! Mi komencis denove facile spiri. Post multa penado kaj iom de malbenado ni elpotigis la ceteron de la mistera kuirajo. Ni estis kvazaŭ fulmofrapitaj. Ĝi havis kruston de dikeco de colo (25.4 milimetroj), kaj la internaĵo estis peco de Kristnasko kuko, ol kiu neniam homaj okuloj vidis pli belaspektan. Bole kuiriginta estis la supra parto kaj bakita la malsupra parto.

Ni bonege festenis tiun posttagmezon, kaj mi estis la heroo de la okazo. Mi lasas al la legantoj konkludi kiel fariĝis la eksterordinara rezulto de mia kuirado, sed mi fierad pri tio, ke unika kaj rekorda estis tia kombinaĵo kiel Kristnask pudingo kaj Krist-

naska kuko kune kuirita en unu potu.

(Represe el la Suda Kruco, Okt.1928 . Tradukis ĝin G.GORDON).

ENIGMOJ.

1. KVADRATO. (1) Besto. (2) En maniero de ia senpeza substanco. (3) Stato de la atmosfero. (4) Kapti por malliberigi (5) Kapabla plenumi facile ion.
2. GRANDIGA VORTO. Mi estas moviĝo; aldonu kapon, mi estas ŝmiraĵo; aldonu voston, mi estas spektaklo; aldonu voston, mi estas rondo; enmetu litebon mi pasas de iu al alia.
3. ŜTUPARA VORTO. Ŝangu la vorton VERM en la vorton BIRD; ĉiufoje po unu litero por formi novan vorton. Ĉu vi povas uzi malpli ol kvar inĝeraj ŝtupaj vortoj? Ekz. KAT MAT MUT MUS
4. AŬTORO KAJ VERKO. Metu la subajn vortojn unu sub la alia sinsekve. La vico de la unuaj leteroj donas grandaniman homon, kaj la vico de la lastaj literoj donas lian verkon:-
(1) Aplikante serioze la atenton al io. (2) Kolekto (3) Karto kiu prezentas landon (4) Havante nenium finiĝon (5) Adverbo (6) Elkrio ĝoja (7) Maro (8) Ano de religia ordeno.

5. BESTO.

Mia unua estas en inkujo sed ne en plum!
Mia dua estas en granat' sed ne en pom!
Mia tria estas en merin' sed ne en ŝaf'
Mia kvara estas en tegment' sed ne en mur'
Mia kvina estas en sekund' sed ne en hor'
Mia sesa estas en karot' sed ne en bet'
Mia sepa estas en kajut' sed ne en ŝip'
Mia tuto estas besto.

Por solvoj vidu paĝon 39

IOM.

ŜTELISTOJ EN NIA KOKINEJO.

En la mezo de la nokto mi aŭdis grandegan bruon de klukantaj kokinoj. Mi ekpaliĝis kaj alvokis miajn fratojn. "Aŭskultu," mi diris, "tre certe estas ŝtelistoj en nia kokinejo."

"Jes, certe," konsentis unu frato, "mi avertos paĉjon." Ni ĉiuj alfrapis al la pordo de nia gepatra dormĉambro. "Paĉjo! Ŝtelistoj estas en nia kokinejo, Venu, paĉjo, ni volas kapti ilin!"

Nia patro nerveme prenis revolveron kaj ni armitaj per bastonoj kaj balailoj sekvis lin. Kelke da metroj for de la kokinejo nia patro ne plu povis regi la nervojn, kaj pafis. Ŝajnis ke la ŝtelistoj ne aŭdis tion, ĉar la klukanta bruado daŭris. Paŝon post paŝo ni ĉirkaŭpromenis la gekokejon. Unu el miaj fratoj kuragiis

rigardi tra la vitroj kaj li diris "Paĉjo! Nenio sin movis en la ejo, nek kokinoj nek ŝtelistoj." Tamen la gekokoj persistis klukadi. Kia stranga afero! Mi rigardis en ĉiu angulo sed ne povis trovi ion.

Finfine mi vidis ion moviĝi en la herbejo. Alproksimiĝante, ni ekrigardis kokinon kiu ne havis plumojn kaj nude kuŝis flanke de erinaco. Tiu ĉi eble volis amikiĝi kun ŝi, sed la nuda kokino estis viktimo de la akraj pikiloj de la kunulo. Ni ĉiuj devis ridegi pri tio, sed en la komenco ŝajnis ke ni iris al bataalkampo.

----- G.H.GEENAN.

FESTSEZONA SALUTO.

La Administracio salutas la legantojn okaze de la jarfino kaj festa sezono. Ankoraŭ unu dek du monatojn la gazeto seninterrompe eldoniĝis, malgraŭ la premo de diversaj malfaciloj. La jaro vidis pliboniĝon en la Esperanta mondo, ĉar en la liberaj landoj la movado efektive progresis, kaj prosperis al grandaj teritorioj jam forskui la jugon de malkultura barbarismo kiun forĝis sur ilin la faŝista teroro. Per tio baldaŭ sin grupiĝos la tie troviĝantaj Esperantistoj, kiuj sendube metas sian forton dispone al la centra organizacio kiam la teruraj vundoj de la kataklismo iom cikatriĝos.

Danke al S-ino Hanks kaj aliaj la propagando radia bele antaŭen marŝis, kaj ankaŭ la gazetojn la vigluloj trafe uzis laŭ sia eblo.

La nova kovrilo ricevis vastan aprobon, kune kun la utila kaj interesa legaĵo per kiu ĉiu numero estis peze ŝarĝita. Ni daŭrigu, per la komuna laboro de niaj bonvolantoj, kiuj tiel malavare, per mono aŭ plumo, kontribuis al nia sukceso.

-----LA ADMINISTRACIO.

ASOCIAJ AFEROJ.

JARLIBRO. Ĉiu membro jam devus ricevi sian ekzempleron de la jarlibro. Espereble vi tenos ĝin kaj ĉiam certigos ke, skribonte al la Asocio, vi turnas vin al la ĝusta oficitenanto. Se iu Individua Membro ne ricevis privatane ekzempleron, li skribu al F-ino Addis, kiu sendos ĝin.

Post la pretigo de la manuskripto kelkaj ŝanĝoj okazis. Sur p. 10---MA (Membro-Abonanto): ŝanĝu 10/- al 11/3. Ankaŭ sur paĝo 12 notu ke la prezo de Step by Step, Butler (paper) nun estas 4/3. Sur paĝo 17 (linioj 2 kaj 3), forstreku de "kaj rajtas formi" ĝis "ekzameno."

PROPAGANDO. La lastaj monatoj v idis pli grandajn penojn de Esperantistoj en Aŭst. ol iam ĉdummilite. Samideanoj en preskaŭ ĉiu landparto meritas laŭdon pro tiu bona laboro. Espereble multaj leteroj atingos "A.B.C.Weekly" pri la radio-parolo de S-ino Hanks

"Esperanto was our magic key," la Nacia Programo la 21an de Nov. Tiu parolo estas eble la pli grava propagandajo aranĝita en nia lando dum multaj jaroj. Gratulojn al S-ino Hanks. Ni denove admonas membrojn sendi al la Prez. de Propagandista Komitato (S-ro WANMER, Qld) raportan pri farita propagando.

GRUPO-KOTIZOJ. Sekretarioj bonvolu noti, ke la Grupa Kotizo nun saldiĝas. Laŭstatute Grupoj pagas "6/- ĝis 72 membroj, kaj unu plia penco por ĉiu plia ~~numero~~." (Minimume 6/-)

SALUTON. Al ĉiu Membro de la Sekretario. Via Kristnasko estu ĝojoplena, kaj la novjaro pacovena.

-----G.H. HILLERMAN (Sek.)
15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

KUN PLAĈO ni ricevis el Dublin du foliojn da turisma materialo, en kiuj la dolĉaj oportunaĵoj de la Smeralda Insulo estas loge prezentataj. La adreso de la entreprenintoj estas: Lorcan O'Uiginn, Sonas, Cnoc na hInneona, Dundroma-Dublin, Irlando.

SVEDA GAZETO HAVEBLA! S-ro F.A.PITT (Peranto, Vikt.) skribas:-
Jus alvenis min 3 ekzempleroj de "Malgranda Revuo," kvaronjara libreto, redaktata kaj eldonata de Stellen Engholm, la konata Sveda Esperantisto. "La Revuo" estas en bona formato. 8½" x 5½", sur bona papero, kun bela, klara tipo. La enhavo estas bone aranĝita kaj tre okulplaĉa.

Diversnaciaj verkistoj aldonas la materialon. Rakontoj, artikoloj kaj poemoj, tradukoj de indaj nacilingvaj verkaĵoj kaj majstraj artikoloj de St. Engholm mem kaj aliaj pri mondaj kaj Esperantaj temoj tre diversigas kaj interesigas la Revuon.

Bedaŭrinde mi havas nur No.2, la jaro (1943) N-roj 1 kaj 2, 2a jaro (1944) por vendi, sed ĉiu estas kompleta en si. Mi havas 24 ekz.ojn de ĉiu numero kaj tuj sendos jepete. La prezo estas 1/6 plus sendkostoj ..

KVINSLANDI. Intereso de la internacilingva demando forte aŭdiĝis ĉe kunveno de la Kristana Asocio de Junaj Virinoj en Brisbano. Arangiĝis ĝan ties suborgano World's Fellowship Council. Inter multkapa alestantaro troviĝis surpriza nombro da E-istoj aŭ poresperantanoj. La ĉefa parolanto D-ro L.J.Nye, diris ke ankaŭ li iam estis E-isto arda, sed pro la ŝajne malrapida progreso de la movado li kompostiom perdis fervoron, demandante al si: ĉu ne fariĝeblus la ia sistemo kiu pli vaste, loge interesus la homojn sur la mondo. Li opinias ke int. lang. devus havi Aziajn radikojn.

Unu-du (mar)armeanoj Usonaj, kiuj interesas sin pri la kulturaj aferoj, parolis favore al E-o. Inter aliaj virinoj parolis Latvino, kaj f-ino Esther Soong, sek-iino de majoro-generalo Wang, Ĉina armea oficiro en la sudpacifika zono.

S-ro F.T.Simon, konata E-isto, rekte traktis la rimarkojn de d-ro Nye pri tiel nomita limaka movigado de E-o dum la lasta du-deko da jaroj. Citante statistikon, li klarigis kiom ĝia influo kaj praktiko efektive etendiĝis en la lastatempo, kaj kiel vigle ĝi ankoraŭ vivas malgraŭ la ondoj de malidealismo en kiu la mondo preskaŭ dronos. (S.WANMER)

Rimarko de la Redaktoro. D-ro Dye devus legi ĉapitron 8 de "The Language Problem" de Durrant. En ĝi li lernus ke ĝenerale akceptita inter la mondlingvistoj estas la prin cipo fundamenta: Internacia Lingvo devas baziĝi sur la Arjaj lingvoj--- tio estas sur la lingvoj A.F.G.S.I.R. La vortaro de Esp-o do estas baze tia, sed ĝia aglutina karaktero aparte taŭgigas ĝin por Aziaj, Dravidaj, Turĉaj, Finn -Ugraj kaj aliaj lingvaj grupoj kies idiomoj havas tiun povon sensange kombini radikojn aŭ aliajn elementojn en unu kunmetitan formon. Sub certaj kondiĉoj la ne-Eŭropaj popoloj konsentus lerni "simpligitan Arjan," same kiel ili plimalpli komplete adoptas Arjan civilizon, teknikon, sed la kontraŭa ne estas vera. Eŭropanoj rezignus inter. lingvon prefere ol koncerni sin kun lingvo bazita ekzemple sur Japana, Hinda, kaj Mongola. Kompreneble, Aziaj vortoj kiaj kimono, geiŝo, piĵamo, bonzo, povas eniri Esperanton laŭ Regulo XV kaj eĉ ifariĝi oficialaj se ili komune akceptiĝas.

"Mia scio de Esp-o formiĝis nur el la Praktika Kurso, sed mi decidis viziti la delegiton de I.E.L. S-ron Magnusson...pli ol horon ni interparolis, plene komprenante nin...S-ro M. gvidas kurson ĉirkaŭ 50-membran en Reykjavik." (Ano de la Reĝa Flugarmeo en Islando). Trad. resume el Brit. Esp. Sep.44.

"My study of Basic English and Interglossa has left me with a still stronger faith in Esperanto." Prof. W.E.Collinson, Liverpool Univ.

B.E.A.Advanced Exam. (Oral Part): David Miller, B.A., Victoria Park, W.Australia. Gratulon.

ERAROJ en la Nov. numero:- 16/10 komponistoj. 16/17 asertadis. 16/23 civitano. 16/29 karieroj. 16/30 kvartalo. 17/7 politike. 17/18 fajrerojn. 23/20 9/- Angle. 25/13 de malsupro: sendependa. 27/1 rajtas.

SOLVOJ. Vidu p. 36.

1. KVADRATO. ĈEVAL ETERE VETER AREST LERTA
2. GRANDIĜA VORTO. IR CIR CIRK CIRKL CIRKUL
3. ŜTUPARA VORTO. Jen unu solvo: VERM VERD PERD PORD BORD (BIRD.)
4. AŬTORO kaj VERKO. ZorgE AmAS MaP Eterne NuR HurA Ocean
Frat ZAMENHOF ESPERANT
5. Besto, KANGURU

KASO de LA RONDO. Kvitancoj Ricevitaj dum Novembro:-
 S-ro Calwell 5/-. F-ino Cox 5/-. S-ro Chambers 10/-. F-ino Helm 5/-
 F-ino Shervington 5/-. S-ro Shelton 5/-. S-ro Brown 5/-. S-ro P.
 Leahy 5/-. S-ro K.Hirschell 5/-. F-ino Kemp 5/-. £2.15.0 Al la
 Generala Kaso 16/6. Al la Kaso de La Rondo £1.18.6.
 Elspezoj £2.14.7 Deficito 16/1

Please add exchange to the cheques, and make them Payable to the Cashier personally.

F-ino W.ADDIS, (Kasistino)
 25 Greville Avenue, Flinders Park, S.Aus.

TRADUK-KONKURSOJ.

Trad uko de Konkurso 16: (Komplitia el 3 tradukoj)

Dum mia vagad-vojaĝo mi estis parolinta kun nudpiedaj homoj, kiuj neniam vidis neĝon, kun aliaj, kiuj neniam vidis la maron aŭ monton. Je unu flanko de la tero mi aŭdis tiujn du, ege respektitajn vortojn: "Kristaneco," "Demokratio". Je la alia flanko mi vidis, de malproksime, orajn idolojn en temploj, kiujn eniri mi ne estis permesita. Eĉ tiu universala vorto "libereco", kriegata aŭ frustrata en ĉiuj latitudoj, ne havis ĉie la saman signifon. La libereco de la Ĉinoj, la libereco de la Rusoj, estis neniel komparebla al tiu de la Angloj aŭ Amerikanoj. Ne, la mondo ne estis malgranda---ne malgranda eĉ por tiuj, kiuj vojaĝis plenrapide. La sennombraj amasoj de "ordinaraj Homoj" kun blankaj, brunaj, nigraj aŭ flavaj haŭtoj ne vojaĝis per "Clipper"-aviadiloj: nacioj ne moviĝas.

Venkinta Grupo: Sydney Esperanto Society.

Tradukota Teksto, Konkurso 18.

Mrs. Miniver woke up one morning with a sense of doom, a knowledge that the day contained something to be dreaded. It was not a crushing weight, such as an operation, or seeing one's best friend off to live in Tasmania; nor was it anything so light as a committee meeting, or a deaf uncle to tea: it was a kind of welter-weight doom.

At first it puzzled her. So far as she knew, she had no appointments that day, either pleasant or unpleasant, and that in itself was good. To be entirely at leisure for one day is to be for one day immortal. According to the Chinese proverb she ought to have been feeling god-like. But the small, dull weight continued to drag and nag. (Jan Struther: Mrs. Miniver)

Tradukoj devas atingi la subskribinton antaŭ la 10.1.45.
P.E.SCHWERIN, 1 Carabella Flats, McDougall St., MILSONS POINT, NSW.

LINGVAJ NOTOJ.

"Akurate" NE signifas "accurately" sed "punctually". La Angla "accurately" tradukiĝas ĝuste per "precize, ekzakte, ĝuste." Sama formo, nesama senco---"falsaj amikoj."

BRAVA. Tiu estas Fundamenta radiko: valiant, brave. Krom esti sinonimo de "kuraga", "maltima", "sentima", ĝi jam signifas (simile al la Franca "brave") ankaŭ (a) "preta por plenumi sian devon, honesta, senartifika, lojala; (b) preta por fari komplezon al alia bonkara. En (a) la Angla ekvivalento estas worthy, good, honest, open; en (b) fine, "good sort". Malgraŭ la fakto, ke la Fund. donas al "brava" la solan senco, ŝajnas al multaj strange uzi ĝin anstataŭ "kuraga", "sentima", ĉar per tio povas ekestiĝi dubesencaĵoj.

NAMED AFTER HIS FATHER. Komparu "Ili nomas siajn bienojn laŭ siaj nomoj", Psalmo 49/11, Genezo 4/17.

PERSONO. Homa individuo konsiderata kiel konscia, respondema, kaj havanta devojn kaj rajtojn. Tamen eĉ bonaj verkistoj foje uzas ĝin por eviti trooftan "homo", sed ĝi ne estas perfekta sinonimo, se efektive ekzistas tia.

NOW THAT... Ne uzu "nun, ke", kio estas Angla idiotismo. La vortoj esprimas ŝanĝon de cirkonstancoj, kaj la Esp-a ekvivalento estas "jam". (I felt more easy now that I had the papers---Mi jam sentis min pli trankvila pro tio, ke mi havas...)

VOLI, DEZIRI. Tiuj ne estas sinonimoj ĉie interŝangeblaj. Por eviti malagrablajn mi volas pagi troalte postulitan imposton, sed ne deziras pagi. Mi volas preni aĝustan medikamenton, sed ne deziras preni. Ĉu vi volus helpi min? (Mi ne rajtas pensi, ke vi dezirus tion, sed pro ĝentileco eble volus....)

ZAMENHOF said, Respondo 47 (1911),...ni neniam devas diri "Meksikujo": ni devus diri "Meksiko", sed, por fari diferencon inter la urbo kaj la samnoma lando, mi konsilas fari tion, kion ni faris kun aliaj samcirkonstancaj landoj, t.e., nomi la urbon "Meksiko" kaj la landon "Meksikio" (kiel Alĝero, Alĝerio, Tuniso, Tunisio). Ĉu ni nomu la senmortan M. Porcius Cato---Kato? En "Proverb-aro Esperanta" Zamenhof skribis "Vizaĝo de Katono, sed virto de fripono."

AMBAŬ. (Lingvaj Respondoj No. 54. 1911) Ambaŭ signifas "ĉiuj du", t.e., ĝi estas uzata anstataŭ "ĉiuj", kiam ni parolas nur pri du personoj aŭ objektoj. Tial la konjunkcian uzadon de "ambaŭ" en la frazo "ni loĝas en Londono ambaŭ en somero kaj en vintro" mi trovas tute ne aprobinda (estas konsilinde diri, "kiel en somero, tiel ankaŭ en vintro"). Kvankam mi ofte uzis la formon "la ambaŭ", tamen mi opinias nun, ke pli logika estas uzi la vorton "ambaŭ" sen artikolo. But Zam. used "la ambaŭ" in Fabeloj de Andersen,

translated years after the above was written. Fabeloj Vol 1, 36, ni ambaŭ reciproke revidos. p.69 La ambaŭ trompantoj petis... p.144...por ke ni povu komparu la "Uzo de la artikolo apud "ambaŭ" estas senutila kaj malkonsilinda." (Plena Gramatiko).

KRISTNASKAJN SALUTOJN al AŬSTRALIAJ SAMIDEANOJ.

Denove ni interŝanĝas kristnaskajn salutojn dum la nacioj ankoraŭ furioze militas kaj la deziro "Paco sur la tero", "Bonvolo al ĉiuj homoj" ŝajnas nur moko.

Sed spite de la nigraj nuboj de militoj, ni devas fikse rigardi al nia stelo--la verda stelo de la espero--la espero ke nia deziro ja efektiviĝos. Eble nuntempe estas pli necese ol iam antaŭe ke ni Esperantistoj pensu pri nia idealo---la frateco de la homaro. Ni devas batali kontraŭ la malamo kaj suspekto montritaj al ali-landuloj. Ni devas varbi kiel oble plej multajn personojn kiuj havas aŭ akiros la samajn idealojn kiel ni. S-ro Churchill kaj aliaj estroj profetas ke la milito finiĝos dum la venonta jaro, kaj ni povas atendi ke, tre baldaŭ, multaj personoj kiuj dum la militjaroj estis tro aferplenaj por labori en la movado nia, revenos al niaj rondoj pretaj por antaŭenpuŝi Esperanton. Tial ni estu pretaj por la forta kaj entuziasma kunlaboro kiu, post la reveno de la sopirata paco, rapidigas la epokon de la homa frateco.

-----FLORENCE RAWSON.

Prez. A. E. A.

KALOCSAY KONSCIENCA.

La traduko de "La Sorĉlernanto" de Goethe reprezentas la frukton de trijara prilaboro. Pri ĝi la Hungara majstro diris: "Ĝi turmentis min kvazaŭ inkubo; malfrue en la nokto mi kuŝis sur kanapo, jam tute elĉerpiginta, sed mi ne povis endormiĝi ne trovinte la solvon." Eĉ "La Korvo" de Poe, kies tradukon oni nomis perfekta, ne donis al li plenan kontenton. Al la refreno "Neniam plu" li preferus la funebrovekan Eterne for", kiu laŭsone respondus al la "Nevermore". Sed kia laboro estus la ŝanĝo de la rimoj! (El "Argenta Duopo", Hungarujo.)

STRANGAJ NOMOJ...KAJ HOMOJ!

En "Renovigo" (Meksikio) de Aŭg. ni legis: "Laŭ la angloj, skotoj estas famaj pro sia avareco kaj iroj pro sia idioteco..." Konsekvence la aŭtoro, S-ro Redondo, devas nomi Islandanon iso, kaj Grén; andanon---greno!